

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.


A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 92 (172)

MELBURNO

Jan.-Feb., 1971

18th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS 2-8 January, 1972, Melbourne



This Congress will be held at Queen's College of Melbourne University and will be a live-in Congress. Accommodation will consist of comfortable one-bed rooms, and members will dine in an imposing dining hall. Restful, spacious grounds, with ample parking space will be available.

Ever-rising costs make it impossible to give an exact tariff at this stage, but full board (room and five meals) should be approximately 8 to 8.50 dollars per day.

Congress fee: before first of July, 1971 for A.E.A. members— 5 dol. For others, 6 dol.

After 1 July, 1971: for A.E.A. members, 6 dol. For others, 7 dol. Non-attending members: 2.50.

Send your room reservations (5 dol. deposit) and Congress fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122T, G.P.O., Melbourne 3001.

FIRST LIST OF CONGRESS MEMBERS

1. K. Linton, Caulfield, Vic.
2. H. Koppel, Reservoir, Vic.
3. Mrs. F. Koppel, Reservoir, Vic.
4. Mrs. V. King, E. Malvern, Vic.
5. A. Heathfield, Surrey Hills, Vic.
6. Miss A. Hearn, Malvern, Vic.
7. Mrs. M. Casey, Caulfield, Vic.
8. Mrs. A. Paling, Glen Iris, Vic.
9. Miss L. Hooper, Glen Iris, Vic.
10. D. Bowie, Newport, Vic.
11. T. Pisz, Malvern, Vic.

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

OFFICIAL NOTICES

27th January, 1971

New Individual Members

Robinson, Mr. W. R., Fitzroy, Vic.
Cox, Mr. J. F., Kingsgrove, N.S.W.
Williams, Mrs. B. M., Morningside, Qld.

Chester, Mrs. E., Scarborough, Qld.
 Graham, Mrs. E., Mylestom, N.S.W.
 Clarke, Mr. B., Castle Hill, N.S.W.

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$790.81
C. C. G., N.S.W.	2.00
Mayall, Mrs. J., Vic.	1.00
Timmins, Mr. V. J., N.S.W.	1.00
Hornsby Esperanto Group, N.S.W.	4.00
Jullie, Miss L., N.S.W.	1.00
Lindsay, Miss J. S., W.A.	1.00
Mason, Mr. H., Vic.	1.00
Grimage, Mr. G. W., Tas.	3.00
Minton, Miss E. C., Tas	5.00
Bowes, Miss T., Qld.	2.00
Rosengren, Mr. H., Vic.	2.00
Scarfe, Mr. W. J., Vic.	1.00
Brooks, Mr. R. E. C., Vic.	1.00
Hopkins, Mrs. A., Vic.	2.00
Kemp, Miss F. H., Vic.	5.00
Keogh, Mr. J., Vic.	2.00
Morrison, Mr. R., Vic.	2.00
Telfer, Miss R. G., S.A.	1.00
Grafen, Mr. W. C. J., Vic.	1.00
Blockley, Mrs. S., W.A.	2.00
Caldera, Dr. C. J., W.A.	2.00
Hotton, Mrs. S. L., N.S.W.	4.20
Fletcher, Mr. V. E., N.S.W.	1.60

\$838.61

Sincere thanks to all helpers.

Book Service: Please note the new address of the A.E.A. Book Service: Mr. T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036, and add this to the book list in the Adresaro.

Interstate Competition

Points allotted

New Individual Member	5
New Life Member	50
Popular Course enrolment	2
Intermediate Course enrolment	5
Advanced Course enrolment	10
Elementary Examination success	2
Advanced Examination success	5
"Klereca" Examination success	10
Each \$1 to the Publicity Fund	1

Positions on 27th January, 1971

	Quota	Points	%
Queensland	130	732	563.1
Victoria	300	1084	361.3
N.S.W. & A.C.T.	260	860	330.8
W. Australia	80	223	275.0
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	48	120.0

C. C. Goldsmith,

Secretary.

EKZAMENOJ DE A.E.A.

S-ino Winsome Greenhalgh, St. Lucia,
 Q. Supera, kun laido.

U.S. UNIVERSITY SYSTEM

Esperanto Information Centre, 410
 Darrell Rd., Hillsborough, Cal. 94010.

in letter to "Tiny", tells of the U.S. University system, with special reference to a 3-weeks residential course on Esperanto (basic, intermediate and advanced) at San Francisco State College, July 5-23. Professors: Drs. R. Trapp, O'Connor, Wm. Auld

Noted also: After 2-3 years of experimentation, some 200 elementary schools in Hawaii (U.S. State) begin teaching Esperanto from 1 Sept. 1971. Above letter available from Editor, "The A-E".

A.E.A. en 1970

Kutime ni donas dujaran raporton ĉe nia kongreso, sed jen mallonga raporto pri agado en 1970.

Membraro. Nia Asocio havis je la fino de Novembro 1970 348 individuajn membrojn kaj 62 Asociajn membrojn; sume 410. Ni opinias, ke se ni havus 500 individuajn membrojn ne necesus ke ni petu donacojn, kaj ni ne estos kontentaj ĝis ni atingos tiun nombron.

Publicigo. Ni daŭrigis presigi verdajn kartojn, sed kun nova teksto, kaj multaj membroj helpis la distribuadon. Dum la jaro ni ricevis 494 informpetojn, kaj rezultis 76 aliĝoj al la Populara Korespondanta Kurso. En alia loko S-ro Petley donas informon pri publicigo en gazetoj, k.t.p.

Korespondaj kursoj. Krom la supre cititaj, 34 aliĝis al la Mezgrada Kurso, kaj 8 al la Altgrada Kurso. Efektive pli ol 75% el tiuj, kiuj finis la Popularan Kurson, aliĝis al la Mezgrada; la sama proporcio validas rilate al la Mezgrada kaj Altgrada kursoj.

Publiciga Fonduso. Dum la jaro niaj subtenantoj helpis per donacoj, kiuj sumiĝis \$265. Al ili ni tre kore dankas, ĉar sen tia helpo ni ne povis esti farintaj la agadon pere de la verdaj kartoĵoj kaj la broŝuro "Freedom of Speech". Tiu estis preskaŭ elĉerpita je la fino de la jaro, kaj nova eldono estis tiam presata por helpi al la agado dum 1971.

Interŝtata Konkurso. Raporton pri la nuna stato troviĝas aliloke en la nuna numero, kaj ni gratulas al Queensland pro ĝia daŭra sukceso. La konkurso finiĝos je la fino de Novembro 1971, kaj ni anoncos la rezulton ĉe la kongreso en Melbourne.

Gazeto. Laŭ nia promeso ni eldonis 11 numerojn dum la jaro, kaj tiel ni esperas daŭrigi en venontaj jaroj. Se niaj membroj daŭrigos sian subtenon, kaj se ni povos varbi novajn membrojn, ni kredeble povos doni pli da paĝoj de tempo al tempo. Almenaŭ ni tion esperas. S-ro F. R. Banham daŭrigas sian bonan laboron, redaktante nian gazeton, kaj, kvankam li afable cedis al

pledo por pli populara enhavo, li ankoraŭ konservas tian altan normon, pro kiu la A. E. estas bone konata. Ni tre dankas al li, kaj ne nur pro tio, sed ankaŭ por lia laŭdinda kvankam iom silenta laboro pri la asociaj ekzamenoj.

F-ino Virginia Cox, kiu dum multaj jaroj administris la dissendon de nia gazeto, ekzigis je la fino de la jaro, kaj ni tre dankas al ŝi pro ŝia helpo. Anstataŭas ŝin S-ino Mary Fordham, Chadstone, Vic., kaj ni deziras al ŝi bonan sukceson.

Libroservo. S-ino Ivy Fallu tre bone gvidis tiun dum la jaro kaj ni tre dankas al ŝi. Ĉar ŝi estos eksterlande dum pluraj monatoj, ŝi ekzigas frue en 1971, kaj anstataŭos sin S-ro T. Elliott en Sydney. Vidu paĝojn 98, 100.

Ekzamenoj. Dum la jaro ok kandidatoj sukcesis akiri nian Elementan Diplomon, kaj unu la Superan. Krome unu membro akiris la Diplomon de la Brita Asocio. Ni esperas ke pli da membroj kandidatiĝos en 1971.

Financo. Sur alia paĝo vi vidos, ke la kreditsaldo je la komenco de la jaro estis \$1198 kaj je la fino estis \$1623, malgraŭ la granda kresko de la elspezoj.

Ni sincere dankas al ĉiu kiu helpis nin en tiu agado. Ni esperas, ke multaj aliaj helpos per kunlaboro en la nuna jaro; kunlaboro per varbado de novaj membroj, kaj per distribuo aŭ dissendo de verdaj kartoj, estas tre valora. Ne forgesu, ke ju pli da Esperantistoj estas en la mondo, des pli utila estos nia lingvo al ĉiu. Ni petas, ke vi helpu al ni atingi eĉ pli bonan rezulton en la nuna jaro.

—K. G. Linton, Prezidanto. C. C. Goldsmith, Sekretario.

ARTHUR KAJ EILEEN OLIVER

Forlasante Aŭstralion post tro mal-longa dumonata restado, ni deziras saluti kaj danki niajn multajn ĝeamikojn, kiuj tiom bonvenigis, gastigis kaj helpis nin diversmaniere. Ni bedaŭras, ke cirkonstancoj ne permesis al ni pli multe partopreni la Esperantistan vivon ĉi tie, sed ni treege ĝojas, ke ni povis ĉeesti almenaŭ du-tri kunvenojn, kaj ni foriras kun memoroj ne nur de plej bonkoraj, gastigemaj kaj ŝatindaj samideanoj, sed ankaŭ de plej viglaj kaj entuziasmaj laborantoj por la Movado. Ni esperas iam revidi vin — Arthur C. Oliver: Eileen C. Oliver. 20/1/1971.

FRENCH STAMP EXHIBITION

"A travelling stamp exhibition of the Youth Federation of Young Esperantists of France will include an Australian section. This is being prepared by the philatelic delegate of the Universal Esperanto Association, Mr. Eino Loooris of Hobart, and will be despatched next month". —The Mercury, Hobart.

A generous worker for the Seamen's Mission, he visits many a foreign vessel, adding to his bounty helpful words about Esperanto. In other fields also he "semas kaj semas konstante". See: The A.E., 3, 6, 12/1967; 6/1968; 1, 6/1969; 1, 9/1970.— Editor.

CHILDREN'S ESP. CONGRESS

The 12th International Infana Kongreseto (U.E.A.) will be held at Romney Marsh, Kent, from 30th July to 6 Aug., with freewill extension to 13th., for children aged 6-16. Partakers with teaching ability are warmly invited to cooperate; food and lodging is free for them. Visiting E-ists, look in on them if possible. Leader: Raif Makarian, 87 Sebastian Avenue, Shenfield, Essex. (I have full details—Editor).

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: La ĝenerala kunveno okazis frue en Dec. 1970. Rezulto:— Prez., Ruth McGrath; vicprez-oj, C. Dean, J. Finch; sek., W. Howard; Kasisto, Edith Palmer; ekzamenisto, D-ro Caldera; bibliotek., Gertrude Pollard.

Je 15/12, la Ligo celebris la Zamenhofan tagon. Vespere 60 anoj kaj vizitantoj festenis en la Motel Forrest. Plitigis la ĝuadon la parolado de D-ro Caldera, kiu senteme parolis pri la grandanima Zamenhof. D-ro Einihoviĉi fervore subtenis la esprimojn de D-ro Caldera. Sekvis kantoj de vizitanto, kaj grupano prezentis lumbildojn.

J. Hawks nun komencas mondvagadon. Tial la Liganoj atendas korespondajn el eksterlandoj . . . fakte kie ajn Jack trovos sin.

La unua komitata kunveno okazis 7/1. Bedaŭre J. Finch ne ĉeestis, ĉar li suferas okulmalsanon. Al li baldaŭan resaniĝon! —G. Pollard.

ADELAIDE: Kunveno honore al D-ro Zamenhof okazis en la hejmo de S-ino Fulton, sed mankas detaloj pri la programo.

MELBOURNE: La plej elstara evento en Decembro 1970 estis la vizito de S-ro Tibor Sekelj (Belgrado), eminenta aŭtoro kaj mondvojaĝanto. La 9-an de Dec. S-ro Sekelj alflugis Melburnon per

jugoslava aerkompanio, kaj AEA-Prez. Ken Linton atendis lin ĉe la aerodromo. La 12-an la gasto estis la ĉefparolanto ĉe la Zamenhof-Festo en la YWCA-Halo. Lia temo: **Nuntempaj tendencoj en la E-a Movado.**

En trafa enkonduko pri la nuna stato de la movado, li atentigis, ke ĝi multloke stagnas, kaj ĝenerale, pro malproporcia kresko de la monda loĝantaro, ĝi efektive regresas rilatume. Krome, la granda plimulto de la organizitaj E-istoj estas pli ol 50-jaraĝa.

Li skizis la tri etapojn de E-o: (1) La kreo, struktura stabiligo de la lingvo E-o. (2) La organizado ĉela al la kreo de E-a "popolo", sen kiu neni lingvo efektive "vivas". Fondo de centra instituto reprezentanta voĉi-povan popolon tutmondan, (3) La enkonduko de E-o en la praktikadon, uzadon oficialan; tion ankoraŭ ni ne plenumis, sed devas diligente ellabori ĝin per efektiva penetro en publikajn uz-kampojn. Tion klopodas fari la Instituto por la Oficialigo de Esperanto.

La tutan paroladon karakterizis sana realismo, inspirita de ĝisosta fido al nia afero; mankis naiva optimismo, senefika fanfarono.

Alvoko kree pozitiva — purige konstrua kontribuo al nia penso kaj, esperable, ag-instigo.

Ceestis 59 gesamideanoj, kiujn unue regalis Kim Bastin per pianludado. La prezidanto de la 4 Melburnaj grupoj kaj S-ro I. Maddern (Morwell) salutis la ĉeestantojn, inter kiuj troviĝis 4 anoj de la nova Morwell-grupo. Amuzan melodramon prezentis la membroj de la Boronia-grupo. S-ro Arnold Baldwin donis revuon pri eventoj kaj agadoj dum 1970 kaj prezentis donacojn al S-ro Marshall Cohen pro longjara agado kaj al S-ino Valda King kaj Kim Bastin pro grava instrulaboro en la Melburna E-Societo. Sekvis la festparolado.

Dimanĉon, 13/12, okazis ekskurso kun S-ro Sekelj al la fama Bestrezervejo ĉe Healesville, kie la gasto multe fotografis kaj filmis por jugoslava televido. La vetero estis belega, sed nur 11 Melburnanoj partoprenis. Samvespere, en la hejmo de Ges-roj Heldzingen, okazis bufeda vespermanĝo.

Vere informriĉa estis prelego de S-ro Sekelj en la Esperanto-Domo je 14/12, pri la temo "De Istanbul al Pekino" kaj li montris kolorbildojn. Je 16/12 la gasto vizitis la grandan "Heinz"-nutrajfabrikejon kaj estis akceptita de direktoroj de la granda firmao en kiu laboras jugoslavanoj kaj kiu deziras dungi pli

da enmigrintoj. Tiun viziton aranĝis nia membro Jack Ryding. Samvespere en la Kvakera Domo S-ro Sekelj alparolis la anojn de la Orrong-Grupo, sed ankaŭ membroj de aliaj grupoj ĉeestis. Kun diapozitivaj S-ro Sekelj rakontis pri siaj aventurriĉaj travivaĵoj "Inter kanibaloj en Amazonio". Iom harstarigaj estis kelkaj incidentoj rakontitoj, ne nur pri tribanoj sed ankaŭ pri diversaj aliaj flankoj de la naturo en tiu fora regiono de Sudameriko.

A.E.A. Sekretario C. Goldsmith, vizitis Melburnon kun sia filino Eileen kaj bofilo Arthuro Oliver, je 9/10-a de Jan. Sed ĉar la E-kluboj feris, la 3 vizitantoj estis nur gastoj en la hejmoj de Ges-roj Fallu, Fordham kaj Koppel.

MORWELL: Je 15-e -de Dec. S-ro Tibor Sekelj (Belgrado) vizitis nian urbon. Li prelegis dufoje al la studentoj de la altlernejo en la posttagmezo, kaj vespere li parolis antaŭ 30 membroj kaj amikoj de la E-societoj. Ĉar ne ĉiuj estis E-istoj, S-ro Sekelj parolis anglalingve pri siaj aventuroj "Inter kanibaloj de Amazonio".

La loka gazetaro vaste raportis pri la vizito de S-ro Sekelj kaj publikigis fotografiojn kune kun S-ro Maddern. S-ro Derek John, oficisto por publikaj rilatoj de la Stata Elektra Komisiono, persone gvidis S-ron Sekelj tra la elektrofabrikejo Hazelwood, Morwell kaj Yallourn.—Mabel Wybenga.

SYDNEY: Dum Novembro kaj Decembro ni daŭrigis nian planon prezenti iom por ĉiuj ĉe niaj kunvenoj. Tre kontentige; Gerald Browne 2/11 paroladis pri "Eksplozoj".

La 9an la "Tri Etaj Brunoj", genepoj de Gerald kaj Alfreda Browne, prezentis interesan programon de Esperantaj. Ili legis al ni diversajn romanetojn, estris lecionon kun la klubanoj kiel lernantoj, kaj pianludis por komuna kantado. Ĉiuj konsentis ke ĝi estas ĝuinda programo, kaj invitis la infanojn ripeti ĝin ĉe Zamenhof Vespero.

La 16an Victor Bourlin montris al ni belan programon de lumbildoj faritaj laŭ siaj propraj pentraĵoj. La temo estas satiro pri la moderna stato de la mensa kaj politika vivo. La 23an ni ludis ŝaradojn, gvidata de Margaret Chaldecott kaj Volo Guelting.

La 30an ni ludis teatraĵetojn en kiuj ĉiuj ĉeestantoj, eĉ plej novaj lernantoj, partoprenis. Ni atendis viziton 7/12 de Tibor Sekelj, sed pro ŝanĝo de ties veturplano li ne alvenis. Feliĉe nin

vizitas Gesinjoroj Oliver, la filino kaj bofilo de "Tajni" Goldsmith, kaj ili paroladis por ni pri sia venturo de Anglujo per "Landrover". Ili ne povis montri lumbildojn, ĉar ili ankoraŭ atendis la rivelitajn filmojn. Tamen per mapo kaj per varoj kiujn ili aĉetis survoje, ili bone ilustris la paroladon.

Ni kuniĝis kun la Manly Esperanto Klubo por la Zamenhof-Vespero ĉe Esperanto Domo. Tom Elliott faris la Festparoladon; sekvis ĝin kantoj kaj ripetita programo de la "Tri Etaj Brunoj". Fritz Mueller-Sorau kantis tri diversnaciajn popolokantojn en Esperanto. Ĉeestis multaj malnovaj E-istoj, kaj ni devis serĉi seĝojn por ke ĉiuj povu sidigi.

Nia Kristnaska Festo okazis 14/12. Estis gaja societa vespero, kaj ni atendis, ke tiu estus la lasta kunveno en 1970. Tamen, Tibor Sekelj venis al Sydney 24/12 kaj ni aranĝis kunvenon por la 30a. Denove ni devis elserĉi seĝojn por sidigi la ĉeestantojn. Ĉiuj ĝuis lian paroladon kaj lumbildojn pri lia vivo inter kanibaloj en Brazilio.

Samideano Fritz Mueller-Sorau estas en hospitalo post operacio. Espereble li resaniĝos sufiĉe frue por ĉeesti nian Konferencon ĉe Terrigal, la 13an kaj 14an de Februaro.

Gesinjoroj Oliver reiros al Anglujo, kaj ni adiauis ilin 2/1 ĉe la hejmo de Edna Giles en Collaroy—REVANTO

MANLY: La jaro finiĝis kontentige por nia klubo ĉe la Vespera Lernejo, Darley Road, Manly, kie 3 kursoj daŭris dum 1970. Meznombro 21 inkluzive de vizitantoj ĉeestis la kunvenojn post la kursoj. 5/11 George Thatcher aŭdigis sonbendon "Mia Esperanta Vivo", parolatan de Tiny Goldsmith; 12/11 Kevin Smith prelegis pri "La Uzado de Vortaroj". (Pastro Ciccanti ĉeestis tiun kunvenon kaj alparolis nin pri sia agado en Rimini, Italujo), 19/11 Edna Giles, Thora Richmond, Fred Deal, kaj Robbie Robertson rolis en teatraĵetoj: 26/11 Susan Sobey, Tina Thomas, Russ kaj May Baxter prezentis skeĉon, kaj S-ro P. E. Schwerin prelegis kun lumbildoj pri "La Nova Arbaro".

Speciala renkontiĝo okazis 21/11 en la hejmo de Les Scott, kie Thora Richmond parolis kun lumbildoj pri sia vojaĝo eksterlanden. Ĉeestis 19, inkluzive de Vjetnama instruisto F-ino My Kwak.

3/12 en la hejmo de Ruth Carruthers okazis aferkunveno por plani novan agadon.

2/1/71 en la hejmo de Edna Giles okazis societa renkontiĝo por bonvenigi

Ges-rojn Eileen kaj Arthur Oliver el Londono, kiuj parolis kun lumbildoj pri sia vojaĝo al Aŭstralio en aŭto "Land Rover". En tiu vespero ni bonvenigis ankaŭ Betty Cleminson, okaze de ŝia reveno de eksterlanda libertempo, kaj multajn vizitantojn inkluzive de Tibor Sekelj el Belgrade, Patricia De Cleene el Auckland, Rowena MacGill el Wellington (N.Z.), kaj Haru Mizajaki el Tokio. Ĉeestis entute 54 membroj kaj vizitantoj.

En la regionaj ĵurnaloj aperis ĉiusemajne, escepte de Kristfestoj, minimume 2 artikoloj pri nia agado. — MARJORIE DUNCAN.

PICTON, N.S.W.: Pro aranĝo farita de S-ro Alan Towsey, S-ro C. C. Goldsmith prelegis pri la internacia lingvo ĉe Picton Rotary Club je la 16a de Decembro. Preskaŭ ĉiuj klubanoj ĉeestis, kaj "Tajni" respondis al multaj demandoj.

En la klubula bulteno en la posta semajno estis longa raporto, kiu finiĝis per la jena frazo:

"But one point Tiny brought out loud and strong was that one of the problems of the world today was lack of communication; perhaps Esperanto could go a long way towards solving this problem."

ROCKHAMPTON: Ni komencis la jaron 1970 kun 14 pagintaj membroj kaj 16 lernantoj. En Julio alvenis tri novuloj, kaj ĉe la jarfino ankoraŭ lernadis tri infanoj (Garry Baker, Karen Lane, Linda McKeon), kaj S-ino McKeon, S-ino Wassman, kaj S-ro John Lont; kaj ĉiujn kunvenadas ankoraŭ 4 malnovuloj por konversacia ekzercado.

Nia ĉefa agado estis kaj estas vendado, eksterlande, de bumerangoj kiujn fabrikas invalidoj en la Sirmata Laborejo en Rockhampton. Ni disvendis 45 dum la kalendara jaro al tre diversaj landoj, kaj jam de la komenco (en mez-1969) iom pli ol 100 al iom pli ol 30 landoj. Kvankam ni faris nur malgrandan profiton ĝis nun, pro reklamkosto ktp) ni akiris iom da famo por Esperanto kiel praktika lingvo en komerco, kaj por nia urbo eksterlande. Ankaŭ ni daŭre akiradas, el nepagipovaj landoj, diversajn interesajn kiuj tre taŭgas por ekspozicioj. Oni sendas ilin intersanĝe kontraŭ bumerango.

En Januaro ni intencas sekvi la ekzemplon de la Manly klubo kaj disdoni 1000 verdajn kartetojn enleterkestojn, tra la urbo.

Vizitis nin dum la jaro kelkaj Esperantistoj: Johani Vilkki de Finnlando, Ges-roj Sinclair de Caloundra, Ges-roj Clarke de Redcliffe, kaj S-ro

Karlo Gunster, Prezidanto de la Brisbane klubo, kiu montris al ni bildojn kiujn li kaj lia edzino faris dum sia mondvojaĝo al Eŭropo kaj la Universala Kongreso en Hispanujo.

Ni faris gravan kontakton kun la Skolta Movado dum la jaro, per la nova Skolta Esperanto-kurso "Jamborea Lingvo" kaj ĝia akompana diskaro. Kvankam ĝisnun neniu skolto venis al nia kurso, tamen ili ĉiuj nun bone scias, ke Esperanto estas taŭga lingvo ankaŭ por geskoltoj. La Skolta Internacia Jaro venos en 1972. Ciu klubo kaj Esperantisto en Aŭstralio faru sian eblon starigi amikecan kontakton kun la lokaj geskoltoj? La skolta movado estas ja "malmola nukso" sed en ĝi — kia kerno atendas! — JOHN MOORE.

REDCLIFFE: Ĉe la hejmo de Ges-roj R. Memmott (5/12) la R. E. G. havis memorindan Feston. El la partoprenantoj multaj portis naciajn kostumojn. S-ino D. Styles elvoĉis vortojn pri Zamenhof, kaj la Urbestro respondis la toston. Lia edzino solene tranĉis kukon. Skeĉo, rostfesto, kantoj, ludoj inter mardo da bela bunto, ĉiujn ĝajgis, inter ili vizitanto Japana—bonvena homo. "Redcliffe Herald" sub diktipa kaplinio donis 20-colan raporton.

Du novaj A.E.A. Oficistoj

En Septembro 1967, post la rezigno de S-ino Joan Andrews, la posteno de Ĉefperanto de la AEA Libro-Servo transprenis S-ino Ivy Fallu (Melbourne). Tiun gravan oficon ŝi plenumis entuziasme kaj kompetente kun la rezulto, ke kaj la librostoko kaj la kapitalo kontentige kreskis. Por ŝia modela laboro kreskis ankaŭ nia reputacio ĉe transmaraj libroeldonistoj.

Meze de 1970 S-ino Fallu anoncis la neceson rezigni ĉar ŝi intencas vojaĝi al Eŭropo. Inter aliaj, ŝi kaj la edzo intencas partopreni la someran kurson en la Altlernejo de Helsingo. Kun granda bedaŭro la AEA-estraro devis akcepti ŝian rezignon, sed esperas ke ŝi revenos al Aŭstralio kun renovigita entuziasmo por denove helpi nian tutlandan movadon.

Post longa penado kaj pluraj malsukcesoj, A.E.A. nun povas raporti ke S-ro Tom Elliott el Sidnejo konsentis transpreni la oficon. Sendube li daŭrigos la altkvalitan laboron de siaj antaŭuloj.

Bonvole do notu ke S-ino Fallu ekŝiĝis je 1-a de Februaro kaj ke la nova adreso ekde la 15-a de Februaro 1971 estas: A.E.A. Libro-Servo, c/- S-ro Tom Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W., 2036.

Ekde Januaro 1956 F-ino V. Cox ekspedis nian gazeton al la membraro. Ŝi plenumis la laboron tre konscie kaj ŝi ĝuis la oportunon servi al AEA. Dum la pasintaj 15 jaroj pro la kresko de la membraro ŝia laboro fariĝis pli kaj pli peza. Ŝi tial decidis, ke ŝi devas transdoni la laboron al pli juna volontulo. La decembra eldono de "AE" estis la lasta kiun ŝi ekspedis, sed ŝi deklaris sin preta helpi kaj konsili al la nova ekspedanto.

Feliĉe AEA trovis novan oficiston en S-ino Mary Fordham. Bonvole do notu ke ekde ĉi tiu eldono la adreso de la ekspedanto estas: S-ino M. Fordham, 15 Midlothian Street, Chadstone, Vic., 3148.

Al S-ino I. Fallu kaj al F-ino V. Cox A.E.A. deziras esprimi tutkoran dankon pro fidela laboro kaj esperas ke la membraro same subtenos niajn novajn oficistojn S-ron T. Elliott kaj S-inon M. Fordham—Herbert Koppel, AEA Vic-Sekretario.

Newspaper Publicity

In 1970 newspaper items concerning Esperanto amounted to approximately 233 items comprising 2196 Column Inches. By comparison there were 130 items comprising 918 Column Inches in 1969 and 175 items in 1239 Column Inches in 1968—H. V. Petley, AEA Press Officer.

36-A NOV-ZEALANDA ESPERANTO-KONGRESO

Ĝi okazis en Auckland 7 Januaro, 1971. Pli ol 100 gesam-oj ĉeestis; inkluzive ĉ. 22 anojn de EĴANZ (Nov-Zelanda Asocio de E-istaj Junuloj).

La Kongresejo estis la kolegio por instruistaj studentoj kaj ĉirkaŭ 70 el la kongresanoj loĝis en la kolegia loĝejo dum la 5-taga periodo.

Oficiale malfermante la kongreson, la vicurbestro de Auckland, S-ro W. M. Tongue, laŭdis E-on kaj ties celon. Li provis legi mallongan E-an tekston kaj ricevis aplaŭdon pro tio.

Prof-o C. J. Adcock prezidis tra la kongreso. Bedaŭre, post 23-jara prezidanteco, li ne povis akcepti reelekton al la posteno, ĉar li transmaren vojaĝos dum Majo. Li prelegos en la Internacia Somera Universitato kadre de la 56-a U.K.E. en Londono.

Transmaraj gastvizitintoj S-inoj Peg Ford Lewis kaj Marie Pearson (N.S.W.) S-roj H. J. Brendel (Q.) kaj Tibor Sekelj, vaste vojaĝinta esploranto-aŭtoro, el Jugoslavio, donis internacian etoson al la kongreso; precipe S-ro Sekelj, kiu

konsile parolis dum kvar lingvaj sesioj kaj prelegoj pri E-prononco. Li pri-traktis ankaŭ la Internacian Instituton por la Oficialigo de E-o, kies gazeton li redaktas. Uzante diapozitivon, li imprespre prelegis pri sia vojaĝo de Istanbulo ĝis Pekino kaj pri alia al la centro de Bolivio.

Aldone al la kvar lingvaj sesioj, okazis kvar kunsidoj de NZEA-anoj, de UEA-anoj, paroladetoj de sep progresintoj kaj de tri spertuloj, kunsidoj de E-sciencistoj kaj instruistoj; pri E-literaturo, kaj tri de la NZEA-komitatoj. Oficiala fotografado (98 ĉeestis), koncerto, oratora kaj drama konkursoj kaj debato (4 parolantoj); du-busa ekskurso tra vidindaj ĉirkaŭaĵoj. EĴANZ-anoj aparte kongresis.

Ĵ NZEA-oficistaro por 1971: Prez., S-ro J. T. Allan; vicprez., E. R. Dearnley; sek-ia Majoro H. W. Petersen; helpsek-ia, S-ro D. A. MacGill; kasisto, S-ino Mary Richardson; Informa Oficisto, S-ino L. Bruce; Eduka Oficisto, S-ro MacGill; Estraranoj, S-ino N. Montgomery, S-ro A. Richardson.

Jen neta raportoj pri brila sukceso. La estraro poste decidis pri loko por la 37-a Kongreso.—W. H. K.

ESPERANTO FEDERACIO DE NOVA SUDA KIMRUJO

La Federacio, kune kun la Manlia Esp. Klubo, okazigis Kristnaskan Festenon Dimanĉe 6/12 en la hejmo de S-ino Ruth Carruthers ĉe Balgowlah. Tio estis granda sukceso, ĉar pli ol 50 geanoj kaj geamikoj ĉeestis. Vizitantoj venis de Austrujo, Jugoslavujo, Singapuro, Vjetnamo kaj Anglujo. Inter ili ni bonvenigis la flinon de "Tajni" Goldsmith, Eileen Oliver kaj ŝian edzon, Arthur, kiuj venis aŭtomobile tra Eŭropo kaj Hindujo.

Post luksa fest-manĝo, ni ĝuis bonan muzikan programon: S-ino Peg Ford Lewis ludis la pianon, la fratinoj Catherine kaj Dorothea Taylor ludis bambu-flutojn kaj ni ĉiuj kantis ĝojkantojn.

S-ino Marjorie Duncan paroladis pri Ges-oj Issobe, kiuj reiros al Japanujo 20/12 post 4 jaroj en Aŭstralio, loĝante dum la tuta tempo en la Manlia distrikto. Ni perdas bonajn geamikojn, sed feliĉe ili ankoraŭ estos membroj de A.E.A. E.F.N.S.W. kaj Manlia Klubo. Tiny Goldsmith faris donacojn al la tuta familio, al Joko belan kolĉenon de opaloj kaj al Ŝo kravat-pinglon ankaŭ el opalo. La opaloj estas donaco de S-ino Grace Swan, kaj la muntadon pripagis la Federacio. Al la du ĉarmaj flinoj ni

donacis librojn, kiel memorigaĵojn de gajaj jaroj en Aŭstralio. Kun emocioj, eĉ larmoj, ni kune kantis "Feliĉajn Tagojn".

Sabate, 2/1, ni adiaŭis Arthur kaj Eileen Oliver ĉe la hejmo de S-ino Edna Giles ĉe Collaroy. Ges-oj Oliver montris lumbildojn pri sia veturo de Anglujo. Samtempe ni bonvenigis S-ron Tibor Sekelj, kiu feliĉe povis esti kun ni malgraŭ sia terure okupita vivo en Sydney. Denove ni ĝuis luksan manĝon, kaj denove ni disigis de bonaj Esperantistoj, kiuj forlasas nin por reveni al sia hejmlando.

F-ino Dorothy Hasluck vojaĝos 1/2 por ferii en Nepalo. Al ŝi "Bonan Vojaĝon!"—Revanto.

KORESPONDI deziras Bartulec Paulo, Stonava 100, Silesia, Czechoslovakia: certe respondos.

POLA RADIO

En letero ĝi atentigas pri eraro sur p. 54, kol. 2, Aŭgusta n-ro de THE A.E.: Legu: En 1969 2000 E-istoj...

Kvankam aŭskultado de siaj radioelsendoj en Aŭstralio ne eblas, Pola Radio varme invitas Aŭstraliajn E-istojn partopreni ĝiajn konkursojn. Bedaŭre, la kuranta konkurso havas limdaton 28 Feb. 1971 — tro frue por ni ĉi-lande. Jam en tiu tago vi leganto espereble estos ĵus ricevinta ĉi-numeron!

Skribu al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.K. 46, Warsaw I, por detaloj pri venontaj konkursoj kaj literaturo.

Mr. KEN LINTON

Has deferred his journey to India until next year because of an accident to his wife, to whom we wish a speedy recovery. Please set aside the notice on page 68.

OFICIALIGU ESPERANTON !

La unua etapo de la Esperanta Movado komenciĝis, kiam Zamenhof lanĉis sian mirindan lingvon en la mondon; la dua etapo komenciĝis kun la fondo de Universala Esperanto-Asocio, kio markis la naskon de la organizita movado, sed, kiel S-ro Tibor Sekelj diris ĉe la Zamenhofa Festo en Melburno, ni nun devas komenci la trian etapon, kaj tiel enigi la internacian lingvon en la vivon de la mondo.

La nova organizon, kiu fokusas sian atenton sole sur ĉi tiun gravan aferon, estas la Internacia Instituto por la Oficialigo de Esperanto kun oficiala

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO SPEZOJ 1970

	Enspezoj			Elspezoj
Kreditsaldo 5-12-1969		\$1198.34	"Australian Esperantist"	
Kotizoj 1970	\$906.40		Presado kaj afranko	
Kotizoj antaŭpagitaj	130.50		11 numeroj	\$1074.98
	1036.90	1036.90	Afranko ĝenerala	46.38
Ekzamenoj		14.00	Presajoj kaj	
"Australian Esperantist"			paperaĵoj	121.70
Abonoj	4.90		Kotizoj al UEA	
Reklamoj	9.00		(Asociaj membroj)	18.00
	13.90	13.90	Donacoj	39.15
			"Adresaro"	27.27
			Kurtaĝo	8.82
			Diversaĵoj	19.34
17a Aŭstralia Kongreso			Kreditsaldo 30/11/1970	1623.24
20% de kotizoj	49.70			
½-profito	171.90			
	221.60	221.60		
Interezo		46.65		
Meza kaj Supera kursoj				
Enspezoj	292.00			
Elspezoj	72.86			
	219.14	219.14		
Diversaĵoj		1.60		
PUBLICIGA FONDUSO				
Donacoj	277.54			
Populara Kurso				
Enspezoj	365.30			
Elspezoj	195.51			
	169.79	169.79		
		447.33		
Publicigaj elspezoj	220.58			
	226.75*	226.75		
		\$2978.88		\$2978.88

*Tiu sumo, kaj multe pli, estas ĵus uzita por pagi la novan eldonon de "Freedom of Speech".

Audited and found correct
(Signed) George Thatcher,
12/1/1971.

gazeto monata: "Esperanto Gazeto". Redaktas ĝin T. Sekelj. Abono nur 2 dol. Peras Ken Linton.

Estas onidiro, ke, se sciencisto volas informiĝi pri iu temo ankoraŭ ne komprene konata de li, libron pri ĝi li verkas.

PRI RUDYARD KIPLING

Liaj aŭtografoj havas altan valoron. Tial li volonte subskribis ĉekojn, kiam li devis pagi malgrandajn sumojn, kaj kontente konstatis, ke multaj posedantoj de liaj ĉekoj ne iris por postuli pagon de la sumoj ŝuldataj al ili.

IMPORTANT NOTICE

Please note that by the time this issue appears the A.E.A. Book Service will be in the hands of Mr. Tom Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036, to whom all orders and correspondence should be sent.

Mrs. Ivy Fallu, who has supervised it during recent years, has resigned as she will be overseas for most of this year.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 93 (173)

MELBURNO

15 Marto, 1971

ESPERANTO EN NOV-ZELANDO

De Wm. H. King. F.N.Z.E.A., D.B.E.A.

Jen la dua parto de artikolo aperinta en la Jun.-Junia, 1969, n-ro de "The A.E.". Ni petas pardonon pro malfruigo de ĉi dua parto. Mankis al la redaktoro la manuskripto, verkita 10 Feb. '69.

La unua landkongreso NZEA okazis 2/5/1911; ĝi okupis nur unu vesperon. La dua en Aprilo, 1912; la tria en 1913; la 4-a en Aprilo 1914, en Auckland. Tiujare la E-klubo en Wellington havis 111 anojn. La 5-a en 1915. Oni ne kalkulas tiujn 5 kongresojn inter la nuntempa serio de naciaj kongresoj.

En 1919 David Tilly kaj Wm. King fondis duan klubon en Whangarei. Radio estis uzata por publiki E-on jam de Julio, 1925, kiam J. L. King serie prelegetis el 2YM Gisborne. En 1926-27 Wm. King faris 15-minutajn paroladojn el 2YK Wellington. En 1928, gvide de Wm. King, audiĝis E-lecionoj el 2YA Wellington. Jam antaŭe la lecionoj aperis en porradiaj gazetoj tra la lando. Tiutempe estis 300 anoj en 67 lokoj.

En 1929, pro iniciato de C. J. Adcock kaj Wm. King, delegacio E-ista iris al la Edukministro H. Atmore, petante, ke E-o eniru la lernejojn, kolegiojn kaj universitatojn. Post 17 tagoj li negative respondis, kun bedaŭro (Vidu: "La Suda Kruco", Sept. kaj Nov., 1929).

S-ino Sarah Ann Ensom (Christchurch) testamentis al la Laborista Eduka Asocio £500 por starigi kursojn en E-o. NZEA eldonis broŝuron Anglalingvan pri la E-movado kaj fliiĝis kun UEA,

kolektis subskribojn por la Peticio al Unesko (1954), eldonis organon: "Oficiala Bulteno", poste "The New Zealand Esperantist". Ĝis nun ĝi aranĝis 34 landkongresojn, establis librofakon: vende, 1964: £700. 1968: £975 (1950 dol.)!

En la unua agjaro 1929. 205 anoj en 75 lokoj. 1964: 364 en 93. 1968: proks. samcifera (sed ne ĉiu sam-o finance subtenas la asocion).

La N.Z. Instruista Asocio, fondita 1961, havas 92 anojn. De tiu sama jaro funkcias ankaŭ la N.Z. Scienca Asocio.

Nune aktivas 20 kluboj, societoj k.s. Ni helpas al UEA, TEJO, Skolta E-Ligo k.a. 1968: 315 UEA-anoj diverskatergoriaj, ankaŭ 55 delegitoj okupas 79 oficojn. En 1969 NZEA enoficigis peranton por kunlabori kun AEA, cele plifortigi E-on en ambaŭ landoj.

Por Esperanto la Nov-Zelanda ĉielo estas lazura.

(La artikolo estas resumita. Informo en la "Tutmonda Jarlibro E-ista" (1907) —New Zealand E-Society, fondita 1905; 25 anoj. Christchurch E-Klubo, 1906; 25 anoj. Southland E-Klubo en Invercargill, 1906; 40 anoj. La nomoj-adresoj estas indikitaj. — Redaktoro).

Deziras korespondi pri geografio, historio, turismo, muziko, kulturo, disktoj: Miroslav Pechtor, Kvjeta Pechtorova kaj Sonja Pechtorova: Erbenora 13, Blansko, Czechoslovakia.

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

OFFICIAL NOTICES

25th February 1971

New Individual Members

Cocking, Mr. A., Dee Why, N.S.W.
 Milligan, Mrs. J. I., Surrey Hills, Vic.
 Strachan, Miss V., Glen Iris, Vic.
 Caldera, Mrs. I., Perth, W.A.
 Ray, Mr. W., Caloundra, Qld.
 Miller, Miss J., Caloundra, Qld.
 Vidlich, Mrs. C., Buderim, Qld.
 Barron, Miss A. M. R., Nambour, Qld.
 Hausler, Mr. J., Buderim, Qld.
 Diaz-Tendero, Mr. G., Nundah, Qld.

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$838.61
Anon., N.S.W.	1.00
Ling, Mr. S., Vic.	2.00
May, Mrs. R. I., N.S.W.	1.00
Glenie, Mrs. O., Vic.	5.00
Laird, Sgt. C., Vic.	1.00
Egset, Mr. R., Qld.	2.00
Milligan, Mr. S. H., Vic.	1.00
Kelly, Mr. S. J., Vic.	0.50
	<hr/>
	\$852.11

Interstate Competition Positions on 25th Feb., 1971

	Quota	Points	%
Queensland	130	764	587.7
Victoria	300	1103	367.6
N.S.W. & A.C.T.	260	876	333.1
W. Australia	80	235	293.7
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	48	120.0

—C. C. Goldsmith, Secretary.

CITINDAĴOJ

Pri Sekspiro, "Inter liaj sanmacianoj ĝis nun lin laŭstature alproksimiĝis nur Newton (nĵuton), eble la plej granda iama sciencisto. Internacie Sekspir apartenas al tiu eta aro da personoj, inkludanta Platonon kaj Wernher von Braun, kies efektivigitaj revoj draste ŝanĝis la homan situacion . . ."

"Post Zamenhof Kalocsay estas la dua granda geniulo de nia afero. Por Esperanto li havas trioblan signifon: (1) kiel poeton originalan, (2) kiel tradukiston kaj (3) kiel riĉiganton de la lingvo".

"Kiu ne havas kaj uzadas La Plenan Vortaron kun Suplemento, tiu ne pretendu kapablon legi nian literaturon". —La tri citaĵoj lau De Kock, en "Norda Prismo"; n-ro I, 1970.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Post Kristnaska kaj Novjara ferio la Ligo denove aktiviĝas. La 10an de Februaro okazis Societa Kunveno kaj ni, la Liganoj, ankaŭ vizitantoj ĝuis diapozitivajn, kiujn f-ino Spink projekciis. F-ino Spink dum kelkaj jaroj loĝis en Ĉinio. Tie ŝi instruis al infanoj la Anglan lingvon. Nun ŝi estas fervora lernanto de Esperanto. Ŝi reiros al Anglujo post monato, sed intertempe regalis nin per lumbildoj kaj komentario pri vivado en Ĉinio. La bildoj montris la progresadon, kiun la popolo faris sub la gvido de Prezidanto Mao, kaj emfazis la kamaradecon, kiu nun regas la landanojn. Tute libere F-ino Spink fotografis diversajn lokojn, antikvajn kaj modernajn; ankaŭ grupojn da kontentaj homoj kaj festivalajn okazaĵojn.

La 13an de Februaro grupo da E-istoj el nia Ligo bonvenigis, ĉe la aerodromo, S-ron Tibor Sekelj. La sekvantan tagon, vespere, la liganoj kunvenis ĉe la hejmo de D-ro Einihovici, kie S-ro Sekelj gastis. S-ro Sekelj montris lumbildojn kaj paroladis pri siaj spertoj inter tribo de Brazilaj indiĝenoj. La 16an de Februaro li, per fervojo, veturis al Kalgoorlie, kun la intenco kontakti grupojn da Aŭstraliaj indiĝenoj, kiuj loĝas en tiu regiono.

Komenciĝos en Marto kunvenoj, po du en monato dum la nuna jaro. La Ligo decidis, ke la kunvenoj konsistos el lecionoj por tiuj, kiuj deziras plibonigi sian uzadon de Esperanto, konkursoj kaj distraj aferoj. — G. Pollard.

SYDNEY: En Esperanto-Domo (Redfern) 1/2, antaŭ ĉ. 30 ĉestantoj — inter ili kelkaj de la Manly-Klubo — la fama esploristo kaj verkisto Jugoslava, Tibor Sekelj, montris siajn impresajn bildojn pri: "De Istanbul al Pekino".

15/2 okazis ĝenerala jarkunveno. La nova estraro: Prez., John Matasin; vicprez-oj, Volo Gueltling kaj Victor Bourlin; sekretario, Margaret Chaldecott; kasistoj, David Gould; biblio tekisto, Tom Elliott, por Sydney Esperanto-Societo kaj ankaŭ la Libroservo de A.E.A. Senlaca Tom Elliott ankaŭ gvidas klason lunde antaŭ la Societa kunveno.

Samkunvene ni bonvenigis S-ron Jon Prance, sed li iros por labori en Kanbero. Baldaŭan resanĝigon al du membroj — Wre Chandler kaj Fritz Muller-Sorau. Fritz estas en la Hospitalo Royal Prince Alfred (dermatologia sekcio). Al ambaŭ fideluloj bondeziras multaj E-aj amikoj!

22/2 Rene Asselin montris lumbildojn de la unua parto de sia mondvojaĝo tra 30 landoj. Estis sonbenda komentario ankaŭ kun Orienta muziko, ĉar ni vidis

bildojn de Malajzio, Tajlando, Hindujo kaj la belega montaro Himalaja. Plezure ni atendas la duan parton en Majo. — G. E. Browne.

MELBOURNE: La kluba agado post la ferioj komenciĝis 25/1 per prelego de S-ro P. Schwerin, kiu kun edzino feruis en Melbourne. S-ro Schwerin montris diapozitivajn kaj rakontis pri vizito en Finnlando kaj partopreno, kiel oficiala A.E.A. reprezentanto, en la Universala E-Kongreso en Helsinko. Nova kurso por komencantoj, sub S-ro Kim Bastin, komenciĝis je 8/2. Samvespere S-ro Harold Beechey priskribis la principojn kaj societojn de "La Gojo", laŭ la koncepto de usona D-ro Schutz.

La Generala Kunveno okazis je 15/2. La kasisto (S-ino M. Fordham) prezentis la finanĉan raporton laŭ kiu la enspezoj superis la elspezojn je \$15.70. Laŭ la raporto de la sekretario (S-ro H. Koppel) la societo havis en 1970 entute 34 membrojn, el kiuj 6 estis novaj studentoj kaj 28 malnovaj membroj. (En 1969:5 studentoj kaj 33 membroj). La bibliotekisto (S-ino Fay Koppel) raportis ke pluaj libroj estis klasifitaj, registritaj kaj kovritaj. Dume ni rajtas fieri ke nia biblioteko nombrigas inter la plej grandaj en la movado por trovi sian lokon en la listo en la UEA-Jarlibro. Elektiĝis la nova estraro: Prez: S-ro H. Rosengren; Vic-Prez: S-ino V. King, S-ro H. Beechey; Kasisto: S-ino M. Fordham; Sekretarioj: S-roj H. Koppel kaj M. Fordham; Publikaj Rilatoj: S-ro A. Baldwin; Biblioteko: S-ino F. Koppel. S-ro Marshall Cohen esprimis dankon al Eksprekidanto S-ro E. McKenzie pro multjara fidela plenumado de la ofico. Kvankam li estas jam 78-jara kaj jam dum pluraj jaroj loĝis en la kamparo, li tre malofte mankis al niaj ĉiusemajnaj kunvenoj. Lia bonhumoro kaj kuragiĝa personeco multe instigis nin, kaj vere multnombraj estis la okazoj kiam li interese rakontis al ni pri la pli juna Melbourne kaj pli fruaj tagoj de sia vivo.

ROCKHAMPTON: En Januaro ni distribuis pli ol 1000 verdajn kartojn en partoj de la urbo — ĉefe enleterkestojn ĉe domoj, sed kelkcentojn en butikojn. En montrofenestroj de eble 30 malgrandaj butikoj en antaŭurboj montriĝas nia presita anoncfolio pri la kurso komen-cota.

"Walter Reid's World Travel Service" afable disponigis al ni duonon de fenestro en la ĉefa strato, en kiu ni montris diversajn Esperantajn, ŝanĝante ilin kelkfoje, dum tri semajnoj. Ni skribis al la loka ABC NEWSROOM por peti anoncon per radio pri la kurso, kun tuja rezulto — oni ne nur tion faris sed

ankaŭ invitis nian publikrilatan oficiston (S-ro John Moore) por televid-intervjuo! Tio disvindiĝis je 4-10 ptm marde, — du tagoj antaŭ la kurskomenco. Ankaŭ marde la loka ĵurnalo "Morning Bulletin" presigis senpagan anoncon pri la kurso, kiel novajeron.

La rezulto de ĉio tio estis entute 28 kursanoj, inklude 23 novulojn. Kaj pro tio, ke ĉi tiu nombro estas tro granda por nia malgranda ĉambro, la estro de Plenaĝula (Maturula) Eduko (Adult Education) disponigis al ni ankoraŭ unu grandan ĉamb:on en la antaŭa "Girls Central School" (Centra Knabina Lernejo), do denove ni havas du ĉambrojn anstataŭ nur unu kiel lastjare — almenaŭ, dum nia klaso restas tiel granda.

CANBERRA: Je la 7a de Januaro kaj la 8a de Februaro, la anoj de la Esperantoklubo en Canberra, honore al S-ro Tibor Sekelj, okazigis du specialajn kunvenojn, ĉe kiuj ili ĝuis viglan konversacion pri diversaj temoj, inkluzive Esperanton en la Komenco kaj stereoskopan fotografadon.. Ĉe tiuj kunvenoj la anoj ankaŭ bonvenigis D-ron Ross Robbins kaj S-ron Ralph Harry ĵus revenintajn al Canberra.

We regret that certain reports have been held over till the next number, as we had to send in all material to printer on the 28th Feb.—Editor.

PICKED PARLETS

The American Cryptogram Assn. (600 amateurs), international, also publishes Esperanto cryptograms.

"The Socialist Leader" publishes Esperanto articles with parallel translations by Verdiro, anonymous author of that remarkable book "Elingita Glavo" (pub. Stafeto). The A.E. 5/63.

57th Japanese Esperanto Congress, near Osaka: 825 took part.

"Animal Farm" (George Orwell) has been translated into Esperanto.

The International League of Esperantist Teachers is compiling regulations for an international Esperanto examination at university level. Write: Dr. H. Sonnabend, Im Eckerkampfeld Ila, D-3161 Dollbergen, Germany, for a copy.

University Fort Lauderdale (Florida), with students from worldover, changed its name to The International University, and encourages use and study of Esperanto.

FIAT Motors, Turin, publishes new prospectus in Esperanto, on the Fiat 128.

—From "Worker E-ist".

The Universal Esperanto Assn. now has a representative in Ciego de Avila, Cuba. He has firm contacts with the Esperanto Commission at the Education Ministry in Havana. Some months ago the Ministry decided to explore the possibilities of teaching Esperanto in all schools and universities in Cuba.

The Local Congress Committee has made a tape on typical London and British sounds; included is the voice of Sir Peter Studd, Lord Mayor of London and Chief Patron of the Esperanto World Congress there. The tape is available to clubs &c. Details: Peter Schilperoord, care 140 Holland Park Av., London W11, 4UF, England.

The English firm of Marks and Spencers has given to the London Esperanto Congress 2500 plastic shopping bags with advertisement text in Esperanto.

BONVOLU RIDETI !

Apud rivereto kampara bubo salutis fiŝanto el grandurbo: "Kiom vi kaptis, sinjoro?" "Ankoraŭ neniom". "Ne tro malbone; Ulo fiŝis tie dum du semajnoj, sed li ne kaptis pli ol vi havas post nur horduono".

Du amikoj vagis tra ultramoderna sekcio de la loka pinakoteko. "Bona Dio!" diris unu: "pro kio oni dezirus pendigi tian pentraĵaĉon!"

"Mi nur povas konjekti pri unu ebla motivo", respondis la alia; "ŝajne ili ne povis trovi la pentriston".

"Io mistifikas min", diris farmisto; "hieraŭ mi elprenis mian malnovan pafilon kaj purigis ĝin sur la antaŭa portiko, kaj hodiaŭ la filino ricevis ok proponojn pri edziĝo".

Vendisto: "Ĉi tiun maŝinon mi tre povas rekomendi al vi; ĝi faros sin mem-pagita post iom da tempo."

Kliento: Estas bone. Kiam ĝi estos jam farinta tion, vi povos sendi ĝin al mi".

Knabeto demandis Mozart-on, kiel oni komponas, kaj, kiam Mozart respondis, ke la knabo ankoraŭ estas tro malgranda, la etulo rediris: "Vi ja havis la saman aĝon. kiam vi komencis komponi".

"Estas vere", respondis Mozart, "sed mi nenium demandis, kiel mi faru".

Genata viro eniris kuracejon. "Doktoro", li diris, "vi devas helpi min. Antaŭ proksimume kvin jaroj mi englutis arĝentan moneron."

"Ĉielo, viro", kriegis la kuracisto. "Kial vi atendis kvin jarojn? Kial vi ne

vizitis kuraciston dum la tago en kiu vi englutis la moneron?"

"Verdire", respondis la viro, "Tiu-tempe mi ne bezonis la monon".

Ĉe bankedo oni diskutis la arton: fari postmangan paroladon ĉe festo. Virino diris: "Jen la plej efika — ĝi konsistas el nur kvin vortoj: 'Mi lavos la manĝilojn, karulino!'"

"OMAR KYAYYAM"

Myself when young did eagerly frequent
Doctor and Saint, and heard great
argument

About it and about: but evermore
Came out by the same Door as in I
went.

Kiam juna, arde mi frekventis
Ejojn, kie pastroj argumentis
Pri ĉio ajn. Foriris ĉiam mi
Sen eĉ gajneto al la propra sci'.

BACK O' THE MOON . . .

O moon, lovely moon, with thy beautiful
face,
Careering throughout the boundaries of
space,

Whenever I see thee, I think in my mind:
Shall I ever, oh ever, behold thy behind?

Ho luno, ho luno, vizaĝe tre bela,
Veturas vi milde tra l' spaco fabela.
Duonon mi vidas — duonon en kaŝo!
Ĉu iam mi vidos al via postajo?

"PLENA ILUSTRITA VORTARO"

Konsulti vi ne preterlasu
Ĉi trezoron, ho amikoj!
Duboj plu ne embarasu

Vin ĉe serĉo pri radikoj.
Krom difinoj, trafe netaj,
En ĝi estas multo pli —
Helpkonsiloj, tre kompletaj,
Frukt' de l' vasta lingvosci'.

Per ama man' ĉi libron tenu;
Ĝin konservu sen difekto.
Antaŭ ĉio — ho komprenu! —
Ne kulpadu pri neglekto.

—Farbo.

PROGRESO

Mi Esperanton provis lerni
instructed by a chap called Ernie;
Mi, do, je ĉiu semajfin',
with nose in book could then be seen.

Nu, Ernie emas al balbut',
so when he talked about a "root",
audiĝis ra- ra- ra- radik'
from out his mouth when he did speak.

Tamen mi mem per pacienc'
from all his stutters made some sense,
eĉ se la sono de la vort',
when he pronounced it, was a snort.

Mi diligente studis, kaj
learned more and more as time went by,
ĝis mia Esperant-vortar'
was greater than his own by far.

Li tion ĉi konstatis, do
he got a bit fed up, you know.
Subite solvo trafis nin:
senĝene mi instruas lin.
L. R. Stirling, Exeter.

P. 46 "Kazaka Lulkanto"

Kopieraro en antaŭlasta verso: legu:
tuleto.

LA REGNO NEUNUIĜINTA

Sekvas resumo de radia parolado
(BBC) de L. Kennedy, laŭ traduko de
H. Chapman.

Skotlando neniam estis perforte konkerita. Ĉe la Romiaj konkerintoj de Anglujo haltis ĉe la Skota landlimo. En 1703 Skotlando "trompiĝis" en la Traktadon, kiu "unuigis" la landon kun Anglujo. Per tio Skotlando ricevis ian internan stabilecon; reciproke ĝi helpis starigi la Britan Imperion, kiu kompare daŭris proks. duonon de la tempo dum kiu la Romianoj okupis Britujon. La aŭtoro plendas pri la kaduko de la Altlando kaj la Insuljo, la mizero de urba Glasgovo kaj la duklasa civitaneco Skota — kaj postulas sendependecon.

Kontraŭ argumento, ke Skotlando ne havas rimedojn por tio, li sin turnas al la "malŝparo, diboĉo, prodigo, malkompetento" de la registaroj ĉe Westminster dum la pasinta jardeko — kriza ekonomio, ega mon-pruntprenado — jen situacio, kiu naŭzas unu el la plej ŝparemaj popoloj en la mondo — la Skotojn. Ĉu mankas al Skotlando la homa genio? Tute ne. Se nomi nur kelkajn el sennombraj: Watts, Bell, Lister, Fleming, Burns ("pli granda lirika poeto ol Heine"). Ĝi provizis ses Britajn ĉefministrojn en ĉi tiu jarcento! Ĝiaj kleruloj, kuracistoj, inĝenieroj ĉirkaŭis la mondon.

La politikan malsinceron oni vidas en tio, ke ĉe Westminster preskaŭ ĉiu opozicia partio en ĉi-jarcento "subtenis" internan regadon por Skotlando; kiam ili transprenis povon, ili rifuzis cedi ĝin. Antaŭ nur 20 jaroj pli ol 2 milionoj da Skotoj subskribis peticion, kiu postulis internan regadon . . . Laborisma registaro ĝin ignoris.

La fald-broŝuro estas tradukita en 11 lingvojn, inkluzive la Latvan, Kimran kaj Bretonan.

Eraro: la Skotoj ne **demandis** aŭtonomecon; ili **postulis** ĝin.

Interesuloj sin turnu al: R. M. Douglas, Tigh an Uillt, Wilton Dean, by Hawick, Roxburgh, Scotland.

NE AMERIKANA AGADO

"Mi devas ion konfesi. Mi ne veturigas aŭton." diris bone konata usona ĵurnalisto.

"Usonanoj estas tolerema popolo. Ili volonte akceptas la fakton, ke persono estas alkoholulo, narkotomanulo, edzinbatemulo, aŭ eĉ ĵurnalisto, sed, se homo ne veturigas, devas ekzisti ia difekto pri li."

"Lastan semajnon mi butikumis por aĉeti porteban skribmaŝinon. Decidinte pri la maŝino, mi demandis al la komizo: Ĉu vi akceptos mian personan ĉekon?"

"Nature," li respondis tre kompleze, "ĉu vi havas identigilon?"

"Kompreneble," mi certigis, prezentante kvar diversajn kreditkartojn kaj mian ĵurnalistan enirpermeson al la Blanka Domo".

"La komizo inspektis ilin kaj diris: 'Kie estas via veturiglicenco?'"

"Mi, ne havas," mi respondis.

"Ĉu vi perdis ĝin?"

"Ne. Mi ne perdis ĝin. Mi ne veturigas aŭton."

La komizo iom minace rigardis, premis butonon sub la vendotablo, kaj tuj alkuris la sekciestro. La komizo jam fariĝis malkompleza.

"Ĉi tiu ulo provas paĝi per ĉeko, sed li ne posedas veturiglicenco. Ĉu mi devus voki la magazendetektivon?"

"Atendu momenton dum mi alparolas lin," diris la sekciestro kaj sin turnis al mi.

"Ĉu vi perdis la licencan pro ia malobeo de trafika leĝo?"

"Tute ne. Mi neniam veturigis. Mi ne ŝatas veturigi."

La sekciestro min suspekteme komtemplis.

"Kiel vi ĉi tien alvenis, se vi ne veturigas?"

Mi luis taksion," mi respondis.

Homamaso estis jam kolektiĝinta.

"Kio okazis?" demandis iu.

"La ulo ne posedas veturiglicencan," respondis alia.

"Li diras, ke li ne veturigas," aldonis tria.

"Kiel neamerikana oni povas fariĝi?!" komentis kvara.

Alvenis la ĝenerala direktoro. Felice li tuj rekonis min kaj ordonis akcepti la ĉekon.

Embarasite per la ĝeno kaŭzita al mi, li humile pardonpetis.

"Venu," li invitis, "mi acetos por vi drinkon".

"Multan dankon," mi respondis, sed mi ankaŭ ne drinkas. — El la angla tradukis K. G. Linton.

ACROSS THE CENTURIES . . .

Sir John Pollock (born 1878) in his "Time's Chariot" (1950) spoke to a man who had been an attache at the British Embassy in Paris. At a dinner party this man sat next to an old lady, who said to him. "As my husband said to Louis XIV . . ." He thought she must be in her dotage, but later learned that she had been the wife of Duc Lianecourt-Rochefoucauld, who, born in 1700, had in King Louis's old age been a page of honor to that king, and in 1787 had married a girl of 17, who was still enjoying life in the middle of the 19th century.

"So", says Pollock, "I have spoken to a man who knew the widow of a courtier to a king born in 1638!"

RECENZOJ

"Gajaj Klubvesperoj": skeĉoj, ludoj. F-ino G. Riisberg. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj, Denmark. 32 p. Prezo 4 Dana kr. (ĉ. 30c.) ce nia Libroservo.

Klubanoj volonte serĉas skeĉojn por la anojn amuzi. Jen 11 skeĉoj de diversaj aŭtoroj, krom 4 ludoj. La eldonejo projektas aperigi ankoraŭ 3-4 libretojn similajn je malalta prezo. La duan kompilis Marjorie Boulton; la trian S-ino Zora Heide — konataj verkistinoj. Estas anoncate ankaŭ originala verko de Bertram Potts — "Nokto da Timo", aperonta frue en 1971.

La unua skeĉo temas pri naciaj idiotismoj: ĉu "orelo" aŭ "okulo" estas uzinda pri kudrilo? Ĉejoj kaj Nederlandano iom varme disputas pri tio. Ili tranĉas la nodon, konsultinte la version en Mateo 19/24 kaj — ekridegas. Estas studindaj ankaŭ la ceteraj, el kiuj pluraj simple, lerte enkondukas psikologiajn elementojn en la homa interkonduco, precipe societeca. La nivelo de la humuro povas levi inteligentaj klubmembroj per enkonduco de propraj ŝercesprimoj, aldonaj pikantaĵoj. Per tio ili povas ankaŭ plilongigi la skeĉon laŭdezure. Antaŭ prezento, oni dece indiku la fonton.

La libreto estas (reko)mendinda kaj certe helpas gajigi ne nur amantojn de l'arto teatra, sed ankaŭ homojn sen pretendo en tiu kampo.

TO CERTAIN ANTI-ESPERANTISTS

If you could honestly examine your state of mind, you might well find that you are prone to argue against new ideas before you understand them. Clean your mental lens, and so see clearly the objects of your muddled criticism.

TRANS LA JARCENTOJ

Kavaliro John Pollock (naskita en 1878), laŭ sia aŭtobiografio "La Caro de l'Tempo" (eldonita 1950), parolis al viro, kiu jam antaŭe estis ataŝeo ĉe la Brita ambasado en Parizo. Ĉe bankedo tiu viro loksidus apud maljunulino, kiu diris al li: ". . . kiel mia edzo diris al Ludoviko la dekkvara . . ." Li pensis, ke sendube ŝi estas senilulo, sed poste li sciigis, ke ŝi antaŭe estis la edzino de la Duko Lianecourt-Rochefoucauld, kiu naskiĝis en 1700, fariĝis honora paĝo al tiu reĝo, kaj en 1787 edziĝis kun 17-jaraĝa knabino. Ŝi ankoraŭ ĝuis la vivon en la mezo de la 19-a jarcento.

Komentis Pollock: "Do vere, mi parolis al viro, kiu konis vidvinon de kortegano servinta al reĝo, kiu naskiĝis en 1638!"

Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj.

Kompilis Isaj Dratwer. 141 paĝoj. Eld. CED. Broŝurita. 6 gld. plus sendkosto.

Eldiroj aŭ skribaĵoj de pli ol 200 famuloj kaj instancoj pri la lingva problemo aŭ pri la Internacia Lingvo mem — jam de antikvaj tempoj ĝis Willy Brandt. Kronologie dividita en sekciojn fakajn, kun indekso de la tuto.

Kiel, ekzemple, sintenis pri la Internacia Lingvo Einstein, Hitler, Tito aŭ Stalin? Jen la respondoj.

Por trovi tiajn citaĵojn, mi jam de 1950 povis konsulti nur la libreton: "El Esperanto en la opinion de hombres eminentes", tradukante, ne memfide, la Hispanan tekston. Nun la E-istoj havas multe pli ampleksan kolekton da diroj aŭtoritataj.

El la 48 citaĵoj en la Hispana libreto, la nuna kompilo akceptis nur 27. Inter la rifuzitaj estas: Emil Boirac. Theo Cart, Charles Sarolea, Gilbert Murray, E. Archdeacon, Charles Baudouin. Juste ricevas mencio O. Bujwid, sed ne Cart, Boirac. Max Muller estas inkludita, ne G. Murray. Laŭ kia principo sin direktis la kompilinto? Kial li ne uzis tutan ĉi-disponeblan materialon?

P.15: Cefanja 3/9. Waringhien en sia verko "Eseoj" (p. 17) asertas, ke la verso estas tute senrilata kun la demando de lingvo internacia. Ĝi temas ne pri unuigado de ĉiuj lingvoj, sed pri reformo de paganaj preĝomoroj.

Pri Leibnitz vidu. eseon de Dietterle en "La Vendreda Klubo" (Hirt: 1921).

"Esperanto — la Latino de la demokratio": tiu slogano estas atribuita al Jean Jaures de la kompilito, sed Marjorie Boulton ("Zamenhof", p. 111), kaj "Sennacieca Revuo", n-ro 75 (p. 55) nomas D-ron Boirac kiel aŭtoron de la frazo.

La dediĉo: "Al la neforgesebla memoro de miaj trege Karaj Gepatroj, Jakub kaj Stera, Viktimoj de la modernaj barbaroj, sinceraj adeptoj de la Lingvo Internacia. tiun ĉi laboron dediĉas mag. Isaj Dratwer".

Unuafoje ĝin leginte, oni povas momente miskompreni la sencon, pro nebona frazkonstruo. Ĝi prefere tekstus: Al la memoro de miaj . . . gepatroj . . . sinceraj adeptoj de la Lingvo Internacia, kiuj estis viktimoj de la modernaj barbaroj . . .

Gusta literumo estas: Jespersen, Laemmle.

S-ro Dratwer varme petas legantojn eltrovi la originalajn tekstojn de la eldiroj en siaj respektivaj lingvoj kaj ilin sendi, kun fontindikoj, al li ĉe: Poŝtkesto 419, Bat Jam, Israel. — F.R.B.

"Biblia Revuo", Julio-Sept. Trimonata; 60 pj. 7 dol. jare. Ĉe Prof-o D. Broadribb, Univ. de Melbourne, 3052.

D. Broadribb kritikas la Novan Anglan B'blion, tekste ĝin komparante kun la Reviziita Standarda Versio kaj la Jerusalema Biblio (trad; de Dominikanoj). Ankaŭ aliajn versiojn li mencias: tiu de Ronald Knox, New World Translation, Berkeley Version.

Pri la Plena Ilustrita Vortaro li favore recenzas, tamen atentigante pri leksikonaj mankoj, precipe ĉe propraj nomoj. Li kontribuas ankaŭ pliajn psalmodukojn kaj pri la Nomo Javeo. Tiajn tekstojn taŭge aprecos nur Hebreistoj.

Italo Chiussi plifortigas sian defendon de Islamo, suplementante sian antaŭan artikolon (Islam: Religio de Amo) per: Islamo, Religio de Toleremo. Konfirme, li citas Okcidentajn klerulojn, kiuj eldiris favore al tiu religio.

A. Mikolašek pritraktis la Samarianojn iliajn originon, literaturon kaj Bible historian fonon.

Pri arkeologio, A. Duranti verke fosas inter la restaĵoj de Kanaana urbo, Gezer. La vorto "telo" bezonas glosion.

Recenzoj, notoj pri tutmonda Bibli-studo formas la finajn paĝojn de elite impresa revuo.

"Norda Prismo", N-ro 3, 1970. Kvaron-jara; 45 steloj. Peranto, Ken Linton.

Poul Thorsen: Intima enrigado en la

laboron ĉe la E-eldonejo Stafeto, kiu dum 17 jaroj enmendis 75 volumojn. El tiuj, bedaŭre, nur ok elĉerpigis, kaj nur unu — "La Infana Raso" — estas reel-donita. Iom mirige, sep el la ok elĉerpigitaj estas poeziaj.

Imponaj provoj literaturaj estas libera-versa poemo: La Falado (el la Pola); proza rakonto 11-paĝa: La Guarbo (la vorto bezonas glosion), originalo de Szathmari laŭ fono antikve-Meksika. Rosbach: Pri la verko de la Norvega skulptisto Vigeland, kies centjaron oni celebris en 1969. Liaj majstraĵoj ornamas la ĉefurbon Oslo.

Dialogforma drameto pri Hypatia (filozofino: 370-415 p.K.) bone suplementas detalan pritrakton pri ŝia vivo trovatan en "Sennacieca Revuo", n-ro 98.

Poemoj de E. de Kock: Odo al William Auld, kaj Protesto provokas provon al tradukon. Ĉu plenumble? J. Francis tradukis poemon de Keats: Odo al Greka urno.

Kvin paĝoj da trafaj recenzoj, krom multo alia. Nia ununura beletra kultura revuo — rekomendinda por ĉiu kiu "amas la literaturon".

"La Sep Reĝidoj, kolorriĉe ilustrita fabelo por infanoj. Aŭtoro: Bela Balsz 24.8 x 33.4 cm., 24 paĝoj. 1.96 dol aŭ egalvalora libro. Libroscio de "Heroldo de E-o", per nia Asocio.

"SKOLTA MONDO"

Here is helpful and interesting reading for the younger E-ists.

Text and illustrations: artistically and technically perfect. Issued quarterly, 50c. a year from: S. Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills, 3127.

POSTE; PLI POSTE ?

Kelkfoje oni legas "pli poste", kvankam la aŭtoro volis diri: "poste", ekz. "Pri tiu afero ni parolos pli poste". La kaŭzo de tiu eraro verŝajne estas, ke "poste" havas en diversaj lingvoj formon de komparativo, ekzemple en la Angla kaj Nederlanda; en ambaŭ lingvoj: later = poste, pli malfrue.

En la citita frazo "pli poste" ne estas komparativo, sed simple signifas: post paso de nedefinita tempo; pli-malpli baldaŭ.

Kompreneble oni ĝuste uzas la formon "pli poste", kiam ĝi estas efektive komparativo. Ekzemple: "Mi manĝis hejme; poste mi vizitis amikon kaj pli poste iris al teatro". (Rondo 7/55).

En la vortaro de Butler: "pli poste = later". Legu: later still.

18th AUSTRALIAN

ESPERANTO CONGRESS

2-8 Jan. 1972 — Queen's College,
Melbourne

Congress fee: before first of July, 1971
for A.E.A. members — 5 dol. For others,
6 dol.

After 1 July, 1971: for A.E.A. mem-
bers, 6 dol. For others, 7 dol. Non-
attending members: 2.50.

Send your room reservations (5 dol.
deposit) and Congress fee to Esperanto
Congress Secretary, Box 2122T, G.P.O.,
Melbourne 3001.

2nd List of Congress Members

12. Mr. P. E. Schwerin, Sydney, NSW.
13. Mrs. K. R. Schwerin, Sydney, NSW
14. Mr. H. J. Rosengren, Fitzroy, Vic.
15. Mr. E. E. Thompson, St. Kilda, Vic.
16. Mr. C. C. Goldsmith, Manly, NSW
17. Mr. Frank Acs, Orange, NSW
18. Mr. F. R. Banham, Rosanna, Vic.
19. Mrs. H. Banham, Rosanna, Vic.
20. Mr. H. M. Cohen, Preston, Vic.

JAPANESE ESP. CONGRESS

Ter Isuguro, Minami Otuka 1-19-2
Tosimaku, Tokio 170, has sent details.
It is to be held at Tokio Univ. on Aug.
28-29. Fee: 1000 yen till end of May;
1300 thereafter. Foreign visitors may
take part as guests, possibly without
certain expense to themselves, if an-
nounced speedily. Those interested ask
me for details as given in letter, or write
direct to address above.—Ed.

ESP. SUMMER UNIVERSITY

In Gyula, Hungary, 4-10 July. Enrol-
ment till 31 May. Address: Gyula, 48-as
u. II, Tit, Hungary. Details from your
editor.

STATE REPORTERS, NOTE !

All copy must be posted to the printer
in the last week of every month. So
first come, first served. We aim to get
this paper out by the 15th of each
month.

JOHN BOOTH

En la Decembra n-ro 1967 ni mise ne
enmetis la nomon sub "Victoria" de John
Booth, 25 Rathdown Street, Carlton.
Aliaj mencioj pri John Booth, kiu fondis
la unuan Esp. grupon en Aŭstralio:
nekrologo, La Suda Kruco, 8/20; The
A.E., 12/67, 11/68 (p. 271). En La S.K.
legu: 1905 — ne 1903.

U.E.A. in 86 Countries.

Rekorda nombro de la asociaj membroj
(la kolektiva membraro de la aliĝintaj
landaj asocioj 26,472). Entute 33,583
membroj.

"Ni devas konstati, ke la poezia
talento de Auld jam preskaŭ superas la
versojn de Kalocsay kaj Baghy" —
Drago Kralj: "Kvar Prelegoj", 1960.

La arte bela verkego, "La Dia
Komedio" (Dante), kun paralela Itala
teksto, ankoraŭ sukcese vendiĝas,
malgraŭ la prezo: £4.3.3 (en 1964),
Sendube la 89 tutpaĝaj reproduktajoj de
Botticelli-ilustrajoj estas en tio forta
vend-faktoro.

Versoj por gasteja libro:

Finas tempo de libro,
Ĉesas dolĉa ripozdaŭro;
Al la polva urb-infero
Hom' revenas kun bedaŭro.

—R. Schwartz.

Kiel vi tradukas en Esperanton:

The argument will not hold water.
He resolved to turn over a new leaf.
You will think better of it afterwards.
It was indeed a storm in a tea-cup.
He was greatly taken back by the
question.

I don't care a straw about what happens.
Leave no stone unturned to find out.
I make shift to have good clothes.
He showed good presence of mind.
He then popped the question to her.

"Lernolibro de algebro estas eble la
ununura io, kio estas vere tradukebla."
—Ortega y Gasset. (Sed: kiel difini la
vorton "traduki"?)

VORTARO BUTLER

Al ĝi li dediĉis 25 jarojn. La Angla
prezo: 25/-. Oni do povas ĝui la frukton
de lia laboro, paginte po unu ŝilingo
por ĉiu jaro en kiu li tiel sin okupis.
Ĉu tro kara?

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 94 (174)

MELBURNO

15 Aprilo, 1971

SOMETHING ABOUT PHILOLOGISTS

"Professional linguists conceive their study to be limited to a factual analysis of languages as they are, but they may be persuaded to consider the problem as citizens of the world" (when peace comes).—Margaret Schlauch, 1943 Professor of English, New York Univ. in "Gift of Tongues".

"Philology appears to me to be among the most futile of sciences since, meantime, a study of it enables no one to do anything with language. If philologists were given authority to alter and direct it, they might be able to prevent many of the crudities which creep in and which they deplore". — J. Conchie in "John o' London's Weekly", June 2, 1934.

"Bacon has said that the true and lawful goal of science is to endow human life with new powers and inventions. Professor Jespersen had the courage and individuality to emphasise that philology has the same "true and lawful goal" as any other science".—Bodmer, in "Loom of Language", p. 470.

(Jespersen was an ardent believer and worker in the field of international language).

"A more sympathetic attitude towards the need for a constructed auxiliary language would open fields of enquiry which have been neglected by linguists in the past. Because they accept languages as products of growth, our scholars have for too long sacrificed the study of functional efficiency to the task

of recording what is irregular, irrational and uneconomical in speech. A more lively interest in language planning would direct their efforts towards new tasks". — idem p. 493.

Note: "La Monda Lingvo-Problemo", a periodical of 64 pages in several languages with full resumes in Esperanto, is designed to appeal to philologists and language students. 7 dol. yearly through the U.E.A.

18th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

2-8 Jan. 1972 — Queen's College,
Melbourne

Congress fee: before first of July, 1971 for A.E.A. members — 5 dol. For others, 6 dol.

After 1 July, 1971: for A.E.A. members, 6 dol. For others, 7 dol. Non-attending members: 2.50.

Send your room reservations (5 dol. deposit) and Congress fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122T, G.P.O., Melbourne 3001.

3rd List of Congress Members

21. Mrs. Doris Sinclair, Caloundra, Q'ld.
 22. Miss W. Addis, Medindie, S.A.
 23. Miss R. G. Telfer, Manningham, S.A.
 24. Miss V. Cox, Surrey Hills, Vic.
 25. Mr. J. Matasin, Northbridge, N.S.W.
 26. Mrs. E. Matasin, Northbridge, N.S.W.
 27. Mr. I. T. Maddern, Morwell, Vic.
 28. Mrs. E. Maddern, Morwell, Vic.
 29. Miss P. Maddern, Parkville, Vic.
 30. Mrs. L. Goldsmith, Manly, N.S.W.
-

TRUTH AND HUMAN WORTH

"The value of man does not consist in the truth which he possesses, or means to possess, but in the sincere pain which he has taken to find it out. For his powers do not augment by possessing truth, but by investigating it, wherein consists his only perfectibility. Possession lulls the energy of man, and makes him idle and proud. If God held enclosed in His right hand absolute truth, and in His left only the inward lively impulse toward truth, and if He said to me: 'Choose!' even at the risk of exposing mankind to continual erring, I most humbly would seize His left hand and say: 'Father, give! Absolute truth belongs to Thee alone'. — G. E. Lessing: "Fragments".

LA VERO KAJ LA HOMA VALORO

La valoro de la homo ne konsistas el la vero, kiun li posedas, sed el la sincera peno, kiun li faris por elserĉi ĝin, ĉar la potenco ne pliiĝas pro la posedo de vero, sed pro la esploro farita por akiri tiun veron, kaj el tio konsistas lia nura perfektebleco. Posedo lulas la energion de la homo kaj faras lin mallaborema kaj fiera. Se Dio tenus kaŝita en Sia dekstra mano absolutan veron, kaj en Sia maldekstra mano nur la viglan impulson al la vero, kaj se Li dirus al mi: "Elektu!" mi plej humile kaptus Lian maldekstran manon kaj respondus: "Patro, donu! Absoluta vero apartenas nur al Vi". — Tradukis el la Angla Ken G. Linton.

KANTO DE AVINO

Ke la infanoj min ne plu kunestas—
min kun soleca sento morne premas.
Ĉe infanec' mallonge ili restas;
rapide al plenaĝo ili venas.

Vestetoj ne plu pendas miadrate;
nenia mark' kotŝusa sur la planko;
ne plu mi vidas ludantetojn strate;
ne prenas sukeraĵojn el manĝ-ŝranko . .
ĉar jam birdetoj miaj disen flugis.

En temp' pasinta ĝenis min la bruoj;
mi serĉis honon por mediti, legi.
Mi tiam ne imagis, ke enuo
animon mian povus nune regi.

Patrinajn manojn okupadas plene
infan-bezonoj: manĝo, trinko, vesto.
Ho, baldaŭ tio ĉesas senrevene:
la birdoj loĝas jam en propra nesto.

Sed nune, sola, je la lampa lumoj,
mi ilin skribas: foje haltas plumo,
dum mi, revante, dolĉe rememoras
la tempon for — Nun nova viv' aŭroras,
ĉar tie, kie miaj nune paras,
kion mi faris, ankaŭ ili faras,
—kaj jam genepoj: "Avineto" klukas.
—F. R. B.

"BULGARA ESPERANTISTO"

Laŭ "Heroldo de E." 16/1/71 tiu gazeto
havas 3800 abonantojn kaj celas atingi
4000. La loĝantaro de Bulgario estas
7.800.000.

"The A.E." eldoniĝas en 500 ekzempleroj
(431 abonantoj je 6/70). La Aŭstralia
loĝantaro nombras: 12.630.000.

44-a Kongreso de S.A.T. Parizo

De 31-a de Julio ĝis 6-a de Augusto
1971. Ĉu iu povus ĝin viziti? Detaloj
ĉe: S.A.T., 67 avenue Gambetta, Pa. is
20eme.

MANUSKRIPTOJ BRULIGITAJ?

Zorge studinte la nekrologon pri
Marcus Zamenhof, patro de L.L. Z., en
"Pola E-isto", Jan., 1908, oni vidas
nenion en ĝi, kio supozigus, ke Marko
efektive bruligis la manuskriptojn de
Esperanto, kiel asertas Privat en sia:
"Vivo de Zamenhof". Adam Zakr-
zewski en sia "Historio de Esperanto"
(1915) ne mencias ian "bruligon". Li
skribis nur: "Zamenhof promesis al ge-
patroj, ke li forlasos tiun ideon almenaŭ
ĝis fino de siaj universitataj studoj". En
la nekrologo oni legas, ke Marko kon-
vinkis sian filon ne aperiĝi lian pro-
jekton ĝis ĝi estos "sufiĉe elprovita
praktike". Marjorie Boulton sugestas, ke
Ludoviko promesis nur **sekreti** pri la
lingvo; tio estas: ne paroli pri ĝi al aliaj.
Li ne promesis ĉesi laboron super ĝi
private. (Vidu: "Zamenhof", p. 33, 36.)

Aliaj vortoj en la nekrologo indikas, ke
Marko principe favoris la projekton de
sia filo; rekte klara estas la aserto, ke
"li subtenis sian filon en liaj laboroj kaj
esperoj"

KORESPONDADO

Sardinia komencanto dez. kor. Bv.
skribu al li.

Bruno Sanna, Scuola Media. 08028
Oresei; Sardinia, Italy.

LIBRO-SERVO

Speciala oferto! "LETEROJ DE
ZAMENHOF" (Waringhien)

La du volumoj por nur 3.50 dol! Nepre
havendaj por ĉiu verdsangulo. Poŝt-
pagita. Limiĝita kvanto liverbla al la
unuaj mendintoj.

Beginners: B.E.A. Pronunciation record
75 c. plus 12 c. postage. Address on front
page of The A.E.

Ni anoncos bonaĉetojn en ĉiu numero.

AUSTRALIA KRONIKO

BRISBANE: La Zamenhof-Festo okazis 18/12 en la halo de la Germana Klubo kun festmanĝo. Ĉeestis ĉ. 50 personoj, inter ili kelkaj malnovaj samideanoj kaj gastoj el la grupo de Toowoomba. Oni festparoladis, deklamis kaj S-ino Callaghan prezentis ĉarmajn E-pupetludojn. Koran dankon meritas la Germana Klubo, kiu senkoste disponigis al ni la halon.

La nova estraro estas: Prez. S-ro K. Guenster; Vic-Prez. S-ino M. Robinson. Sekretario: S-ino N. Callaghan; Kasisto: B. Allatt; Libroservo: S-ro H. Brendel; Biblioteko: C. Sullivan.

Anonco en antaŭurba gazeto rezultis, ke 36 personoj deziris aliĝi al nova kurso. Ree nin trafis malĝoja novaĵo: La milito en Vjetnamo kaŭzis la morton de la filo de Ges-roj R. Ross de la Sherwood-grupo. Ges-roj Greenhalgh estas nun survoje al Usono, la unua etapo de sia mondvojaĝo. —K. Guenster.

TOOWOOMBA: La Jarkunveno okazis 16/2 en la halo de la 'Adult Education Centre'. Nova estraro elektigis: Prez. S-ino Harvey; Vic-Prez. S-ino Buchan; Sekretario: F-ino M. O'Mara; Kasisto: S-ino Carney; Biblioteko: S-ino Lehane; Presoficisto: S-ro H. Petley; Fremdlanda Korespondanto: F-ino Veacock. Samvespere komenciĝis nia nova kurso: Kune kun 8 "progresintoj" ĉeestis 24 komentantoj.

SEYMOUR (Vic.) Lunde, 15/2, ĉe la "Internacia Vespero" de la "Business & Professional Women's Club" S-ro Percy Holmes aranĝis ekspozicion de Esperantistoj. Kelkaj instruistoj interesiĝis pri Esperanto, inter ili ankaŭ la estro de la loka altlerniĝo. S-ro Holmes distribuis multajn "verdanjn kartojn". La loka gazeto "Seymour Telegraph" 2/3 raportis pri la Esperanto-ekspozicio.

MELBOURNE: Je 22-a Feb. S-ro H. Koppel gvidis "Ĉu vi scias" demandaron, kiu samtempe ekzercis la buŝojn kaj malkovris la sciomankon de la anoj rilate la historion de Esperanto. S-ro F. R. Bannham, 1/3, prezentis bildoplenan historion, kiu montris la egoismon regantan la plimulton de la homoj. Sekvis teatraĵeto traktanta la konfuzon kiu povas kreski el la nacilingvaj idiomaj.

S-ro K. Linton, 15/3, legis kelkajn bonstilajn tradukaĵojn siajn. "Ĉu estas surogato por Dio" instigis al pensado, kiel ankaŭ "La Mesaĝo de la Kajto", konsilofonto por tiuj, kiuj scias profiti. Informcelaj sed malfacile koncepteblaj estis la faktoj malkaŝitaj per "La Steloj kaj la Homoj", do bonvene malstreĉe estis "La Gojo posedi velboaton".—F.K.

Orientaj Antaŭurboj (Melbourne): La Jarkunveno okazis je 17/2. La nova estraro konsistas el Prez.: S-ro A. Heathfield; Vic-Prez.: F-ino Ann Hearn, S-ino B. Thomas; Sekretario: S-ro R. Reed; Kasisto: S-ro W. Brockwell; Protokolanto kaj Reprezentanto al Viktoria E-Federacio: S-ino M. Casey; Biblioteko: S-ino M. Fordham; Informado: S-ino Smith; Komitato: Ivy Fallu, Maurice Fordham, Marcia Widdicombe.

Orrong E-Grupo: Post reklamo en loka gazeto ni akiris kelkajn novajn membrojn. Ni aĉetis ekzempleron de la libreto "De Z al A en tri epokoj", prelego de S-ino Fay Koppel ĉe la Perta Kongreso. Ni trovis ĝin tre taŭga helpilo kontraŭ tiuj, kiuj ofte demandas "Ĉu Esperanto havas literaturon?". Tiuj el ni kiuj lastatempe vizitis la E-Domon en Richmond estis impresitaj ne nur de la grandega nombro da libroj prunteblaj de la biblioteko, sed ankaŭ pri la grandega laboro farita por bindi, kovri kaj klasifi ilin. — Adrienne Paling.

Lastmomente ni aŭdis ke je 10/3 A.E.A. Sekretario "Tiny" Goldsmith edziĝis al F-ino Lily Jullie. Ni esperas raportoj pli detale venontnumere. La nova paro nun loĝas ĉe Flat 2, 22 Augusta Rd., Manly, 2095.

MANLY: 28/1 okazis jarkunveno ĉe Ruth Carruthers, 66 Wanganella Street, Balgowlah. Elektigis la jena estraro: Prez.: Kevin Smith; Vic-prez.: Skabeno Frank Preacher kaj Arthur Cocking; Sekretario: Olive Russell; Kasisto: Russell Baxter; Libro-agento: C. C. Goldsmith.

Nome de la Manly klubanoj, Kevin Smith esprimis tutkoran dankon al Marjorie Duncan por 10-jara laŭdinda prezidanta laboro, kaj prezentis al ŝi oran insignon kun la gravuritaj vortoj "Vivano Manly".

11/2 La unua stud-periodo komenciĝis en la Vespera Lernejo, Darley Road, Manly. En la komenca kurso 15 sub Betty Cleminson; en la progrese 12 sub Flora Cardale; en la altgrada 5 sub S-ro P. E. Schwerin kaj Marjorie Duncan. Je 8.30 post la kursoj okazis la jenaj programoj: 11/2 "La anoj parolas"; 18/2 "Grekujo", prelego kun lumbildoj, S-ro P. E. Schwerin; 25/2 "Luda vespero". Lily Jullie gvidis kart-ludon "Leksikono". Klubanoj, bonvenigis Ges-rojn Clarke (Redcliffe Grupo, Kvinlando), kiuj nuntempe restas en Sidnejo survoje al la 56-a Universala Kongreso de Esperanto en Londono.

"Pacific Times", "Manly Daily", "North Shore Times" kaj "Warringah-Pittwater News" presis artikolojn pri nia agado.

("Vivano" estas protektnike necesa mallongigo de "Dumviva ano . . ." —P.F.L.)

Post la kursoj 4/3 okazis distra programo; kontribuis vizitantoj Ges-roj Clarke (Redcliffe Grupo, Kvinslando), Richard Moir (Glasgovo, Skotlando) kaj la jenaj anoj: Les Scott, Susan Sobey, Thora Richmond, George Thatcher, Eunice Graham.

11/3 Pensiga prelego de Margaret Chaldecott, "Eŭropo laŭ Sezonoj" kun lumbildoj.

15/3 Speciala renkontiĝo ĉe Ruth Carruthers honore al S-ro Erasmus Zilles, vizitanto el Germanujo, kiu parolis pri (a) Esperanto-informado en Neustadt, (b) bonaj rilatoj kun urbestro, (c) la Itala kongreso surŝipe.

18/3 Kevin Smith lerte traktadis pri Lingvaj Problemoj.

20/3: por celebri la dekan datrevenon de Manly Klubo ĉ. 70 E-istoj kaj vizitantoj, inkluzive de Grace Kirkwood el Mylston (N.S.K.), Rowena MacGill el Wellington (N.Z.) kaj Haru Mijazaki el Tokio, ĉeestis "smorgasbord" en la Virina Kroketa Klubo de Manly. May kaj Russell Baxter organizis la manĝon, ankaŭ la distraĵojn. El la Brandmann Muzika Lernejo venis grupo da junaj muzikistoj, kiu lerte ludis piano-akordione. Sekvis teatraĵo en kiu rolis May kaj Russell Baxter. Richard Moir kantis E-e, sin akompanante per gitaro. Ges-roj Clarke (Redcliffe Grupo) montris lumbildojn kaj raportis pri kursoj por gejunuloj ĉe sia hejmo. May Baxter kaj Bill Donald demonstris modernan dancadon.

Kevin Smith, nome de la Manly Klubo, la Sydney Societo kaj la A.E.A., gratulis kaj donacis al Ges-roj C. Goldsmith, kies edziĝo okazis 10/3 en Sidnejo. Nome de la Redcliffe Grupo, S-ro Clarke aldonis bondeziron kaj plian donacon al la novgeedza paro.

Elokvente parolis Skabeno Frank Preacher pri la fondo kaj kresko de de la Manly Klubo; li aparte menciis la senlancan deklaran laboron de Marjorie Duncan, prez. ek de la klubfondo ĝis la nuna jaro. Vesperfine la programestro, Arthur Cocking, arigis la ĉeestantojn en rondon por kanti "Malnovajn ge-konatojn". Rondmeze staris Ges-roj Goldsmith, Marjorie Duncan kaj la nuna prezidanto, Kevin Smith.

Dankon al May Baxter kaj ŝiaj helpantoj, kiuj brave laboris en la kuirejoj! —Fenikso.

SYDNEY: 1/3 Victor Bourlin alportis malplenan sonbendon de Ian Ross de Hornsby, kaj membroj sonbendis paroladon. Ĝi estos sendita al la kluboj en Aŭstralio, do eble vi ĝojos aŭdi voĉojn de amikoj. Volo Guelting parolis pri S.A.T., la sennacia societo de kiu li estas peranto por Aŭstralazio.

Margaret Caldecott priskribis, kiel ŝaradoj povas amuzi kaj instrui Esperante Gerald Browne menciis, kiel E-o helpis ilin trovi "tuje-faratajn" amikojn, kiam ili eniris "strangan landon", kaj Alfreda Browne petis sugestojn por interesi gejunulojn. Tom Elliott klarigis pri la Libro-servo de A.E.A., nun servata de li. Victor Bourlin deklamis sian tradukadon de poemo de Maksim Gorki: "Heroldo pri Stormo". Ni arde atendas aŭdi voĉojn de E-istoj kaj amikoj, kiam la sonbendo revenos al nia klubo.

8/3 Victor Bourlin lumbilde rakontis pri sia veturo el Ruslando al Ĉinio tra la Gobi Dezerto, kiam li estis juna viro. En tiu tempo kaj kondiĉoj li ne havis fotografilon, do li mem desegnis koloritajn bildojn. Kelkaj estis humoraj!

15/3 plezure ni bonvenigis al Grace Kirkwood, vizitanto de Coffs Harbour. Edna Turvey montris lumbildojn de Hongkongo, kiun ŝi vizitis por alesti religian kunvenon en universitato.

Varmkore ni gratulas al Lily Jullie kaj "Tiny" Goldsmith okaze de ilia geedziĝo. Feliĉa estu ilia nova vivo!

22/3 la prezidanto, John Matasin, pensige parolis pri "Vojo al Solvo de Mond-problemoj". Li konsilis, ke homoj devas klopodi atingi la celon de sana korpo kaj sana menso.

Wre Chandler malsaniĝis dum vizito en Melburno kaj nun estas en Fern Tree Gully Hospital. Al li rapida resaniĝo! — G. E. Browne.

PERTH: Kunvenis Liganoj 24/2 por laŭtlegi korespondadojn el diversaj landoj. Leteroj kaj poŝtkartoj emfazis la spiriton de Internacia Amikeco, penso inspira por E-istoj tra la mondo.

La Ligo kunvenis 10/3 ĉe la Instruista Kolegio en Nedlands. Pro malsano de F-ino Stempel, kiu estis listita por montri lumbildojn pri sia deĵorado en Nov-Hebriidoj, la programo formiĝis kiel legado de teatraĵa peco, diskuto pri sintakso kaj lego de letero el Suda Koreo ricevita de la sekretario.

La Instruista Unuiĝa Biblioteko, post rekonstruo, estas preta ricevi donacojn de E-libroj aldone al tiuj nun sur breto sub rubriko "Esperanto". Kontribuantoj de taŭgaj libroj por okupi la provizitan spacon trovas dankan ricevanton kiu havas la honorindan nomon, Gertrude

Pollard (Vidu la A.E.A.-Adresaron.)—
G. Pollard.

Ekzamenoj de A.E.A.

Elementa: Isabel McLaren, Morwell, Vic

Esperanto — Federacio de N.S.K.

En 13/2 okazis Konferenco de E.F.-N.S.W. ĉe Terrigal, bela marborda urbeto, sesdek mejlojn norde da Sidnejo. Partoprenis 24 membroj, la plejmulto el kiuj alvenis vendredon la 12an kaj post la ĉefmanĝo ĝuis neformalan babiladon, plejparte en Esperanto, en komforta ĉambro, kiun la Hotelo rezervis por ni.

Sabate antaŭ la matenmanĝo, kelkaj marŝis al la "Skillion", terkapo for unu mejlon de la hotelo; aliaj banis en la hotela naĝejo aŭ en la surfo. La ornitologoj iris al apuda Laguno por observi la birdojn kaj registri ties voĉojn. Poste, ni iris amase al la loka Skolta Halo por voĉdoni, ĉar estis Elekto-tago en N.S.K.

Sekvis ekskursoj en la ĉirkaŭaĝo ĝis la lunc-horo. Je 2.30a p.m., ni kunsidis por la sola aferkunsido de la Konferenco. Ni ricevis raportojn pri la Manly, Sydney, kaj Hornsby Kluboj, raporton de la Sekretario, kiu devas eksoficiĝi pro malsano, kaj diskutojn pri la venontaj agadoj de la Federacio. En la kunsido ni uzis la Anglan lingvon pro la nombro de lernantoj kiuj ĉeestis, sed pluraj parolis Esperante.

Nia venonta Konferenco estos en Majo ĉe la "Hydro Majestic", Medlow Bath, sur la Blua Montaro.

La ĉefmanĝo estis festa okazo, sed daŭris tro longe, kaj nia kunveno por ludoj kaj distrado komenciĝis tre malfrue. Ni ludis Esperantajn vortludojn, kaj babiladis plejparte en Esperanto. Eĉ la komencantoj partoprenis.

Dimanĉe ni decidis lunci ĉe la Naturkonservejo "Girrakool" apud Gosford. Bedaŭrinde Tajni suferis stomak-malsanon, kaj multaj ne atingis la rendevuon. Kiel kutime, la vetero estas perfekta. George Thatcher, kiu aranĝas niajn konferencojn, verŝajne havas influon kun Jupiter Pluvius, ĉar li ĉiam aranĝas belan veteron.—REVANTO.

ES WAR EIN ALTER KOENIG . . .

Estis iam reĝ' multaĝa
Kun peza kor' kaj kap' grizhara.
Kompatinda reĝ' multaĝa
Edziĝis kun junino kara.

Estis iam knabo bela
Kun gaja kor', hararo blonda.
Tenis li trenajon silkan
De la reĝino ĉarme-ronda.

Konas vi prateman kanton
Kun sono dolĉa, sono plora?
Devis morti ili ambaŭ - - -
Pro troa ardo amadora.

(Heine: trad. F. R. B.)

KIEL VI TRADUKAS . . . P. 108

S-ro V. J. Timmins (N.S.K.) sendis al siajn provojn:
La argumento similas al likanta sitelo.
Li forte decidis folii pli bonan ĉapitron
en sia vivlibro.

Poste vi fariĝos pli saĝa pri la afero.
Tio vere estis ŝtormo en tetaso. (Lau P.I.V.)

Li estis ege konsternita de (pri) la demando.

Al mi estas tutegale pri kio ajn okazos;
aŭ: Mi ne zorgas unu pinglon pri io okazonta;

aŭ: Estas indiferece al mi kio okazos.
Serĉu eĉ sub ĉiu ŝtono por priesplori la aferon.

Iel prosperas al mi posedi bonajn vestojn.

Li montris viglan menspretecon.
Tiam (poste) li elŝutis al ŝi la fianĉproponon.

Pri 4: Klopodado tro grava pri afer' senenhava. F. R. B.

LETERO DE FIAT

Estimata Redakcio: nia firmao, kiu ek de la jaro 1964 uzas la Internacian Lingvon por sia informado eksterlande, eldonis lastatempe aliajn prospektojn en Esperanto por la Fiat 124 Special kaj Fiat 124 Special T.

Ni aldonas ĉi tie 2 ekzemplerojn de tiuj prospektoj por eventuala recenzo en via gazeto.

Ĉiuj prospektoj en Esperanto pri niaj produktoj estas riceveblaj ĉe nia adreso: Corso Marconi N 10, 10100 Torino, Italy.

Bonvolu akcepti niajn plej korajn salutojn.

(Subskribo: Publik-Informisto FIAT).

La du belegaj faldfolioj koloraj prezentas la internon, eksteron kaj mekanismon de la aŭtoj, detale, impresive bildigitajn kun teksto en Esperanto. Kun alta plezuro ĉiu aŭtemulo rigardas ĉi prospekton. Skribu por ĝin ricevi.—Red.

RECENZOTAJ

Eta Vivo: Clelia C. Guglielminetti.
Poemaro. 143 p.

Kantoj kaj Romancoj: H. Heine. Tradukoj de Kalocsay kaj Waringhien. 383 p.

Humoroj: originala poemaro. William Auld. 115 p. (Eldonis Stafeto).

Kiam iu dronas, jam estas tro malfrue lin instrui naĝi.

Sidante apud naĝejo iun tagon, mi aŭdis tumulton. Kapo balanciĝis en profunda akvo. Mi vidis homon kuri al la rando de la naĝejo kaj krei: "Retenu la spiron!" Tiam junulino lin subtenis per plua konsilo: "Flosu sur la dorso!" Iliaj voĉoj kaptis la atenton de la deĵoranta gardisto. Sen atendi eĉ onon de momento li kuregis la tutan longecon de la naĝejo, plongiĝis en la akvon, kaj aliris la viron al sekureco. Poste li diris al mi: "Kial, en la nomo de Ĉielo, neniu kriis tiun solan vorton: Help! Kiam iu dronas, jam estas tro malfrue lin instrui naĝi."

Tiuj vortoj revenis al mi kelkajn semajnojn poste, kiam mi vizitis lernejan memservan restoracion. Mi vidas mal-elegante vestitan knabinon akcidente lasi fali la laktan de sur sia pleto, ĝuste kiam ŝi alvenis ĉe sia tablo. Iu alkuris kun viŝilo por sorbi la elverŝitan laktan. Mi aŭdis instruistino admoni ŝin, ke ŝi estu pli zorgema. Kelkaj lernejanaj turmentetis ŝin pro ŝia malerteco. La kompatinda knabino, ŝajne paralizita, tie staris surda kaj muta. Memorante la konsilon de la naĝgardisto, mi demandis al mi, ĉu ŝi posedas monon por aĉeti pluan glason da lakto, aŭ ĉu ŝi devas resti senlakta la tutan tagon.

Mi stariĝis kaj aliris la vendotablon, aĉetis pluan glason da lakto, kaj ĝin metis sur ŝian pleton. La rigardo de danko kaj trankviliĝo pruvis al mi, ke mi korekte divenis.

En tempo de krizo ni devas memori fari ion pozitivan. Ni devas agi praktike kaj percepte, kiam ni vidas frathamon afliktatan.

Lastan Kristnaskon amiko mia estis ano de grupo de virinoj, kiuj distribuis korbojn da manĝaĵoj al malriĉaj familioj. Ĉe unu domo virino kun siaj infanoj kunpremiĝantaj al ŝi, silente rifuzis la donacon. Surprizite, kelkaj grupanoj opinis la virinon nedankema kaj mal-humila.

"Mi estis tuj forironta, kiam io min malhelpis," diris mia amikino. "Mi revenis sola kaj trovis la virinon. Si klarigis al siaj infanoj, ke oni mal-ŝaltis la gason pro nepago, do mankis al ŝi rimedo kuiri la maleagron. "Ĉu ne estas pli bone," ŝi demandis al la infanoj, "ke ricevu la birdon iu alia, kiu povas ĝin kuiri?"

"Mi foriris, sed poste revenis kun kuirita maleagro," aldonis mia amikino.

Agante pozitive en krizo postulas, ke ni konsideru la bezonon de la alia persono pli urĝa ol la propra. En kelkaj krizoj estas pli saĝe voki spertulon, ol

provi mem esti tio. Ne estas unu sola formulo por helpi alian.

Unu nokton sur aviadilo juna soldato petis al mi, "Ĉu mi povas paroli al vi, Sinjorino?" Mi rigardis la rubandizitan soldaton sidantan apud mi kaj jesis. Pli ol horon li parolis. Dum tuta jaro li forestis en Vjetnamo, kiu estis inkubo de mortigo kaj perdo de kamaradoj. (Li perdis parton de sia kruro).

Dum ni alproksimiĝis lian celon, mi sentis lian pligrandiĝantan tension kaj rimarkis liajn tremantajn manojn. Ankoraŭ li parolis. Li estis multe ŝanĝita dum la foresto. Ĉu liaj gepatroj komprenos? Kion pri lia fianĉino? Li kaj ŝi sin vivtenis nur per leteroj.

Dum la aviadilo aŭtokuris al la haltejo la junulo panike kriis: "Ho, ne! La tuta urbo atendas min!" Stevardino alvenis por informi lin, ke jam estas tempo eliri. Li ne respondis.

"Ho, soldato," diris la stevardino, "Ĉu vi timas? Ĉu vi ĝajnis tiujn medalojn por nenio?" Sed li ŝajne ne aŭdis ŝin. Jam estis tempo, ke mi agu.

Mi metis la vizaĝon tre proksimen al tiu de la soldato, kaj urĝe diris: "Mi suferas koratakon. Bonvolu helpi min eliri la aviadilon."

La plano tuj efektiviĝis. Tre zorgeme kaj garde li kondukis min el la aviadilo laŭ la koridoro kaj malŝupren laŭ la ŝtuparo. Ĝuste kiam ni tuŝis la betonon, junulino kuris el la homamaso, kriante lian nomon. Kiam ŝi nin atingis, mi revenis al la seĝo en la aviadilo.

"Kiel vi sukcesis fari tion?" postulis la stevardino.

"Naĝgardisto instruis min," mi respondis. "Kiam iu dronas, jam estas tro malfrue lin instrui naĝi."

—El la angla tradukis K. G. Linton.

Karaj Klubsekretarioj!

En nia lasta numero nia redaktoro prezentis al vi planon por la regula kaj akurata apero de nia gazeto, sed post interkonsiliĝo kun la kompostisto, ni decidis iom modifi tiun planon, kaj tiun modifitan planon mi nun prezentas al vi. Laŭ tiu plano la klubraportoj devos atingi ĉiumonate la:

vicsekretarioj je la 15-a de la monato

la redaktoron je la 19-a,

la kompostiston je la 22-a,

la presiston je la 1-a

la ekspedistinojn je la 7-a,

la leganton je la 15-a

Tiel ĉiu estos kontenta; la klubsekretarioj scios, ke iliaj raportoj devas atingi la vicsekretariojn akurate aŭ tiuj raportoj maltrafos tiun numeron kaj aperos en la venonta; la redaktoro, kompostisto, kaj presisto povos plani sian laboron, bone

sciante, kiam ili devos dedici sin al nia gazeto, kaj, plej grave el ĉio, nia sekretario povos efike plani sian agadon, kiu estas sufiĉe malfacila, eĉ kiam ĉio okazas precize akurate.

Ĉio dependas do, de niaj klubsekretarioj, sed eĉ por tiuj estos pli facile, ĉar ankaŭ ili povos regule plani sian agadon.

Mi anticipe dankas al ĉiuj pro ilia kunlaborado. Sincere via prezidanto, Ken G. Linton.

LA KUDRILLO. Skeĉo. Laŭ Faulhaber.
FRITZ, Nederlanda gasto. BOZENA, Ĉeĥa samideano. MARIA, ŝia fratino. PANJO, patrino de Maria kaj Bozena.

Hejmĉambro en Ĉeĥoslovakio, kie loĝas Panjo kun la du filinoj. Vizitas ilin gasto el Nederlando. Bozena kudras. Fritz legas "Heroldon de Esperanto". Bozena penas enkudriligi fadenon, sed vane.

BOZENA: Fritz, eble vi havas pli bonajn okulojn ol mi. Mi petas vin, ŝovu tiun fadenon tra la orelon de la kudrilo.

FRITZ: Tra la orelon? Tra la okulon, vi certe volas diri.

BOZENA: Ne, mi ne eraras. Tio estas orelo!

FRITZ (proteste): Tute ne. Tio estas okulo!

BOZENA: Ha ha! okulo! Tio estas sensencaĵo. Tio ja estas orelo.

FRITZ: Kial sensencaĵo? Okulo estas la ĝusta nomo, ĉar ĝi similas al okulo.

BOZENA: Okulo ja estas Nederlanda idiotismo!

FRITZ: Orelo estas Ĉeĥa idiotismo!
(Eniras Maria)

MARIA: (ridetante): Kio estas?

BOZENA: Aŭdu! Fritz diras, ke en Nederlando la virinoj ŝovas la fadenon tra la OKULON de kudrilo. Ĉu vi iam aŭdis ion tian?

MARIA: Neebla esprimo! Nederlandanoj ĉiam havas ion eksterordinaran!
Orelon ili nomas OKULO!

FRITZ (prenante tason de la tablo): Sed, knabinoj, aŭskultu! Kiel vi nomas la tenilon de taso por teo aŭ kafo?

BOZENA: Ni nomas ĝin orelo.

MARIA: Ĝi ja similas al orelo.

FRITZ: Ĝuste! ankaŭ ni nomas ĝin orelo, sed tiun finaĵon de kudrilo ni nomas OKULO, ĉar ĝi similas al okulo. Tio ja estas tute klara.

BOZENA kaj MARIA: Aŭdu! Tion li nomas tute klara!

FRITZ: Orelo estas naciismo. La Ĉeĥa lingvo vin influis.

BOZENA: OKULO estas naciismo.

MARIA: Vin influis la lingvo Nederlanda.

(Fritz profunde ĝemas)

BOZENA: Ni demandu Panjon. Panjo! Panjo!

PANJO (eniras): Kio okazis?

BOZENA kaj MARIA: Orelon li nomas OKULO.

PANJO: Mi tute ne komprenas. Kio estas al viaj OKULOJ kaj ORELOJ?

BOZENA: Ne niaj okuloj kaj oreloj, sed Fritz persistas, ke kudrilo havas okulon anstataŭ orelon!

PANJO: (kun rideto skuas la kapon): Nederlandanoj estas strangaj homoj; ili konstruas siajn domojn sub la nivelo de la maro kaj ŝovas fadenon tra la okulon anstataŭ tra la orelon de kudrilo.

FRITZ (senespere levas la manojn; profunde pensas, kaj subite diras): Ĉu en la Nova Testamento ne estas parolo pri kamelo, kiu trairis la okulon de kudrilo?

BOZENA kaj MARIA: (jubilante): Jes, jes, sed tra la ORELON.

FRITZ: Ne eble.

BOZENA: Ni montros tion al vi, nekredemulo!

(La knabinoj prenas Ĉeĥan Biblion kaj trovas la lokon).

BOZENA: Jen, Mateo 19/24.

(Kun kunpremitaj lipoj ili fingre montras la tekston).

BOZENA: Tie ĝi staras: UCHO: tio estas, ORELO.

MARIA: Nu, kion vi diras pri tio?

FRITZ (obstine): Sed nun ni esploru la NOVAN TESTAMENTON en Esperanto. Ĉu vi havas ĝin?

PANJO kaj MARIA kaj BOZENA: Jes, ni havas ĝin.

(Ili prenas la Esperanto-Blibion, serĉas la lokon, triope legas — kaj rigardas sin perplekse. Subite ili ekridegas!)

E. Otto, en "Gajaj Klubvesperoj"

(Dansk Esperanto-Forlag, 1970)

Adaptita de F. R. Banham.

KVAR EPOKOJ DE ESPERANTO

1887-1900: La "Rusa periodo". En la Unua Adresaro el 1000 nomoj, 800 estas Rusaj. Eks-Volapukistoj multe aliĝis al Esperanto. Grandparte idealisma, homunuigema; ankaŭ lingve kritika, sed rezulte stabiliga.

1900-1914: La "Franca periodo". La unua Esperanto Mondkongreso (1905), fondo de U.E.A. Esperanto fariĝis vere vivanta lingvo. Stariĝis la unuaj verkistoj: Zamenhof, Bein (Kabe), Grabowski, Kofman . . . Provo de Zamenhof naski Hilelismon; la afero pri Ido. Genio de Hodler, kiu, kun

aliaj, en Svisujo tenadis Esperanton entutata dum la milito. Sesjara paŭzo.

1920-1938: Pli-universaliĝo de Esperanto pro kresko ĉe diversnaciaj verkistoj. Fondo de S.A.T., "Literatura Mondo" (la Budapeŝta skolo); Omoto Internacia, multo da Rusa politika literaturo. Esperanto per radio. Vasta prilingva, vortara, literatura eldonado. Ok antologioj naciaj en Esperanton. Sekvis la Nazia teroro kaj la Dua Milito.

1948-?: Mondkongresoj reestigis per tiu en Berno (1947). Novaj Esperantaj eldonejoj: Tenerife, Kopenhago, Nico, Limburg/Lahn, Rio de Janeiro k.a. Britaj poetoj prenis la torĉon lumigitan en Budapeŝto. La Peticio, venko ĉe Unesko, progreso en la Oriento, post-Stalina revekiĝo en Rusujo kaj ties orbitlandoj. Apero de la monumentaj: "Leteroj de Zamenhof" kaj la Plena Ilustrita Vortaro . . .

Vidu: "Lingvo kaj Vivo" (Waringhein), p. 397; The A.E., 1/1961: Legu 1905 ĉe linio 2, kol. 2. sur paĝo 109.

BONVOLU RIDETI . . .

Du viroj sidis unu kontraŭ la alia en aŭtobuso. Unu legis ĵurnalon kaj, kiam li finlegis paĝon, li ĝin ĉifis kaj jetis el fenestro. Finfine la alia viro ne povis plu elteni, kaj demandis: "Kial vi ĉifas paĝojn kaj ilin jetas el fenestro?" "Por fortimigi elefantojn", respondis la alia. "Sed, amiko", persistis la dua; "estas neniom da elefantoj ĉi tie!" "Tute prave", respondis la unua, "kaj tio pravas la efikecon de la ideo".

Fraŭlino estis ŝokita per la fivortoj de la metiistoj, kiuj riparas la telefondratojn apud ŝia domo; do ŝi skribis al la centro por plendi pri la afero. La ĉefmetiisto do devis prezenti raporton al sia ĉefo. Jen ĝi: "Mi kaj Spajk laboris pri ĉi tiu tasko. Mi estis ĉe supro de eskalo kaj lasis misfali iom da fandita plumbo, kiu trafis la nukon de Spajk. Li rigardis al mi kaj diris: "Vere, kara Henriko, vi devos esti pli zorgema".

"Mi manfrapis la vizagon de Henriko lastan vesperon", diris blondulino; "sed poste mi pentis". "Kial?" demandis ŝia kunulino; "ĉu li ne kulpis?" "Ne", respondis la alia; "mi opiniis, ke li estas malfidela, sed la haro, kiun vi vidis sur lia jako, apartenis nur al lia edzino".

"Ĉu vi kredas, ke ĝentlemanoj preferas blondulinojn? demandis la junulino. "Kompreneble", respondis ŝia fianĉo. "Sed mi estas brunulino". "Do kio? Mi

ne estas ĝentlemano".

Oni diras, ke vi fianĉiĝis al Mikaelo". "Jes, tio estas fakta". "Ĉu vi scias, ke iam li amproponis al mi?" "Nu, ne precize tion, sed li menciis, ke li kulpis pri kelkaj stultajoj en la pastinteco".

Kuracisto ricevis telefon-vokon de amiko, kiu deziris, ke li vizitu lin por ludi kartojn. La kuracisto konsentis veni, sed esperis, ke lia edzino ne multe demandos pri tio: kien li iras. "Ĉu vi nepre devas eliri, mia kara?" ŝi demandis simpatie. "Mi timas, ke jes", li respondis; "tri kuracistoj estas urĝe jam tie".

Lordo Palmerston (pameston) estis populara Ĉefministro Brita meze de la 18-a jarcento. Estis onidiro, ke li, jam 78-jaraĝa, havas amaferon kun edzino de pastro, ĝuste antaŭ elektado tutlanda. La famo de vigis lian politikan kontraŭulon, Lordon Disraeli (disrali) amare murmuri: "Pro Dio, la popolo ne sciu tion! Se ĝi scius, li nepre venkus balote tra la tuta lando!"

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION Publicity Fund

Previous acknowledged	\$852.11
Thompson, Mr. E. E., Vic.	1.00
Webb, Mr. J. H., Qld.	1.00
Clarke, Mr. V. C., Qld.	1.00
Brodie, Mr. N., N.S.W.	2.00
Ross, Mr. R., Qld.	1.00
Howard, Mr. W. H., W.A.	2.00
Brown, Mr. N. E., Vic.	1.00

\$861.11

Sincere thanks to all supporters.

Position on 23rd March 1971

	Quota	Points	%
Queensland	130	789	607.0
Victoria	300	1115	371.6
N.S.W. -/- A.C.T.	260	884	340.0
W. Australia	80	239	299.0
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	50	125.0

IMPORTANT

If you have already paid your subscription for this year we thank you for your promptness. If you have not yet done so, please note that no further issues of the "Australian Esperantist" will be sent to you until you have rectified this omission. Our movement needs your support to continue the recent progress, so please send without further delay and so help your officers.

—C. C. Goldsmith, Secretary.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 95 (175)

MELBURNO

15 Majo, 1971

18th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

2-8 Jan. 1972 — Queen's College,
Melbourne

Congress fee: before first of July, 1971
for A.E.A. members — 5 dol. For others
6 dol.

After 1 July, 1971: for A.E.A. mem-
bers, 6 dol. For others, 7 dol. Non-
attending members: 2.50

Send your room reservations (5 dol.
deposit) and Congress fee to Esperanto
Congress Secretary, Box 2122T, G.P.O.,
Melbourne 3001.

4th List of Congress Members

31. Mr. F. Mueller-Sorau, Petersham,
N.S.W.
32. Miss D. Davies, Bouldercombe, Q'ld.
33. Mrs. R. Carruthers, Balgowlah,
N.S.W.
34. Mr. G. Thatcher, Fairlight, N.S.W.
35. Mr. G. Browne, Mosman, N.S.W.
36. Mrs. A. Browne, Mosman, N.S.W.
37. Mr. J. Moore, Rockhampton, Q'ld.
38. Mrs. R. McGrath, Mt. Pleasant,
W.A.
39. Mr. H. McGrath, Mt. Pleasant,
W.A.
40. Miss A. Godfrey, Burwood, Vic.
41. Miss Ellen Minton, Cremorne, Tas.
42. Mrs. E. Siede, East Ringwood, Vic.
43. Mrs. May, Baxter, Manly, N.S.W.

State Distribution: Vic. 22; N.S.W. 13;
Q'ld. 3; W.A. 2; S.A. 2, Tas. 1; A.C.T.
nil.

La Kongres-Sekretario raportas . . .

Ciuj preparlaboroj por la 18-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso bone progresas.

La L. K. K. fondiĝis je la 2-a de
Februaro kaj jam havis 2 kunsidojn.
Ĝi konsistas el: Prez. kaj Kasisto: S-ro
Ken Linton; Sekretario: S-ro Herbert
Koppel; Protokolistoj: F-ino Ann Hearn;
Prizorgantoj de manĝetoj kaj bankedo:
S-inoj Valda King kaj Margaret Casey;
Akceptantoj (ĉe Queens College) S-ino
A. Paling kaj S-ro L. McLochlan;
Ekspozicio: S-ro A. Heathfield; Infor-
mado: S-ro A. Baldwin; Transporto:
S-ro M. Fordham; Koncerto: S-ino M.
Sanders; Libro-Stando: S-ino I. Fallu.

S-ro K. Linton preparas belan kongresinsignon. Ĝi montras la Kolegion
"Queen's".

Pastro C. Cowling konsentis aranĝi la
Di-Servon. Ĝi okazos en la kapelo de
la Kolegio.

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

OFFICIAL NOTICES

17th April, 1971

New Individual Members

Murray, Mr. W. J., Palm Beach, Q'ld.
Attwood, Mrs. A., Corinda, Q'ld.
Mossop, Mr. C. S., Concord West,
N.S.W.
Harvey, Mrs. W. K., Toowoomba, Q'ld.
Calaby, Mr. M., Yarralumla, A.C.T.
Barber, Mr. N., Korumburra, Vic.
Brown, Miss M., Robinvale, Vic.
Pollock, Mr. D., Toowoomba, Q'ld.
Alvin, Mr. M., Morwell, Vic.
Maddern, Miss H., Morwell, Vic.
Semple, Miss M., Port Vila, New
Hebrides.

Publicity Fund

Previously acknowledged \$861.11
Buki, Mr. J., N.S.W. 1.60

Robinson, Mr. W. R., Vic.	2.00
McGrath, Mrs. R., W.A.	2.60
	\$867.31

Sincere thanks to all helpers.

Interstate Competition Points allotted

New Individual Member	5
New Life Member	50
Popular Course enrolment	2
Intermediate Course enrolment	5
Advanced Course enrolment	10
Elementary Examination success	2
Advanced Examination success	5
"Klereca" Examination success	10
Each \$1 to the Publicity Fund	1

Positions on 17th April 1971

	Quota	Points	%
Queensland	130	810	623.0
Victoria	300	1142	380.6
N.S.W. -/- A.C.T.	260	901	346.5
W. Australia	80	242	306.6
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	50	125.0

Only six more months. If you know Esperantists who are not yet members, please help your State and us by suggesting that they join.—C. C. Goldsmith, Secretary.

AUSTRALIA KRONIKO

BRISBANE: Okazis 15/3 la ĉi-jara ĝenerala kunveno, kiun kondukis S-ro. Alan Grant. La komitatanoj nun estas:—S-ro. Karl Gunster prezidanto, S-ro. Mal Robinson vicprezidanto, S-ino. Val Robinson sekretario, F-ino. Beverley Allatt Kasisto, S-ro. Hans Brendal libro-peranto, S-ro. Gerard Diaz Tendero bibliotekisto, S-ino. Joan Elvidge kaj F-ino. Cathy Sullivan help-sekretarioj. Ni bedaŭras ke S-ino. Nell Callighan ne povas daŭrigi la sekretarian laboron. Ŝi tamen ĉeestos la klubon kiel kutime. Pro la longa kaj fidela servado al la movado, la anoj unuanime voĉdonis S-ron Karl Gunster dumviva membro de nia societo.

Mi ĝojas raporti ke nia unua pikniko ĉi jare estis granda sukceso, malgraŭ la nuba ĉielo. Ni povis renkonti multajn familianojn de niaj gekomencantoj. Ankaŭ ni salutis anojn de la Redcliffe kaj Caloundra kluboj. Streĉan intereson montris la piknikanoj dum vortluda konkurso. Beverley Allatt gajnis la premion por progresintoj, kiu estis bela libro donacita de Hans Brendal. Dankon, Hans! La premion por komencantoj gajnis Robyn Cook; ankaŭ ŝi ricevis libron.

Mal Robinson parolis 2/3 pri la internacia lingvo ĉe kunveno de Rotaract (junaj Rotarianoj) Chermside. Multaj de la ĝejnuloj faris demandojn, kaj kelkaj el ili montris intereson, partopreni niajn venontajn klasojn.

Don Wright 10/3 estis gastparolanto ĉe kunveno de la Aŭstralia Numismatika Societo. Li klarigis pri la 25 stela krono de la jaro 1965, montranta la kapon de D-ro. Zamenhof. La aŭskultantaro tre interesiĝis pri ĉi tiu grava monero.

MELBOURNE: F-ino Ann Hearn 22/3 gvidis konkurson por kiu ĉiu ĉeestanto devis verki plurfrazan konkludon al jam preparita komenco. Tiuspeca konkurso estis nova kaj tre utila sperto. Gajninto estis nia populara muzikisto Kim Bastin. "Novajoj el Esperantujo" estis la titolo de prelego de S-ro Herbert Koppel, 29/3.

Alvenis en Melburno 31/3 D-rino Christa Spruch, emerita edukisto el Krefeld, Germanujo kaj sola E-isto el 50-persona germana flugkaravano. Samvespere S-ino L. Fridenbergs bonvenige gastigis ŝin kune F-ino Hooper de la Orrong-Grupo. La sekvantan tagon S-ro Jack Ryding, UEA-Del. por Turismo, veturigis ŝin al la Bestrezervejo ĉe Healesville kaj vespere S-ro H. Koppel kaj S-ro Ryding kondukis ŝin de ŝia hotelo unue al la Esperanto-Domo kaj poste al kunveno de la Orrong-Grupo, kie dum la kaftrinkado D-rino Spruch alparolis la anojn pri siaj E-istaj travivaĵoj antaŭ kaj postmilitaj (inkluzive partoprenon en pluraj mondkongresoj) kaj pri siaj vojaĝplanoj.

La vesperon de 5/4 ni dediĉis al registrado per magnetofono de pianludado fare de Kim Bastin, kiu baldaŭ forlasos nin. Li akiris stipendion de la finna registaro por plue studi la finnan lingvon.

Orizantaj Antaŭurboj (Melbourne): Okazis 14/4 en la hejmo de F-ino Ann Hearn festvespero honore al Jack kaj Ivy Fallu, kiuj baldaŭ vojaĝos al Eŭropo. F-ino Hearn organizis bonan programon. La Prezidanto, S-ro Arthur Heathfield, nome de la klubanoj, bondezire adiaŭis Ges-rojn Fallu kaj prezentis al ili donacon. S-ro H. Koppel parolis laŭde pri la laboro farita de S-ino Fallu por A.E.A. kaj transdonis taglibron kun espero pri vojaĝraportoj post ilia reveno.

BORONIA, Vic.: Ni ricevis 12/2 inviton al la hejmo de Ges-roj Stephens de la loka Baha'i Grupo. Ni ĝuis interesan prelegon kaj diskuton. Inter la principaro de la Baha'i-religio estas la ideo pri internacia lingvo. Kunvenoj nuntempe okazas en la hejmo de Ges-roj G. Kuhlman (13 William St., Upper Ferntree Gully).

MORWELL: La jarkunveno okazis 23/2 La nova estraro: Prez: S-ro I. T. Mad-dern; Vic-Prez: S-ino I. McLaren; Sek/Kasisto: S-ino M. Wybenga; Bibliotekisto: S-ino I. McLaren. Okazas nun 2 klasoj: Ĉiumarde, en la hejmo de Ges-roj Wybenga (30 Butters St.) kunvenas ses personoj, kiuj ekzercas sin en kon-versacio. Dek novaj lernantoj kunvenas ĉiun merkredon vespere en la Altlernejo. Nia junula klubo kunvenas ĉiun lundon posttagmeze, ankaŭ en la altlernejo.

(Klubraportistoj bonvole sendu viajn raportojn ĝis la 15-a de la monata al la A.E.A. Vic-Sekretario, 41 Byfield St., Reservoir, Vic., 3073).

SYDNEY: 29/3 Elsa Brandmann, uzante filmojn, priskribis sian vojaĝon. Unue, Rotorua. Sekvis Fiĝio (kie ŝi renkontis E-iston, S-ron Richards.), Waitiki, Los Angeles (vizito al Disneyland), San Francisko, Cikago, Akvofalego Niagra, Nov-Jorko (operdomo, Statuo de l'Liber-eco, kies supron ŝi atingis!), Vaŝingtono, kaj multo alia. Londono (la Turo) kaj aliaj partoj de Anglujo, Amsterdamo, kanaliĉa lando. Preskaŭ la tutan veturon ŝi faris aeroplane. La duan (Eŭropan) parton ni ĝuos en 19/4.

5/4: Bonvenon al Vera Payne (Perth) kaj Richard Moir (Skotlando)! Ambaŭ loĝas en Cronulla (Sidnejo) kaj esperas fondi grupon tie. Ankaŭ bonvena estis Roger Nightingale (N.Z.), vizitanto en Sidnejo.

Petite de Brazilanoj, ni sendis bildojn por E-ekspozicio. Viola Schlesinger drame legis du rakontojn el la libro: "Bona Elektio" de Norvega E-aŭtoro J. H. Rosbach.

Goje ni raportas, ke Fritz Mueller-Sorau bone resaniĝas, kaj ke Wre Chandler jam estas hejme el hospitalo. Esperinde ili ambaŭ povas baldaŭ refrekventi la klubkunvenojn. — G. E. Browne.

MANLY: Ĉiujaŭde en la Vespera Lern-ejo okazis komenca kurso sub gvidado de Betty Cleminson; progresa kurso sub Flora Cardale kaj altgrada kurso sub S-ro P. E. Schwerin kaj Marjorie Dun-can.

25/3 "La anoj parolas": partoprenis 28 inkluzive de 10 komencantoj, kies instruiston, Betty Cleminson, ni gratulas.

1/4 Dudek dum membroj ĉestis post-kursan renkontiĝon. S-ro P. E. Schwerin prelegis pri Italujo. Informplena komentario kun lumbildoj.

15/4 Victor Bourlin: "Tra la dezerto Gobi". Tute unika prezentado. Koloraj diapozitivaj faritaj per fotografado de desegnoj pentritaj de Victor Bourlin mem. Vivplena komentario pri elstare rimarkindaj travivaĵoj.

S-ino Betty Cleminson starigis komen-can kurson en sia hejmo, 20 Stirgess Avenue, Harbord. La kurso okazas ĉiumarde je la deka matene.

Du specialaj renkontiĝoj okazis: 4/4 7.30 ptm en la hejmo de Ruth Carruthers, Wanganella Street, Balgowlah, por adiaŭi al Phyllis kaj Arthur Cocking, kiuj aervojaĝos eksterlanden. Klubanoj kaj vizitantoj partoprenis amuzajn vort-ludojn, sub gvido de S-ino M. Duncan. Margaret Liston solkantis. Phyllis Cock-ing akompanis per piano. Poste ili kan-tis duete. Adiaŭajn bondezirojn al Ges-roj Cocking esprimis Russell Baxter, nome de la membroj. Arthur Cocking, vic-prez. Manly Klubo, ĉestos la Uni-versalan Kongreson en Londono kaj la Ferian Kurson en Helsingor, Danlando.

8/4 Ĉe Ruth Carruthers por renkontiĝi kun D-rino Christa Spruch, U.E.A. delegito por Krefeld, Germanujo. La honorata gastino paroladis pri siaj vojaĝoj kaj travivaĵoj dum Universalaĵ Kongresoj.

28/3 "Ruĝa Kruco": pordfrapa mon-kolektado fare de la membroj de nia Klubo. S-ro A. B. Duncan organizis la kolektadon por sia regiono. Klubanoj kaj geamikoj kolektis ducent dolarojn.—Fenikso.

PERTH: Kunvenis anoj de la Perth-Klubo 24/3. Vice la anoj rakontis anek-dotojn, por ekzerci parolfluecon. La Komitata kunveno okazis 7/4. Diskuto pri la formo de la 1971-aj societaj kun-venoj okazis, kaj, ĉar kelkaj voluloj aniĝis, estis decidite enkonduki gram-tikan sesion inter la kutimaj distroj. Sekvis 14/4 societa kunveno, kaj F-ino Gray prezidis. Komence leciono pri la uzado de la finaĵo "n" anstataŭiganta prepozicion estis traktata de G. Pollard kaj R. McGrath. Poste okazis vigla kon-kurso (sen premio), kiu instigis anojn al furiozaj cerbumoj kaj plumskrapado. F-ino Gray postulis rapidecon kaj neprajn Esperanto-esprimojn. F-ino Hunt gvidis E-kartludon. Tiel tre interese forflugis la horoj!—G. Pollard.

La plej maljuna E-isto en la mondo.

Mortis en la 28-a de marto en sia hejmo, 27 Luplau Crescent Howick, Auckland, 106-jaraĝa Esperantistino — F-ino Mary Luplau. (Antaŭ unu jaro la urbestro de Howick re-nomis la straton en kiu ŝi loĝis). Okaze de la lasta Nov-Zelanda E-Kongreso en Januaro. Joan Siddall veturigis S-inon Peg Ford Lewis, Profesoron C. J. Adcock (prez. N.Z. E.A.) kaj lian edzinon, Doktorinon N. Adcock (Wellington Universitato) al Howick, Aŭklanda marurbeto, por saluti al F-ino Luplau okaze de ŝia 106-a nasktego. Krom bukedo kaj donaco

nome de la N.Z.E.A., F-ino Luplau ricevis donacon nome de la Manly Klubanoj, kaj dankis Esperante. — FENIKSO.

ANGULO POEZIA

Koko kokerike bru
brust-elstare sur la sterko;
oni pensus, ke la tuto
estis lia propra verko!

—B. Potts: "Nokto da Timo".

Juna knabin' el Palermo
plendis ĉe vido de vermo
rampanta en pomkoro ŝia.
"Bonŝanca vi ege ja estas".
kunulo ekdiris, "ĉar restas
nur vermoduono en mia".

Malsata tigrin' de Bengalo
serĉadis en densa ĝangalo
manĝaĵon por bonapetito.
Finfine ekvidis dormanton
en tendo kaj diris: "Bonŝanĉon,
jen manĝo matena en lito".

— V. J. Timmins.

(Vera limeriko konsistas el 5 linioj da vortoj en anapesta metro. La 1-a, 2-a kaj 5-a versoj (vidu: Butler) rimiĝas kaj havas tri akcentitajn silabojn. La 3-a kaj 4-a rimiĝas kaj havas du akcentitajn silabojn.—Red.)

ES WAR EIN ALTER KOENIG . . .

Iame estis reĝ' maljuna,
Kun peza kor' kaj kap grizhara
Jen kompatinda reĝ' maljuna,
Kun junulin' jam geedzpara.

Paĝio bela iam estis,
Blondakapa, gaj-sangvina.
Portis li la silktrenajon
Post paŝado Reĝedzina.

Konas vi malnovan kanton —
Dolĉan — foje mortsonoran?
Ambaŭ devis baldaŭ morti —
Amon havis tro fervoran.
—(El Heine trad. F.R.B.)

TIME (Austin Dobson)

Time goes on, you say. Ah no.
Alas, the time stays — we go.

"La tempo iras", vi, amiko, diras.
Ho ve! La tempo restas — ni foriras.

REPRESOJ

Ni plaĉe vidas represojn el nia gazeto en aliaj eldonadoj. Ĉiu havas plenan rajton libere represi ĉion ajn en "The Australian Esperantist".—Red.

PRI NIA GAZETO

Meritas nia gazetet' konservon —
Do en vi trovu la necesan vervon
Por teni ĝin uzprete sur la breto
En via preferata legĉambreto.

Sur ĝiaj paĝoj vi ĉiame trovus
Materialon per kiu vi povus
Prelegojn verki por klubej-kunveno
Sen troa streĉo — kun malmulta peno.

En mia menso dolorade fluas
Ploriga penso, ke malsaĝe vi detruas
La frukton de kompiloj, hor' post horo,
Sukriĉan je la cerb', animo, koro.

Kun iu mi parolis sur stratrando,
Kaj li al mi responde pri demando
El poŝofundo tiris la gazeton
Kaj skribis krude, brute, trans paĝeton.

Presitaj vortoj inke malaperis,
Dum mi, anim-premate, malesperis.
Ĉu vane tempon, monon, ni elspezas
Por tio, kion homoj mis-aprezas?

Amikoj, tenu vi sub ama gardo
Produkon de ofero, fido, ardo;
Rigardu ĝin objekto ja valora
En ĉiu senco — distra aŭ labora!
—F.R.B.

BRULIGO DE MANUSKRIPTOJ?

Pri paĝo 110: A. Holzhaus informas, ke Hans Welling (nask. 1888) en letero al li (25/11/61) sciigis, ke Zamenhof estis en Bad Neuenahr (1913 - Red.) por kuracado ĉe D-ro F. Bluth (mortis ĉ. 1937). Bluth amikis kun Welling, kiu de li eksciis multon pri Zamenhof: interalia, ke "Zamenhof prezentis al sia patro sian tutan Esperanto-verkon por prijuĝo. La lasta . . . malaprobante la aferon, ĝin disŝiris kaj bruligis".

D-ro Bluth kaj H. Welling ne estis E-istoj kaj tial ne legis rakonton de Privat en tias "Vivo de Zamenhof" (1920). Holzhaus konstatas, ke tre verŝajne Zamenhof mem rakontis al D-ro Bluth pri bruligo, kaj Bluth siavice rakontis al Welling. Holzhaus opinias do, ke "bruligo de manuskripto estas vera okazo". (The A. E. 5-6/61, 7/62, 4/71.)

NANKINA JANGZI-PONTEGO

Tiuj homoj, kiuj strabe rigardas la Ĉinojn kiel ankoraŭ posttreniĝantajn saĝe studus 12 fotojn (150mm x 100mm). Eldonis ilin: Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 313, Pekin. Tiu miraklo de la pontkonstrua tekniko etendiĝas super la giganta Jangzi-rivero. Ĝia aspekto senspirigas miregantojn. Okcidentaj pontistoj tie kaj tie povus multon lerni ĉe tiaj majstroj.



Nia Sekretario
CECIL CHARLES GOLDSMITH ("Tiny")

Edziĝis kun
LILY JULLIE

je la 10-a de Marto, 1971



La geedziĝo okazis en registara oficejo en Sidnejo kaj nur 2 atestantoj ĉeestis. La geedziĝo estis pli-malpli "sekreta", kaj neniu el la Esperantistoj sciis pri la horo aŭ la loko, krom la 4 partoprenintoj, kiuj post la ceremonio festmanĝis en "Hotel Menzies".

Dek tagojn poste, okaze de la 10-a datreveno da la Manly Klubo, la nova prezidanto (S-ro Kevin Smith) transdonis al la novaj geedzoj donacojn de A.E.A., de Sidneja E-Societo kaj de la Manly E-Klubo. Ges-roj Clarke, de la Redcliffe grupo, kiuj ĉeestis la kunvenon, plie aldonis kristalan peltvon. La

novedzino, la iama F-ino Lily Jullie, naskiĝis en Kvinlando kaj poste fariĝis flegistino en Sidnejo en kiu profesio ŝi laboris dum 25 jaroj. Ŝi fariĝis membro de la Manly Klubo en Jan. 1969 kaj de Junio 1969 ĝis Decembro 1970 estis ĝia kasisto.

La nova paro nun loĝas en ĉarma loĝejo ĉe (Flat 2) 22 Augusta Road, Manly, de kie ili ĝuas belan oceanan panoramon. La membraro de A.E.A. deziras al la nova paro longan kaj feliĉan vivon kune. — Herbert Koppel (Melbourne).

Ĉu estas truko en ĉi tio?

Kiam mi estis vere malgranda knabineto, mi sciis multajn gravajn aferojn, kiaj: estas tigroj ĉirkaŭ ĉi tie—eble; estas interese meti fazeolon en la naztruon; kotaj pasteĉoj ne bone gustas; kaj, kiel ĉiuj malgrandaj infanoj devas, mi avidis lukti kun la grandaj problemoj, kiaj butonumi la butonojn sur la dorso de mia robo, manĝi pizojn ĝentile, aŭ kompreni la diferencon inter "dorson antaŭen" kaj "interno eksteren".

Kelkaj problemoj estis por mi neniaj problemoj. Mi facile portis la ŝuojn sur la malĝustaj piedoj, ĉar — nu — ĉar mi ŝatis ilin tiel porti, sed plejparte — nur ĉar.

Estis kelkaj aferoj, kiujn mi ne sciis, kaj aferoj, kiujn mi ne povis fari, sed oni ne rajtas postuli tro multe ĉe malgranda knabineto; kaj mi ne ĝenis min pri aferoj, kiujn mi ne povis fari.

Kiam la enormaj unuaklasuloj strutis al mi kaj defis min silabi la vorton "kato", dirante: "Ho, provu, stultulo — silabu katon", mi nur metis la polekson en la buŝon kaj kontente respondis: "Mi ne deziras." Tiam ili nur mokis kaj forlasis min. Tiel mi kontente vivis, pensante pri tigroj, suĉante la polekson, kaj portante la ŝuojn sur la malĝustaj piedoj.

La tagon post mia kvina naskotago la patrino eskortis min al la lernejo por io nomita "inteligenteca testo". Enirante, ŝi ridetis kaj premis mian manon.

"Imagu", ŝi diris. "Se vi sukcesos ĉi tiun teston, vi eniros la unuan klason."

Mi palpebrumis. Kion! Mi? Eniru la lernejon, Sed kio okazos, se mi ne sukcesos la teston. Mia nazo komencis akvumi. "Atendu la instruistino ĉi tie", ŝi diris kaj foriris.

Mi sidis sur eta seĝo ĉe eta tablo, kaj penis ne suĉi la polekson. La instruistino eniris. Ŝi aspektis enorma, kaj kiam ŝi ridetis, ŝi montris milon da dentoj. Mi rigardis dum ŝi penis sidigi sur alian etan seĝon, prenis broŝuron el koverto, kaj metis ĝin sur la tablon. "Do jen estas la testo!" mi diris al mi, tuj ĉesis salivi, kaj simple gapis.

Ĉe la supro de la paĝo estis bildo de taso, bobeno da fadeno, tabla tranĉilo, kaj ŝtrumpeto. Disjetitaj sur la resto de la paĝo estis bildoj de subtaso, kudrilo, forko, kaj ŝuo. La instruistino donis al mi grandan nigran krajonon, kaj petis min desegni plaĉajn liniojn por kunigi tiujn aĵojn, kiuj apartenis unu al la alia.

"Ho ve!" mi pensis, tenegante la krajonon en ŝvita pugno. "Ĉu estas ia truko en ĉi tio?" Iu ajn stultulo sciis, ke la subtaso apartenas la la taso, sed eble ŝi deziras, ke mi metu la forkon kun la subtaso por gardi kontraŭ la ebleco, ke la taso estas plena de manĝaĵo, ĉar mankas aliaj puraj vazoj. Povas esti, ke oni bezonas la forkon por elnodi la ŝulaĉon. Eble iu lasis la ŝtrumpeton apud la taso por memori iun ĝin ripari per

la kudrilo kaj la fadeno, krom ke ne estas truoj en la ŝtrumpeto, sed ili povus esti sur la alia flanko. Mi opiniis, ke eble estus pli bone, ke mi informu la instruistinojn, ke mi devas viziti la necesejon.

Tamen mi timis, ke ŝi ektrovos, ke mi ne povas butonumi la butonojn sur mia dorso, do mi nur iom snufis, kaj desegnis malesperajn liniojn inter la taso kaj la subtaso, inter la kudrilo kaj la fadeno, la tranĉilo kaj la forko, kaj ŝuo kaj la ŝtrumpeto. Tiam mi stariĝis por iri hejmen.

Sed denove, ho ve! Ankoraŭ estas pli. La instruistino tiris min en alian ĉambron, kie mi laŭte vokis por la patrino, kaj dum mi viŝis la nazon per la rando de la robo, ŝi turnis al pago dua. Tie mi vidis stultaspektan virinon kun tri gantoj flosantaj en la aero ĉirkaŭ ŝia kapo — la unua tro granda, la dua tro malgranda, kaj la tria ŝajne taŭga.

"Kiu ganto apartenas al la sinjorino?" ŝi demandis.

Mi antaŭen kliniĝis kaj ekzamenis la limigitan atestaĵon. La sinjorino aspektis tro stulta por ekkoni sian propran ganton, sed kial demandi al mi? Antaŭe mi neniam vidis aŭ ŝin aŭ la ganton. Eble la sinjorino ricevis la ganton de iu, kiu opiniis, ke ŝi havas gigantajn manojn. Povas esti, ke ŝi aĉetis tro malmulte kostajn gantojn, kiuj malgrandiĝis dum lavado. Cetere, kial estas nur unu ganto? Ĉu ŝi ne havas du manojn? Per tremanta fingro mi montris al la mezgranda ganto, kaj mi streĉiĝis por aŭdi la malaprobantajn kriojn de la instruistino, sed ŝi retenis sian opinion kaj sin turnis al pago tria. Neniam antaŭe mi trapasis tian aflikton.

Nek iam komprenis mi, kial oni permesis al mi eniri la unuan klason, kaj mi neniam kuraĝis demandi, ĉar mi amas la lernejon. Mi amis la odoron de kreta polvo kaj la inkecan paperecan odoron de libroj. Mi amis mian instruistinojn. Ŝi permesis, ke mi estu la bakita terpomo en la unuaklasa Nutraĵa Baletto. Mi amis roli kiel bakita terpomo. Mi amis kolorigi per paŝtelo, skribi "kato"-n, kaj senti min vere lerta.

Lerteco estas unu el la plej bonaj sentoj, kiuj ekzistas, sed malfacile estas reteni ĝin. Oni sentas ĝin en la unua klaso, sed poste ĝi grade malaperas. La alta edukado kaj la lecionoj de la vivo tendencas humiligi personon longe antaŭ la mezaĝo.

Jen estas mia nuna aĝo — meza. Nun mi estas granda kreskinta edzino kaj patrino, kiu sentas sin multe malpli lerta ol kiam ŝi estis en la unua klaso. Mi

posedas nur unu ganton — mi opinias, ke ĝi estas la mia — kaj mi demandas al mi ĉu la hundo forprenis la alian. Ĉiumatene mia domo estas unu granda enigmo de tasoj, subtasoj, kudriloj, fadenoj, tranĉiloj, forkoj, ŝuoj kaj ŝtrumpetoj, lasitaj sur la piano aŭ perditaj en la litoj de la infanoj.

"Ho ve", mi murmuris, serĉante sub la lito por mia alia ganto, kaj trovante nur pluajn ŝtrumpetojn, "ĉu estas ia truko en ĉi tio?"

Mi faras mian eblon, kaj la infanoj helpas min ĉe la malfacilaj partoj. Jes, vi pravas, ili butonumis min sur la dorso, sed nun mi portas la ŝuojn sur la ĝustaj piedoj, ĉar mi estas 43-jara—El la angla tradukis Ken G. Linton.

(Laŭ P.I.V. "truki" = artifiko uzata en filmado por doni aspekton de realeco, al dekoracio k.t.p. En la E-Franca vortaro de Waringhien: truc (de theatre); tour (d'escamoteur). Butler: = trick, knack, dodge. "Havi la trukon . . ." = get the hang of . . . "Trukoj de la metio" = dodges of the trade. En tiu ĉi senco S-ro K. L. uzis la vorton en sia supra traduko.—Red.)

ISBRUCKER; SUPICHOVA

Mortis du elstaraj E-istinoj: S-ino Julia Isbrucker kaj S-ino Julie Supichova. La unua: 83-a vivjaro. La dua: 85-jara.

VLADIMIR J. BALCAR

Dr. B. J. Balcar, of Monterey, Cal., asks whether anyone knows his son, above name, who is at University House, Canberra. Dr. Balcar sends his greetings to E-ists in Australia.—Winsome Greenhalgh, in Utah.

BONVOLU RIDETI

Instruisto: Kiel oni faras por disdividi 5 terpomojn inter 6 personoj?
Lernanto: Ilin kaĉigi . . .

Diskutante kun mia edzino, mi ĉiam havas la lastan vorton, do mi diris: "Nu bone, aĉetu la veston!"

Kuracisto: Havante tiun malsanon, vi tamen povos tre maljuniĝi.
Paciento: Kaj sen ĝi . . . ?

Filino: Ho, patrino, kia ofendo!
Patrino: Kio okazis?

Filino: Mia iama fianĉo ĵun resendis al mi mian foton kaj skribis sur la koverton: "Specimeno sen valoro".

Kial via filino ankoraŭ ne edziniĝis?
Ho, ŝi estas tro inteligenta, preni viron, kiu estas tiel stulta, preni ŝin.

RECENZOJ

HEINRICH HEINE: Kantoj kaj Romancoj. El la Germana verse tradukitaj de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. 16 x 22,5 cm. — 383 paĝoj. Prezo: trolbindita 6 dol., broŝurita 4.80 dol. Eldonis Stafeto, Tenerife.

Versmagiisto Heine — pasi-arda — Tradukon igis malfacila faro.

Pro lingvo subtilsensa, majstre arta,

Staradas lia verk', spitantata baro.

Post enkonduka studo pri la vivo kaj verko de Heine, la libro entenas: La Libro de l'Kantoj (kun suplemento); Lirika Intermezo; La Hejmreveno; Romancoj; Harc-Vojaĝo; Novaj Poemoj (kun suplemento); Diversaj; Germanio; Atta Troll (parte); Romancero; Lamentadoj; Lazaro.

Ne povas temi, kiel ĉe Baudelaire, pri kompleta kolekto. Por tio oni bezonus mil paĝojn. Ĝi tamen donas la plej tipan, bonan kaj konservindan el la poemaro. Mil paĝoj, pro sia kosto, ne faciligus vendon. La tradukintoj tial sagace, diskrete eltondis iujn poemojn kaj strofojn, pri kiuj ili supozas, ke ili ne tre interesus la E-publikon.

La pligrandan parton de la tuto tradukis Kalocsay, sed la tuta tradukado okazis en intima kunlaborado de la du majstroj.

Pro sia ironia, mokema tono, Heine iom similas al Byron; pro sia lirika ĉarmo . . . al Herrick kaj Lovelace. Per pli vasta perspektivo, tamen, li certe komparindas kun la Skoto Burns. Ties fekundeco verkrea, lirika kaj satira impresivo, kaj protestado kontraŭ tielnomataj sociaj konvenecoj, nepre metas lin en spiritan kunulecon kun la Germano.

Multon de la Heine-poemoj invadis amoloro, melankolio, interalie pro malfeliĉa pasio al lia kuzino. Aliaj poemoj estas pipritaj per facilanima, amare cinika mokemo kontraŭ iaj konceptoj ĝenerale rigardataj kiel sanktecaj. Tamen jen kaj jen la karaktere netaksebla poeto povis elŝpruci strofojn kies sentimentoj konformus kun tiu de pia kampulo: ekzemple, La Pilgrimo al Kevlaar.

Ja ĉekore Heine restis Judo, kaj instinke, kredinkline kroĉis al la mono-teismo, kiel atestas lia proza: Konfeso. (1853-4). Jam antaŭe en sia testamento (1851) li klare esprimis sian religian kredon. En pli ol unu senco, lia vivo, malgraŭ malsaĝo, makulo, povas porti sanige valorajn lecionojn ankaŭ al ni — versistoj aŭ ne.

Li konservis ĝis vivfino sian mensklarecon, sian senmortan kre-forton. La poemaron Lazaro li verkis sur sia mort-

lito, kaj per La Adiaŭanto, pene skribita nur kelkajn semajnojn antaŭ sia finspiro, li mokete, grimace adresis al la mondo siajn lastajn vortojn:

En mia brust' jam mortis ĉio
mondume vanta, ĉiu pasio;
eĉ la malam' al malbon' interne
jam mortis kaj l'interes' koncerne
al propra, fremda mizersorto —
nun regas en mi nur la morto.

—Kurteno falis — dramofino . . .

La kurajo kaj fido de la brava eldonisto, Juan Regulo, certe meritas, ke mil E-istoj tra la vasta mondo rapide elĉerpigu la nunan nombron da ekzempleroj, tiel ebligante duan eldonon.

Jen literatura tributo al homo, poeto superba, martiro glorvenka. — F.R.B.

"Nokto da Timo". Tri noveloj de Bertram Potts, Nov-Zelando. 80 paĝoj. 10 Danaĵ kr. (0.55 kr = 0.7 Australia). Eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Abyhoj. Ĉe nia Libro-servo.

La unua temas pri esploristo, sola transvivinto de pereinta grupo. Li sin trenas tra neĝostormo ĝis kabano de pelcasisto, kiu lin save vartas, sed sklavigas al ŝakludado, pri kiu li estas maniulo. Nervstreĉo oni legas pri la sperto de la terurita esploristo, deviga kunulo dum vintro de giganta frenezulo. La fino frape impresas.

La dua ilustras la diron: "la vojo al la vira koro estas laŭ lia stomako". Parttempa divers-taskulo implikiĝas ĉe klientino — amema vidvino, liu logadas lin per ĉerizortoj. Bone strukturita rakonto pri ridiga situacio.

La tria estas burlesko brile bonhumora kun kernideo pri ia poemomaŝino, vers-komputero. Per lerta galimatio, sensenca lingvaĵo pseŭdosciencia, la aŭtoro brule satiras poetan enigmemon: "Ju pli ĉifre, des pli sukcese" . . . moto de multaj "modernuloj".

Per intence sensenca strofo:

Adze belas konkto hoke . . .

Kaj ĉion pelas ĉerkprovokel!

La aŭtoro paroligas "admiranton": "Kiel muzike ritma! Kiel melodie riĉa!" kaj li ironie komentas: "Kiel fiera estus la Majstro, se li sciis, ke Esperanto tiel kapablas".

S-ro Potts bone scias "La Proverbaron" kaj el ĝi trafe pruntas, krom fari proprajn saĝ-rimajetojn.

Lingve bonega. P. 29, 72: "terurigit" (terurite).

Gratulon al li pro ĉi-verko, ĉiel rekomendinda.

"Ni Aktoras": tri komedietoj de Marjorie Boulton. 36 paĝoj. Eldonis "Dansk Esperanto-Forlag"; Abyhoj. 4

Danaj kr. (kr. = 7c.) Ĉe nia Libro-Servo.

"Leciono pri la Participoj". Naŭ-persona — gvidanto kaj ok kursanoj. Rigidaj la respondoj de la petolemaj ĵelernantoj.

"Fiŝkapti en Malpura Akvo". Sep-persona. La skizo necesigas iom multe da dekoro.

"Spertulo pri Unua Helpe". Kvin-persona. Preskaŭ sen dekoro.

Por impresa efekto roluloj devas esti lingve lertaj kaj familiaraj kun pli ol simplaj elementoj. La lingvaĵo estas modere facila, sed la aŭtorino "ne preparis lakton" por komenculoj; tial kelkaj vortoj kaj parolturnoj bezonas apartan studon antaŭ prezento.

Tri-kvar prezeraroj. P. 6: prezenco (prezenco); 16: sterumon (sternumon); 17: tri-pecaj oreloj (! tripecaj?); 27: Kion signifas: "virkapro kun pernicoj"? 34: Oni ja kuraĝigas homon, personon. Ĉu oni povas kuraĝigi ankaŭ — intereson?

PRI LA ANGLA "SICKLE"

A sickle — serpo — falĉilo kun formo krescenta.

A sickle moon = arka luno, lunarko; krescento, krescenta luno. Luno je sia unua aŭ fina kvarono.

La E-a vorto: siklo = Antikva mezurunuo.

AT OUR BOOK SERVICE

Superseded copies of "STEP BY STEP IN ESPERANTO" (M. C. Butler) — only 1.10 posted. Limited number only to the first orders.

Available also: "NEPALO MAL-FERMAS LA PORDON" (Tibor Sekelj, Esperantist world traveller) — 3.00

KORESPONDADO

F-ino Dimitrina Arsova, Str. V. Sarbov 11, Pernik, Bulgaria.

Kursanoj 13-60-jaraĝaj dez. korespondon. Esperanta Societo "Balkana Stelo", poŝtkesto 90, Trojan, Bulgaria.

HOW'S ESPERANTO DOING NOW?

Almost inevitably you hear it whenever Esperanto is mentioned.

How do you, presumed to be the knowing one, give answer? Your reply is probably conditioned by your mood of the moment. With seemingly graver things on your mind, you may tend to let the subject fade into another via a few remarks suggesting that "things are pretty fair, encouraging . . . slow but solid progress" and let it go at that.

When, however, the tone is high, and you have come from, say, the vibrant stimulus of a rich and varied foreign mail, with pep and poise you address your questioner thus: "Look, friend, you may not know it, but it's a remarkable thing that a planned lang- ("artificial" to you) is in existence today 84 years after it made its first appearance. No other such has lived like so long. It has survived two world wars, global depression, localised varieties of currency shake-ups that drained Esperantists' pockets and palsied their organisation, plus the distrust or dislike of certain circles and the inertia of the mass. Add to this the hospitality of dictatorships in Germany, Russia, Spain, Portugal, where over decades the faithful Esperantist was deprived of his gazettes and postal facilities. Whence could these ageing cut-offs, find fuel for faith and incentive to hold on, if not in their memory of the Zamenhof ideal and the belief that outside their frontiers the movement was really moving forward? But what inducement had the young to learn Esperanto — they, a riding generation severed from those of similar age abroad? Today in those lands things are much brighter; some of the Eastern bloc are ahead of those in which we call the free world.

"Where can we turn to find anything to do what Esperanto is doing? In what language not your own could you write a clear and correct letter after a few months' honest application? The tenses of all verbs you can master in a matter of hours; those of a national tongue call for years. After much travail and having had every amenity, Somerset Maugham mourned his impotence before the Spanish subjunctive. An Esperantist can pen his feelings to a Japanese and feel sure that one voice has penetrated the wall of ideograms that hems in over 80 millions whom to fight is easier than to understand. So with all the others".

From my attentive and — we trust — impressed auditor, we turn to your collective ear. If our movement is to move we must make more of us. Like the conies, we are a feeble folk — feeble also statistically, which they are not. Use your pen and your larynx to impress and ingather recruits; let the word become flesh, a witnessing entity. Double your correspondence and strive to attain fluency. Have your facts ready, to shoot down your captious questioners.

How to garner your facts? Now, you do know how.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 96 (176)

MELBURNO

15 Junio, 1971



Congress fee: before first of July, 1971 for A.E.A. members — 5 dol. For others 6 dol.

After 1 July, 1971: for A.E.A. members, 6 dol. For others, 7 dol. Non-attending members: 2.50.

Send your room reservation (5 dol. deposit) and Congress fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122T, G.P.O., Melbourne 3001.

5th List of Congress Members.

44. Mr. R. G. Robertson, Northbridge, NSW.
45. Mrs. M. D. Robertson, Northbridge, NSW.
46. Mrs. G. Pollard, Rossmoyne, W.A.
47. Mrs. I. McLaren, Morwell, Vic.
48. Mr. Arnold Baldwin, Kew, Vic.
49. Mr. V. Bourlin, Turrumurra, NSW.
50. Mrs. May Frogley, N. Richmond, Vic.
51. Dr. A. Einihovici, Floreat Park, W.A.
52. Mrs. I. Einihovici, Floreat Park, W.A.
53. Mr. F. G. Wall, Violet Farm, Vic.
54. Miss J. Turner, Rockhampton, Q'ld.
55. Mrs. D. Deqn, St. Lucia, Q'ld.
56. Mr. R. K. Taylor, Canberra, ACT.
57. Mrs. L. Fridenbergs, Hawthorn, Vic.

58. Miss M. Maddern, Parkville, Vic.

59. Miss B. C. Williams, Camberwell, Vic.

60. Mr. Jack Fallu, Sth. Oakleigh, Vic.

61. Mrs. Ivy Fallu, Sth. Oakleigh, Vic.

62. Mr. Ralph Harry, CBE, Canberra, ACT.

63. Mrs. M. Sanders, Ashwood, Vic.

64. Miss M. Sanders, Ashwood, Vic.

65. Mrs. M. B. Smith, Oakleigh, Vic.

66. Mr. V. J. Timmins, Waitara, NSW.

67. Dr. C. J. Caldera, Perth, W.A.

68. Mrs. Irene Caldera, Perth, W.A.

69. Mr. N. A. Collier, Bowen, Q'ld.

State Distribution: Vic. 34; NSW, 17; W.A., 7; Q'ld, 6; A.C.T., 2; S.A., 2; Tas., 1.

You may win a prize: If your Congress Number is 80, 90 or 100 you will receive a valuable Book Prize; so hurry with your enrolment. Please note that on the first of July, Congress Fees will go up by \$1.00.

PROVISIONAL PROGRAMME

Sunday, 2nd January, 1972

9.00 - 12.00 Arrival of Delegates, Registration

11.00 A.E.A. Committee Meeting.

2.00 Bus Tour No. 1: Historical Tour of Melbourne with the National Trust.

7.15 Esperanto Church Service

8.15 Welcome Evening.

Monday, 3rd January, 1972

9.00 Press Conference

9.45 Official Opening of Congress; Congress photo

11.15 A.E.A. General Meeting (1)

2.00 Bus Tour No. 2: City Sights and Gardens

7.30 2 Lectures.

Tuesday, 4th January, 1972.

- 9.15 Language Session
11.00 Unveiling of Memorial Plaque
for John Booth
2.00 A.E.A. General Meeting (2)
7.30 2 Lectures.

Wednesday, 5th January, 1972.

- 9.15 Language Session
11.00 A.E.A. General Meeting (3)
2.00 Debate on a topical subject, led
by Dr. A. Einihovici (Perth)
4.30 Lecture
7.30 Drama Competition and Literary
Evening

Thursday, 6th January, 1972

- 9.00 Bus Tour No. 3: Day Excursion
to Ballarat and Sovereign Hill
7.30 2 Lectures

Friday, 7th January, 1972

- 9.15 Language Session
11.00 A.E.A. General Meeting (4)
2.00 Debate: "How to regain old
Esperantists"
4.30 Teachers Meeting (1)
7.30 International Concert.

Saturday, 8th January, 1972

- 9.15 Teachers' Meeting. (2)
11.00 U.E.A. Meeting
2.00 S.A.T. Meeting
4.30 Official Closing of Congress
7.30 Congress Dinner

Sunday, 9th January, 1972

- 2.00 Bus Tour No. 4. Post-Congress
Excursion to Cowes and
Penguin Parade

**AUSTRALIAN ESPERANTO
ASSOCIATION
OFFICIAL NOTICES
15th May, 1971**

New Individual Members

- Hooton, Mrs. S. L., Manly, N.S.W.
Vagg, Miss W. N., South Yarra, Vic.
Petty, Mr. B., South Yarra, Vic.
Blosich, Mr. J., New Farm, Qld.
Taylor, Mr. R. K., Canberra, A.C.T.
Payne, Mrs. V. E., Cronulla, N.S.W.
Lukhurst, Mr. L. M., Flinders Park,
S.A.
Mountwinter, Mrs. J., Victoria Point, Qld
Memmott, Mr. R., Scarborough, Qld.
Culey, Mr. J., Wahroonga, N.S.W.
Horrocks, Mr. D. J., Vaucluse, N.S.W.
Trevorah, Mr. P., Rosanna, Vic.

Publicity Fund

- | | |
|---------------------------|----------|
| Previously acknowledged | \$867.31 |
| McQueen, Mr. D., Vic. | 2.00 |
| Simpson, Mr. A. R., Vic. | 10.00 |
| Taylor, Mr. R. K., A.C.T. | 5.00 |
| Vawser, Mr. F. D., S.A. | 2.00 |
| Sennomulo, N.S.W. | 1.00 |

\$887.31

Sincere thanks to each helper.

**Interstate Competition
Position on 15th May, 1971**

	Quota	Points	%
Queensland	130	825	634.6
Victoria	300	1163	387.6
N.S.W. - - A.C.T.	260	936	360.0
W.Australia	80	242	302.5
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	57	142.5

Do not miss this opportunity! If you have friends who support Esperanto but are not members of our Association, try to induce them to join. They can do so now for the half-year commencing July 1st at the half-rate, namely \$1.50. There is a good possibility that we shall reach 500 individual members before the end of this year; please help to ensure this.

EKZAMENOJ DE A.E.A.

Supera: Arthur Cocking, Dee Why.
Elementa: Leslie V. Scott, Manly.
— Tiny Goldsmith.

Fees for the Elementary are \$2; Advanced, \$3; Final, \$2 for examination of the thesis; \$2 for the written; \$2 for an eventual diploma. See The A.E. 3/69, 5/69.

**EL NOV-ZELANDO
37-a NZEA Kongreso.**

La 37-a landa kongreso okazos en Wellington 6-10 Januaro 1972, inkluzive. La kongresejo, en la Konstruaĵo YWCA, 355 Willis Str., estas ĉiel ideala: koncert-halo, restoracio, unu-kaj dultitaj dormoĉambroj. Pri kotizoj kaj programeroj ni informos poste.

Special Financa Fonduso.

La NZEA jam ricevis por la fonduso \$1500 de 39 kontribuantoj. Jen la projekto: samideanoj pruntedonas seninterese monsumojn por sesjara periodo, sed NZEA repagos la monon okaze de urĝa bezono flanke de iu partoprenanto. Celante almenaŭ \$2000 NZEA investas la ricevitajn monon por akceli E-on en Nov-Zelando.

Ĝis marto, tri numeroj aperis de gazeto "Kvaronjare" — "Ligilo kaj informilo de la NZEA kaj oficiala suplemento al "New Zealand Esperantist".

NZ-a Delegito al U.K.E.

Prof-o C. J. Adcock, prezidinto, reprezentos la NZEA-on kaj ĉi-landajn samojn en la ĉi-jara 56-a U.K. (Londono). Li prelegos en la Internacia Somera Universitato, kadre de UKE.

Oratora Pokalo Donacita

Belan pokalon por la NZ-a Oratora Konkurso, kutima programero de NZEA-

kongresoj, donacis sam-o S-ro W. J. Hall, de Palmerston North. Ĉu la nombro de konkursanoj kreskos en la venonta 37-a Kongreso, kaj ĉu ties kvalifikoj pliboniĝos rezulte de la donaco? — W. H. King.

CHURCHILL KAJ LA KARPO

Post la falo de Francujo en la dua mondmilito, signifa fabelo vastiĝis en Anglujo pere de esperplenaj famoj tra la tuta batita lando. En ĝia heroa humuro kaŝas sin pruvo pri la profunda kaj daŭranta fido pri finfina venko en la koroj de tiu obstina popolo ĉe la okcidenta flanko de la angla markolo.

La fabelo rakontas, ke en Julie 1940, kiam Anglujo frontis la malamikon sola, Hitler invitis Churchill al Parizo por sekreta konferenco. Churchill alvenis per aviadilo kaj estas eskortita al la Chateau de Fontainbleau, kie Hitler kaj Mussolini lin atendis ĉe tablo apud la fama karpa lageto.

La Fuhrer perdis neniom da tempo. "Jen kio mi diras al vi, Churchill! Anglujo estas jam finita! Subskribu ĉi tiun dokumenton, konfese, ke Anglujo perdis la militon, kaj tuta Europo spertos pacon morgaŭ".

"Mi bedaŭras, ke mi ne povas subskribi," kviete respondis Churchill. "Mi ne konsentas, ke ni perdis la militon".

"Ridinde!" kriegis Hitler, batante la tetablon kaj skuante la tasojn. "Rigardu la pruvon".

Churchill trinketis sian teon. "En Anglujo", li diris, "ni ofte decidis mal-konsenton per veto. Ĉu vi ŝatus veti kun mi? La perdinto devos konsenti, ke li perdis la militon".

"Pri kio temas la veto?" postulis Hitler suspekteme.

"Ĉu vi vidas tiujn grandajn karpojn en la lageto", respondis Churchill. "Nu, ni vetu, ke la unua kapti karpon el tiu lageto sen uzi la kutiman fiŝilaron, estos deklarita gajninto de la milito".

"Ho, mi vetos pri tio", rapide respondis Hitler. Li elprenis revolveron kaj pafis al la plej proksima karmo, sed la akvo tiel deviigis la kuglon, ke li malplenigis la magazeton sen trafi karpon.

"Estas via vico", grumbliis Hitler, turnante sin al Mussolini. "Vi estas lerta naĝisto, ĉu ne?"

Il Duce sin senvestigis kaj plonĝis en la akvon, sed tute vaniĝis ĉiu peno kapti karpon, ĉar la fiŝoj glitis tra liaj fingroj, kaj finfine li elgrimpiis el la akvo tute elĉerpita kaj ankoraŭ senfiŝa.

"Estas via vico", raspis Hitler, sin turnante al Churchill. "Ni vidu, kion vi povos fari".

Churchill stariĝis, elprenis la kuleron el sia subtas, kaj alpaŝis la lageton, kie

li plenigis la kuleron per akvo, kiun li tuj jetis trans sian ŝultron. Tiun agon li daŭre ripetis, ĝis Hitler malpacienĝis kaj kriegis: "En la nomo de la infero, kion vi faras?"

"Mi malplenigas la lageton", respondis Churchill.

"Sed tio daŭros treege longan tempon", rikanis Hitler.

"Bone mi scias tion", serioze respondis Churchill. "Ni eble bezonas ankaŭ longan tempon por gajni la militon, sed finfine ni tion faros". — Tradukis el la angla Ken Linton.

SAN MATEO, CALIFORNIA

As preparation for French and Spanish children in grades 3, 4, 5 at Highland School in San Mateo are learning Esperanto. The experiment is for three years. Philip Vador, principal, expects the course to provide (a) an introduction to the world and its peoples; (2) a better understanding of their own language; (3) some grasp of the structure of other languages.

ESPERANTO IN HAWAII

A pilot course in elementary schools: 16 classrooms of 8 cities in grades 4, 5, 6. Next year the number of classes will be doubled. 50-minute periods. Prof. D. A. Sanborn wrote to the American Assn. of Esperanto Teachers: "While regular language arts teachers have been reluctant initially to teach the unit, they soon discover that the materials are largely self-instructional. Thus they learn along with the students and need not play the role of expert. Student acceptance and interest has been high".

IN CLAREMONT-FERRAND, FRANCE

The Faculty of Arts at the University follows the International Language Course as an optional study to be taken with the compulsory subjects. Started in October, 1969, the lessons are relayed from the radio and TV teaching centre of Clermont. M. Pierre Janton, Docteur es Lettres, Professor of English at the Faculty, conducts the Esperanto course.

— "Esperanto Contact International" (B.E.A.)

PRESAJ KOLOROJ

La kompara legebleco de koloroj estas laŭ sekvanta, en la preferata ordo:

- (1) Nigra inko sur flava papero.
- (2) Verda inko sur blanka papero.
- (3) Blua inko sur blanka.
- (4) Blanka inko sur blua.
- (5) Nigra inko sur blanka.

— Printing Trades Journal, Okt. 1948.

AUSTRALIA KRONIKO

Klubraportistoj bonvole sendu viajn raportojn ĝis la 15-a de la monato al la A.E.A. Vic-Sekretario, 41 Byfield St., Reservoir, Vic., 3073

PERTH: Liganoj 28/4 kunvenis ĉe la ĉefa kunvenejo en Suda Perto. Por helpi komenculojn pri la uzo de la finaĵo "n", kompetentuloj traktis la variantojn de la sintaksa uzo. Sekvis kartludo (lerte gvidita de F-ino Hunt), kiu emfazis la uzadon de la finaĵo "n" kaj scion pri la multaj afiksoj. La partoprenantoj devis strikte uzi E-on.

Nia prez-o 8/5 kaj kelkaj anoj ĝuis ĉeeston de F-ino Morris ĉe rendezvuo en Kings Park. Ŝi feriiis en Okcidenta Aŭstralio, kaj ni kaptis okazon denove renkonti ŝin, ĉar antaŭ ok jaroj ŝi membriĝis al nia Ligo. Ĉe teo kaj kukoj F-ino Morris atentotene rakontis pri sia irado al diversaj landoj.

Okazis 12/5 societa kunveno ĉe la Instruista Kolegio en Nederlands. Montris diapozitivajn kaj komentariis G. Pollard pri sia vagado en la norda duonsfero. Sekvis traktado (estrita de S-ro Howard) de la tradukitaj Anglaj idiotismoj presitaj en "The A.E." (p. 108 kaj 113). Multajn diversajn tradukojn en E-on la ĉeestantoj voĉe proponis kun la penso plejsupra en la menso, ke fremduloj ne komprenus la Anglajn idiotismojn! Unuecon ni ne tute rezultigis.

Pro malsano F-ino Stempel ne povos reiri al sia misiista laboro en la Nov-Hebridoj. Ŝi restos ĉe sia Okcident-Australia adreso. S-ro Waugh, alia fidela Ligano, intencas ĉeesti la Univ. Kongreson en Anglujo en la nuna jaro. S-ro Hawks vagadas tra Afriko; Laŭ raporto ankaŭ li ĉeestos tiun Kongreson. —Gertrude Pollard.

SYDNEY: 19/4. Per filmo ni plu "mondvojaĝis" kun Elsa Brandmann: pura Amsterdamo, gajo Parizo, nia E-kongreso en Vieno (vee! la filmoj perdiĝis), Okcidenta Berlino kaj Orienta Berlino, kie ŝi renkontis parencojn kaj malnovajn amikojn, kiujn ŝi ne vidis dum multaj jaroj. Ni plezure atendas la sekvontajn filmojn.

3/5. Vizitantino el Nov-Zelando, Rowena McGill, donacis al la Klubo malgrandan "tapeton" kun la Maoria emblemo por bonŝanco: Tiki. Bondezire ni adiaŭis ŝin kaj Haru Mijazaki, kiuj iros al Japanujo. Frank Dunn prelegis "Pri Indonezia Poezio", klarigante pri la diversaj lingvoj de tiu lando kaj kiel oni adoptis la Malajan kiel nacian lingvon. Li legis poemojn de tri Indoneziaj poetoj kaj poste parafrasis ilin en Esperanto.

10/5. Tom Elliott prelegis pri "Mal-

benito inter Mallertuloj". Li parolis pri diabloj, anĝeloj, Grekaj dioj, Jazono kaj la ora ŝaf-lano kaj legis parton de poemo "Paradizo Perdita" (Johano Miltono). Ofte ni ridis pro lia gaja ŝercemo.

Wre Chandler kaj Fritz Mueller-Sorau bone progresas al resaniĝo. Ni ĝojas! — G. E. Browne.

MELBOURNE: Kim Bastin, kiu baldaŭ vojaĝos al Finnlando, legis 19/4 ĉapitrojn el la finna epopeo "Kalevala" kaj je 26/4 tekston de prelego de universitata profesoro pri la angla lingvo kiel mondlingvo.

S-ro F. R. Banham, 3/5, legis siajn tradukojn de rakontoj fare de Guy de Maupassant kaj Graham Greene.

A.E.A. Prezidanto Ken Linton prelegis, 21/4, pri Esperanto en la ĉefsidejo de la Melburna Savarmeo. Tiu prelego estis aranĝita de Majorino Isabel Gale, kiu nuntempe entuziasme studas Esperanton en klaso de S-ino A. Paling de la Orrong-Klubo.

MANLY: 22/4 En la Vespero Lernejo, Darley Road, Manly, ĉeestis la elementan kurson, 10, la progresan 9, la altgradan 5. Thora Richmond parolis kun lumbildoj pri Oberammergau. Sekvis renkontiĝo en la hejmo de Ges-roj R. Baxter, por adiaŭ Ges-rojn V. Clarke el Redcliffe (K.), kiuj iros al Anglujo por alesti la U.K.E.-on en Londono. Ili poste ĉeestos la Feriajn Kursojn el Elsinore (Danlando). "Tajni" Goldsmith, nome de la membroj, bondeziris al Ges-roj Clarke, kaj dankis al May kaj Russell Baxter pro la gastigado. Victor Clarke respondis. Al la Klubo Jessie Clarke donacis presitajn kantfoliojn (40): Ĉokoladojn ŝi donacis al Flora Cardale pro ŝia instruado kaj al Marjorie Duncan, kiu de tempo al tempo gastigis ilin.

29/4 Ĉeestis post-kursan renkontiĝon dek sep membroj, ankaŭ vizitanto, S-ino Hashizume. S-ro P. E. Schwerin prelegis pri Suda Francujo kaj Monako, kun lumbildoj.

1/5 En la Virina Kroketa Klubo de Manly okazis Societa Vespero por festi la finon de la unua stud-periodo.

Ĉeestis 28 membroj kaj 9 vizitantoj. Skabeno Frank Preacher salute bonvenigis. Sekvis dancado; komuna kantado; sol-kantoj de Margaret Liston: Edith Ellis akompanis. May Baxter instruis Latin-dancadon. "Samba", en kiu ĉiuj partoprenis. Ludis violonon S-ro Ellis: akompanis Edith. Skeĉon, "Ĉetado de Nova Capelo", verkis kaj rolis Margaret Liston. El la Hispana, Richard Moir tradukis kaj kantis, sin akompanante per gitaro. Kontraste, li ludis "Flamenko";

Post manĝeto ĉiuj runde dancis kaj kantis. "La Verda Stel". Les Scott akompanis piano-akordione. La Prez., Kevin Smith, dankesprimis. Vesperfine la programestro, Robbie Robertson, arigis la ĉeestantojn en rondon por kanti "Malnovajn gekonatojn". Les Scott akompanis per piano-akordiono.

Al May kaj Russell Baxter, kiuj organizis la distraĵojn ankaŭ la manĝeton, dankon por gaje sukcesplena vespero.

6/5 Post la kursoj George Thatcher prezentis unuarangan programon pri Avignon, Francujo, kun lumbildoj kaj sonbenda komentario de S-ino Humm, amikino de Ges-roj Schwerin.

13/5 Afer-kunveno en la hejmo de Ruth Carruthers, 66 Wanganella Street, Balgowlah. Prezidis Marjorie Duncan. Membroj diskutis kaj aranĝis agadon kaj programojn ĝis la jarfino.

13/5 Laŭ peto de S-ino M. L. Christian, Prez., United Associations of Women, Sidnejo, paroladon pri la Esperanto-Movado faris S-ino Peg Ford Lewis dum semajna tagmanĝo en C.E.N.E.F. Konstruaĵo, Kent St., Sidnejo. El la 25 ĉeestantoj, 2 parolis en nia amata lingvo kun Peg Ford Lewis. Ili ambaŭ esperantigis antaŭ pli ol kvardek jaroj. Komence ĉiu ricevis "verdanan karton", portantan dorso la vortojn "MI ESTAS . . .". La parolanto kaj ĉiu ĉeestanto individue prezentis sin Esperante. Vigla diskuto sekvis la paroladon—FENIKSO.

BRISBANE: Pasintmonate ni havas nur unu okazon raportinda, sed ĝi estas tre grava; nome, alvenis S-ro Tibor Sekelj. Bedaŭre, li povis resti kun ni nur mallongan tempon. Ses gesperantistoj bonvenigis lin ĉe la flughaveno. Samvespere Ges-roj Grant gastigis lin, kune kun aliaj E-istoj ĉe sia hejmo. Ja tre interesa vespero! 25/3 ĉe la Sherwood Stata Lernejo E-istoj ĝuis montradon de diapozitivaj kaj paroladon de S-ro Sekelj mem, nome pri la Rivero Amazono en Brazilo. Li estas homo kun multaj historioj por rakonti. Liaj brilaj okuloj diris al ni: "Jen bonhumora homo!" En Brisbano S-ro Gerrard Diaz Tendaro lin gastigis. "Jes, S-ro Sekelj, vi restis kun ni tro mallonge!" Lia vicleco inspiris ĉiujn, kiuj lin renkontis.

Ni preparas novajn klasojn por komencantoj; ili komenciĝos fine de junio. Jam kelkaj sin registrigis. Du klubanoj eksterlande — Winsome Greenhalgh en San Francisko kaj Beverley Allatt en Japanujo — kontaktis E-istojn. Bedaŭre por Beverley, ŝia E-amiko volis paroli nur Angle, por plibonigi sian scion de tiu lingvo. — V. Robinson.

KRISTNASKO — 1908

Kiam estis mi bubaĝa, kun poŝomona
havo magra,
Antaŭ knabgazetbutikoj, Kristofeste
bunte-belaj,
Staris mi kun kor' saltbata, hav-deziro
dance flagra:
"Ho, ke estu en la mano tiuj aĵoj ja
juvelaj!"

Ankoraŭ klare mi la nomojn rememoras;
En mia koro-menso ili belsonoras.
Per bildoj kaj rakontoj plenpakitaj
Pri ĉiaj sukaj temoj ĝu-ekscitaj.

Jen Butterfly kaj Jester, kaj Comic Cuts
kaj Puck,
Kaj Lot o'Fun, Chips, Marvel, Boys'
Friend, Boys' Realm kaj Pluck,
Chums, Popular, The Magnet kaj The
Gem:
El ili, kiun havu mi? Problem'!

La allogaĵojn post la vitro gapis mi
sopire —
Aliajn sur ĉeporda rak' rigardis
haltospire!
Finfine mi aĉetis, eliris kun la "gemo"
Sekura en la firma ten' de mia fingroj-
premo (I).

"Numer' Duobla!" paĝe dika, ja por mi
regalo franda;
Mi suĉe sorbu ĝin, kun ĝoja ĝu,' en
tempo tre malgranda,
Ĉar sciu, ke, post plena sorb', denove mi
impetis
Reire al la butiket', kie ĝin mi aĉetis,
Per tie plendi mildmiene: "Pro eraro mia
Aĉetis mi neĝustan; devus esti la alia!"
Per tiu ruzo mi sukcesis — tion jam mi
elkonfesis! —
Plian nutron por la kor' ĝi do por mi
permesis.

Jen trompoago kiun vi ne nomus
tuthonesta
Sed pensu vi iome pri la monrimed'
"investa" —
La kelkajn pencojn igis mi labori
plenefike,
Kaj tion nur mi povis, fi-agante artifike.

—Kaj poste, dum jardekoj ses, voĉeto al
mi sonis—
"Senscie en pasinta temp' personoj krom-
aldonis
Plezuron al fripono, ĉar li monon ne
disponis".
—F.R.B. (I) Vidu tuj sube.

"OJ", "OJN" meze de kunmetoj.
"Librojrimeno": "Rabistoj" 3/16, la
unufoja uzo de Zamenhof? Kofman
senstreke uzis "ojn" en sia traduko de

"Iliado" — ponardojnjetistoj. Grabowski (en "Sinjoro Tadeo") pli ol 50-foje uzis formojn, kiel dioj-ordonoj, spikoj-deko, muŝoj-speco, sinjoro-ĉeesto, per tio evitante, pro la metro, uzon de "de" (aŭ, "da") . . . ordono de dioj, deko da spikoj kaj cetere. La Rondo 4/56, p. 135.

BED IN SUMMER

In winter I get up at night
and dress by yellow candle-light.
In summer, quite the other way,
I have to go to bed by day.

I have to go to bed and see
the birds still hopping on the tree,
or hear the grown-up people's feet
still going past me in the street.

And does it not seem hard to you,
when all the sky is clear and blue,
and I should like so much to play,
to have to go to bed by day?
—Robert Louis Stevenson.

Provu vian verskapablon,
tradukante la supran poemon.
Komparu vian kun du
tradukoj en la sekvanta
numero. — Red.

LIBERA FORUMO

Legantoj, sendu leterojn al la redaktoro, por presiĝo sub tiu rubriko. Interŝanĝu ideojn pri interesaj aferoj E-aj. Jam 17 jarojn tiu rubriko disponas al ĉiu leganto, sed mankis leteroj. La lastaj tri aperis 4/67, 8/67, 4/70, el kiuj du venis de nia vicsekretario.

"Rezervu unu paĝon por leteroj" sugestis amikoj bonintencaj. Laŭ mia nuna sperto, ili, kune kun skribemaj kunuloj, frontus taskon pleniĝi tiun paĝon, ĉar inter nia rondaro troviĝus nur malmultaj aliaj kun sama sento kaj preta plumo. Tamen, kun espereto, mi atendas leterojn el ĉiu ŝtato — ideo konstruaj, sen malico kontraŭ iu aŭ io, kaj — kernece kurtaj. Ĉiu colo en nia gazeto estas valora. Ĉiunumere la manko de spaco vidiĝas al mi kiel vera minaco. — Red.

MARY LUPLAU: 1865-1971

Aldone al p. 119. Ŝi naskiĝis en Ballarat kaj migris al Nov-Zelando en 1914. Kvankam ŝi ne aktivis dum lastaj jaroj cele de E-o, ĉiujare, kiel en kelkaj jaroj, naciaj ĵurnaloj raportis pri ŝia datreveno, emfazante pri ŝia longa, fervora intereso en E-o. En februaro F-ino Luplau aperis en la nacia TV-a programo kiel la plej longviva E-isto.— W. H. King.

PREMIO SIMONDETTI VENAS AL AŬSTRALIO

"La Ornitologia Rondo Esperantlingva" (O.R.E.) starigis premion por honori ĉiujare la plej bonan tekston verkitan en Esperanto pri Naturscienca temo. Por omaĝi al la karmemora unua prezidinto de la Rondo, le premio nomiĝas "Premio Simondetti".

Tiel komenciĝas la "regularo" pri la Premio. Por atingi la grandan honoron la verkanto devas kontentigi la membrojn de la "speciala Komisiono laboranta en la sino de O.R.E." ke la verko havas specialan meriton kaj por Esperanto kaj por Naturscienco. Tiu "speciala komisiono" por 1970-71 konsistas el M. Halvelik, W. de Smet, G. P. Makkink, C. Stop-Bowitz kaj L. Laqa, ĉiuj famekonataj esperantistoj. Oni, do, konstatas ke la Premio estas granda honoro por la verkinto kiel natursciencisto kaj kiel esperantisto.

Gajninto de la 1971-a Premio estas S-ino Grace Kirkwood de Mylestom, N.S.K. kiu dum pluraj jaroj estis Prezidanto de la Sidneja Esperanto Societo. Ŝia kontribuado estis traduko de broŝuro pri "Maŝpurigado de la Ĉirkaŭaĵo" de Barbara Salter, originale eldonita en la angla lingvo de la "Bird Observers' Club". La Premio estas dividita inter S-ino Kirkwood, S-ino Salter kaj la Hon. Sekretario de la B.O.C., S-ro Roy Wheeler.

La Premio, do, havas duoblan signifon. Unue ĝi atentigas la ornitologojn de Aŭstralio, kiuj plejparte estas membroj de B.O.C., pri la valoro de Esperanto, kaj due, ĝi donas al Aŭstralio ankoraŭ unu honoran lokon sur la mondmapo de nia Lingvo.

Ni gratulas al S-ino Kirkwood —
REVANTO.

"WOULD . . . ?"

- (a) He would go from house to house, telling of the affair.
Li iradis de domo al domo, dirante pri la afero.
(ago ripeta, kutima.)
- (b) Despite this, he would frequent the place.
(Akcentu la vorton: would.)
Spite al tio, li persistis frekventi la lokon. (Volo, intenco.)
- (c) If I were rich, I would buy it.
Se mi estus riĉa, mi aĉetus ĝin.
(Nursupoza, nereala: do kondicionala.)
- (d) Would you kindly close the door?
Cu vi bonvolus fermi (bonvole fermus) la pordon? (Gentila formo, anstataŭ: Fermu la pordon.)

RECENZOJ

"Biblia Revuo" N-ro 4 Okt.-Dec., 1970). Trimonata; 6 dol. Ĉi tiu revuo, unika en Esperanto, jam atingis 254 paĝojn. Ĝia eldonnumero: 3000. Impresa kvanto.

Cefartikolo: profundpensa studo pri la Malnova kaj Nova Testamento, pri kiuj la aŭtoro, P. S. Siedl, asertas, ke ili estas kaj diversaj kaj unuecaj; ili estas egale valoraj en senco, ke oni devas ilin rigardi kiel — unu kun la alia — supleme- mente integraj al la Kristana religio. Li verkis principe laŭ romatolika starpunkto doktrina.

G. van Groningen detale esploras la Biblian vorton "seolo" kaj la pensadon pri tio de Jakobo el Serug, episkopo kvinjarcenta.

La subtilaj komplikajoj de la Kristana teologio kaj la ekzegezo Biblia estas fakoj de la klereco, kiuj postulas aŭ ege altgradan instruitecon, aŭ, ĉe ordinare-edukitoj, treegan kapablon de memklorigo kune kun ĝisosta amo al la nomitaj fakoj. La enhavon de ĉi revuo nur tre pene komprenus la simpla E-isto, sed bone profitus homoj tauge ekipitaj por mense ekspluati ĝiajn artikolojn detale verkitajn kaj riĉe dokumentitajn. Paĝo de pure Bibliŝcienca teksto, por la plimulto da homoj, estas same malfacila, kiel paĝo da supera matematiko plena de simboloj. Ĉe la Bibliŝcienca verkistoj kompreneble uzas, tekstoj kaj piednote, sian posedon de la antikvaj lingvoj: Greka, Latina, Hebrea, Aramea. Krome ilia menso kaj spirito estas jam saturitaj per la tradicia, historia fono de la problemoj, kaj ili antaŭsupozas similan staton ĉe legantoj. Ili evidente celas eliton; same celas la "Biblia Revuo".

Cu inter la proks. 400 organizitaj E-istoj en Aŭstralio troviĝus dek homoj tiel kvalifikitaj por digesti ĉi tiujn cetere valorajn artikolojn? Se jes, ili saĝe mendus

Estus domaĝe, se tiu ĉi revuo formortos pro malsufiĉa subteno. Pri tiu eventualo la bravaj eldonantoj ankoraŭ ne timas.

"AUSCHWITZ (OSWIECIM)"

1940-1945: K. Smolen tradukis laŭ la 4-a Pola eldono. Eld. Stata Muzeo en Oswiecim. Prezo ne indikita. 106 paĝoj; 102 fotoj.

Animfrakasa historio pri infero farita de homdiabloj. Eble ankoraŭ pli deprima estas la fakto, ke tiu malhomeco ankoraŭ nun daŭras. La homoj ne progresas ire el sia Satana stato. Ili kapablas sin turni en frenezajn sadistojn. Ankaŭ aliaj naciaoj, krom la Germanaj, naciaoj fieraj pri sia kulturo, simile uzadas modernan teknikon por kruele perforti

la korpojn de siaj kunhomoj, masakri ilin kaj dezertigi iliajn loĝregionojn. Legu pri torturoj tempe de la milito en Alĝerio kaj Indoĉinio kaj pri la hororo jam de jaroj en la kampoj kaj karceroj de Sud-Vjetnamo.

Se ĉia tia kulpulo ricevus sian merititan punon, miloj da militistoj en pluraj landoj juste pendus de galĝoj. Antaŭ la eterna monumento de la martireco, tie konstruita, homaj homoj honoras la memoron de la viktimoj mortintaj sur tiu loko, kaj ankaŭ en multaj aliaj.

Petu la libron ĉe la Stata Muzeo en Oswiecim, Polujo, aŭ ĉe Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Box 46, Warsaw.

"Humoroj": originala poemaro de Wm. Auld. 115 paĝoj Eld. Stafeto, Tenerife. \$2.00.

Per ĉi tiu fasko la aŭtoro sin esploras subjektive, enrigardante la propran memon, laŭ Sokrata konsilo. Lia verko do ne estas nutrokaĉo por fingrosuĉantoj; nur versamantoj kun firma intenco elsondi la fundon de lia intelekto ricevos la impresojn, kiujn lia animo strebas transmeti.

Estas certe, ke multaj legantoj rigardos iujn el la paĝoj kiel prozaĵon. Ekz. "Paneo"; nur ĝia formo, nome disigajo da senritmaj prestiĝlinioj, ebligas al ĝi ŝajnaspekti kiel poemo. Jen ĝi:

"Iom post iom likiĝas aero el ĉi pneŭmatiko, la mondo. Baldaŭ ĝi kunfaldiĝos, kiel elefanto senostigita. Kiu alportos krikon kaj rezervan radon al la paneo de la universo?"

Se tio estas poezio, tiel same poezia estas litereto al garaĝisto. Simile ĉe p. 62, 77.

Por iniciigi, komencu per p. 34, 39, 41, 54, 56, 73, 90, 108, kies sukono vi suĉos sen trea mens-peno. Ili estas vere ĝuindaj, sed pri aliaj oni tentiĝas diri, ke ili estas tiel malfacile tradukeblaj, kiel iuj de Heine aŭ Browning. Oni povas demandi al si: ĉu tiu esotereco estas avantaĝo Esperanta? Ĉu plaĉas al poeto E-a aŭ nacilingva la scio, ke lia verko estas karceregita inter la muroj de nur unu lingvo? Kial ne prefere verkoj, kiuj allogas tradukantojn?

Auld estas rimmajstro, kiu ial ne volas ĉiupoeme elmontri sian arton . . . ankaŭ mozaikrma jonglisto: ŝtala, tra la; retro, ne tro; kaj la, tenaja; merla, per la . . .

Henri Vatre en enkonduko prave laŭdas la aŭtoron, kiu kun energio kaj digno eldiras sian feblon kaj ĉagrenon. Vatre mem "eliris el la libro pli forta, malpli malespera". Tiel estu al mil mendintoj de la mil ekzempleroj.

"Eta Vivo": Poemaro de Clelia Conterno Guglielminetti. Eldonis Stafeto, Tenerife. 143 paĝoj. 2 dol.

La aŭtoro estas profesoro, kiu revizianta kunlaboris ĉe la traduko de la eterna verko: *La Dia Komedio*. Karakterizas ŝian lingvajon malofteco de neologismoj; nur sporade oni trovas ilin (ekz-e: asaltas, p. 41). La kolekto estas kvar perioda: 1935-39, la knabinaj jaroj; 1940-45, la milita tempo; 1946-54, malespero sen rezigno; 1955-69, propraviva introspekto. En ĉi lasta troviĝas kvar iom strangaj poemoj enigme titolitaj per baptonomoj de kvar elstaraj E-istoj: Baldur, Marjorie, Ivo, Gaston. Mankas klara interpreto.

Estas bedaŭre, ke ŝia alta intelekto kaj pura spiriteco ne trovis pli prosodie konvencian esprimmedion. Nur kelkaj poemoj estas rimaj; multaj estas nur linioj da patosa prozo en formo arbitre aranĝita por aspektigi ilin veraj versoj. Sur p. 37-39 oni trovas miksaĵojn da rimaj kaj senrimaj vers-kunajoj. Inter aliaj, p. 56 defias metrikon analizon. Kiel klarigi la predikativan adjektivon en: "... ploro banas ilin **kunigitaj**?" P. 89-90: bona rimado, tamen la versoj lamas, ĉar ili ne interkonformas laŭ silaba nombro.

Prof-o Waringhien en enkonduko atentigas pri la neordinareco de la kolekto, enhava kaj poetika. Li komentas, ke "la stilo kiel la ritmo de la poemoj estas sufiĉe nekutima," kaj li aŭdas en ŝia verko "la voĉon de la moderna itala poezio". Sed en kio precize konsistas la itala (aŭ la Angla) "moderna" poezio? Jen temo, ne por simpla enkonduka paĝo, sed por tezo doktoreca.

"**Tra Soveta Ukrainio**", n-roj 4-5-6. Perioda revuo traktanta la socian vivon — arto, literaturo, medicino, eduko, tekniko, kun paĝoj da prozo kaj poezio. Inter diversaj poetoj estas Hilda Dresden. (nask. 1896). (Adreso mankas.)

"**Ukraina Soveta Socialisma Respubliko**": Statistikaj tabeloj kun atentiora komentario. 23 paĝoj.

"**Horizonto de Soveta Litovio**": literatura revuo, pli specife priesperanta ol la supra kajero T.R.S. Aparte valora: *Riĉeco de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj*. Ĉi revuo sendiĝus al ĉiu petinto, kontraŭ interŝanĝo de aĵoj kaj ideoj en amika kunrilato. Adreso: Litova S.S.R., Vilnius C. a.d. 178. Rekomendinde. La enhavo de ambaŭ periodaĵoj atestas riĉan talenton kaj fundan fervoron de E-istoj en tiuj regionoj.

De Ken Linton

— Sur p. 120, kol. I, la vorto "anapesta" devus esti "amfibraka". —

(Ni citis laŭ "The Modern World

Encyc." — Home Univ. Library, 1935. Sen ironio, ni jam nun akceptas la diron de pli fidinda aŭtoritato, dankante lin pro lia atentigo.—Red.)

NIA LIBRO-SERVO

Instruistoj! Via kurso de komencantoj bezonas ion novan — iom de spritajo. Mendu:

"**Gaja Leganto per Esperanto**" (P. E. Schwerin) 35c. 3-a eldono de **Vortaro Fulcher/Long**, nur nur \$2.15. Denove havebla: "**Tempesto super Akonkagvo**" (Tibor Sekelj), \$2.00

Helpu niajn aŭtorojn kaj eldonistojn — kaj ankaŭ vin mem per subteno menda: ĉe T. Elliott, Libroperanto, 8 Lone Pine Pde., Matraville, 2036.

FACILA LEGAJO

Muŝo havis du infanetojn. La tri muŝoj apudflugis sukerajejon. Unu el la infanoj demandis la patrino: "Ĉu vi permesas, ke mi frandu de tiu bela bombono?" La patrino respondis: "Jes, kara, laŭvole frandu."

Apenaŭ la muŝeto estis iom lekinta, ĝi falis teren kaj mortis. La bombono estis fabrikaĵo de la sukeraja trusto.

Larmojn verŝante, la patrino pluflugis kun la alia infaneto. Ili venis al bakejo. La muŝeto malsatis kaj diris: "Kara patrino, ĉu vi permesas, ke mi iom frandu de la freŝaj bulkoj? Ili ja ne estas bombonoj kaj ne malutilos min." Respondis la muŝpatrino: "Certe, kara, frandu iom".

Post frandeto, la muŝeto rigidigis kaj falis teren. La bulko estis fabrikaĵo de la bakaja trusto.

Jam ankaŭ la dua infaneto estis mortinta; la muŝpatrino frenezigis pro doloro. Ĝi forflugis por memmortigi sin. Ĝi konis lokon, kie pendis papero muŝmortiga. Tien ĝi flugis kaj manĝis de la papero. Sed anstataŭ morti, ĝi restis sana, ja eĉ pli saniĝis. Tiu papero estis fabrikaĵo de la muŝpapera trusto. Oni ne prave atendas, ke ĝi mortigu muŝon!

BONVOLU RIDETI . . .

Kial vi ne edziĝas?

Mi ne volas; estas al mi bone. Mi ja prizorgas mian komercejon kaj havas du fratinojn, kiuj mastrumadas por mi.

Du fratinojn, jes, sed tio ne povas esti sama.

Ne diru tiel; ili ne estas miaj fratinoj.

52-jara Svedo, deziras korespondi kun Aŭstralianoj pri Ĉiuj temoj, interŝanĝas bildkartojn kaj fotojn. Arne Bengtsson, Abybergsgatan 32, 431 31 Molndal, Svedujo.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 97 (177)

MELBURNO

15 Julio, 1971



Congress Fee for A.E.A. members: \$6 dol. For others 7 dol. Non-attending members: \$2.50. Send your room reservation (5 dol. deposit) and Congress Fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

6th List of Congress Members

70. Mr. Harold Gilbert, Hawthorn, Vic.
71. Mr. E. C. Tronerud, W. McLeod, Vic.
72. Mrs. M. E. Tronerud, W. McLeod, Vic.
73. Miss T. Bowes, Malanda, Q'ld.
74. Mrs. I. Fink, Mt. Waverley, Vic.
75. Mr. K. L. G. Smith, Balgowlah, N.S.W.
76. Mr. L. V. Scott, Manly, N.S.W.
77. Mrs. M. Wybenga, Morwell, Vic.
78. Rev. C. C. Cowling, Caulfield, Vic.
79. Mr. A. Turner, Shepparton, Vic.
80. Mrs. K. Morrison, Manly, N.S.W.
81. Mr. E. W. Chandler, Crow's Nest, N.S.W.
82. Mrs. T. A. Richmond, N. Manly, N.S.W.
83. Mrs. W. Greenhalgh, St. Lucia, Q'ld.
84. Mr. B. H. Cordery, Mapleton, Q'ld.
85. Mr. I. W. Heldzingen, Boronia, Vic.
86. Mrs. H. Heldzingen, Boronia, Vic.

87. Mr. J. P. Gunning, Chatswood, N.S.W.

88. Miss A. Dennys, Willoughby, N.S.W.

89. Miss V. Strachan, Glen Iris, Vic.

State Distribution: Vic. 44; N.S.W. 24; Q'ld 9; W.A. 7; S.A. 2; A.C.T. 2; Tas. 1. **You may win a prize:** The first Book Prize goes to No. 80: Mrs. Kay Morrison of Manly, N.S.W. She will receive it during the Welcoming Evening (Sunday, 2 Jan. 1972). If your Congress number is 90 or 100 you too will receive a valuable Book Prize; so hurry with your enrolment.

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION OFFICIAL NOTICES

18th June, 1971

New Individual Members

- Carlson, Mrs. M., Morwell, Vic.
Sleswick, Miss J., Morwell, Vic.
White, Miss P., Morwell, Vic.
Mackenzie, Miss J., Morwell, Vic.
Quinn, Miss J., Morwell, Vic.
Broderick, Miss E., Morwell, Vic.
Carlson, Miss T., Morwell, Vic.
Castilla, Miss A., Morwell, Vic.
Regan, Mr. B., Moe, Vic.
Gale, Major I., Armadale, Vic.
Deutscher, Mr. A. D. Fairfield, Q'ld.
Frost, Mr. A. S., Northgate, Q'ld.
Gibson, Mrs. M., Auckland, N.Z.
Wilson, Miss P., Gardenvale, Vic.
Ferguson, Mrs. E., Dee Why, N.S.W.

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$887.31
Brown, Mrs. L. M., Vic.	2.00
Fink, Mrs. I., Vic.	2.00
Pisz, Mr. T., Vic.	1.00

Stubbs, Miss J., Q'ld.	5.50
Williams, Miss B., Vic.	7.00
Hanks, Mr. E. S.	1.00
Bate, Mrs. L., Q'ld.	2.00
Grant, Mr. E. T., Qld.	2.00
Marshall, Mr. H., Vic.	3.60
N.S.W. Esperanto Fedn.	50.00
Gray, Miss J. L., W.A.	2.00

\$965.41

Sincere thanks to every helper.

Interstate Competition Position on 18th June, 1971

	Quote	Points	%
Queensland	130	853	656.1
Victoria	300	1235	411.7
NSW - - ACT	260	1033	397.3
W. Australia	80	244	305.0
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	57	142.5

This competition will finish at the end of November. Help your State to a better position. Here is a list of ways in which you can do so—but act now, for it will soon be too late. We hope to announce the result at the Congress in Melbourne.

Points allotted

New Individual Member	5
New Life Member	50
Popular Course enrolment	2
Intermediate Course enrolment	5
Advanced Course enrolment	10
Elementary Examination success	2
Advanced Examination success	5
"Klereca" Examination success	10
Each \$1 to the Publicity Fund	1

Looking forward to meeting you at the Congress. C. C. Goldsmith, Secretary.

EKZAMENOJ DE A.E.A.

Elementa: Norman A. Collier, Bowen, Q.

Karavano al la Melburna Kongreso

Kvinslandanoj kaj membroj el Nov-Suda Kimrujo, kiuj deziras akiri rabaton per komuna vojaĝo, fluge aŭ fervoje, de Sidnejo al Melburno, TUJ kontaktu S-ron C. C. Goldsmith, P.O. Box 415, Manly, 2095, kiu organizos karavanan.

NASKO KAJ DORMO

Estas fakto, ke multaj homoj dormas pli komforte kun la genuoj preskaŭ tuŝantaj la mentonon. Elvokite de la litvarmo, tio estas senkonscia ripeto de ilia pozicio dum embrieco en la utero patrina. Tiaj homoj rigardas ellitiĝojn kiel devojn malamatajn; subkonscie, kvazaŭ ree, ili sentas sian naskiĝon. Dum la tuta vivo ĉiu homa havas en si sub-

konscian senton pri tiu psika traŭmato. —D-ro R. von Urban.

NOV-ZELANDAJ LERNEJOJ

Preciza informo pri E-kursoj en N.Z. -aj lernejoj por 1971 ankoraŭ ne estas ricevita, sed en multaj urboj troviĝas grupoj en mezlernejoj, kiuj studas la lingvon dum horo aŭ duonhoro ĉiusemajne. Nia ĉefa malfacilo estas manko de profesiaj instruistoj vere kapablaj instrui E-on. En Dunedin, Pleasant Point, Christchurch, Wellington, Hastings, Napier, Te Awamutu, Hamilton, Auckland, Wanganui, Palmerston North, Tangowahine, kaj eble en aliaj urboj, laboras malgrandaj grupoj. Aliflanke, estas iom da malprogreso pro translokiĝo de E-instruistoj for de lernejoj en Northcote, Awahou South kaj Palmerston North. Pro tio, la tieaj klasoj ĉesiĝis. Dum marto, tamen, E-o estis enkondukita al nova klaso ĉe la romkatolika Monahina Lernejo de Skta. Jozefo (St. Joseph's Convent) en Whangarei. Laŭ invito de ties lingvo-instruisto, Fratino Verda, 44 geknaboj 10-12 jaraĝaj komencis studi E-on dum duonhoro ĉiunvendre, anstataŭ la latinan kaj francan lingvojn; ŝi studas kun la lernantoj, kaj —por ni kuragiĝe! — fratinoj en lernejoj en Wanganui, Napier kaj Christchurch celas lerni E-on por ĝin instrui lerneje.

Multaj lernejestroj en N.Z. favoras kaj subtenas E-on pro diversaj kaŭzoj. Elernejan instruadon forte subtenas E-ista Junulara Asocio de N.Z., kies anoj dissendas "The Worksheet", sub la titolo "Junularo Instruas la Junularon", sesfoje jare. Ĝi haveblas ĉe: Margaret Hamblin, 6 Tennyson St., Upper Hutt, Wellington. Jam aliĝis al E-JANZ II instruistoj N.Z.-aj, kiel plenaĝaj anoj (kotizo 2 dol.).

La N.Z.-a Instruista E-Asocio ricevis informon, ke pluraj lernejestroj aĉetas la bonegan lernolibron de R. Makarian; "Secondary School Esperanto" por komencantoj; estas havebla komuna legolibro "Lerta Leganto", I kaj II (por la unua parto de Makarian), kiun verkis E-JANZ-anoj.

En "Liberal Studies Courses" (por la plej altaj klasoj altlernejaj: 17-18 jaroj), estas taŭga okazo diskuti la temon: "La Internacia Lingvo — Kial? Kiel? Kia? Kiam?". Kion oni faras tiurilate en Aŭstralio? — W. H. King, 27 Norfolk St., Whangarei.

"KRISTANA ALVOKO"

is the organ of the Fellowship of British Christian E-ists. Copy from Mrs. Marion Walker, 16 Church Green, Bridlington, Yorks. 12 pages.

MANKIND'S SLOW PACE TO PROGRESS

THE FORERUNNERS VERSUS APATHY AND PREJUDICE

In the revue "Esperanto", May, 1971, Professor Gaston Waringhien sketches the thought of some of the greatest minds—Galileo, Francis Bacon, Grotius, Descartes, and the French thinkers of the 17th century. Much of their universal outlook and ideals found expression in 1887 in the work of Dr. L. L. Zamenhof. The professor asks why, if in Esperanto there is embodied and realised so much of what the great thinkers of past centuries dreamed, it has met apathy and opposition, and remains yet so far from final victory.

He answers this by pointing to the slowness with which the world accepted other benefits. For instance, the reform of the Gregorian calendar of 1582 was adopted by England as late as 1752; in Russia only in 1918. The astronomical discovery by Galileo of the revolution of the planets round the sun was sanctioned for instruction in Rome in 1822. The abolition of slavery, which Grotius (1583-1645) had postulated as a juridical right, after six centuries of Christianity, was proclaimed in England in 1833; France in 1848, U.S.A. in 1865—and from slavery the earth is not yet fully

freed. The establishment of an International Court of Arbitration, visioned also by Grotius, remained an airy project till 1899, when it found limited realisation.

Esperanto is only some 80 years old. Its achievement in that short time, when assessed in the light of the above evidence, is indeed remarkable.

Mankind but slowly comes to see,
Accept and use the blessings at its
hand,

Wherewith its shackled strength to free
And wider means of progress to
command.

The world is in the process of massive transition; news-media is piped into every home. Thus, the analogies with the inarticulate past may not be wholly valid. International relations—social, economic, scientific—are becoming with every hour more intermeshed, and, as a consequence, free communication for all peoples intensely urgent. The pace is on; the world will not wait further centuries for one language for all. And it need not. It is here, functioning on a scale that could be extended to embrace the earth.

LIBERA FORUMO

Multaj homoj sendadas al mi bankbiletojn en kovertoj. Mi timas, ke, se oni daŭrigas tiel fari, iu fripono en la Poŝto eltrovos tion, kaj mi ne nur ne ricevos tiujn leterojn, sed ankaŭ aliajn, kiujn oni eble malfermos, esperante trovi monon. La afero estas kontraŭleĝa. Tio ne min kulpigus, sed se poŝtklasifikistoj sciis, ke ofte troviĝas mono en miaj leteroj, mi povus perdi multajn leterojn. — Tom Elliott, Libro-Servo.

Nuntempe, Esperantistoj sin turmentas senlime pri la manko de kreskado en la movado. Mi hezitas aldoni ankoraŭ opinion al ĉi tiu tro aerumata temo. Sed, ŝajnas al mi ke en epoko de implikado, en tempo de partoprenantaj demokratuloj, ni dividiĝas en agantan malplimulton kaj pligrandan malplimulton (!) de akceptantoj. Por kontraŭbatali tion "The Australian Esperantist" povus esti la vera voĉo de nia nuntempa movado. Mi scivolos pri la opinioj de aliaj legantoj, kiel nutri antaŭenigan kunecon.—S-ino E. Reed, E. Oakleigh (Vic.)

BERTRAND RUSSELL: L. COUTURAT

En sia aŭtobiografio (p. 134) Bertrand Russell skribis, ke en 1897 li ricevis pri sia verko "Fundamentoj de la Geometrio" laŭdleteron de Louis Couturat. Tiu ne sciis la Anglan lingvon kaj, "armita de vortaro" nur pene povis tralegi la verkon. La du viroj kelkfoje vizitis unu la alian, sed fine ĉesigis kontakto, ĉar Couturat "absorbiĝis en la problemon de internacia lingvo". Per sampaĝa komento Russell implice montris sintenon al Esperanto malan ol tiu de sia samtempulo H. G. Wells, kiu, okaze de la morto de Zamenhof, sin esprimis en 18 majo, 1918, per: "Zamenhof — unu el la plej noblaj specimenoj de tiu internacia idealismo, kiu estas la natura donaco de la Judaro al la homaro".

Couturat estis elstara filozofo, logikisto, kiu ludis drame gravan rolon en la afero internacilingva de 1907 ĝis 1914, en kiu jaro li mortis pro trafik-akcidento en Parizo. Vidu: Leteroj de Zamenhof: G. Waringhien.

BED IN SUMMER (p 130)

Somera enlitiĝo

En vintro vekas min la stelo,
Aŭ flava lumo de kandelo.
Somere, tute mala ago,
Mi enlitiĝas dum la tago.

Mi kuŝas kiam la paseroj
Ankoraŭ pepas en hederoj.
Kaj plenaĝulaj piedplatoj
Ankoraŭ sonas sur la stratoj.

Kaj ĉu ne bedaŭrinde estas,
Ke kvankam ĉio hela restas,
Kaj kvankam ludi mi deziras,
Al la lito jen mi iras?

—Brendon Clark

Enlitiĝo en somero

En vintra nokt' leviĝas mi
kaj vestas min ĉe l' kandellum'.
Somere oni pelas min
en liton ĉe la tagolum'.

Irante liten vidas mi
la birdojn salti sur branĉar',
kaj aŭdas sur la stratpavim'
paŝetojn kurtajn de l'homar'.

Ĉu ne mirinde en somer'
dum blua estas la ĉiel',
mi ludi volus ĉe river',
dormiri devas sen ribel'?

—Adolf Holzhaus

LA PURIGANTA POEZIO

Per praktiko de poezio homo povas purigi la emociojn de la memo. Ofte mankas al ni iu al kiu ni povas konfesi, eldiri niajn animajn prem-ĝenojn. Estus bone, se ni povus elverŝi niajn sentojn, sen timo, sen embaraso. Atestas tion poetoj mem:

Wordsworth: (Mia poemo) estas ĝustatempa elvoĉo, kiu alportis al mi koran faciligon.

Byron: La poezio estas kvazaŭ la lavo de fi imagpovo. Per ĝia erupto ĝi malebligas en mi eksplodon.

Goethe: Kio min maltrankviligas, tion mi esprimas poezie. En tiu maniero mi ĝin neniigas.

Newman: La poezio estas rimedo por senŝarĝigi prematan animon. Ĝi estas elirejo tra kiu la emocioj fluas, trovante sinesprimon.

Keble: Por sennombraj homoj la poezio estas sav-klapo, kiu evitigas al ili mensan malsanon.

Bedaŭre, nur malmultaj el ni kapablas —poezii.

El "Junge Leiden: Lieb Liebchen . . ." Heine.

Du Tradukoj.

Al brusto, al mia—ha, ĝi min doloras,
Almetu maneton, amata knabino.
Vi aŭdas, ke tie meblisto laboras?
Li por mi la ĉerkon konstruas sen fino!

Ha, kiel li frapas en mi en la koro!
La vivo forkuras, ne restas jam por mi . . .
Rapidu, rapidu kun via laboro,
Ke povu mi jam je eterne ekdormi.
—Leo Belmont: Fundamenta Krestomatio.

Ĉe l'koro tuŝu min, trezoret',
Ah, aŭdu batojn en brustkameret':
meblist' malica pri la konstru'
de mia ĉerk' laboras kun bru'.

Tag-nokte martelas, frapas li,
la dormon delonge rabas li.
Ah, majstro, rapidu preti jam,
ke do-me mi povu kvieti jam.
—K. Kalocsay, Kantoj kaj Romancoj.

Traduku ĝin en la Anglan. Provo aperos en la aŭgusta numero.

TIBOR SEKELJ

En "Heroldo de E-o", 1 Majo, estas legate, ke li portis Esperantan flage-ton ĝis la pinto de la monto Kosciusko — surloke legata Koziasko". Jam do li portis ĝin sur la suprojn de tri kontinentoj. Restas nur Eŭropo kaj Azio. "Ĉu iu pli juna transprenos la torĉon?"

NEKROLOGOJ

Roy Rawson

Veterana Esperantisto, Roy Robert Rawson, 73-jaraĝa, mortis la 14-an de junio, 1971, en Hawthorn, Melburno, Viktorio. En antaŭa tempo li fervore, efike kaj sindediĉe laboradis publike por la Internacia Lingvo en diversaj kampoj —organizaj, radiaj, librovendaj. Pro siaj Eŭropaj vizitoj, li estis konata ankaŭ internacie. Li restis dumvive fidela al tiu nobla celo, por kiu li plifruie oferis tiom multe da tempo kaj energio.

Kun funda bedaŭro liaj amikoj kaj kolegoj de la bela tempo jam pasinta lin adiaŭas, kaj al lia edzino, Florence, kaj ilia filo, Donald, sincere kondolencas.

George Mrongovius

Aŭstraliaj Esperantistoj aŭdos kun bedaŭro pri la morto de S-ro George Mrongovius, dum kelkaj jaroj ano de la Melburna E-Societo. Li naskiĝis en Rusujo kaj vivis dum kelkaj jaroj en Germanujo, kie li eklernis Esperanton. En 1949 li enmigris Aŭstralion kaj malfermis libro-vendejon sub la nomo "POLYGLOT". Parto el la stoko de

"Polyglot" estis Esperanto-libro kaj gazetoj kaj tiamaniere li multe propagandis por nia lingvo kaj varbis kelkajn novajn membrojn al la Melburna E-Societo, unu el kiuj estas la nuna Prezidanto.

En Junio 1970 li devis submeti sin al operacio, post kiu li ne resaniĝis, kaj li mortis la 23-an de Februaro, 1971. Al S-ino Mrongovius kaj al lia familio ni esprimas niajn profundajn kondolencojn.

AUSTRALIA KRONIKO

Klubraportistoj bonvole sendu viajn raportojn ĝis la 15-a de la monato al la A.E.A. Vic-Sekretario, 41 Byfield Street, Reservoir, Vic., 3073.

PERTH: Okazis 26/5 kunveno ĉe Suda Perto. S-ino Pollard montris la uzon de la fino 'n' rilate al la preterlaso de prepozicio. Nia Prezidanto prezentis aforisimojn kiel temon por legado, kaj sekvis voĉlegado estrita de S-ino Palmer, kiu preparis diversajn ĉerpajojn el proverbaro. Ĉiu vice legis pecon kaj tradukis Anglen. Poste S-ro Finch laŭtleĝis amuzan rakonton. La celo de spertuloj estis helpi kaj kuragi komencantojn al partopreno en ĉiu kunveno.

Liganoj 9/6 kunvenis ĉe Nedlands en la Kolegio de Instruistoj. Ĉar inter la grupo komencantoj sin trovis, la temo baziĝis sur voĉ-esprimoj, kompreno de legataj artikoloj kaj gramatika ekzerco. S-ro Howard preparis vigle estris elpensitan programon. Lia ĉefa temo estis la uzado de la sufiksoj 'ig' 'iĝ' 'ul'. Post tiu cerbo-streĉo, li prezentis kart-ludon, kiu necesigis klaran prononcon.—G. Pollard.

ADELAIDE: Lokaj anoj ĝojas vidi inter si denove S-ron F. D. Vawser, kiu antaŭ nelonge revenis el Britujo. Li estis tre entuziasma, kaj havis multon por rakonti, pri historiaj vizitindaĵoj en Anglujo, kiam li alparolis la klubanojn. Li denove kaptis la okazon priskribi siajn travivaĵojn kaj montri siajn belajn bildojn kaj broŝurojn kiam S-ino Fay Koppel el Melburno survoje al Alice Springs ĉeestis kunvenon je la 8-a de Junio. Tiuokaze klubanoj ankaŭ diskutis kun la vizitantino la venontan tutaŭstralian kongreson en Melburno. Tiu kunveno okazis en la hejmo de F-ino Mary Hodge. Poste F-ino Win Addis regalas la ĉeestantojn.

MELBOURNE: S/ino Fay Koppel, 17/5 pritraktis la temon "Privat kaj Gandhi" kaj tiel atentigis pri ankoraŭ unu trezoro en nia Biblioteko, la libro "Vivo de Gandhi". 24/5 S-ro H. Beechey alparolis

la ĉeestantaron pri la antikva ĉina sistemo "I Ching", plej malnova maniero profetadi. Laŭ ties principaro la progreso de la mondo dependas de senĉesa ŝanĝado, kaj per la observado de tiu proceso oni povas reguligi la vivon. Li klarigis ankaŭ la sistemon reprezentante per simbolaj sesoj da rompitaĵ kaj nerompitaĵ linioj ĉion en la universo kaj la maniero fari demandojn kaj ricevi taŭgajn respondojn per la ĝusta ŝanĝado de la linioj.

Ni havis 31/5 la plezuron renkonti S-ron Konarewski, kiu estis la lasta sekretario de la E-Societo en Czeszochowa (Pollando), antaŭ ol li rifuĝis el Pollando per la helpo de Svedaj kaj Germanaj E-istoj. Li interese rakontis pri sia vojaĝo de Svedujo kaj Danlando al Aŭstralio. Samvespre, S-ro Marshall Cohen rakontis pri adiaŭa kunveno li havis je 26/5 kun S-ro Tibor Sekelj en la Tullamarine Aerhaveno. Post kvinmonata vagado tra multaj partoj de Aŭstralio kaj Nov-Gvineo, S-ro Sekelj reiris al Jugoslavujo por prelegi kaj montri siajn filmojn al siaj samlandanoj. Nia lerta lingvisto Kim Bastin, 7/6, parolis pri la malfacilo de la angla gramatiko kaj montris ke tamen ekzistas reguloj.

MORWELL: En Aprilo Ges-roj Schepers prezentis teatraĵeton, kiun ili registris per sonbendaparato. S-ino McLaren prezentis registritajn kantojn en Esperanto. En Majo S-ro Colin Laird prezentis interesan filmon kiu montris al ni iom pri la vivo en la R.A.A.F. Li montris filmon pri sia flugvojaĝo al Havajo kaj Figio antaŭ kelkaj jaroj.

Ni ĵus preparas novan E-kurson sur sonbendo, kiu estos multe pli malmultkosta ol similaj kursoj haveblaj. Interesuloj skribu al S-ino Mabel Wybenga, 30 Butters Street, Morwell, 3840.

Gratulojn al S-ino I. McLaren kiu sukcese plenumis la Elementan Ekzamenon de A.E.A.

En Junio ni festis nian 2-an datrevenon de la fondiĝo de nia klubo per donaco de Esperanto-Libro al la Morwell Publika Biblioteko. Tio estas la 3-a libro kiun ni donacis al nia biblioteko.

SYDNEY: 17/5 Rene Asselin montris lumbildojn de la dua parto de sia ĉirkaŭmonda vojaĝo; — la aŭtobuso kiu iras de la Oriento al la Okcidento; bildoj de Nepalo kaj Himalajo, temploj k.t.p.; rivero Gango en Hindujo; Rene sur elefanto, vizitante allogajn lokojn; la Taĝ-Mahalo, la montpasejo Kajbaro, kie ŝajne ĉiuj portas pafilon; en Pakistano kaj Irano, fine Istanbulo kaj mirindaĵ

moskeoj; sonbenda parolado kun tipa Hindua muziko. Ni ĝu-atendas vidi liajn bildojn de Europo.

22/5: Speciala kunveno. Estis 22 anoj de Sidneja kaj Manlia Klubo, ankaŭ aliaj grupoj, por rebonvenigi S-ron Tibor Sekelj, kiu revenis de Nova Gvineo kaj Nova Britujo, kiu en pasinta tempo la popolo estis kanibala. Dum 1½ horoj ni vidis maloftajn lumbildojn pri la indiĝenoj en iliaj ofte primitivaj lokoj. La indiĝenoj kreskigas kakaon, legomojn, ignamojn k.t.p. Iuj el ili fidis al la stranga "kargokulto" por provizi kion ajn ili deziras. Tibor lerte parolis pri la kuriozaj kutimoj de la popolo kaj rakontis aventuron, kiu preskaŭ faris finon al li. Li reiras hejmen kun niaj bondeziroj. En la ĵurnalo "Australian" 24/5 aperis bona intervjuo kun li pri E-o.

24/5: Lumbildoj kun sonbendo en E-o ricevitaj de Madama Simone Humm, kiu loĝas en Avignon, Sud-Francujo: — bildoj de mezepokaj preĝejoj, ankaŭ antikva akvedukto, amfiteatro kaj aliaj ruinoj, krom bildoj modernaj. Laŭ peto, ni sendis la bildojn al Morwell.

29/5: La "Esperanto Federation of New South Wales Incorporated" (nova nomo) kunvenis en la Esperanto-Domo: poste, danco kaj koncerto. 31 5: Margaret Chaldecott instruis pri ludo "Punĉinelo", simila al "Scrabble", sed kun E-literoj, afiksoj k.c. 7/6: Frans Franich regalis nin per Magnetofono Muziko: "Tria Simfonio" (Beethoven) kaj partojn de aliaj verkoj. — G. E. Browne.

("Punĉinelo": Unua Aldono (1909) al la Universala Vortaro. Lau lingvoj F. I. H. P. R. — Red.)

MANLY: 3/6: postkurso parolado fare de Betty Cleminson, kun lumbildoj, pri ŝia lastatempa vojaĝo. Alestis 19, inkluzive de 6 el la elementa kurso. 5/6: en la halo de North Balgowlah Presby. Church okazis Internacia Distra Nokto, societa vespero Anglalingve, organizita de Thora Richmond. Pastro Graham Beeston salutis. Marjorie Duncan parolis pri la celoj kaj praktika valoro de E-o, kun eta demonstro. Marjorie Liston, Richard Moir kaj Marjorie Duncan kontribuis al la muzika programo. Preĝejanoj aranĝis "kvizon" kaj montris diapozitivajn pri alilandaj vojaĝoj.

10/6: kutimaj kursoj — elementa, propra, altgrada — ĉe la Vespera Lernejo, Darley Road, Manly. Altgraduloj partoprenis en ŝaradoj, kiujn Lily Goldsmith lerte gvidis. Sekvis kunveno, diskuto, konversacio. 17/6: ĉeestis elementan kurson 5; altgrada 12. S-ro P. E. Schwerin lumbilde prelegis pri "La

Loire-Valo kaj Belgujo". Unuaranga programo, kiun raportis "North Shore Times", "Pacific Times", "Pittwater and Warringah News".—Fenikso.

BRISBANE: Nia prezidanto, S-ro Karl Gunster, gastprelegis ĉe festlunĉo de la Turisma Ligo ĉe Motelo Coronation. Ĉirkaŭ 80 personoj ĉeestis. Viglaj demandoj estis faritaj al Karl pri la internacia lingvo. Ni esperas formi novan studgrupon. — V. Robinson.

TOOWOOMBA: Ĉe nia lasta kunveno, 8/6, ni diskutis la eblecon aranĝi la 19-an Aŭstralian E-Kongreson en nia urbo. Tiurilate ni ricevis leteron de S-ro Herbert Koppel, A.E.A. Vic-Sekretario, kiu diris ke nenia kongreso ĝis nun okazis en Kvinslando, kaj Toowoomba estus taŭga loko ĉar nia somero estas pli milda ol tiu de Brisbano. Ĉiuj ĉeestantoj konsentis ke estus instigata okazo havi la 1974-an kongreson en nia urbo, sed ke nia societo ne estas sufiĉe forta en la nuna tempo. Tamen ni plu diskutos la problemon.

ROCKHAMPTON: Ĉiun jaŭdon 2 klasoj daŭre kunvenas en la vespero. Entuziasmaj komencantoj bone progresas. Ĉiun sabaton posttagmeze kelkaj membroj kunvenas por praktiki konversacion kun la celo akiri fluecon por partopreni la Melburnan kongreson. Daŭras vendado de bumperangoj eksterlanden.

REDCLIFFE: Pri la dumonata kunveno (6/4) hejme de Ges-roj R. Memmott ni raportas: S-ro Memmott jam faris prividajn sonbendon pri la duoninsulo Redcliffe, kiun ni sendas al ĉiu E-grupo en Aŭstralio. Ni konsideras faron de historia sonbendo pri Redcliffe, la plej malnova blankula loksido en Kvinslando.

La grupo bonvenigis novajn membrojn — S-inojn D. Henniff kaj G. de Millo; gratulis al S-ro C. Goldsmith okaze de lia edziĝo; al S-ino E. Tognolini pro flegista ekzamen-sukceso; sendis salutkarton al F-ino Luplau pro ŝia 106-a datreveno, kaj karton al S-ino Seccombe, esperante al ŝi resaniĝon.

Sur la insulo Bribie 4/4 anoj de la grup Redcliffe gaje kunvenis kun la grupoj de Brisbano kaj Sunshine. La ĵurnalo "Redcliffe Herald" dek-cole raportis pri la supraj okazoj.—Lilian Memmott.

S.A.T. Congress

If near Paris 31 July - 6 August, look in on it. Details from S.A.T. UEA-yearbook, p. 65. Late detailed info. just received, May 31.

18-a Aŭstralia Esperanto Kongreso

Januaro 2-3, 1972

ESPERANTAJA KONKURSOQueen's College
Melburno, Viktorio.

La personoj kiuj sendos la dek plej bonajn Esperantajojn (bildkartojn, ilustraĵojn, salutleterojn, gazetojn k.t.p.) ricevos premiojn.

Sendu Esperantajojn al
A. C. Heathfield 128 Broughton Road
Surrey Hills Victoria 3127 Aŭstralio

Dum Periodo de Tensio, Timo, Dubo, kaj Danĝero.

"Por taksu la veran karakteron de homo necesas scii, kion li farus, se li scius, ke neniu ajn lin akuzos". Tiujn duokajn unu vortojn diris Thomas B. Macaulay, angla aŭtoro kaj poeto. Ili tre frue influis mian vivon.

Antaŭ kvindek jaroj en kvartalaĉa lernejo, S-ino Robinson submetis sian klason al testo pri aritmetiko. Kiam ŝi kontrolis la respondarojn, ŝi ektrovis, ke dekdu knaboj estis skribintaj la identan malpravon respondon al unu el la problemoj.

S-ino Robinson petis tiujn dekdu knabojn ke ili restu post la ĉeso-signalino. Ŝi prezentis neniajn demandojn. Ŝi neniam akuzis. Ŝi simple skribis sur la nigra tabulo dudek unu vortojn kune kun la nomo de la nobla homo, kiu ilin verkis, kaj ŝi ordonis siajn lernantojn kopii ĉi tiujn vortojn cent fojojn.

Mi neniam scias pri la aliaj dekdu knaboj, sed parolante pri tiu sola knabo el la dekdu, kies intimajn pensojn mi konas, mi povas ĉi tion diri: tio estas la plej grava unuopa leciono de mia tuta vivo.

Okazis, ke mia vivo ĝis nun trapasis periodon de tensio, timo, dubo, kaj danĝero. Estas konsole, kompreneble, lerni el la historio, ke ĉiuj periodoj estis plenaj de tensio, timo, dubo, kaj danĝero, sed homo bezonas pli ol konsolon — li bezonas ilojn per kiuj labori kaj voĉmontrilojn por lin gvidi; kaj li bezonas mezurstangojn per kiuj mezuri.

Kvindek jarojn post ol konatiĝi kun la vortoj de Macaulay, mi ankoraŭ opinias, ke ili estas la plej bona mezurstango, kiun mi iam ajn trovis. Ne pro tio, ke ili provizas rimedon mezuri aliajn, sed pro tio, ke ili provizas nin per rimedo mezuri nin mem.

Malmultaj el ni devas fari grandajn decidojn: kompromiti nian nacion al milito aŭ endanĝerigi la armeon per batalo; sed ĉiuj el ni devas taĝon post taĝo fari pure personajn decidojn: Ĉu ni enmetu en la poŝon la enhavon de tiu monujo, kiun ni trovis sur la strato, aŭ

ĉu ni transdonu ĝin al la polico? Ĉu ĉi tiu mendo erare sendita al ni anstataŭ al nia rivala firmao estu aldonata al nia vendokvoto, aŭ honeste sendata al tiu, al kiu ĝi vere apartenas?

Neniu scios! Neniu krom vi, sed vi devas vivi kun vi mem. Ĉiam estas pli bone vivi kun iu, kiun vi povas esti — ĉar estimo naskas memfidon. Kaj memfido estas multe pli bona ol konsolo.

Memfido estas bonega armilo — precipe dum periodo de tensio, timo, dubo, kaj danĝero. — El la angla tradukis Ken G. Linton.

RECENZOJ

"La Turmentego de la Memmortigintoj": Almerindo Martins de Castro. El la Portugala originalo tradukis Benedicto Silva. Eld. Spiritisma Federacio de Brazilo. 160 paĝoj. Prezo ne indikita.

Al teranoj permedie parolas spiritoj de sinmortigintoj. La verko ĉiupaĝe predikas kontraŭ tiu "krimo, la fonto de nepriskribeblaj turmentegoj", vivece ilustrante per historiaj notoj. Sinmortigo estas la plej malbona speco de murdo, ĉar pro ĝi oni ne plu havas okazon por penti.

Seneko, Epikteto, Sekspiro, David Hume, Tennyson inter aliaj parolis pli milde, eĉ favore pri sinmortigo. Aliflanke Cicerono, Martialo, Ovidio, Defoe kaj Goldsmith kondamnis ĝin kiel mal-kuraĝon.

Sekspiro: Kontraŭ sinmortigo estas malpermeso tiel tree Dia, ke mia man' malforta tremas . . .

Ho, se l'Eterna ne barinta estus per sia leg' la sinmortigon!

Montaigne estas duvoĉa: La plej dolĉa donaco de l'Natura al la homoj estas la ŝlosilo per kiu ni povas eliri el la karcero de l'vivo (Eseoj 111/3). Sed: Estas ago malkuraĝa, kaŭri en tert'uo sub pezega tomoŝtono, por eviti la batojn de l'sorto (11/3).

Estas okazoj pri kiuj humana homo nepre sentas neceson indulgi sinmortiginton, pro la diversaj motivoj, kiuj pelis lin ĝis tiu ekstrema faro. Edzo, ne naĝipova, vidas edzinon, flon baraktanta en muĝanta maro; li senespere plonĝas en ĝin por morti kune kun la amato. Simile pri incendio, en kiu ne estas eĉ ŝanceto transvivi eniron, li tiel same faras. La heroo Oates (otz) ĉe la malespera esploro Polusa, adiaŭis siajn morte-mizerajn kamaradojn en tendo en la glacia, ventvipata sovaĝejo, por eliri al certa morto, nur por ŝpari al ili la ŝarĝon de lia subteno. Ĉu krimaj sinmortigoj, aŭ agoj de sindona oferemo?

Havebla ĉe: Luiz Otero, Caixa Postal, 323 Cassino, Rio Grande, RGS Brazil.

"Ni Komedietaŝ": Ok skeĉoj de Zora Heide. Eld. Dansk E-Forlag, Ingemannsvej 9, DK 8230, Abyhoj, Denmark. 32 paĝoj. Prezo 4 Danaj kr.

Aparte plaĉas "Ce Dentisto", ne tre longa. Ĝi estas ridiga kaj facile ludebla. "Panika Intervjuo" postulas aparte bonan lingvolertecon, klare senhezitan elprononcon, ĉar temas pri ion avangardisma poetino, kiu voĉlegas sian strangan vers-monstron.

"Karulo", de eble triminuta daŭro, estas bona provpeco por memfidiĝi novajn rolulojn ĉe amuzo teatra. Uzantoj povas modifi, alifrazigi, tie, kie ili pensas, ke tio ankoraŭ pli forte ridigus spektantojn. Sed indiku la fonton.

La du-akta "Psikoanalizo" estas iom nedece aŭdaca.

Mendebla ĉe nia Libro-servo.

"Antaŭ du mil Jaroj": el la Portugala tradukis Porto C. Neto. Eld. Brazila Spiritisma Federacio, Rua Souza Valente 17 Rio de Janeiro, Gb, ZC -08. Prezo ne indikita.

Vidu: La Rondo, Jan-Feb. 1952. Releginte la libron, la tiama recenzinto nun konfirmas sian aprecon de la verko. En la interdumaj tridek jaroj ankoraŭ ne aperis similtima romanego el la grandioza speco al kiuj apartenas ĉi verko kune kun "Quo Vadis?" kaj "Fabiola". Kun la nomitaj ĝi rajte kompariĝus. En ĝi oni kvazaŭ vivas en la unika tempo historia — la estiĝo de la Kristana eklezio meze de la pagana mondo.

Temas pri reenkarigiĝo de spirito, Emanuel, kiu lernas per doloroj la vojon al perfekteco. Li parolis per medio, Xavier, kiu aŭtoris la libron.

La stilo estas iom balaste peza, troriĉa, florea prozaĵo. Per arta resumo, kiu forigus milojn da modifantaj vortoj kaj frazoj, la leganto pli facile ricevus la sencon kaj pli plezure sekvus la historion. Lingvaĵo gramatike bona.

En la pretendata revelacio (p. 321) la Kristo parolas al venintoj en Paradizon. Strange, ke la lingvaĵo de la Majstro pli similas la retorikon de Lapenna ol la pur-elementan stilon de Jesuo. Esprimoj, kiaj "surplaneda vivo", "evoluciklo", "definitivaj progresoj" ŝajnas nekongruaj sur la lipoj de tiu, kiu parolas per la tre simplaj vortoj konservataj en la Evangelioj.

La tradukinto rigore limigis sin je la ĝenerale uzata lingoprovizio, evitante

neologismojn. Pro tio, la verko estas rekomendinda por la granda plimulto. Bedaŭrinde, ke ankoraŭ la unua eldono restas neelĉerpita.

"Esperanto: A First Foreign Language for All Mankind": Dr. Bernard Cavanagh, M.A., D.Sc. 32 pages. Eld. The British Esperanto Assn.

The author is an outstanding exponent of Esperanto, and within this finely produced booklet has answered effectively all questions reasonably asked concerning the structure of Esperanto, its organisation, its achievements in various fields, and its undoubted value for anyone who learns it. He brings up to date earlier compendiums, critically examines widely held notions as to the relative "universality" of English, points to the poor results of "school" French and German, attests to the concrete advantages of Esperanto instruction as part of modern-language study, and to the beneficial effect on the use of the mother tongue.

Language discrimination against the small nations is obvious in international politics, where their representatives are compelled to argue their case versus those of major powers, who are able to use their own languages. Further, the small peoples must often choose their less dialectically competent delegates mainly on account of their mastery of an "official" language.

The pars on The Neutrality of Esperanto and its organisation should be absorbed word by word. The author concludes: all users of Esperanto should be welcomed, but views and laws that would suppress, oppose or damage it we must condemn.

No price is given, but every "apostle" should have this booklet.

LIBRO-SERVO

Tri novaj libroj nun haveblaj ĉe via Libro-Servo: NOKTO DA TIMO kaj aliaj noveloj: Bertram Potts \$1.35. NI AKTORAS: Tri komedietoj: Marjorie Boulton \$0.55. NI KOMEDIETAS: 8 Teatraĵetoj: Zora Heide \$0.55.

"Telopeo": bulteno de la E-Fed. de N.S.K. 8-paĝa. Wre Chandler, redaktoro. Audrey Denny: Mia Kontakto kun Blinduloj: Kay Morrison: recenzo pri libro The Times of Henrietta (Jane Tabberer), krom alio interesa.

Kiel traduki: "telopeo"? Mutas pri tio la P.I.V. Ĉu ne pli trafa titolo?

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 98 (178)

MELBURNO

15 Aŭgusto, 1971



Congress Fee for A.E.A. members: \$6 dol. For others 7 dol. Non-attending members: \$2.50. Send your room reservation (5 dol. deposit) and Congress Fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

7th List of Congress Members

90. Mr. F. D. Vawser, Prospect, S.A.
91. Mrs. O. Glenie, Balaclava, Vic.
92. Mr. I. Toth, Heidelberg, Vic.
93. Mrs. E. Toth, Heidelberg, Vic.
94. Mrs. M. Halliday, Glen Waverley, Vic.
95. Mr. J. Slattery, Balmoral, Vic.
96. Mrs. E. M. Ferguson, Dee Why, N.S.W.
97. Mr. D. R. Ferguson, Dee Why, N.S.W.
98. Mr. E. McKenzie, Warrandyte, Vic.
99. Mrs. M. McKenzie, Warrandyte, Vic.
100. Major I. V. Gale, Armadale, Vic.
101. Mr. H. Beechey, Noble Park, Vic.
102. Mr. V. Guelting, Ashfield, N.S.W.
103. Mr. I. Slavoff, Albert Park, Vic.
104. Mrs. E. Gardiner, Brisbane, Q'ld.
105. Mr. R. S. P. Reed, E. Oakleigh, Vic.

106. Mrs. E. Reed, E. Oakleigh, Vic.
107. Mr. C. M. Smith, Morningside, Q'ld
108. Mr. R. Brooks, Boronia, Vic.
109. Mrs. S. Brooks, Boronia, Vic.
110. Mr. D. Cafiso, Morwell, Vic.
111. Mr. J. Fluit, Morwell, Vic.
112. Mr. K. Pattle, Morwell, Vic.

State distribution: Vic. 61, N.S.W. 27, Q'ld. 11, W.A. 7, S.A. 3, A.C.T. 2, Tas. 1.

You may win a prize: This month's winners of Book Prizes are No. 90: Mr. F. D. Vawser of Prospect, S.A. and No. 100: Major Isabel V. Gale of Armadale, Vic. They will receive their prizes during the Welcome Evening (Sunday, 2 Jan. 1972). If your Congress number is 125 you too will receive a valuable Book Prize; so hurry with your enrolment.

Karavano al la Melburna Kongreso

Kvinslandanoj kaj membroj el Nov-Suda Kimrujo, kiuj deziras akiri rabaton per komuna vojaĝo, fluge aŭ fervoje, de Sidnejo al Melburno, TUJ kontaktu S-ron C. C. Goldsmith, P.O. Box 415, Manly, 2095, kiu organizos karavanojn.

Dramo - Konkurso

En la kadro de la Melburna Kongreso okazos por la unua fojo Dramo-Konkurso.

Ciu grupo esperantista en Aŭstralia rajtas partopreni per unu teatraĵo, ne pli longa ol 20 minutoj. La plej bona teatra grupo ricevos la "A.E.A. Dramo-Sildon", migrantan trofeon, kiun la gajnontoj tenos ĝis la venonta kongreso.

Se via grupo deziras partopreni, sendu la titolon de via teatraĵo, la nombron de

la aktoroj kaj la tempodaŭron de via prezentado ĝis la 31-a de Oktobro 1971 al Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001, —Herbert Koppel, Kongres-Sekretario.

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

OFFICIAL NOTICES

16th July, 1971

New Individual Members

Gibb, Mr. J. G., Mackay, Qld.
Gamble, Mr. N., Deakin, A.C.T.
Henderson, Mr. P., Lane Cove, N.S.W.
Hartshorn, Mr. F. W., Eumundi, Qld.
Pamphilon, Mr. H. J., Corryong, Vic.
Harvey, Mr. J., Red Hill, A.C.T.
Lindeson, Miss M., Elsternwick, Vic.
Sinclair, Mr. G., South Yarra, Vic.

Interstate Competition

Positions on 16th July, 1971

	Quota	Points	%
Queensland	130	870	669.2
Victoria	300	1254	418.0
N.S.W. - - A.C.T.	260	1050	403.8
West. Australia	80	244	305.0
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	57	142.5

Publicity. Green cards are still giving better results than any other form of publicity. If you have never used them, or if you have done so and can use more, just write and say how many you want. They bring results. —Tiny Goldsmith, Secretary.

EKZAMENOJ DE A.E.A.

Supera:

S-ion Jessie Clarke, Woody Point, Q.
S-ro R. W. Baxter, S-ino May Baxter, Manly.

Pri la Parola Parto la Komisiono avertas pri malfacilo, kiun povas havi kandidatoj loĝantaj en izolaj lokoj. Nome, ili ne povas viziti ekzameniston.

Parola provo per sonbendo estus nekontentiga, pro kelkaj kialoj. Estas necese, ke parola provo enhavu konversacion nepre spontanee, improvizan, sen antaŭa preparo; ĝi konsistu el libera interŝanĝo de demandoj-respondoj fare de kandidato kaj ekzamenanto. Krome la kandidato legu Esperanton tekston, por ke la ekzamenanto priuĝu lian prononcadon kaj aŭskultu liajn rimarkojn pri la senca enhavo de la teksto. Dezirinde ankaŭ, ke la kandidato traduku en Esperanton sen troa hezito Anglajn frazojn voĉitajn de la ekzamenanto. Ĉio tio ne estas ebla per uzo de sonbendo. La Komisiono do avertas izolajn Esper-

antistojn pri tio. Antaŭ ol kandidatiĝi por la Skriba, ili certigu pri posta kontakto kun ekzamenanto por la Parola.

PRI NEKONTENTIGA PROGRESO

Leginda artikolo de Lapenna en "Esperanto", Jul.-Aug. 1964. En ĝi li citas laŭ "The Australian E-ist", n-ro 34/1963: "Estas tre grave, ke pliboniĝu la lingva nivelo de niaj gazetoj . . ." La landaj organoj "enhavas timige multe da nemature verkita teksto, nekompetente kontrolita, dum en la kulturaj revuoj troviĝas kontribuoj tro 'alteflugaj' el enhava kaj stila vidpunkto". Lapenna demandas: ĉu tiuj kritikoj estas pravaj?

Li detale respondis la propran demandon, skribinte inter alio, ke gazeto kun tekstoj en kiuj daŭre troviĝas gramatikaj eraroj, naciismoj kaj ne-fundamentaj formoj, superflua neologismoj kaj stilo nekonforma al la spirito de Esperanto, prezentas gravan dangeron por la lingvo kaj ĝia plua progresado. Redakti gazeton estas respondeca tasko; se oni ne scias perfekte la lingvon, oni ne akceptu tiun funkcion; kaj se oni scias ĝin, oni ne hezitu korekti la erarojn. Gazeto devas esti redaktata kaj ne redaktiĝi per si men. Malbona lingvo ŝokas la spertajn E-istojn kaj senkuraĝigas la komencantojn. Primitivaj, nepoluritaj tekstoj malproksimigas klerajn personojn kaj malutilas al la prestiĝo de la lingvo kaj al la seriozeco de la Movado

"FACILECO DE ESPERANTO"

"Nia informado devas celi ĉiujn tavolojn de la socio; kvankam estas efike en kelkaj rondoj aserti la grandan simplecon de nia lingvo, tamen en aliaj rondoj tia aserto maltrafas. Ĉar estas fakto, ke lingvo ne povas esti simpla; lingvo estas kompleksa organismo, kaj Esperanto estas nur **relative** simpla. La simpleco de Esperanto estas **gramatika** simpleco; sed la gramatiko estas nur la **bazo** de la lingvo. Oni povas parkeri la gramatikon en tre mallonga tempo — sed oni povas studi la lingvon dum sia tuta vivo kaj tamen ne tute ellerni ĝin". —Wm. Auld, "Esperanto en Skotlando" 5/51.

Sur la fronta kovrilpaĝo de sia bonega: "A First Foreign Language for All Mankind" (ĉe B.E.A.) D-ro Cavanagh prave metis emblemon: "Simple—Subtle". Vidu: "How Long Does it Take to Learn Esperanto?", "The A.E. Jun.-Jul. 1968.

"RETORIKO": Dr. I. Lapenna.

Third edition is ready. The other editions (4500 copies) sold quickly. Order through our agent.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: La Liganoj kunvenis 23/6 ĉe South Perth, kaj traktis diversajn temojn. Unue okazis tradukado de skribitaj bone konataj diraĵoj preparitaj de S-ino Palmer. Emfazis la skribitaj pecoj scion pri la uzo de la fino 'N', kaj kono de kutimaj Esperantaj vortoj. Sekvis diskuto pri tio, en kio ĉiuj ĉeestantoj partoprenis. Poste sin distris la anoj per kart-ludo, kiu necesigis la uzon de Esperanto.

La prezidanto de A.I.E.A. jam ricevis kelkajn E-ajn librojn por starigi, sub la rubriko "Esperanto", en la biblioteko de la Instruista-Unuiĝo ĉe Perth. Si bonvenigos pluajn donacojn, ĉar instruistoj konstante prunteprenas librojn el tiu Biblioteko.

Grupo de Esperantistoj, kiuj loĝas sude de Perth, trans la rivero Swan, kunvenas dufoje en monato por sin ekzercadi en la parola uzo de E-o. Antaŭ kelkaj jaroj la hejmo de S-ino McGrath estis la rendevuo, sed ĉar malsano trafis unu el la domanoj, la kunveno nun okazas ĉe la hejmo de F-inoj Longson. Post vigla ekzercado, en kiu ĉeestantoj vice partoprenas, F-inoj Longson provizas teon kaj manĝon. Volante danki al ilia gastameco, la vizitantoj donacas monon kiun F-inoj Longson senhezite metas en la Kason, por aĉeti materialon por helpi la eldonajn de nia gazeto, "La Nigra Cigno". — Gertrude Pollard.

MELBOURNE: Pro plua vetero nur malgranda nombro ĉeestis kunvenon je 21/6, kiam S-ro Ken Linton distris la ĉeestantojn per areto da tradukaĵoj, tre diversaj laŭ temo kaj humoro. Je 28/6 S-ro H. Koppel priskribis vojaĝon kaj alvenon en Alice Springs, kaj S-ino Koppel aldonis priskribon pri la urbo kaj la revenon per aeroplano al Tullamarine. Mikspoto de S-ro F. R. Banham 5/7 temis grandparte, pri fenomenoj supernaturaj — la parolado de lingvoj neniam studitaj, la regado de verkistoj far de la propraj kreitaĵoj, la stranga konduto de abeloj rilate mortintan zorgiston ktp.

Honore al Kim Bastin, kiu forveturos al Finnlando okazis 12/7 speciala societa vespero. Kim mem provizis ravan muzikon kaj ludis por komuna kantado. S-ro Rosengren en la nomo de klubanoj esprimis bedaŭran adiaŭon, kune kun bondeziroj por vojaĝo kaj restado transmaren. S-ro H. Koppel legis artikolon el "A.E." Apr. 1960, p. 72, kiu priskribis la esperantigon de Kim, kaj fine S-ino Valda King laŭdis kaj lian lingvokapablon kaj lian muzikan talenton antaŭ

ol transdoni utilaĵojn donace de la anoj. Sekvis regala refreŝigo.

CANBERRA: Okazis denove, 15/6, Adiaŭa Vespero por nia fondo-membro kaj eksprezidanto Ralph Harry, C.B.E. antaŭ lia foriro kiel aŭstralia ambasadoro al la Germana Federacia Respubliko. La vespero plenvoloris. S-ro Harry kondukis nin unue al Belgujo — viglaj kunvenoj en Bruselo kaj Roterdamo kun paroladoj, kantadoj, impona recitado de Gogol per sonbendo. Ankaŭ al Suda Francujo kaj Vieno li kondukis nin per rakontoj. Li montris Vjetnamon per koloraj filmoj. Li i.a. menciis ke ekzistas ses E-klubo en Vjetnamo antaŭ ol li foriris.

La nova estraro de la Canberra E-Klubo konsistas el Noel Gamble, Prezidanto, Joyce Torr, Sekretario kaj Phillip Grabham, Kasisto. S-ro Grabham estas ankaŭ la Prezidanto de la Narrabundah High School E-Grupo.

S-ro Heber Petley, la AEA-Inform-Oficisto, impresis nin per sia respondo al invito sendi pk. por ekspozicio en la urbodomo de Campos (Brazilo). Ni sukcesis influu la Kanbernan Turisto-Oficejon reprodukti sian plej novan afiŝon kun E-a teksto (20 x 16 koloroj) "Esploru novan Aŭstralion en la Cefurbo Kanbero". Bela! La solvo por multaj ekspozicioj! Petu ekzemplerojn ĉe 11 Lamington St., Deakin, A.C.T., 2600, se via klubo interesigas.—Noel Gamble.

SYDNEY: 21/6: Membroj ludis "Scrabble", kun E-aj vortoj. 28/6: Nia prez-o, John Matasin, prezentis lumbildojn pri vojaĝo, kiun li faris kun Eve al Meksikio antaŭ kelke da jaroj — la bildoj estis bonaj, la temoj atentotiraj, kaj la parolado flua. Gi estas stranga lando, kun multaj indiĝenoj, eble devenuloj de la antikvaj Inkaoj. Estis ankaŭ bildoj de E-istoj en urboj, kiuj ili vizitis. W. L. Simkins, mondvojaĝanto, kiu vizitis nian landon antaŭ du-tri jaroj, estis en Meksikio je la sama tempo. Li aperis en la bildoj. Interesis nin la benado de dombestoj, birdoj ktp. antaŭ preĝejo.

5/7: Membroj legis teatraĵetojn, kaj uzis la libron de Marjorie Boulton: "Ni Aktoras". La tri skeĉoj estis verve legataj, kaj, se ni ne havas famajn aktorojn, ili estas entuziasmaj. Ni vere ĝuis la vesperon. 12/7: Ni denove ludis: "Pulĉinelon" kaj penis fari E-ajn vortojn kaj frazojn kun pli-malpli da sukceso, laŭ nia lingvoscio. Fritz Mueller-Sorau informis nin, ke E-kurso komenĉigos en la 9-a de sept. en la Central

Methodist Mission, Pitt St. Estu, ke multaj partoprenu en ĝi. — G. E. Browne. **MANLY**: 24/6 okazis ĉiusemajna kunveno en la Vespera Lernejo, Darley Road. Ĉeestis elementan, progresan kaj altgradan kursojn entute 12. La anoj prezentis (1) Teatraĵeton "Diligentaj kolegoj", C. C. Goldsmith, Kay Morrison kaj Lily Goldsmith; (2) rakonto de historio, Kay Morrison; (3) paroladeto pri la Hospitala Lernejo por infanoj de la "Royal Far West Health Scheme", Marjorie Duncan.

22/6: Ĉe la hejmo de Ruth Carruthers, speciala renkontiĝo por adiaui al Edna Giles okaze de ŝia forveturo al (a) la Universala Kongreso en Londono, (b) la Post-Kongreso en Edinburgo, (c) la feriaj kursoj en Elsinore, Danlando. Betty Cleminson organizis amuzan ludon, "Divenu la kanton filmon aŭ libron". Sekvis vespermanĝeto. Bondezirojn al Edna esprimis Robbie Robinson nome de ĉiuj.

S-ro P. E. Schwerin dankesprimis al Ruth Carruthers. 1/7 Ĉeestis elementa kurso 5 (B. Cleminson), progrese 4 (F. Cardale), altgrada 5 (C. C. Goldsmith). Poste la progresaj kaj altgradaj kursanoj ĉeestis pensinstigan prelegon de Kevin Smith pri "la uzo de 'U'".

8/7 Okazis la kutimaj kursoj. Margaret Chaldecott gvidis ludon "Pulĉinelo" (similas al Scrabble). Instruistoj, progresaj kaj altgradaj kursanoj partoprenis. Marjorie Duncan bonvenigis vizitanton, Roger Springer. Artikoloj: "Manly Daily" (2) "North Shore Times" (1).

15/7: Bonega klubprogramo 8-9 de S-ro P. E. Schwerin. Lumbildoj kaj prelego pri Nederlando (dua parto).

En sia hejmo S-ro C. C. Goldsmith gvidis novan kurson por komencantoj.—**FENIKSO**".

ESPERANTO PUBLICITY

Congratulations to Mr. H. V. Petley, whose fine article on the forthcoming World Esperanto Congress in London appeared in "The Downs Star", a local Queensland journal.

Under a four-column head and lead-in, it ran to 33 inches of well-reasoned analysis of the problems facing the world in the field of linguistic communication. A copy has been sent to Mr. Becker for display at the London Congress.

PRESERAROJ

P.136, kol. 1, 14 de sube: legu: "de la imagpovo". 138, kol. 1, oka: legu: "ie en pasinta". 134, lasta en kol. 1: "homo". 137, unua en kol. 1: "—libroj"

34-a linio: forigu "preparis". 138:8: kie en . . . ; 53: Margaret Liston. 140: 1 kol. 11: iom.

SEE COLUMN 2, PAGE 136

Here, on my heart, torn with anguish so grievously,
Rest the sweet hand of thine, girl to me dear.
Hear you not there how some Inner One's laboring,
Building for me, without ceasing, a bier?

Ah, in this heart of mine strikes he so bitterly,
Life itself flees from me; nothing remains.
Hasten, thou Inner One, finish thy laboring;
Let me to sleep for aye, freed from my pain. — F.R.B.

POEM BY HEINE

A princess came in dream to me,
Her cheeks were damp and pale.
Embraced, we sat 'neath linden tree
And breathed out love's sweet tale.

"I would not have your father's throne,
Nor sceptre of fine gold;
His crown bejewelled rest his own—
Thee only would I hold".

"Such cannot be", she said to me;
"I lie in grave below.
'Tis but at night I come to thee,
My love for thee to show".
—(Trans. F.R.B.)

Traduku ĝin Esperanten. Modela traduko aperos en la sekvanta n-ro.

TEO TABLOJDA EN 1900

Tablojdoj da teo pura, densigita. Dolĉa taso da teo preparebla en unu minuto. Tablojdoj provizas tasojn da teo bongusta kaj plaĉaroma en plej mallonga tempo. Oni povas veŝtpoŝe porti sufiĉon daablojdoj por pretigi 50 ĝis 100 tasojn da teo. Te-tablojdoj certigas pri unusama grado de forteco, pureco, perfekteco, kaj forigas malŝaron. Ili estas valorega beno al vojaĝantoj kaj turistoj, kaj ajo faciluza, monŝpara en la hejmo. Uzante ilin, oni evitas malbonajn efikojn de la ordinara teo. Skatoloj: 6 kaj 12 pencoj ĉe apotekoj. — Burroughs, Wellcome & Co., Londono.

Tiu anonco aperis en eldonajo de la jaro 1900. Alipaĝe oni legas anoncon pri trikmaŝino funkcia kun silko, katuno kaj lano.

LIBERA FORUMO

Respondi kontentige al S-ino Reed ("A.E." Jul '71) mi ne povas pro manko de kompreno. Malgraŭ ĉeesto de imponaj vortoj, la vera senco de la tuto restas por mi enigmo. Kion signifas "epoko de implikado"? Kion signifas "tempo de partoprenantaj demokratuloj"?

Nur iom nebule sin prezentas du pensoj: unu, "dividiĝo en malplimultojn" kiun ĉi lamentas, alia, por kiu ŝi pledas, ke "la A.E. povus esti la vera voĉo de nia nuntempa movado" (nur en Aŭstralio, ĉu ne?). Ni konsideru tiujn laŭvice.

Jes, ŝajnas ankaŭ al mi, ke ni "dividiĝas en malplimultojn", kaj ankaŭ mi lamentas. Eble ĉiu homo ŝatas esti korifeo, kaj starigi propran grupon. Tio en si mem estas bona, se la nova grupestro ĉiel kapablas gvidi varbitojn, sed se tio kondukos nur al dividiĝo de malnova grupo, ĉu tio ne malbone efikas?

La sperto jam montris ke kelkaj volontaj gvidantoj tro rapide kontentiĝis pri la propra scipovo, kaj baldaŭ bezonis helpon. Jam ne vizitante la malnovan grupon, ili tamen sin turnis al ties anoj por helpo en la nova grupo, dum ĉi tiuj, spite de bonvolo ne povis disponi pri sufiĉe da tempo por plene subteni ambaŭ. El la fina elekto rezultis "malplimulto" — eble malbona por ambaŭ.

Unu preteksto por dividiĝo en "malplimultojn", kiuj cetere neinstige influas al varbitoj, estas distancoj kaj vojaĝkostoj. Ĉi tiuj ekzistas bedairinde, sed ĉu ne ili gravas egale por instruantoj kaj parolantoj dezirataj el malnova grupo kiel por novuloj?

Kelkaj, ne dezirante pagi kotizon al centra klubo, tamen trovas tute natura prunteprenon de libroj aĉetitaj kaj konservataj en biblioteko dank' al kotizoj de malplimultaj fideluloj.

Unu viktimo de dividita lojaleco estis Ho! Ve! la Melburna Rendevuo, tre valora oportuno, ne nur por aŭskulti bonan E-paroladon, sed samtempe multeme informi. Pro ĉeestomanko neinstiga egale al parolantoj kaj aŭskultantoj tiu formortis. Kiu priplendas tro altan nivelon, tiu vere ne celas pliboniĝi. Por la nuna skribanto nur ĉiama studento, pli gvidbezona ol gvidkapabla, akre sentiĝas la manko de tia ekzercado. Ĉu same forvelkos ankaŭ la M.E.S., kune kun siaj plurspecaj rimedoj — propra kunvenejo, granda biblioteko, pagata telefon servo, ktp. ?? Kaj se jes, ĉu tio estos bona por nia enlanda movado?

Ni prefere aŭskultu la pledon de S-ino Reed por pli da komuna kunlaboro, tiom da grupoj kiom eblas, sed ne per divido

de ekzistantaj; kaj same ni subtenu ŝian penson ke "A.E." estu la voĉo por nia movado en Aŭstralio. Ne utilas tro multaj gazetoj, el kiuj jam aperis kaj, post 2-3 eldonoj, malaperis pluraj. Dediĉu la rimedojn kaj la pensojn por plifortigi kaj pli bonigi, kune kun via Redaktoro, la jaman organon. — Fay Koppel.

Kun miro ni legis leteron ("A.E." Julio, p. 135) en stranga Esperanto. Supermaraj (kaj lokaj) legantoj certe demandas kion signifas "epoko de implikado" aŭ "tempo de partoprenantaj demokratuloj". Kaj kiamaniere oni povas "nutri antaŭenigan kunecon"?

Nia gazeto estas tutmonde konata pro klara stilo, bona Esperanto. Pro tio eble la aŭtoro de la letero — kiu **CERTE NE** estis S-ino Reed — skribu ĝin denove en **ANGLA** lingvo, por ke ni ĉiuj komprenu! — Sam. Klubano.

Leginte la provizoran programon de la venonta nacia kongreso en "The A.E." (Junio), mi rimarkis, ke debato okazos pri: Kiel revarbu la eksepantistojn al la movado? Ĉu taugas? Ili estas ĝenerale maljunaj. Ĉu la celo pravigas la rimedojn? Ni prefere penu konduki gejunulojn en la movadon, ĉar tiamaniere oni gajnas entuziasmon kaj kontinuecon. Eble legantoj povas prezenti utile helpajn ideojn. — Ann Hearn.

TRADUKA DISKUTO . . .

Jen kelkaj provetoj. Ĉu vi konsentas pri korekteco senc-redona?

"Such conduct is immoral, if not criminal".

(1) Tia konduto estas malmorala, kaj verŝajne ankaŭ krima.

(2) Tia konduto estas malmorala, kvankam ĝi povas esti ne krima.

"Please inform the secretary if you intend to be present".

(1) Se vi intencas ĉeesti, bonvolu informi la sekretarion.

(2) Bonvolu informi la sekretarion pri tio: ĉu au ne vi intencas ĉeesti.

Pri la signifo de komo:

"I am not doing this, because I love you".

Tial ĉar mi vin amas, mi ne volas fari ĉi tion.

"I am not doing this because I love you".

Ne pro amo al vi mi faras ĉi tion.

Por eviti dusencecon ĉe la dua frazo sub (2), uzu . . . **whether** you intend . . .

RECENZOJ

"Metodiko de la Esperanto-Instruado: Gvidlibro por instruantoj, de Prof-o Rudolf Rakuša. 190 paĝoj. Eldonis Mladinska Knjiĝa, Ljubljana, en kunlaboro kun U.E.A. Prezo ne indikita.

Ĝi estas tre impresa verko laŭ ĉia aspekto: bona papero, plasta kovrilo, teknike modela. En ĝi ne troviĝas sekaj grafikaj, test-statistikoj k.s., sed trafa informo, saĝa konsilo, objektiva kritiko Ĝi allogas per vastperspektiva elrigardo, pri-fakta utilo kaj ankaŭ per flue interesa verk-metodo, kiel atestas specimenojn:

... fakuloj-lingvistoj interesiĝis pri la lingvo de iu afrika tribo, sed preterentatis, ke antaŭ iliaj okuloj kaj oreloj manifestiĝas dum E-kongresoj, en la servo de UEA delegitoj tkp. vivanta lingvo, ĉielmaniere uzata. Al tiuj homoj la instruisto . . . menciis la verkojn de lingvistoj Prof-oj B. Collinder, W. E. Collinson, G. Waringhien, E. A. Bokarev, Mario Pei k.a. kaj konsilu al ili unue lerni E-on kaj ĝian literaturon kaj nur poste kritiki".

"E-o estas relative multe pli facile ellernebla ol iu ajn alia lingvo. Tamen oni ne troigu . . . Se Zamenhof en la Fundamento Krestomatio skribas: ' . . . por ĝia ellernado sufiĉas, kelke da tagoj' oni devas klarigi tion per tio, ke estas la demando pri E-o kiel ŝlosila lingvo (v. 111/1). Se temas pri aktiva scio de E-o, de pri la povo senerare skribi kaj paroli la I. L-on, sciis ankaŭ Zamenhof bone, ke necesas serioza kaj longdaŭra studado. La 16 regulojn oni facile komprenas kaj memoras, sed la subkonscia aplikado bezonas longan praktikadon" Jes, homo povas atingi perfektan scion teoriant, tamen malhavi instinktan, aŭtomatan, subkonscian facilecon en uzado buŝa kaj skriba.

Tiuj specimenoj evidentigas, ke la verko valoras eĉ al ne-pedagogoj, precipe per sia unua parto: Specialaj Kondiĉoj kaj Problemoj, kiu pritraktas la diversajn motivojn laŭ kiuj oni lernas E-on, ekzamenas la facilecon de la Angla kaj E-o kun enketa atesto, kaj malavantaĝojn de E-instruado kaj multo alia de ĝenerala intereso.

En la dua kaj tria partoj la aŭtoro traktas pri prononco, semantiko, sinonimoj kaj parence-rilataj vortoj, ekzamenoj, korespondado, kritiko de 14 tipaj instru-metodoj kaj lernlibroj. Riĉa bibliografio kaj indekso plivalorigas la verkon.

P. 45: antigi tion. 48: duobla negacio — "neniu saĝa instruisto de E-o ne

atakos kaj malatentos la signifon de grandaj lingvoj". (?)

Pro troa laboro elĉerpiĝis la fortoj de la oferema edukisto, kiu ne ĝisvivis aperon de sia granda manlibro, sendube uzota grandskale. Ĉiu E-pedagogo devus sin turni al D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/11, Ljubljana, J. S. por informoj. Facila faro.

"Sennacieca Revuo", N-ro 99. Eld. S.A.T., Parizo. 56 paĝoj. Peranto: Volo Guelting. La lastjara prezo: \$0.75.

G. Waringhien impresas klarigas pri la kolosa tasko, kiun li kaj kolegoj sukcese plenumis, jam fine kompletiginte la Plenan Ilustritan Vortaron. Nur legadi pri tiu terura laboro estigas senton de ekstrema laciĝo, pro nerva reago. La leksikologoj ja meritas apartan benon de la dioj — neestingeblan vidpovon! Ĉi prelego estas valora suplemento al lia samtema, farita ĉe la Somera Universitato ("Esperanto", 11/70).

N. Bartlemess komentas la eventojn de 1970j., okulvagante la teron kaj konkludante per paragrafo sincere idealisma.

G. Chevrolat detale esploras Parizon, urbplane, historie, trafikisteme, domaranĝe k.c. Kompakta enciklopedieto pri tiu ĉefurbo.

C. Bruins analizas la sociajn vidpunktojn kaj teoriojn de Marks kaj Montessori. Al kio tiuj homoj alcelis dumvive? — "Socian transformon, harmonion de la kosmo". Sin direktis Marks revolucie al la proletaro; Montessori paceduke al la infanaro. Temo ne beda por ĉiu pensema pedagogo.

Laŭ starpunkto socia kaj klasinflua, S. Aarse kontribuas gravan artikolon pri Shakespeare kaj lia tempo. La aŭtoro ilustras sian tezon per similiaĵoj en la vivo de Rembrandt, Bach, Mozart, Beethoven, Berlioz. Li evidentigas fundan scion pri la nevideblaj fortoj, klasaj kaj monaj, kiuj influis sur geniulojn, kaj aparte sur la unikan dramiston de Stratford.

Poemo pri Stalin fare de E. Jevtuŝenko, tradukita de P. Poliŝĉuk en Taŝkento. Ĉu por aŭ kontraŭ Stalin? Oni bezonas komenton, por ĝin klare traduki.

P. Schwartz ride, senbride vortionglas pri la P.I.V., la hipioj, la refleksiva pronomo "sia". Liaj finaj vortoj implicas ĉesigon de lia ĝu-dona serio. Ho ve, nepre ne!

"Vortludoj": Derrick P. Faux, Charn-don, nr. Bicester, Oxon. 24 pages. 28 cents plus postage.

For years Mr. Faux has specialised in

producing booklets for Esperantist children. In his present series (*Legu Kaj Lernu*) we now have: *Vortludoj*, 22 games to be played by learners as they pause a while from more formal study, or by individuals and families at home. This is one of the simpler forms:

La grupestro anoncas 3-literan vorton. Ĉiu ludanto skribas la tri literojn kaj penas fari frazon per vortoj, kiuj komenciĝas per tiuj literoj.

TRI: Tigro ronkas ie.

AU, per 4 literoj: kaj 5:

MARO: Mi amas rozan odoron.

KANTO: Kantu al ni tre ofte.

Obtainable at above address or at B.E.A.

—Marjorie Bolton, Skribas

Pri la recenzo sur p. 123, *The A.E.*, Majon: "Pro longa poŝtista striko en Britujo mi ne povis korekti presprovaĵojn de mia libreto *NI AKTORAS*, kaj pro tio la unua eldono estas terure plena de preŝeraroj. Oni ĵus aperigis novan eldonon kun korektoj. La 'virkapro kun pernicioj' estas 'kun pernioj' (angle: chilblains), kiu havas sencon, kaj la oreloj estas ja 'tripecaj' — malĝentile. Mi nun preparas duan volumon de tiaj skeĉoj.

"Mi preskau finverkis iom testamentecan volumon de seriozaj esoj, kiuj vere espereble estos ia kontribuajo al Esperanto. Aperis en la angla, ĉe la eldonejo Macmillan, prezo 85 p., nova libro mia por lernejoj: 'Reading for Real Life', kiu enhavas diversajn aludojn al Esperanto".

(La P.I.V. difinas "pernio" per frostabceso, frostŝvelo.—Red.)

"**Komunlingva Nomaro de Eŭropaj Birdoj**": Nomenklatura Komisiono de la Ornitologia Rondo Esperantista. Eldonis Esperanto Press, 2040 Springbank Rd., Mississauga, Ontario, Canada. 68 paĝoj, 90 c.

Valora aldono al niaj fakvortaroj. Ĝi konsistas el 559 Sciencaj (kun la komunlingvaj) nomoj, kaj du indeksoj —Latina kaj E-a. R. H. Bossung antaŭparole pritaksas la provojn fari birdnomojn, jam de P. Stojan (1911) ĝis la nuno kaj starigas dek principojn laŭ kiuj oni tiucele laboru. Unu principo estas: kiom eble adapti la nomaron al la difnoj de la P.I.V.

La nomaro estas de birdoj "kiel rigardas ilin Europanoj". Papagoj, kakatuoj sekve ne trovas lokon en ĉi libreto, ĉar ili ne estas Eŭropaj birdoj; tamen bone konas ilin Eŭropanoj. Necesus dek jaroj, por ke la Komisiono serioze studu la 8600 speciojn de la

tutmonda birdaro.

La kompilaĵo certe estas helpa precepte al birdamantoj iom familiaraj kun la klasifiko de Linnaeus.

"**Jarlibro de la U.E.A., Unua Parto** 1971. La Enkonduko atentigas pri kvar gravaj eventoj: La Aŭstra Statprezidanto, D-ro Franz Jonas, flue parolis en Esperanto antaŭ la brile sukcesa Kongreso Universala en Vieno; la impreso impona landkongreso Itala sur la luksa ŝipo 'Caribia' kun ĉeesto de parlamentanoj kaj televidistoj; la Nederlanda televida akademio decidis dissendi televidan kurson de Esperanto ekde 1972; fine, apero de la Plena Ilustrita Vortaro, majstroverko leksikologia.

Unuafoje aperas nomoj de urboj (5) en la Germana Demokratia Respubliko, en kiuj jam troviĝas delegitoj. Rekordan nombron da landoj aligintaj la U.E.A. atingis, tamen ankoraŭ mankas la bezonata nombro da individuaj membroj—10.000—parte pro devizaj malfaciloj, sed, vee, ankaŭ parte pro indiferenteco de multaj E-istoj ankoraŭ ne konsciaj pri sia morala devo aliĝi al la tegmenta organizajo. La U.E.A. estas la ŝilda fronto de la mondmovado, kies tasko kaj celo estas: oficiale kaj publike prezenti Esperanton al la tuta tero. Ju pli granda ĝia membroforto, ĝia financa firmeco, des pli granda ĝia kapablo impresi kaj favoriĝi la publikon ĉe ĉiu nivelo.

Nova fotopreso donas malpli grandan literaron, kaj ne aperas multa teksto de *Jarlibro* 1970 (510 paĝoj); la nuna havas 336—nepre uzendajn de ĉiu aktiva E-isto.

VOĈO EL HUNGARUJO

The Australian Esperantist estas modesta gazeto . . . sed en ĉiu numero oni trovas ion interesan . . . La kritiko pri Norda Prismo (6/70) estas riĉa de rimarkoj indaj je serioza konsidero, ĉu pozitive, ĉu negative . . . Oni devas vere aplaŭdi pri la lasta frazo de la recenzo: "Hungara Vivo", N-ro 1, 1971.

"**History of Morwell High School**", vol. 6, 1970 and 1960. by the principal, I. T. Maddern. A fine 55-page (10 x 8) publication on glaze paper, richly illustrated with photos. Seven pages are given to Esperanto. Mr. B. E. Hirstgood; Mesdames S. Brown, S. M. Doherty, R. Y. Zwankhuizen and I. McLaren staff members, conduct the Esperanto classes.

Esperanto is accepted by the Examination Board as an "approved activity"—a subject for Leaving Certificate. At

various levels — Forms 1 to 5 — 300 out of 900 students took the language. In three classes at the Leaving Certificate level, approximately 70 students sat, and all passed.

The school has group-letter correspondence with Esperantists in 30 countries.

PIKA REPLIKO

Fama esploristo prelegis ĉe la Brita Muzeo pri sia laboro en Mongolujo. Li uzis la terminon: Gobia Dezerto. Post la prelego la muzea direktoro diris al li: "Sed, doktoro, estas pleonasme, uzi la vortojn 'Gobia Dezerto', ĉar la nomo Gobio mem signifas: dezerto en la Mongola lingvo".

"Ja vere", respondis la esploristo; "vi kaj mi tion scias. Tamen tre malmultaj el la aŭskultintoj scias la Mongolan lingvon, tial mi preferas paroli en lingvo, kiun ili komprenas".

ORDONA Ŝ-SONO

Vizitanta negocisto en Sudafrika urbo estis ĝenata de negrinoj, kiuj babiladis Bantulingve ekster lia oficeja fenestro. Ne sciante ilian lingvon, li ordonis al iu iri al ili kaj Bantue ilin kvietigi. Bantua servisto obeis. Li kvietigis la negrinoj per simpla: Ŝ-ŝ-ŝ.

PIV-PAVOJ

Schwartz komike nomas PIV-pavoj fierajn posedantojn de la giganta vortaro. Tiuj elituloj — kontraŭ elspezo 26-dolara — povas paradi inter la vulgara kokinaro, kiel tiu majeste impona birdo.

EDZOJ, ATENTU!

Neniam kritiku vian edzinon pro ŝiaj karakteraj mankoj. Povas esti, ke ĝuste pro tiuj malperfektaĵoj ŝi ne sukcesis trovi pli bonan edzon.

KORESPONDADO

Italaj E-amikoj, kaj ankaŭ parapsikologoj, serĉas interŝanĝon de leteroj k.c. Prof-o C. Cerri-Calzoni, Casella Postale 159 - 13051, Biella, Italy.

AL MIA KATO (M. Boulton)

Tra la salono vi jus pasis, sed vi ne estas hermetika, vi flakon sub divano lasis. Konfesu do, fi, kato lika!

LA VIA LA GRANDA . . .

Du versoj de Louis Genin ("Ho ve", poemo en "Belga E-isto", 1950).

"La agrablono de la via kareso . . . kaj la viajn la okulojn mi rigardis . . ." Estas precedentoj: "la malsaĝeco via la grandega" (Hamleto, 26/17); "la patro la mortina" (13/6 samverke).

La demando pri tiu duobligo de la artikolo (Rondo, 1/51) ne havis eĥon de lingvemuloj. Post studeto oni atingas konkludon, ke Zamenhof kaj eventuale Genin influigis de la Greka. Zamenhof bone sciis la Grekan: gimnazie — "Greka lingvo 5".

En la Novtestamenta Greka la difinita artikolo estas okaze ripetita post la substantivo, por enkonduki atribua(j)n vorto(j)n. La efiko estas iom enfaza: "en la teron la bonan": Luko 8/8.

"la paŝtisto de la ŝafoj la granda": Hebreoj 13/20.

"la patro via la en la ĉielo": Mateo 5/16.

"la korto la ekstera": Apokalipso 11/2.

"la Dio la farinta la mondon": (Agoj 17/24.

Ci-rilate rimarkinda estas uzo (Fundamenta Krestomatio, 402, 9-a eldono) "tra ĉielaj tra speguloj . . ." Sen komento en la 17-a eldono (1954).

Kiel en la Greka; tiel ankaŭ en E-o, oni povas post "la" kvazaŭ substantivigi adjektivon aŭ particon, jene: "Kiu estas la perfidanta vin?": Johano 21/20. "la loĝanta en la ĉielo" (Psa. 2/4); "ĝi estas la prezentanta la plej . . ." (Kotzin, "Historio de Ido", p. 34); "Ha, la senhonta!" (Marta 233); "la grava estas liveri . . ." ("Lingvo kaj Vivo", p. 280). F.R.B.

Cefjuriano: Ni trovas, via juĝista moŝto, ke la akuzito estas senkulpa.

Juĝisto: Kian nekompreneblan motivon vi povas proponi por tia surpriza verdikto?

Cefjuriano: Ni trovas, via juĝista moŝto.

Juĝisto: Ĉu vere! Ĉu ĉiuj dek du el vi?

Plumamikoj Aŭstralaj, skribu al S-ro Adr. v.d. Hoeven Sr., P.B. 9751, Den Haag, 2078, Holland. Respondo garantiata!

TRANSLATION COURSE

For the more advanced student. 11 numbers a year. \$2. — Editor.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 99 (179)

MELBURNO

Septembro, 1971



Congress Fee for A.E.A. members: \$6 dol. For others 7 dol. Non-attending members: \$2.50. Send your room reservation (5 dol. deposit) and Congress Fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

8th List of Congress Members

113. Mrs. Herta Koppel, Oakleigh, Vic.
114. Mr. M. Fordham, Chadstone, Vic.
115. Mrs. M. Fordham, Chadstone, Vic.
116. Mr. L. C. Willis, Burwood, N.S.W.
117. Mrs. E. Ashdown, Moe, Vic.
118. Mr. Stan Ling, Warburton, Vic.
119. Mr. J. Ryding, Sandringham, Vic.
120. Mr. N. Brodie, Bexley North, N.S.W.
121. Mrs. B. Cleminson, Harbord, N.S.W.
122. Mrs. B. Forrest, Narrabeen, N.S.W.
123. Miss C. M. Morris, Melbourne, Vic.
124. Mr. D. J. Horrocks, Vacluse, N.S.W.
125. Mrs. Lena Buchan, Toowoomba, Q'ld.

On 1 July 1971 the State Distribution was as follows: Vic. 68, N.S.W. 32, Q'ld. 12, W.A. 7, S.A. 3, A.C.T. 2, Tas. 1.

You may win a prize: This month's winner of a Book Prize is No. 125: Mrs. Lena Buchan of Toowoomba, Q'ld. She

will receive it during the Welcoming Evening (Sunday, 2 Jan. 1972). If your Congress number is 140 you too will receive a valuable Book Prize; so hurry with your enrolment.

Karavano al la Melburna Kongreso

Kvinslandanoj kaj membroj el Nov-Suda Kimrujo, kiuj deziras akiri rabaton per komuna vojaĝo, fluge aŭ fervoje, de Sidnejo al Melburno, **TUJ** kontaktu S-ron C. C. Goldsmith, P.O. Box 415, Manly, 2095, kiu organizos karavanon.

Stipendioj por lernejanoj

Anonima donacinto disponigis stipendiojn por la plej bonaj E-lernantoj en aŭstralaj lernejoj. Tiuj stipendioj valoras proks. po \$80 kaj konsistas el senkosta semajna vizito al Melburno por partopreni la 18-an Aŭstralia E-Kongreson.

La unuaj 3 stipendioj estis ĵus aljuĝitaj al 3 studentoj de la Morwell High School. Iliaj nomoj estas David Cafiso, John Fluit kaj Kelvin Pattle.

A.E.A. OFFICIAL NOTICES

14th August, 1971

New Individual Members

Walter, Mrs. F. N., Canterbury, Vic.
Gash, Mrs. A., Mona Vale, N.S.W.
De Mille, Mrs. G. D. P., Redcliffe, Qld.
Kunze, Mr. S., Burpengary, Qld.
Dixon, Mr. F. C., Ballarat East, Vic.
Allen, Mrs. J., Mylestom, N.S.W.
Cameron, Mrs. R., Mylestom, N.S.W.
Clarke, Mrs. U., Mylestom, N.S.W.

Publicity Fund

Previously acknowledged \$965.41
Strickland, Mrs. E., N.S.W. 2.00

Ryding, Mr. J., Vic.	2.00
Koppel, Mr. H., Vic.	1.02
	\$970.43

Sincere thanks to all helpers.

Interstate Competition Positions on 14th August 1971

	Quota	Points	%
Queensland	130	880	676.9
Victoria	300	1267	422.3
N.S.W. - - A.C.T.	260	1082	416.1
W. Australia	80	244	305.0
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	57	142.5

November draws nigh with the end of this competition, and we hope to announce the final figures during the Congress in Melbourne. You can boost your State in any of the following ways.

Points allotted

New Individual Member	5
New Life Member	50
Popular Course enrolment	2
Intermediate Course enrolment	5
Advanced Course enrolment	10
Elementary Examination success	2
Intermediate Examination success	5
"Klereca" Examination success	10
Each \$1 to the Publicity Fund	1

C. C. Goldsmith, Secretary.

AUSTRALIA KRONIKO

Klubraportistoj bonvole sendu viajn raportojn ĝis la 15-a de la monato al la A.E.A. Vic-Sekretario, 41 Byfield Street, Reservoir, Vic., 3073.

PERTH: Je la julia monatkunveno ĉe Nedlands S-ro Howard estris. Ekzercado pri E-prononco. Precipe li pritraktis la vokalojn, avertante pri inklino uzi la nacilingvan prononcon. La ĉeestantoj vigle kaj voĉe sin ekzercis pri la ĝusta prononco; ofte la provojn interrompis admono kaj korekto. Sekvis listo da vortoj elektitaj de la estro, kiujn grupanoj devis skribi en frazoj kaj vice voĉlegi. La ĉefa celo de la Ligo estas, ke dum kunvenoj ĉiu partoprenas.

28/7: Kunveno en Suda Perto. Malfermis ĝin la prez-o, kiu traktis pri la korelativoj. Ĉeestantoj skribe tradukis anglajn frazojn en kiu oni uzas E-korelativojn. Poste, por ekzerci la voĉon kaj la orelojn, ĉiu partoprenis amuzajn teatrajn legadojn, kies spiritojn la oreloj facile kaptis. Ĉe la hejmo de F-inoj Longson grupanoj vice legis E-e kaj poste tradukis anglan. — G. Pollard.

BRISBANE: 14/7: La Brisbanaj E-istoj dividigis en du grupojn. Je tiu vespero komenciĝis nia jarmeza lernejo por nov-

lernantoj ĉe 271 North Quay—plaĉa loko kie nia prez-o, Karl Gunster, bonvenigis 25 personojn. Ili lernas sub gvido de Joy Kennedy, Hans Brendel kaj Val Robinson ĉiumerkrede. Ĉiulunde ĉe nia klubejo, Martin Chambers, Roma St., Nel Callaghan, Beverley Allatt kaj Mal Robinson instruas la altgradajn anojn ĝis la 9-a vespere (21-a horo eŭrope), kiam ĉiuj arigas por kaŝtrinki kaj komune aktivi.

S-ro Arthur Deutscher, lingva instruisto ĉe la Brisbana Gramatika Lernejo porknaba, jam instruas tie klason de 25 knaboj. Varma entuziasmo ekzistas inter ili — kio estas komprenebla, kiam iu kiel Arthur instruas. Lia intereso pri E-o inspiras al ĉiuj.

Ceestis nian junian piknikon 20 membroj kun siaj familioj. Du vortkonkursoj tenis la intereson de la anoj, kiuj ĝuis felicajn tagojn kune kun la grupoj de Redcliffe kaj Caloundra.

Plaĉas al ni, ke Kvinlandon reprezentis ĉe la Universala Kongreso en Londono S-ino Win Greenhalgh kaj Ges-roj Clarke. Proksimume samtempe S-ino Nel Callaghan partoprenis la Japanan Kongreson en Tokio. Per sonbendo ŝi portis al tiu grava okazo voĉojn de Brisbanaj E-istoj parolantaj pri nia ĉefurbo kaj nia vivmaniero. — Val Robinson.

MELBOURNE: Ĉe la Societa Vespero de 26/7 S-ro H. Koppel klarigis la gravecon por Esperanto-Redaktoro ricevi interŝanĝe eksterlandajn gazetojn, el kiuj li ĉerpas eksterlandajn novaĵojn kaj opiniojn. Poste li montris ekzemplerojn kaj mallonge parolis pri multaj. Je 2/8 la klubanoj legis laŭvice artikolojn el diversaj eksterlandaj E-gazetoj; interesa kaj amuza sperto. Je 9/8 F-ino Ann Hearn ĉe la nigra tabulo gvidis Ekzercaron, kiun ŝi nomis "Negbula Frazkonstruado".

Manke de horloĝo S-ro Arnold Baldwin tamen povos respondi al la demando "Kioma horo estas?". Je 16/8, post mallonga disertacio rilate la konsiston de tempo kaj spaco mem, kaj ties dividigo laŭ unuoj (horoj, minutoj, sekundoj), li klarigis kiel konstrui sunhorloĝon helpe de peco da ŝnureto kaj gnomono.

Eastern Suburbs (Melbourne) Pluraj membroj de nia klubo ricevis leterojn kaj bild-poŝtkartojn de Jack kaj Ivy Fallu, nuntempe en Eŭropo. Ili renkontis en Londono alian membron de nia grupo, S-inon Margaret Casey. Ges-roj Fallu partoprenis la internaciajn feriajn E-kursojn en Helsingo en Julio kaj post vizitoj al Berlino kaj Bruselo partoprenis kursmajnon en la franca kultura E-domo Kastelo Gresillon.

Ni jam elektis nian teatraĵon por la Drama Festivalo ĉe nia venonta kongreso: "La Aventuroj de Don Juano" de la konata aŭtorino Zora Heide.

BORONIA (Vik.) Ni ricevis 2 bildpoŝtkartojn de niaj mondvojaĝantoj Gesroj G Kuhlman, unu el Hongkongo kaj la alian el Moskvo, post vojaĝo per la Trans-Siberia Fervojo, dum kiu ili ĝuis agrable varman veteron dum la tuta vojaĝo.

Spite de malvarma vetero ni havis bonan ĉeeston ĉe niaj kunvenoj kaj eĉ akiris novajn membrojn. — Ivan Heldzingen.

MORWELL (Vik.) 29/7 ni ĝuis sonbendon kaj diapozitivajn senditajn al ni de Esperanto-Klubo en Avignon, Francujo La E-grupo en ĉi tiu fama franca urbo kompilis interesan kaj informriĉan programon.

SYDNEY: 19/7 David Gould montris lumbildojn de sia vojaĝo de "Taĝ-Mahalo al Tamizo". De Hindujo li flugis al Kabulo, kaj de tie al Irano. Vojaĝante, li amikiĝis kun S-ro Bahman de Isafano, en Irano, kaj ankoraŭ korespondas kun li. Bilde li ilustris siajn spertojn kaj strangajn vidojn, kies daŭrigo ni esper-atendas.

26/7: Frank Dunn parolis pri la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Li trovis en ĝi iom da eraroj, neeviteblaj en tia grandega libro. Pri traduko de nomoj, urbaj, landaj kaj personaj li konsentis, ke tio estas malfacila problemo, sed konsideris ĝin jam nun nepre solvenda.

Plezure ni legis, ke ĉe Morwell School (Vik.) E-o estas nun objekto por "Leaving Certificate". Tio okazu ankaŭ en Nov-Sudkimrujo! (Vidu: The A.E., aŭgusta n-ro. — Red.)

2/8: Volo Guelting parolis pri "logio", kiel en: "astrologio", kaj atentotene, sed eble ne konvinke, traktis pri "numerologio".

9/8: Lumbilde Victor Bourlin plurakontis pri sia veturo tra Gobio por atingi Pekinon en 1927. Vivece li priskribis la vivmedion kaj -manierojn de la dezertanoj.

Ni esprimis "bonan vojaĝon" al Roger Nightingill, kiu iras Japanujon por 3-4 monatoj.

Margaret Chaldecott aperos en Programo "Temptation" Channel 7, jam registrita, 16-9-71 (au poste), 1-30 ĝis 2.00 p.t.m. Antaŭ la komenco de la "Quiz", kiam ŝi respondis al demandoj ŝi faris rimarkojn pri Esperanto.—G. E. Browne.

MANLY: Ĉiujaude en la Vespera Lernejo, Darley Rd., okazas 3 E-kursoj kaj kluba programo. 22/7: anoj prezentis rakontojn kaj deklamojn. 29/7: S-ro G.

Thatcher sonbende aŭdigis salutvortojn de kelkaj membroj, kiuj parolis per la "rondira bendo". Poste: bonega surbendigita parolado de S-ro Ralph Harry. 5/8: S-ro R. G. Robertson, M.E., M.A., M.I.Mech.E., supera lekcisto ĉe la Universitato Nov-Sudkimruja, prelegis: "La Povumo de la Suno". Desegne kaj lumbilde li priskribis metodojn por utiligi la sun-energion. Kongresanoj, nepre ĉeestu tiun saman prelegon en la Univ. Melburna en Januaro! 12/8: S-ro Thatcher aŭdigis Tutaŭstralian rondiran sonbendon.

Invitite, niaj anoj S-inoj Liston, Baxter kaj Duncan ĉeestis publikan kunvenon por diskuti starigon de Arta kaj Kultura Centro por Manly. Ĉeestis 72 personoj. Reprezentiĝis 21 kulturaj organizaĵoj. Elektiĝis kunordiga komitato, kiu klopodos antaŭenigi la celojn de la aliĝontaj societoj — inter ili certe la Manly Esperanto-Klubo. — Marjorie Duncan.

DRAMA TROFEO

Karaj Gemembroj,

Estas mia privilegio kiel via prezidanto, kaj mia granda plezuro kiel membro de nia aŭstralia asocio, fari gravan anoncon.

Estas donacita al nia asocio valora kaj bela trofeo, por kiu konkurso la diversaj grupoj ĉe la venonta kongreso en Melburno.



Donacis ĝin unu el la plej aktivaj kaj sindonemaj esperantistoj en Aŭstralio, S-ro Herbert Koppel. Li sugestis, ke ni nomu ĝin la A.E.A. Dramo-Trofeo, sed pli taŭge ni nomu ĝin la Herbert Koppel Dramo-Trofeo de A.E.A.

Ĉiu grupo esperantista en Aŭstralio rajtas partopreni per unu teatraĵo, kiu ne estu pli longa ol dudek minutoj, kaj prezenti ĝin ĉe la venonta kongreso, sed ĉiu partoprenonta grupo devas anonci sin ĉe la Kongresa Sekretario ĝis la 31-a de Oktobro. La gajninto tenos la belan trofeon ĝis la venonta kongreso.

Ni estas ĉiuj tre dankemaj al Herbert Koppel pro lia malavara donaco, sed ni povas plej bone montri tiun dankemon per amasa partopreno en la konkurso—Via prezidanto, K. G. Linton.

W. J. SCARFE

With regret we have learned of the death of our member, who passed away on 19 June from a coronary. His home was in Dimboola (9 Acacia St.). Our sympathy goes out to his wife and family.

GRAVA LETERO DE LA PREZIDANTO

Karaj Gemembroj,

Sube estas ekzemplero de proponita nova statuto por nia Asocio.

Ĉi tiu revizio estas farita laŭ decido de la kongreso en Manly en Januaro 1968, do estas tre grave, ke ĉiu membro bone pripensu ĝin. La plej gravaj ŝanĝoj estas en paragrafoj 11, 19, kaj 31, kaj estas planitaj por korekti tiujn mankojn kaj neperfektaĵojn, kiuj malkovriĝis ĉe tiu kongreso. La afero estis jam longe konsiderata far la Estraro, kiu fine nun ĝin prezentas al vi.

Vi rimarkos en paragrafo 31, ke por ŝanĝo de nia statuto estas necese, ke voĉdonu almenaŭ triono de la membraro; do mi nun petas al ĉiu membro, kiu ne povos ĉeesti la kongreson en Melburno, ke li registru sian voĉon, donante leteron al samklubano aŭ alia membro, kiu intencas ĉeesti, por ke tiu prezentu la leteron, kaj tiel certigi pri la registro de la voĉo kaj ebligi la ŝanĝon de la statuto.

Jam estas forpasintaj kvar jaroj inter Manly kaj Melburno, kaj ni certe ne deziras atendi pluajn du jarojn nur pro manko de voĉoj; do aranĝu la aferon antaŭ ol forgesi tian gravan aferon.

Sincere instigas vin,

via prezidanto, Ken. G. Linton.

STATUTO de la AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

I. ĜENERALAJ PRINCIPŬOJ

1. **Nomo.** La nomo de la Asocio estas 'Aŭstralia Esperanto-Asocio'.
2. **Konsisto.** La Asocio konsistas el individuaj membroj kaj aliĝintaj Esperantistaj organizadoj.
3. **Celoj.** La celoj de la Asocio estas:
 - (a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo, Esperanto;
 - (b) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvigi ĉe ili komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj;
 - (c) zorgi pri la kunagado de Esperantistaj organizadoj;
 - (ĉ) okazigi tutlandajn kongresojn kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn.
4. **Neŭtraleco.** La Asocio estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, partipolitiko, kaj sociaj problemoj. En ĝi viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteblaj por ĉiuj oficoj.
5. **Lingvo.** La oficiala lingvo de la Asocio estas la Zamenhofa lingvo, Esperanto, tia kia ĝi estas difnita per sia fundamento kaj per sia verkaro.
6. **Administra Jaro.** La administra jaro estas la kalendara jaro.
7. **Oficdaŭro.** Ĉiuj nepagataj oficoj daŭras du jarojn. La ofico-havantoj estas reelekteblaj.
8. **Respondeco.** Pri la agoj de siaj oficistoj kaj reprezentantoj la Asocio estas respondeca nur se ili agas laŭ siaj kompetentecoj.
9. **Sidejo.** La sidejo de la Asocio estas la urbo kie loĝas la sekretario.

II. MEMBRECO

10. **Membro-kategorioj.** La kategorioj de membreco estas:
 - (a) honoraj membroj laŭ decido de Ĝenerala Kunveno;
 - (b) ordinaraj, subtenantaj, kaj dumvivaj membroj akceptitaj de la Estraro. Dumvivaj membroj pagas dudekoblan kotizon de ordinara membro;
 - (c) asociaj membroj, kiuj pagas pli malaltan kotizon kaj ne ricevas la gazeton;
 - (ĉ) familiaj membroj, kiuj pagas pli malaltan kotizon, ĉar jam estas en la familio membro kiu ricevas la gazeton;
 - (d) junulaj membroj, aĝo malpli ol 18 jarojn, kiuj pagas pli malaltan kotizon. Decidojn pri akcepto de membroj, kun la escepto de honoraj membroj, faras la Estraro. Malakcepto ne bezonas klarigon fare de la Estraro. Asociaj, familiaj, kaj junulaj membroj ne havas voĉdonrajton.

11. **Aliĝintaj Organizaĵoj.** Ĉiu aŭstralia organizaĵo esperantista povas aliĝi al la Asocio, se ĝi enhavas almenaŭ sep membrojn, estas laŭorde organizita, kaj estas neŭtrala laŭ la senco de paragrafo 4. Decidojn pri akcepto de organizaĵo faras la Estraro. Ĉiu organizaĵo kiu deziras aliĝi devas sendi al la sekretario ekzempleron de sia regularo kaj liston de ofichavantoj kaj membroj kune kun la filia pago. Ĉiujare, en la sama monato, aliĝinta organizaĵo sendas al la sekretario novan liston kune kun la filia pago por tiu jaro.
12. **Kotizoj.** Pri la jarkotizo de la diversaj kategorioj de membreco, de la grupoj kaj federacioj, decidas Generala Kunveno.
13. **Eksiĝo.** Membro aŭ organizaĵo kiu dum la kuranta jaro, malgraŭ averto, ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksiĝinta. Tamen la Estraro povas decidi, ke membro kiu havas respektindan kaŭzon por nepago, restas membro sen voĉdonrajto.
14. **Eksigo.** Membro, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de la Asocio, aŭ ties decidojn, povas esti eksiĝata, post esplorado de la kazo. Decidojn pri eksigo faras la Estraro. Protestojn pri decido de la Generala Kunveno. Eksigo de organizaĵo bezonas la decidon de la Generala Kunveno aŭ la unuaniman decidon de la Estraro.

111. GENERALAJ KUNVENOJ

15. **Ordinaraĵ kaj Specialaj Kunvenoj.** Almenaŭ unufoje en ĉiu du jaroj okazas ordinara ĝenerala kunveno de la Asocio por aŭskulti kaj eventuale diskuti la raportojn de la Estraro, por decidi pri la venonta agadmaniero kaj kotizoj de la Asocio, por elekti la oficistojn kaj Estraron por la venonta dujara periodo, kaj por elekti, se necesas, specialajn komisionojn. Se triono de la membroj skribe petas specialan ĝeneralan kunvenon, la sekretario aŭ alia estrarano aranĝas tion.
16. **Anoncoj.** La sekretario anoncas en la oficiala organo, almenaŭ tri monatojn antaŭe, la daton kaj lokon de la ordinara Ĝenerala Kunveno. Ĝi okazas kutime en la kadro de tutlanda Kongreso.
17. **Tagordo.** La sekretario anoncas almenaŭ unu monaton antaŭe la provizoran tagordon de la kunveno. La tagordo de ordinara kunveno almenaŭ inkluzivas: prezenton kaj aprobon de la jarraporto kaj financa raporto de la Asocio, elekton de Estraro, diversajn proponojn kaj demandojn skribe proponitajn de aliĝinta organizaĵo, aŭ du aŭ pli da membroj.
18. **Debato.** La Prezidanto aŭ Vicprezidanto, aŭ estrarano nomita tiucele de la Prezidanto, prezidas ĉiun sesion de Ĝenerala Kunveno. Li certigas, ke la debato estas konforma al ĉi tiu statuto, kaj rajtas insisti ke parolantoj limigu sin al la eroj de la tagordo.
19. **Decidoj.** Kunsidoj de Ĝenerala Kunveno validas se ĉeestas almenaŭ dudek membroj. Membro kiu ne povas ĉeesti Ĝeneralan Kunvenon rajtas skribe nomi alian membron kiu reprezentu lin. Decidoj estas farataj per simpla plimulto de voĉoj kun la escepto de decidoj pri:
 - (a) la kapitalo de la Asocio;
 - (b) aliĝo al internaciaj organizaĵoj;
 - (c) pago de salajro al ofichavanto;

por kiuj du trionoj de ĉeestantoj devas voĉdoni por la rezolucio, kaj la ĉeestanto devas reprezentu almenaŭ trionon de la tuta membraro.
 - (ĉ) ŝanĝo de la Statuto (vidu sub paragrafo 31).

IV. ESTRARO

20. **Konsisto.** La Estraro konsistas el
 - (a) Prezidanto, du Vic-Prezidantoj, Sekretario, Vic-Sekretario, kaj Kasisto, elektitaj individue.

Tri membroj en kategorioj 10a aŭ 10b rajtas skribe proponi membron el tiuj kategorioj por ofico, kaj devas sendi la proponon (kun la skribita konsento de la proponato) al la Sekretario plej malfrue du monatojn antaŭ la Ĝenerala Kunveno.
 - (b) Post la Kongreso la Estraro akceptos po unu plua estrarano proponita de ĉiu Stato (pere de Federacio se tio ekzistas).

En kazo de eksiĝo de estrarano la Estraro rajtas elekti anstataŭanton por la periodo restanta ĝis novaj elektoj.

21. **Kompetencoj.** La Estraro plenumas la decidojn de la Generala Kunveno, gvidas la aferojn de la Asocio, kreas kaj administras servojn kaj aranĝojn konforme al la celoj de la Asocio kaj la decidoj de la Generala Kunveno. Ĝi ankaŭ interrilatas kun eksterlandaj kaj tutmondaj organizaĵoj. La estrarkunsidoj validas se partoprenas almenaŭ tri estraranoj. La protokolo de ĉiu kunsido estas sendata al ĉiu estrarano, kune kun anonco pri la venonta kunsido.
22. **Prezidanto.** La Prezidanto reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Generalan Kunvenon, kunvokas kaj prezidas la estrarkunsidojn, kaj malfermas la Tutlandajn Kongresojn. Lia voĉo decidas en kazo de voĉegaleco. Se li ne povas ĉeesti kunvenon li nomas Vic-Prezidanton aŭ, se nek unu nek alia Vic-Prezidanto ĉeestos, alian estraranon por prezidi.
23. **Sekretario.** La Sekretario administras ĉiujn devojn kutimajn en tiu ofico. Li kontrolas la membrolistojn, la korespondadon, aranĝon de kunvenoj, kaj prezentas raporton ĉe la Generala Kunveno.
24. **Kasisto.** La Kasisto ricevas ĉiujn monojn destinitajn al la Asocio aŭ rekte aŭ de la Sekretario, pagas la aprobitajn ŝuldojn, kaj tenas ĝustajn kontojn pri la elspezoj kaj enspezoj de la Asocio.
25. **Komisioj.** Por esplori iujn problemojn aŭ por plenumo de difinita tasko la Generala Kunveno aŭ la Estraro rajtas elekti ekster aŭ inter si reprezentantojn aŭ specialajn komisionojn por la daŭro de la tasko komisiita al ili.
26. **Gazeto.** La Asocio eldonas propran gazeton, kiu servas ankaŭ kiel oficiala informilo. La redaktoron aŭ redakcian komitaton nomas la Estraro, inter aŭ ekster si.
27. **Biblioteko.** La Asocio organizas bibliotekon de libroj, gazetoj, filmoj, sonbendoj, kaj eldonaĵoj. Ĝi servas al ĉiu membro de la Asocio. La Estraro decidas pri la bibliotekisto kaj pri kondiĉoj de uzo.
28. **Libroservo.** La Asocio organizas libroservon por la tuta lando. La Estraro nomas la Administranton. Filiigita grupo rajtas nomi peranton, kiu organizas la mendojn de sia grupo per rekta korespondo kun la administranto. Nur filiigita grupo rajtas ricevi rabaton.

VI. FINANCOJ.

29. **Administrado.** La Kasisto administras ĉiujn monaferojn de la Asocio, kun escepto de la kapitalo, kaj publikigas la jarbilancojn.
30. **Kapitalo.** La kotizoj de dumvivaj membroj, ĝeneralaĵaj donacoj superantaj sumon fiksitajn de Generala Kunveno, kaj heredadoj, formas la asocian kapitalon, kaj estas daŭre posedataj de kuratoroj elektitaj de Generala Kunveno, kiu rajtas elekti, se necese, apartajn kuratorojn por fondusoj kun apartaj celoj. Generala Kunveno difinas la kondiĉojn laŭ kiuj la kuratoroj posedas proprajn.

VII. ŜANĜO DE LA STATUTO KAJ DISSOLVO

31. **Ŝanĝo.** Ĉi tiu Statuto povas esti ŝanĝata nur
 - (a) de Generala Kunveno kondiĉe, ke du trionoj de ĉeestantoj voĉdonu por la ŝanĝoj, kaj ke la ĉeestantaro reprezentu almenaŭ trionon de la membraro;
 - (b) post diskuto en Generala Kunveno, per Generala voĉdono en kiu la voĉdoniloj estas senditaj poŝte al ĉiu membro, kondiĉe ke voĉoj (kalkulitaj 90 tagojn post la dissendo) estas ricevitaj el almenaŭ duono de la tuta membraro kaj almenaŭ du trionoj de la voĉoj estas por la ŝanĝo.
 En ambaŭ kazoj la membroj devas esti informitaj pri la proponataj ŝanĝoj almenaŭ tri monatojn antaŭ la voĉdono.
32. **Dissolvo.** Libervola dissolvo de la Asocio povas okazi, nur observante la kondiĉojn de paragrafo 31a de ĉi tiu Statuto. La restanta havaĵo estos deponata tri jarojn favore al Esperantistoj, kiuj intencas fondi similan asocion. Se tio ne okazas, la havaĵo estos donacata al alia Esperanto-organizaĵo, kiun indikas la decido pri dissolvo.

ANSTATAŬILO

donota al membro kiu ĉeestis la ĝeneralan kunvenon, aŭ sendota al la sekretario plej malfrue la 15an de Decembro 1971.

I, of
 being a member of the Australian Esperanto Association, hereby appoint
 of
 as my proxy to vote for me at the Meeting discussing the revision of the
 Association's Statutes. This to be used in favour of/against the proposals.

Signature.

KARAJ MEMBROJ: U.E.A.

Je ĉi tiu tempo lastan jaron mi petis ĉiujn pagi la kotizon frue, ĉar mi intencis vojaĝi eksterlanden kun la edzino, kaj mi elkore dankas ĉiujn pro la maniero laŭ kiu ili tiel bonege plenumis mian deziron.

Tamen, kiel multaj jam scias, tiu vojaĝo ne povis okazi pro akcidento al mia edzino. Mi povas nun raportti, ke ŝi estas plene resaniĝinta, kaj mi intencas foriri tuj post la kongreso.

Do mi devas denove peti, ke vi sendu viajn kotizojn frue. Efektive tio estas eĉ pli grava ol en la lasta jaro, ĉar pro la kongresaj devoj mi ne povas dediĉi tiel multe da tempo al U.E.A.-aferoj en Decembro, kaj do multaj kotizoj ricevitaj post Novembro devos atendi ĝis Pasko. Mi antaŭdankas vin.—Ken G. Linton, ĉefdelegito de U.E.A.

OUR PUBLICITY. PAGE 144

Mr. Petley wishes it known that he disclaims credit for the article in the newspaper. It is an English translation made by Dr. Lapenna, the author of the article. Mr. Petley obtained it by airmail. Credit, however, is his for the praiseworthy initiative which resulted in its appearance in the "Downs Star".

RAPORTO EL LONDONO

Pri la 56-a Universala Kongreso en Londono: Petite de S-ro Linton reprezenti Aŭstralion, mi akceptis la honoron, kaj je la inaŭgura kunveno (1/8) ĉe la fama Festival Hall mi sidis sur la estrado kun salutantoj el 40 landoj antaŭ ĉ. 2,500 homoj. Estis majesta kunveno, kun multaj homoj de ambasadora rango. Oni aŭdis nur la E-an lingvon, kaj estas malfacile esprimi la miregon, kiun mi sentis dum mi parolis al tiom tre multaj personoj, bone sciante, ke ĉiuj komprenas, ke mi portas saluton de bonvolo el Aŭstralio.

La kongreso daŭris unu semajnon. Estis prelegoj, debatoj, koncertoj, filmoj, teatraĵoj, ekskursoj, bankedo kaj balo, kaj akcepto per la Lordurbestro Londona. Oni povis laŭplaĉe alesti tiun al alian aferon; ĉie oni trovis homojn el multaj nacioj — fierajn pri sia propra lando, sed eĉ pli fierajn ĉar ili povis komuniki. La paroladoj ne estis formalaj aŭ malfacilaj. Flue, senĝene la grupoj diskutis siajn proprajn aktivecojn kaj interŝanĝis ideojn. Mia edzo kaj mi renkontis amikojn el Aŭstralio: Ges-rojn Greenhalgh, S-ron Cocking, S-inon Giles, S-inon Taylor, kaj S-inon Joko Issobe kun ŝia filino.

Dum la maturuloj partoprenis sian kongreson en Londono, Infan-kongreso okazis ĉe la marbordo. Ĉeestis ĉ. 60 infanoj (6-16-jaraj) el landoj tre diverslingvaj. Kun ili ni parolis E-e, ĉar E-o estis la sola lingvo konata de ĉiuj. Ili amuzis nin per kantoj, aktorado, muzikludo, per tio min rememorigante pri niaj infanaj grupoj en Redcliffe — bedaŭrinde, ke neniu infano el Aŭstralio ĉeestis. — Jessie Clarke: eksprez. Redcliffe-Grupo.

RAPORTO DE S-INO I. FALLU

"Dank'al la etoso de amikeco dum la tuta semajno, kaj al la granda laboro de Ges-roj Friis kaj kunlaborantoj, ni neniam antaŭe spertis tian mirindan E-ferion. Laŭvole oni rajtis ĉeesti iujn el la tri klasoj matene. La lecionoj daŭris vigle kaj bonhumore, kaj kvankam ni multe lernis, ni ankaŭ ĝuis gajan ridadon, tagon post tago. Posttagmeze okazis multaj ĝuplenaj ekskursoj, kaj vespere diversaj festoj kaj prelegoj. La semajno pasis tre rapide, kaj iuj el la partoprenintoj sentis sin malvolemaj foriri, kiam alvenis la horo ekventuri for. Al ĉiu E-isto, kiu pripensas pri ferio eksterlande, ni diras: 'Nepre vizitu S-ron Friis ĉe Helsingor!'"

LIBERA FORUMO

Pri p. 140. "Kiel traduki: telopeo?" Se vi estus el Nova Sud-Kimrujo vi kredeble sciis tion. Telopeo speciosissima estas la "waratah", la Stata Emblemo de N.S.K. Se P.I.V. enhavus plenan liston de la sciencaj nomoj de la floroj de Aŭstralio, certe ĝi ne mutus pri telopeo, ĉar verŝajne, post la akacio kaj la eŭkalipto, ĝi estas la plej fama el la Aŭstraliaj arboj.

Mi kredas, ke estus bone, ke Aŭstraliaj samideanoj lernu la nomojn de la plimafaj vegetaĵoj, birdoj, bestoj kaj insektoj, por aldoni interesajn al niaj transmaraj leteroj. Estas eĉ eble, ke pli da transmaraj ol da Aŭstraliaj samideanoj rekonas la nomon: telopeo. Hontinde, se tio estas vero.

Antaŭ pluraj jaroj mi aŭdis Australian turiston diri, ke en Kalifornio la "blue gum" (Eucalyptus globulus) estas indigena, kaj tiuj arboj en Aŭstralio estis enportitaj de Usono. Li vere kredis tion, kvankam li estis lerneja knabo en Gippsland, la natura hejmo de E. globulus. Kompreneble, ne estas la rolo de la E-movado instrui pri naturaj aferoj, sed la plimulto el niaj samideanoj interŝanĝas leterojn, poŝtkartojn k.t.p. pri Aŭstraliaĵoj, kaj certe helpus al la intereso de tiuj interŝanĝoj, se la skribantoj ĝuste sciis pri la naturaj aferoj de siaj landoj. — Revanto.

F-ino Ann Hearn pridubas la saĝecon diskuti ĉe la venonta kongreso pri "Kiel revenigi malnovajn E-istojn". ("AE" Aŭg. 71) Mi provas klarigi.

Dum la kongreso en Perth 1970 ni havis utilan diskuton pri "Kiamaniere gajni pli da novaj lernantoj". La diskuto en Melbourne estos kvazaŭ la daŭrigo de la diskuto en Perth, ĉar kian valoron havas varbi novajn kursanojn, se tiuj varbitaj dum la pasintaj 2-3 jaroj jam malaperis? Kaj kian malbonan efikon havas malplenaj klubejoj al novevarbitoj, kiam ili vidas ke "movado" konsistas el 5-6 ĉeestantoj? Regajni la malnovajn Esperantistojn signifas ankaŭ ke la novevarbitoj ricevu pli da entuziasmo.

Cetere, malnovaj Esperantistoj ne estas ĝenerale maljunaj, kaj aĝo havas nenian rilaton al frukt plena laboro por nia movado. Tion pruvas la sindonema (50-hore-semajna) laboro de la jam 80-jara sekretario de A.E.A., kompare kun la 18-jara "fondinto" de junulara organizo, kiu, post foruzo de kvindek-dolara subvencio de A.E.A. tute malaperis el niaj vicoj.

Ĉe ĉiuj E-kongresoj kaj kluboj oni senfine diskutas la temon kiamaniere gajni novajn lernantojn, kaj tiuj, kiuj nepre deziras tion daŭrigi, trovas 2-an diskutejon ĉe la Melburna Kongreso. Por la aliaj diskuto pri revarbado de la jam varbitoj estos nova sperto. Ĉu ne la malnova angla proverbo diras: "Birdo en la mano valoras pli ol du birdoj en la arbusto"?—Herbert Koppel

P. 144 EN SONGO . . . (Heine).

En sonĝo principon mi vidis
Kun vangoj malsekaj de ploro —
Sub arbo, sub verda ni sidis,
Tenante nin koro ĉe koro.
"De l'patro de l'via la krono
Por mi ĝi ne estas havinda!
For, for lia sceptro kaj trono—
Vin mem mi deziras, aminda!"

"Ne eble!" ŝi al mi rediras:
"En tombo mi estas tenata.
Mi nur en la nokto eliras
Al vi, mia sole amata!"
—Trad. Zamenhof: Fundamenta Krestomatio.

En sonĝo principon vidis mi
kun palaj vangoj ploraj;
sub verda tilio sidis ni,
tenante nin kor-ĉe-koraj.
"Ne strebas mi je l'patra tron",
nek je la sceptro el oro,
nek je la diamanta kron",
vin mem mi volas, trezoro".
"Ne eble" — rediris ŝi al mi —
min kaŝas kav' tombara;
nur nokte eliras mi al vi,
ĉar vin mi tre amas, kara".
—Trad. K. Kalocsay: Kantoj kaj Romancoj.

INAŬGURO DE E.F.K.

La inaŭguro kunveno de la Esperanto-Federacio de Kvinlando okazos 3 Okt., je horo 1 p.t.m., ĉe Sutton House, 65 Marine Parade, Redcliffe, 4020. Ĉeestantoj! Bonvolu tuj kontakti S-inon D. M. Sinclair, 6 Borland St., Caloundra, 4551, pri sidlokoj. Temanĝo provizota.

NIA LIBRO-SERVO

Nun haveblaj:
"Bona ŝanco": W. Bormann. 12 prelegoj pri Esperanto hodiaŭ. 246 paĝoj. \$3.60.
"Estiĝo de la Tero kaj la Homo": Leander Tell. 106 paĝoj. \$2.00.
"La Tempesto": Shakespere. Trad. Kalocsay. 120 paĝoj, \$2.00. Ĉiujn eldonis Stafeto.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 100 (180)

MELBOURNE

Oktobro, 1971

IMPORTANT NOTICE

Dear Members,

When our dearly loved secretary, Tiny Goldsmith, launched his Publicity Campaign there were those members who thought that he was too ambitious, and even some of his most active helpers had misgivings about the attainment of that goal. However, his campaign has proved so successful that we cannot praise him too highly.

Now, in the following article, he presents us with another ambitious plan, and it behoves us to back him to the hilt, and to build upon the success already achieved, and, instead of letting our achievement crumble into dust, go on to even greater success.

When we cease going forward, we run the grave risk of slipping back, and so, with this in mind, read his proposal, then support his campaign with all your resources. I strongly recommend it to you. — Your president, Ken G. Linton.

RETROSPECTION

There comes a time in the life of every organisation when it is advisable to look back at results achieved, and forward in order to judge of future possibilities in the light of experience gained. Such a time has arrived for our Australian Esperanto Association. Three years ago we launched our Publicity Campaign, Publicity Fund, and Interstate Competition, which will end in November.

The Publicity Campaign was based almost entirely on the support of our members in the distribution of the green publicity cards. Sixty thousand of these have been printed (some are still available) and they have brought in 2054 enquiries. Some of these enquiries have joined local classes and clubs, and 192 have enrolled for the elementary correspondence course. We have been informed of 33 who have so far completed this course, and of these 27 have enrolled for the intermediate course, and 43 have joined the A.E.A. The profit on this course has helped to pay other publicity expenses and a reprint of the book "Freedom of Speech". 88 students have enrolled for the intermediate course, and of the 22 who have already completed this 14 have enrolled for the advanced course. Six have completed this and obtained the Diploma. The profit on the intermediate and advanced courses has considerably helped our general account, as a result of which we have been able to publish this periodical monthly.

Quite a reasonable record I think, but now comes a snag. It is obvious that members are now tired of distributing the green cards for latterly few have been requested. Instead of receiving 25-40 enquiries a week they have dropped to about half a dozen. This means a considerable drop in income for few correspondence course bookings are coming in. Some time ago the N.S.W. Esperanto Federation elected a publicity sub-committee, of which I became convener. At its first meeting it became evident that a publicity campaign for such a theme as Esperanto would

best succeed if on a national scale, and the point was how could this best be arranged. Ordinary advertising in local papers we knew from experience to be almost useless. At the second meeting we had reports of experience elsewhere which made it clear that good results were best obtained from really large circulation periodicals, when, although the cost was high, the cost per reply had proved the lowest. After discussion, the sub-committee decided to recommend to the Federation Executive that it thought a half-page advertisement in the "Readers Digest" would be the best possible because

- (a) the circulation in Australia is 720,000, which certainly means a readership of at least a million and a half;
- (b) its readers are largely the type we wish to attract;
- (c) the advertisement would be almost certainly the only one on the page;
- (d) if results were only a quarter as good as from the green cards we ought to receive at least 700 students for the Popular Course, and this would give sufficient profit to pay for another ad. in the same periodical, and action could continue.

But the cost is high, \$1290, and the sub-committee thought the idea might immediately be rejected by the Federation Executive. At its next meeting the suggestion was presented, and to my surprise all its members welcomed it. It was unanimously decided to suggest to A.E.A. that an appeal be launched to raise the necessary sum, and the Federation promised to open it with a donation of at least \$250.

Many firms such as the International Correspondence Schools, the Prudential Assurance Company, etc. regularly use this magazine, and they would not do so unless it brought good results. We therefore hope that this new approach may lead to the expansion we all desire, and that you will help to make it possible. All we need at present is promises, but these we should like to have as quickly as possible. It would be a great help to clubs and classes throughout Australia if the advertisement could be in the January issue, for all enquiries would receive information about local clubs, and classes which start in January and February. For this space would have to be booked at least in November. — Tiny Goldsmith, A.E.A. Secretary.

Promises received to September 18th: N.S.W. Esperanto Federation, \$250; Manly Esperanto Club, \$50; Mr. L. V. Scott, \$20; Mr. and Mrs. R. Baxter, \$10; Mr. and Mrs. C. C. Goldsmith, \$10; Morwell Esperanto Club, \$100; Mr. and Mrs. R. Robertson, \$20; Mr. G. Thatcher, \$20; Mr. K. G. Linton, \$25; Sydney Esperanto Club, \$50; Mr. and Mrs. J. Matasin, \$20; Mr. and Mrs. W. Chandler, \$10. Total \$585.

A.E.A. OFFICIAL NOTICES

18th September 1971

New Individual Members

Wallace, Mr. J., Cobram, Vic.
McBride, Mr. J. A., Gaythorn, Qld.
White, Mr. K., Arncliffe, N.S.W.

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$970.43
Sanders, Mrs. M., Vic.	2.00
Thatcher, Mr. G., N.S.W.	2.00
Koppel, Mr. H. Vic.	1.00
	<hr/>
	\$975.43

Sincere thanks to all helpers.

Biennial General Meeting

The Biennial General Meeting of the Australian Esperanto Association will be held on Monday, January 3, 1972, at Queen's College, Melbourne.

—C. C. Goldsmith, Secretary.

"Forte ni staru, fratoj amataj . . ."

En "La Revuo Orienta", junio 1971, aperas nomoj-adresoj de naŭ Aŭstraliaj E-istoj, el kiuj nur du troviĝas en la "Adresaro" de A.E.A. "Fratoj, manon donu kore . . ."

Interstate Competition Positions on 18th September, 1971

	Quota	Points	%
Queensland	130	885	680.7
Victoria	300	1275	425.0
N.S.W. - - A.C.T.	260	1095	421.2
W. Australia	80	244	305.0
Tasmania	30	44	146.6
South Australia	40	57	142.5

"PLENA GRAMATIKO"

Se U.E.A. ricevos antaŭmendojn por 500 ekzempleroj de la 3-a volumo de tiu verko, ĝi estos eldonita. Sen la mendoj, ĝi ne povos aperi. Multaj jam posedas la unuan kaj duan volumojn kaj sentas mankon de la tria. — "Esperanto", junio, 1971.

MORWELL HIGH SCHOOL COMMENDED AT WORLD ESPERANTO CONGRESS

Conference Resolution goes to all Australian Governments.

Translated from Esperanto, the Resolution reads:

The members of the International League of Esperanto Teachers (ILEI), representing more than 20 countries, founded in 1949, and accepted by UNESCO as an associate body, October 1952 —

—on the occasion of its public conference in London, August 1971, during the 56th Universal Esperanto Congress;

—having considered the important results obtained at Morwell High School, Victoria, Australia, in the fields of international education and communication through instruction in the international language, Esperanto;

—noting the important fact that the achievement of understanding amongst a multi-lingual world of nations can be more easily reached through Esperanto than through the teaching of individual national languages, a satisfactory knowledge of which demands a heavy expenditure of time and money;

—and conscious of the great value of Esperanto because of its neutrality; its avoidance (in strict accord with the Charter of Human Rights), of all forms of lingual and cultural discrimination; and its educational value to children as a means of international communication and understanding;

—warmly **RECOMMENDS**

—to the Government of Victoria; to all the State Governments of Australia, and to the Commonwealth Government itself, to examine carefully the work of Morwell High School, specially in connection with the teaching of Esperanto as a regular school subject, with a view to implementing a similar introduction of Esperanto into all their schools. — Signed Dr. M. Dazzini, General Secretary, I.L.E.I.

Four years ago the Principals' Association recommended unanimously that Esperanto should be introduced into our schools and universities, and that an officer be appointed to organise its introduction. ...The Director of Secondary Education vetoed it, considering his one opinion to be more important than the united voice of 200 principals of schools. Esperanto has been accepted as a subject for the Leaving Certificate; it must not be excluded from the list of Matriculation subjects. The attack on obscurantism is being intensified..

The "Morwell Advertiser" front-paged the above report, with photo, 9 Sept., 1971.

APEROS "SKLAVOJ DE DIO"

D-ro J. Hamvai, fakdelegito de UEA en Auckland, en E-on tradukis la majstran prozverkon de Hungaro, Geza Gardonyi (1863-1922). Gi baldaŭ aperos en Hungarujo. Ci jaron, D-ro Hamvai atingos sian 50-an jaron de E-isteco. Gratulon al li.

EKZERCU VIAJN JAMAJN SCIOJN

"What you don't use, you lose!" — Kio en menso ĉiame ne verdas, Tion, ho ve, ni certe tut-perdas. Verdas: figure uzata = "la maljunulo ankoraŭ verdas" t.e., retenas la fortojn de l'antaŭa tempo.

FI, KIA TAJPILO'

Gi aldonas akuzativ-finajojn, kiam ili devus NE troviĝi, kaj preterlasas ilin, kiam ili devus esti. Ĉu vi havas similan maŝinon?

50-JARA SVEDA VIDVO

oficisto, dez. kor. kun skribemulinoj interŝanĝas fotojn, bild-kartojn. S-ro Runo Mur, Poste Restante, 40220 Goteborg 5, Sweden.

KEEP YOUR COPIES

We urge our new members now receiving THE A. E. to preserve their copies for use in days to come. At the early stages of their progress in the language it may be that some of them find certain difficulty in reading this or that text. This is natural, and unavoidable, for, in the nature of the case much of the reading material must be kept at a level of literary maturity. This, we trust, may be, if not now then later, enjoyed by all our current subscribers. We try to adapt the contents to meet all levels of reading capability, by inserting simple texts with those of a necessarily more advanced form of expression, where the subject calls for this.

Therefore, save your copies and so retain a valuable record of Esperanto activity and also, we hope, much other matter meriting its modest appearance.— Editor.

PAGE 136: LIEB LIEBCHEN

Mrs. Pollard has sent two translations of this poem, which we hope to print.



Congress Fee for A.E.A. members: \$6 dol. For others 7 dol. Non-attending members: \$2.50. Send your room reservation (5 dol. deposit) and Congress Fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

Congress Fee for A.E.A. members: \$6 dol. For others \$7 dol. Non-attending members: \$2.50. Send your room reservation (\$5 dol deposit) and Congress Fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

9th List of Congress Members:

126. Mrs. A. E. Hall, Rosebery, N.S.W.
127. Mr. W. R. Robinson, Fitzroy, Vic.
128. Dr. K. C. Porter, Heidelberg, Vic.
129. Mrs. M. Duncan, Manly, N.S.W.
130. Mr. P. A. Williams, Mordialloc Vic.
131. Miss C. Radcliffe, Manjimup, W.A.
132. Mrs. M. Liston, Manly, N.S.W.
State Distribution: Vic. 71; N.S.W. 35;
Qld. 12; W.A. 8; S.A. 3; A.C.T. 2;
Tas. 1.

You may win a prize: If your Congress number is 140 or 150 you will win a valuable Book Prize; so hurry with your enrolment.

Karavano al la Melburna Kongreso

Kvinslandanoj kaj membroj el Nov-Suda Kimrujo, kiuj deziras akiri rabaton per komuna vojaĝo, fluge aŭ fervoje, de Sidnejo al Melburno, TUJ kontaktu S-ron C. C. Goldsmith, P.O. Box 415, Manly, 2095, kiu organizas karavanon.

Ministro por Turismo malfermos nian Kongreson

Kun plezuro mi anoncas ke la Ministro por Turismo, Hon. Vance Dickie, M.L.C. konsentis malfermi la 18-an Aŭstralian E-Kongreson. Ankaŭ Skabeno David Wang, konata ĉina komercisto, konsentis inaŭguri memor-sildon ĉe la domo kie John Booth fondis en 1905 la unuan aŭstralian E-klubon. — Herbert Koppel, Kongresa Sekretario.

Dramo-Konkurso

Gis nun 3 kluboj anoncis sin por la Dramo-Konkurso: Manly E-Klubo, Esperanto-Klubo de Orientaj Antŭrboj (Melbourne), kiu ludos "La Aventuroj

de Don Juano", kaj la Boronia E-Grupo, kiu ludos "La dubinda malbonŝanco de Lee Sing".

LIBERA FORUMO

Pri la Projekto sur la fronta paĝo mi demandas: Ĉu estas saĝe elspezi \$1,300 por unusola reklamo? En 1965 aliaj entuziasmoj intencis sendi "Junulon al Tokio". Ili kredis ke almenaŭ 300 junuloj aliĝos kaj pagos \$2 aliĝkotizon. Ili eraris, malpli ol 10 aliĝis, kaj la projekto fiaskis.

Nun oni esperas akiri 700 korespondlernantojn. Ĉu la subtenantoj de tiu ideo estas pretaj surprizi sur sin la taskon korekti po 15-20 korespondlecionojn? Aŭ ĉu ili atendas ke la 81-jara A.E.A. -Sekretario povos korekti 700 lecionojn?

Ni nepre kolektu \$1,300, sed uzu la sumon por pli realaj celoj. Mi povas nomi tri: 1-e: Investu la monon en registaraj obligacioj kaj per la interezo sendu ĉiun duan jaron promesoplenan Esperantiston al la japana aŭ novzelandana kongreso. 2-e: Donu la sumon al Brisbaneanoj aŭ Pertanoj por ke ili fondu Esperanto-Domon. 3-e: Sendu al 130 bibliotekoj pakajon da libroj en la valoro de \$10, kiu enhavas lernolibrojn, vortarojn kaj la "Vivon de Zamenhof". Tiamaniere ni efike disvastigas Esperanton tra Aŭstralio.

Cetero, la nuna kolekto por la Publiciga Fonduso ne havis la intencitan sukceson. La intenco estis kolekti \$2,500 en 2 jaroj. En preskaŭ 4 jaroj ni ankoraŭ ne atingis \$1,000. Kial ni nun aŭdacas elspezi \$1,300 por unusola anonco?? — Herbert Koppel.

Kun intereso mi legis la leteron de S-ino Koppel (p. 145) pri ŝiaj tri plendoj. La unua plendo: ŝi ne tute komprenis la leteron de S-ino Reed (p. 135). Tamen la nekomprenita letero certe kaŭzis multege da respondaj vortoj!

La dua plendo: la fondiĝo de kluboj alie ol la M.E.S. Mi esperas, ke la fondintoj de la Boronia, Eastern Suburbs kaj Orrong grupoj klarigos al ni siajn kialojn.

Fine, S-ino Koppel plendas, ke ni ne sufiĉe subtenas "A.E.". Tiurilate mi akordas kun ŝia pledo. Pro ni, la Aŭstralia E-istaro ne prezentas la bezonan kvanton da viglaj artikoloj al la redakcio. "A.E." kutime inkluzivas tedan miksaĵon da antaŭviditaj eroj el aliaj E-gazetoj.

Sed kritikoj sen plibonigaj proponoj meritas nenion, do mi proponas, ke ni

ĉiuj laboru por prezenti interesajn lokajn historiojn k.t.p. al la redaktoro. Sendube ili ofte enhavos erarojn, sed eble niaj kleruloj helpos korekti ilin antaŭ pres-apero. Krome, mi proponas, ke la redaktoro ne akceptu malicajn leterojn de iu ajn persono, kiu malkuraĝas malkovri sian nomon.

S-ino Reed, mi gratulas vin pro via vere kataliza letero al kiu S-ino Koppel iom maltrafe respondis. — Arturo Heathfield.

(Aperas en "A.E." notoj el E-gazetoj nur kiam ili estas aparte signifaj, aŭ interesaj pro sia kuriozeco, ridindeco aŭ alia aspekto. Tre malmultaj Aŭstraliaj E-istoj abonas alilandan E-gazeton, sekve kiel ili povas legi novaĵojn en "A.E." jam "antaŭviditajn"? Ĉu S-ro A. H. povas indiki la nombron de Aŭstraliaj E-istoj, kiuj abonas al "Esperanto", "The British Esperantist", "Heroldo de Esperanto", "Norda Prismo" aŭ aliaj? — Red.

Mi tute ne konsentas pri unu el la proponitaj ŝanĝoj de nia Statuto. Rilate al para. II, sekcio (d) "asociaj, familiaj kaj junulaj membroj ne havas voĉdonrajton", mi opinias, ke la efektiviĝo de tiu propono certe forpelos multajn nunajn familiajn kaj asociajn membrojn, kaj kompreneble la A.E.A. perdos multe da mono kaj estimo. — Mary Fordham.

LEGŬ, RIDEGU . . .

Junu viro, promenante tra urbo, ekvidis buŝgutan persikon en fenestro de luksa fruktobutiko. Li decidis ĝin aĉeti por sia amatino. "Kiom kostas tiu persiko?" li demandis.

"Kvar frankojn", respondis la vendisto.

La junulo paliĝante, hezitis, sed la tento estis tro forta, kaj li pagis per monero kvinfranka. Li jam denove estis sur la strato, kiam la vendisto kuratingis lin: "Mi ŝuldas al vi unu frankon restonon!"

"Ĝin retenu", diris la junu viro; "ĉio en ordo. Enirante vian butikon, mi pro neatentemo paŝe dispremis unu vinberon."

Franca sinjorino iom konfuziĝis, ekscianta, ke ŝia Angla amikino estis "up, but not down yet" (jam ellitiĝis, sed ankoraŭ ne eldormcambrigiĝis.)

"Wot I say is this: When you're up to what they're up to, then it's up to you". (Jen kion mi diras: kiam vi scias, kion ili celas, tiam vi devas aĝi mem.)

"De post kiam mia flino faras tajpadon,, ŝi multe progresis ĉe la forte-

piano. Imagu, kara, ke ŝi sukcesas ludi la 'Funebran Marŝon' de Chopin en 48 sekundoj".

AUSTRALIA KRONIKO

SYDNEY: Dorothy Hasluck (grupo Hornsby) parolis pri "Marŝado Himalaja", kun lumbildoj de monto Everesto ktp. Alestis Wre Chandler, kiu nun esperas veni pli ofte. Ĉe Katmandu ŝi grimpis al alta roko, tende loĝis en primitivaj kondiĉoj, sed ne plendis. Carmis ŝin la ĝaj-fablaĵoj Serpoj. Aeroplene al Putna, Darjeeling, Kalkuto, Delhio, kie ŝi renkontis S-ron Prokrosch, ardan aktivulon por E-o.

23/8: Fritz Mueller-Sorau traktis pri sia ferio ĉe Moree, kie li renkontis Ted kaj Leila Woodruff, kiuj sendis bondeziraĵojn. Fritz legis por ni amuzajn aferojn el E-gazetoj kaj pecon el libro: *La Vivo de Gandhi*. Fine: *La Promeso*, el "Oomoto" (Japanujo), kiun li mem verkis . . . viva rakonto pri spiritismajoj, kiujn lia amiko en Germanujo spertis. Tom Elliott montris enkadrigitan poŝkarton, kiun posedas la Societo — el Varsovio, poŝtstampe 12/1/1910.

Ĝi estas adresita de D-ro Zamenhof al S-ro H. Gadsden, Sidneja Klubo. La kara Doktoro informas, ke li ne povas akcepti titolon "honora prezidanto", ĉar ne estas lia kutimo akcepti titolojn. (Detaloj: *La Rondo*, 8/47).

30/8 ni bonvenigis Gunter Scheerschmidt, el Hamburgo. Grace Kirkwood, de Coffs Harbour, parolis pri siaj tri lernantinoj, kiuj post nur unu jaro povas korespondi E-e, tiel obtenante pli grandan vidpunkton de mondaj aferoj.

Premiitan artikolon en "La Mevo" (5/71), pri-birda gazeto, verkis unu lernantino, Barbara Salter, helpite de Roy Wheeler (Melburno). (Detaloj: *The A.E.*, 6/71). Ivo Maddern letere rekomendas, ke ni E-istoj skribu leteron al ĉiu sia parlamentano, por peti, ke E-o estu instruata en la lernejoj. Ni ĝue aŭdis sonbendon (aranĝita de Ian Ross) kun voĉoj de Tiny Goldsmith, S-ro Timmins, klubanoj de Morwell, Redcliffe, Melburno ktp. 6/9: Anoj legis poemojn kaj eseojn. Amuzas poemo verkita de Margaret Chaldecott (pri membroj) eble aperos en "Telopeo", organo de la Federacio. — G. E. Browne.

MELBOURNE: Je 23/8 S-ino Fay Koppel, pro malvarmumo, devis transdoni al la edzo sian tekston pri "Malkovro kaj esplorado de kaverno en la regiono apud Buchan". Ĉe la societa vespero de 30/8 ni ĝuis la diapozitivojn kaj sonbendon senditan de la E-klubo de Avignon, Francujo.

S-ro F. R. Banham, 6/9, prezentis Eŝcan Mikspoton, grandparte prilingvan, kiu inkludis plurajn pensinstigajn demandojn. La lasta ero rilate la snobismon en la moderna reklamarto pri cigaredoj estis pensinstiga, des pli ĉar la ekzemploj estis facile rekoneblaj.

Je 13/9 S-ro H. Koppel raportis pri renkontiĝo kun japana inĝeniero Takaŝi Kawai sur la ŝipo "Izumisan Maru". Tre impresis lin la pureco de la moderna ŝipo, kiu transportas likvidan petrol-gason inter Aŭstralio kaj Japanujo. S-ro Kawai estas fervora Esperantisto, kiu projekciis por la gasto propran filmon pri la Universala Kongreso en Tokio (1965).

MORWELL (Vic.): Je 27/7 ni ekzamenis ekspozicion de Esperantaj kolektitaj de S-ro I. Maddern. La loka gazeto raportis pri la interesa elmontraĵo.

MANLY: 19/8: Sekvis altgradan kurson (sub gvido de S-ino K. Schwerin) lumbilda prelego de S-ro P. E. Schwerin pri Svedujo. 21/8: Pro inundo ni devis nuligi arangon por festi la finon de la 2-a studperiodo en la Virina Kroketa Klubo de Manly. 26/8: Ĉiusemajna kunveno en la Vespera Lernejo, Darley Road. Kontribuis i.a. S-ro Les Scott, Ges-roj Goldsmith kaj S-ino Marjorie Duncan. 2/9: Aferkunveno ĉe S-ino Ruth Caruthers, 66 Wanganella Street, Balgowlah, 7.30-10 p.t.m. Ceestis 14 anoj kaj S-ro Adrian Culey. 3/9: Multe da Manly Klubanoj alestis (kun grupo el organizajo. Arta kaj Kultura Centro por Manly) al la Ensemble Teatro, Milsons Point

Ni gratulis nian ŝatatan vizitinton kaj program-aranĝinton Margaret Chaldcott el Sidneja Klubo pro ŝiaj aperoj en Programo "Temptation", Channel 7. Ŝi pruvis sin bonega ambasadorino pri la Esp. movado. — "Fenikso".

PERTH: 11/8: okazis interesa kunveno, en kiu ĉiu el la ĉeestantoj partoprenis. Ĉiu el la grupo alportis kvin diapozitivojn kaj vice projekciis ilin sur la ekranon, samtempe kun komentoj. Ni trovis nin, metafore, veturigataj en landojn fremdajn, kaj tra nia propra, bela hejmlando. Vere ĝi estis "Geografio sen Larmi" kaj meritas montradon en niaj lernejoj.

25/8 kunvenis liganoj en Suda Perto. Post ol la Prezidanto malfermis kaj prezentis la temon, ŝi lanĉis la procedon, kiu konsistis el legado de poŝtkartoj de korespondantoj el diversaj landoj. Vice la ricevintoj legis ilin, kaj priskribis dorsajn bildojn montritajn sur ili. Sekvis sesio el viglaj demandoj, kiuj stimulis diskutojn. La demando, "Kion ni povas fari por allogi gejunulojn al la uzo de Esperanto?" produktis multajn sugestojn, sed ankoraŭ restas la problemo ne solvita.

8/9 en la Instruista Kolegio, S-ro Finch estis kunvenon el liganoj. Li atentigis nin pri la nepra uzado de nia Internacia Lingvo ĉiufojon, kiam okazas kunveno. Li havis antaŭ si liston da provokaj sentencoj, kaj post ol li vice legis ĉiun, li invitis, ke ni proe-aŭ-kontraŭe kritiku. La komentoj estis amuzaj. Sekvis ekzercado por la mezgrada grupo, kun celo, ke la estro kuragigos tiujn anojn al la arto de memesperimo. Fine konversacio regis. Ĉu Esperante? Kompreneble! G. Pollard.

THE LONDON CONGRESS

Notes from letter by Wendy Vagg (Orrong Club), a beginner in E-o: 31 Aug. 1971:

"I settled in an hotel near the Kongresejo. Entering the latter, I was not feeling very calm. Having handed in my Congress card, I received a receipt and official badge. The man was English. I explained in E-o: "Mi komprenas iomete". He was very good and clarified the procedures to me very slowly. I was then given a large bag of literature, which I will show you.

Signs in the London streets directed the way to the Congress and the Underground: 'Bonvenon al la Esperanto-Kongreso en Londono!'

At the 'Interkonatiĝo' at the Kongresejo hundreds of people greeted old friends; it was good to see the many young people, children, teenagers and whole families, all fluent E-ists.

The inauguration ceremony was a 3-hour affair, the gist of which I could follow, but I could not understand the long speeches. After official welcomes came about a dozen foreign ambassadors, only a few requiring E-ist translators. Then the 40 delegates from each country saluted Congress. There were three hours of speeches; and to show how impressed I was, not once was I bored. In fact the whole thing moved me to think that here were over 2000 people from at least 40 countries, and no interpreters needed.

Sunday afternoon: church services: I went to the service at St. Martin's-in-the-Field. The church was packed. The preacher was a Dutch E-ist. The local vicar said a welcome through an interpreter. In the evening was the 'Brita Vespero', a concert.

The Kongresejo was open for about 10 hours every day. There I often browsed around, going through the Libroservo and speaking to people. I tried to buy a ticket for the Teatra Vespero, but they had sold out. Failed too at the Film night (one film was 'Ci tiu Lando —

Aŭstralio), being turned away with many others as the theatre was full.

And now, my main ambition is to study hard at Esperanto, become fluent, and go to another Congress!

LIBRO-SERVO

Libroj nun haveblaj ĉe via servo:

LIBRE DE APOKIFROJ-Karel Capek
1-10

AGO KAJ REAGO-Francisko Xavier
1-85

KVARA RAPSODIO-Ferenc Szilagy
75

FUNDAMENTA KRESTOMATIO-
Zamenhof 2-75

20th OLYMPICS IN MUNICH, 1972

The German Esperanto-Association asks our Association, and its individual members to contact the Australian Olympic body and any Olympic athlete they may know personally, to the end that Esperanto may be a factor at the Games in Munich. Organiser: H. Schmid, Bebo-Wager-Str., D-89 Augsburg.

NE MANKU LA EPITETOJ !

En Esperanto-rondoj "parolado" ordinare ricevas sian adjektivon "interesa"; "sukceso" nia normale portas sian "brila", pri kiu ni ne nur "feras" sed "juste fieras". Parolante pri alia kolego ni epiteton uzas: "fidela", aŭ, pro vario, "fervora", malgraŭ ke ties bona eco estas klare evidenta.

Lernantoj estas "entuziasmaj"; diskutoj, "viglaj"; manĝetoj, "luksaj", aŭ almenaŭ "bonustaj"; pejzaĝoj, "belaj". Bedaŭre la vorteto "tre" jam de longe perdis signifon kaj nun servas nur por ekvilibrigi frazon aŭ ritmigi version.

INFORMADO PRI ESPERANTO

Grava 4-kolumna artikolo en "Australian Jewish News", 13 Aug. 71. "A magnificent failure", kun foto de D-ro Zamenhof ĉe la 4-a Universala Kongreso, Bazelo 1908. David Nathan skizis la vivon de Zamenhof kaj la internan ideon de Eo. La "malsukceso" rilatas al la malsukceso de samlingvanoj vivi pace unu kun alia — ne al la lingvo mem. La artikolo mencias, ke E-o eble estiĝas la oficiala lingvo de la Komuna Markato.

La dua estas letero de F-ino Ann Hearn ("The Age", 14 aug. 71): "Mixed up in the Common Market". Ŝi citis la anglan journalon "Yorkshire Post", kiu ekzemplis konfuzojn pri diversaj lingvoj uzataj kun eksportajoj.

RECENZOJ

"La Tempesto": William Shakespeare. El la Angla tradukita de Kalman Kalocsay. 120 paĝoj. 2.00 dol. Eldonis Stafeto, Tenerife.

Jen la 15-a kompleta verko de Sekspiro tradukita en E-on. Faris ĝin ne Anglo, sed Hungaro majstra tornisto de l'esprimado poezia.

Por literature hardita E-isto, homo facile familiara kun licencoj poeziaj ofte nur prove eksperimentaj, la dramo en sia E-a vesto povus esti pli facile legata, tio estas, komprenata, ol en la lingvo Elizabetana. Ofte oni trovas vualitajn aludojn, maskitajn dirojn, tiutempajn parolmanierojn, tradukitaj per pli klaraj vortoj, ĉar la sencnon Kalocsay celis redoni, kaj ne la formon.

Estus interese, scii per kiuj helpiloj tekstaj, libraj, la tradukinto sukcesis mastri sian laboron. Certe, ke ankaŭ Angla tradukanto sin provizus per komentarioj, kaj, eventuale ankaŭ tradukoj alilingvaj por sin armi por tia lukto. La amaso de pritekstaj opinioj el multaj libroj ja cerbumigus serĉanton al precizaj sencnoj, kaj pene li devus sintezi aŭ saĝe elekti el la diversaj interpretoj de la Sekspirologoj, eĉ en la Angla lingvo sola. Evidentas, ke Kalocsay firme kaj definitive formis sian propran juĝon pri tio.

Laŭdinda estas la Postparolo. Ĝi atestas, ke la tradukinto intense studis sian taskon antaŭ ol paŝi al la pena plenumo. Lia vasta priscio de la fono kaj esenco de la verko hontigus la mezan Anglon, kies kono pri ĝi estas, kompare, mizere eteca.

Defendante sian uzon de t.n. neologismoj, Kalocsay sugestas, ke se oni prezentos la dramon antaŭ lingve "primitiva" publiko, "lerta regisoro povas por-okaze simpligi ties leksikon . . . sed por la E-a literaturo en ĝia tuto oni ne povas tion fari". Steletoj en la teksto direktas al Notoj en la finaj paĝoj. Laŭdinde — kaj farenda ĉe tiaj gravaj verkoj, ofte obskuraj ĉe lokoj.

Nur malofte lia mano sin movis mise: jen unu (akto I, sc. 2): ". . . he's gentle, and not fearful". —

Motteau: "Ho, kara patro! Tro ne ofendu lin, ĉar, **dolĉanima**, li malmultume estas".
Kalocsay: . . . "Ne juĝu tro subite, ja li estas **milda** kaj **sendanĝera**" (!).

Waringhien: . . . "Lin ne provoku tro spite, ĉar li estas ja nobela kaj sentima". ("Eseoj", p. 51).

Ĝi ambaŭ — Motteau kaj Kalocsay — mistradukas: "**Gentle**", kiu signifas tie: **nobela** (ne "milda", nek "dolĉanima").

Trudas sin komparo kun la traduko de Motteau (1905), kiu estas lingve, forme kaj sence kritikinda. Sur preskaŭ ĉiu paĝo oni trovas miskomprenojn.

Kolektivo de kleruloj tradukis la Bibliion. Oni saĝe konsiderus tiun principon ankaŭ por simile gravaj bazverkoj de la homara kulturo.

"Geriatrico kaj la ĝenerala zorgo por gemultjaruloj". Eldono de Asocio de Laboristaj E-istoj. 43 paĝoj. 2.50 guld.

Elstara E-ĝvidanto S-ro F. Faulhaber tradukis ĝin dum li kuŝis unuflanke paralizita en la malsanulejo Sunradio, Hilversum, Nederl. Li spertis la sekvojn de la kursoj kompilitaj de la aŭtoroj, kies tekstoj konsistigas la libron. Klarlingve estas traktitaj la ĉefaj problemoj de la maljuniĝo kaj ties ofte deloraj fenomenoj, psikaj kaj fizikaj. Unu ĉapitro ekzamenas la efikojn de seniligiĝado sur la korp-organojn — efikojn akcelatajn pro troa litrestado, pri kiu la aŭtorino forte avertas.

Por 80-jarulo ne estas grave, ĉu li 85-jariĝos, sed tre grave, ke li ne atingu tiun aĝon, jam kuŝinte 5 jarojn sur matrac-tombo. La celo de geriatrico ne estas aldoni jarojn al la vivo, sed vivon al la jaroj.

La geriatrico kaj reaktiviga instituto Zonnestraal, sub Prof-o Schreuder kaj Prof-ino Diatlowicki-Tobi povu inspiri registarojn en aliaj landoj — inter ili Aŭstralio — sekvi ĝian ekzemplon, nome, establi similajn laŭ pli vasta skalo.

Al miloj da homoj debilaj, senilaj, Mankadas ankoraŭ flegejoj azilaj.

"Lingvologia Revuo":... n-ro 7. E. Hanhiniemi, P.O. Box 764, Ingham, Queensland 4850.

Valora artikolo de Zamenhof antaŭe ne publikigita. Mankas dato. Deĉifris ĝin A. Holzhaus pere de la E-Muzeo, Vieno. Mankas al la recenzanto cerboforto sence pritaksi la sekvantan komenton de la aŭtoro de ĉi eldonaĵo. Cetere ĝia komplika reformismo ne estas taŭga temo por nia gazeto. Admirinda estas nur la sindediĉa pacienco sed vana penado de la homo, kiu tiel forŝutas sian energion sur nepre senfrukta tero.

TO OUR REPORTERS

Please leave a space between each line of E-text. In closely typed line the circumflexes often do not show up clearly, and the printer may miss them. Mark clearly any blurred letter. Use freely the abbreviations listed in the Yearbook of U.E.A. for 1962, p. 156.

"The Latrobe Valley Esperantist", n-ro 10, monata, Esperanto-Societo de Morwell (Vik.), mimeografita. 50c

Lokaj novaĵoj, leteroj, legaĵetoj. Voko al E-istoj kaj amikoj sendi leteron al la Edukada Ministro, Hon. L. H. St. Thompson, Education Dept., Treasury Bldgs., 3004, petante akcepton de E-o.

... LA "ANSTATAŬILO" SUR P. 155. ...

Voters who wish to retain their copy of "The A.E." intact may copy the form on a sheet of paper, fill in the details and to: Secretary, P.O. Box 415, Manly, 2095, before 15 December.

37TH NEW ZEALAND ESPERANTO CONGRESS : WELLINGTON

6-10 January 1972

Details: 11 Central Terrace, Kelbrun, Wellington.

A.E.A. Examinations.

Elementary (Elementa): 2 dol. Advanced (Supera): 3 dol. Final (Klereca): 2 dol for oral; 2 dol. for written; 2 dol. for thesis; 2 dol for eventual diploma. Send fee to Mr. L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, 2095.

If a candidate succeeds in the written paper, but fails in the oral test, he may sit for the oral within a given time limit, without further fee.

If he fails in both sections, he may sit within a given time limit, on payment of half fee. (The "A.E.", Mar-Apr. 1969).

INFANLIBROJ ĈINAJ

El glacea papero, kun bonege laŭ-naturaj ilustraĵoj kaj tre interesa lego-teksto. "Sekreta Informilo"; "Rakontoj pri Liu Hulan"; "Casado kun Avĉjo"; "La Varma Sudo kaj Frosta Nordo". Prezoj ne indikitaj. Haveblaj ĉe "El Popola Ĉinio", P.O. Kesto 77, Pekin. Senrezerve rekomendindaj.

A.B.C. AND ESPERANTO

Wilfred Thomas will speak on A.B.C. about the London Esp. Congress. Date uncertain; may be 18 Nov. on 2nd network, all capitals.

On 3rd network regional: 15 Nov. Check programs carefully!

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084
Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350
Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 101 (181)

MELBURNO

Novembro, 1971

KUNLABORADO VENKOS

La letero de Herbert Koppel pri la projekto anoncita en nia lasta numero tre mirigis min. Ne ĉar li havas kontraŭan vidpunkton al nia Estraro, sed ĉar li kuraĝis presigi tion en la sama numero en kiu ni unue anoncis la planon. Li ŝajne ne komprenas la signifon de la esprimo "esprit de corps". Tamen, jen konciza respondo.

Eble la plej miriga paragrafo estas tiu en kiu li indikis, ke eble mi devus korekti 700 lecionojn! Li bone scias ke ni jam havas pli ol 30 instruantojn por la kursoj, kaj mi havas nenian dubon ke ni povos trovi ankoraŭ tridekon da kompetentaj helpantoj kiam tio estos neceso.

Li proponas tri aliajn celojn por la uzo de la mono, sed ĉiuj tri estas jam provitaj en aliaj landoj, kaj ĉiuj tri fiaskis. Mi povas facile doni detalojn, ĉar mi mem partoprenis kelkajn, sed mankas spaco, laŭ nia redaktoro. La tri metodoj proponitaj de Herbert indikas nur elspezon de mono. Nia projekto, se ĝi rikoltus la rezulton kiun ni esperas kaj atendas, per la profito pro la korespondaj kursoj, donus la rimedojn por plua reklamado sen la neceso peti pliajn donacojn; kaj tio povus okazadi.

Neniu alia kritikis la planon. Kontraŭe, ni ricevis multajn gratulajn leterojn. Unu de membro de la Melburna Klubo komenciĝis per la vortoj, "What a splendid idea". Eĉ pli bone, ni jam ricevis pli da promesoj kaj donacoj. Jen aldona listo:

Mueller-Sorau, Mr. F.	\$10
Rockhampton Esp. Soc.	20
Fordham, Mrs. M.	5
Smith, Mr. C. M.	10

Hasluck, Miss D.	2
Toowoomba Esp. Soc.	10
Ferguson, Mrs. E.	5
Timmins, Mr. V. J.	25
Russell, Mrs. O.	5
Hopkins, Mrs. A.	20
Fletcher, Mr. V. E.	25
Brisbane E. Society	50
Sumo je 21 okt.	\$772

Pli ol duono de la bezonata sumo.

Al ĉiuj, kiuj tiel rapide kaj favore respondis, sincerajn dankojn. Notu, ke la mono estas donita por specifa celo, kiu interesis la donacintojn, kaj ni ne rajtas uzi ĝin alimaniere. La reklamo estas jam mendita, kaj devus aperi en la januara numero de "Reader's Digest". Tiu dato devus esti helpa al la klasoj kiuj komenciĝos en Jan.-Feb., kaj ankaŭ al la kluboj. Ĉiuj veraj Esperantistoj atendas la disvastigon de Esperanto, kaj sekve ili estas optimistoj. Ni kune laboru ĝis sukceso — Tajni Goldsmith, A.E.A. sekretario.



Congress Fee for A.E.A. members: \$6 dol. For others 7 dol. Non-attending members: \$2.50. Send your room reservation (5 dol. deposit) and Congress Fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

Karavano al la Melburna Kongreso

Kvinslandanoj kaj membroj el Nov-Suda Kimrujo, kiuj deziras akiri rabaton per komuna vojaĝo, fluge aŭ fervoje, de Sidnejo al Melburno, **TUJ** kontaktu S-ron C. C. Goldsmith, P.O. Box 415, Manly, 2095, kiu organizos karavanon.

KONGRESA PROGRAMO

- Dimanĉon, 2-1-1972
 9.00 - 12.00 Alveno de la delegitoj. Registrado.
 11.00 A.E.A. Komitat-Kunveno.
 2.00 Bus-Vojaĝo No. 1: Historiaj Vidindaĵoj.
 7.15 Di-Servo: Pastro C. C. Cowling
 8.15 Bonveniga Vespero
 London, 3-1-1972
 8.45 Gazetara Konferenco
 9.45 Inaŭguro de la Kongreso fare de Hon. Vance Dickie, Ministro por Turismo. Fotografado
 11.30 A.E.A. Generala Kunveno (1)
 2.00 Bus-Vojaĝo No. 2: Urbaj Vidindaĵoj
 7.30 (1-e) Pastro C. C. Cowling prelegos
 (2-e) S-ro P. E. Schwerin: "Natur-Elementoj kontraŭas la homojn" (kun lumbildoj pri Delphi, Pompeii, Venecio)
 Mardon, 4 - 1 - 1972
 9.15 Lingva Seminario—S-ro Ken Linton
 11.00 Inaŭguro de Memorŝildo por John Booth fare de Skabeno David Wang.
 2.00 A.E.A. Generala Kunveno (2)
 7.30 (1-e) S-ro F. R. Banham: Zamenhof, Pitman kaj Schweitzer
 (2-e) S-ro R. Robertson: "Skribi kaj paroli ne sufiĉas por la moderna klerulo".
 Merkredon 5 - 1 - 1972
 9.15 Lingva Seminario—S-ro Ken Linton
 11.00 A.E.A. Generala Kunveno (3)
 2.00 Diskuto pri "Eŭtanazio" gvidata de D-ro A. Einihovici.
 4.30 Novaj talentoj prelegos
 7.30 Dramo-Konkurso kaj Literatura Vespero
 Ĵaŭdon, 6 - 1 - 1972
 9.00 Bus-Vojaĝo No. 3 Tuttaga Ekskurso al Ballarat
 7.30 (1-e) S-ro R. Robertson: "Teknikoj por utilligi la povumon de la sunradioj".
 (2-e) S-ro Victor Bourlin: "Grimacoj de la Mondo" (Lumbild-Desegnaĵoj).
 Vendredon, 7 - 1 - 1972

- 9.15 Lingva Seminario: S-ro Ken Linton
 10.45 (1-e) S-ro Kevin Smith: "Kristano rigardas Islamon"
 (2-e) S-ro W. Chandler: "Evoluo kaj kutimoj de la Pingvenoj".
 2.00 Diskuto: "Kiamaniere revarbi malnovajn Esperantistojn".
 4.00 Instruista Kunveno (1)
 7.30 Internacia Koncerto
 Sabaton, 8 - 1 - 1972
 9.15 Instruista Kunveno (2)
 11.00 U.E.A. Kunveno
 2.00 S.A.T. Kunveno
 4.30 Literatura Prelegoj kaj Fermo de la Kongreso
 7.30 Kongresa Vespermanĝo
 Dimanĉon, 9 - 1 - 1972
 2.00 Bus-Vojaĝo No. 4: Postkongresa ekskurso al Cowes por vidi la "Paradon de la Pingvenoj"

Nepre rezervu viajn sidlokojn por la Bus-Vojaĝoj: Ne sendu monon, sed skribu TUJ al Box 2122 T., G.P.O., Melbourne, 3001 kaj indiku en kiuj ekskursoj vi deziras partopreni.

A.E.A. Examinations

Advanced (Supera): Richard Moir, Cronulla, Honors.
 Elementary (Elementa): Norman A. Collier, Bowen, Q.

WILFRED THOMAS AND ESPERANTO

One of our Queensland members suggested to the well-known broadcasting personality, Wilfred Thomas, that he might find something suited to his programs in the World Esperanto Congress. Mr. Thomas has sent back three letters in which he makes it clear that he personally is very much in favour of Esperanto — travelling as he does he is constantly "hitting the language barrier". He was unfortunately unable to attend the Congress but has recorded an interview about Esperanto with the Secretary of the British Esperanto Association (Mr. Platt).

It is hoped to broadcast this on the 3rd network (regionals) ABC on 29th November, and on the 2nd network (city stations) on 2 December. Note that these dates are later than those given in the last issue. Watch your programs.

Be listening! And afterwards, don't forget to write to Wilfred Thomas, c/- B.B.C. London, thanking him for the opportunity to have him at your place.

LIBERA FORUMO

Vere estas ŝoke vidi la malakordon sematan de H. K. en la oktobra "A.E.". Tiny Goldsmith proponis al ni rimedon per kiu ni povus unufoje por ĉiam solvi la eternan problemon de reklamado por la E-aj kursoj. Se ekzistas en Aŭstralio nur 10 kluboj kiuj elspezas \$50 jare en reklamoj en ĵurnaloj, lokaj gazetoj k.s. ni povas gajni la plejparton de la bezonata \$1300.

Supozinde aliaj kluboj ankaŭ trovas, ke eĉ kun la servado de nepagataj instruistoj ili malofte gajnas la koston de reklamado de novaj kursanoj. Nun—kun la plano de Tiny—necesas nur ke ni kunmetu tiun monon, sendu la kursdetalojn al li, kaj per tio ni havas multe pli efikan reklamadon ol ni aliel povus esperi.

Kompreneble, se ni konservos la enspezon de novaj kursoj por la sekvanta jaro ni povos havi eĉ pli grandiozan reklamadon.

Kial H. K. atendas, ke Tiny estu la sola, kiu instruas E-on? Tiny ja estas telkrono al E-ujo; li ne estas E-ujo.—Tom Elliott.

(S-ro T. E. kaplinie skribis: Logika Forumo, tamen estas bone uzi nur la formalan rubrik-titolon.—Red.)

Jus leginte la kongresan numeron de "Esperanto", la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, mi estas ravita de la enhavo. Eĉ se mi nenion alian ricevis dum la tuta jaro, tiu festparolado de la prezidento, Prof. D-ro Ivo Lapenna, rekomencus la tutan jarkotizon. Ne nur ĝi estas absolute inspira, sed la lingvo estas modelo por ĉies imito.

Sed tio estas nur unu ero en tiu numero. La raporto pri la Universala Kongreso en Londono estas tiel realeca, vigla, kaj detala, ke mi ne povas ne senti, ke mi vere ĉeestis tiun kongreson. Kaj kiel inspira estas la raporto pri la Lingva Forumo!

Sed jam sufiĉas! Nia internacia organo estas vere dezirinda. Ĝi estas la plej bona revuo en la tuta Esperantujo—Ken G. Linton, Cefdelegito de U.E.A.

JUAN REGULO : STAFETO

Li informas cirkulere: Presebloj sur Kanariaj Insuloj pli kaj pli malfaciligas; mi serioze timas, ke mi ne povos longe plu elteni mian ĉi-tiean aktivadon. . . . Mi ĵus aranĝis presi librojn alilande sed samtempe mi daŭrigos presadon en K. I. dum tio estas ebla. . . . Mi esperas elteni ĝis trans la 100-a titolo.

AUSTRALIA KRONIKO

Melbourne: Nia ĉi-jara "Bazar-Vespero", nomata "American Tea", okazis je 27/9. Spite de malbona vetero kaj malsaniĝo de anoj tamen ĉeestis 24 personoj, kies gaja kunlaboro kaj vigla marĉandado por libroj, plantoj, spicaĵoj, bakajoj stampis la aferon kontentiga sukcese kun fina enspezo de \$39.33. Pluajn \$14.—ni ricevis de S-inoj A. Paling, V. King, S-ro O. Mitchell kaj F-ino A. Hearn, kiuj ne povis persone ĉeesti. Lastjare 28 ĉeestantoj kontribuis \$53.36. La monon ni uzos por nia biblioteko kaj Ekipaja Fonduso.

Je 4/10 S-ro H. Koppel raportis pri la Universala Kongreso en Londono kaj la S. A. T-kongreso en Parizo laŭ gazetoj kaj raportoj aerpoŝte ricevitaj. La parolanto je 11/10 estis S-ro H. Beechey, kiu unue faris komparon inter la homa cerbo kaj komputoro. Poste li faris eksperimenton pri novel-verkado, uzante la klubanojn kiel "programistojn" kaj propran cerbon kiel "komputoron". Li meritas gratulon pro la "mistero-rakonto", kiu rezultis post tre mallonga tempo.

Frapa ekzemplo pri la valoro de persistemo troviĝis en la rakonto de S-ro Marshall Cohen, kiu je 18/10 skizis la penojn kaj eksperimentojn, pere de kiuj la nun fama japano Mikimoto finfine sukcesis rice rikolti siajn "arte"-produktitajn perlojn.

Morwell (Vic.): La junuloj starigis kukostandon kaj ricevis \$33.18, kiujn ili uzos por fari filmon. Plue en la hejmo de S-ino Taylor okazis antaŭtagmeza kunveno dum kiu la junuloj rikoltis preskaŭ \$20. S-ro Maddern estis la parolanto. Je 28/9 Ges-roj Schepers prezentis sonbendprogramon. Nia klubo decidis donaci \$20 al nia junula klubo por subteni ĝian film-projekton.

Sydney: 13/9: La prezidanto menciis, ke la Esp. Fed. de N.S.K. deziras reklami E-on pli bone, ekz. en Reader's Digest. La Societo decidis kontribui \$50 por tiu afero kaj, se necese, donaci ankoraŭ \$50 poste. Fritz Mueller -Sorau informis, ke 30 studentoj alestis lian unuan lecionon ĉe la Metodista Centra Misesjo. Viola Schlesinger montris lumbildojn de Fiĝio, Tahitio kaj Meksikio. Fiĝio kaj Tahitio estas belaj tropikaj landoj. Meksikio: konstruaĵoj faritaj de la Majaanoj antikvaj, ofte kun skulptaĵoj. Espereble ni baldaŭ vidos ankoraŭ el ĉiuj 900 bildoj.

20/9: Franz Franich plezurige ludis per sonbendo muzikon de Mozarto. 27/9: Frank Dunn parolis pri alfabetoj orientaj kaj okcidentaj — Cina, Japana, Hinda, Romiana, Greka k.a., informante kiel la

nunstilaj alfabetoj devenis el bildoj.

11/10: "Sur Vojaĝo", lumbildoj de S-ro N. Brodie: Haifo (la Templo Bahaia), Jeriĥo (la Monteto de Tento), la Morta Maro (kie ŝia edzo fosis sur la densa akvo, tenante libron enmane!) la Rejno, Koblenco, Munkeno k.a., la Jungfraŭ neĝkovrita . . . En Parizo: Statuo de Libereco kun Turo Eiffel fone. Nederlando: lando de tulipoj k.a. belbuntaj floroj; Usono: Falakvoj Niagaraj, kie oni kultivas lantanon por kontraŭi ter-erozion; la lumoj de Nov-Jorko kaj ĝiaj nubskrapuloj ĉe sunsubiro. Orea spektaklo! —G. E. Browne.

Manly: 16/9: La kutimaj kursoj okazis en la Vespera Lernejo, Darley Road, Manly. Altgraduloj poste alestis prelegon de S-ro P. E. Schwerin pri Vieno kaj Perto, kun lumbildoj.

23/9: Daŭris Elementa, Drama kaj Altgrada Kursoj. Lily Goldsmith gvidis altgradulojn en kartludo pri la Korelativoj.

24/9: Speciala Vespero en la Granda Halo de la Vesperlernejo, Darley Road. Programestro Robbie Robertson. Verkis kaj reĝisoris teatraĵeton "EN LA MALLUMO" Margaret Liston, Rolis May Baxter, Adrian Culey, Margaret Liston kaj Robbie Robertson. Skabeno F. S. Preacher prezentis lumbilde prelegon. Temo: Per vagonaro trans Siberion. Kontribuis al muzikaj programeroj Richard Moir, Margaret Liston kaj Adrian Culey. Ĉeestis membroj kaj aliaj Esperantistoj 25: ne-Esperantistaj vizitantoj 25. Poste ĉirkaŭ 20 membroj vizitis la hejmon de S-ino M. Liston por vespermanĝeto.

30/9: Roger Springer parolis pensige pri temo: "KIAL LABORI?" (Filozofia vidpunkto.)

7/10 Ĉiu el la altgraduloj prezentis erojn. Artikoloj aperis en 4 ĵurnaloj ĉi-semajne: "Manly Daily", "Pacific Times", "Warringah News", "North Shore Times".

14/10: Sub gvido de Lily Goldsmith, altgraduloj partoprenis en kart-ludado, kiu donis ekzercon pri verboj.

16 kaj 17/10: Multe da Manliaj Klubanoj veturis al "EVERGLADES" Motelo, Leura (en la Blua Montaro) por partopreni en Konferenco de la Esperanto-Federacio de N.S.K. Post la Konferenco ĉiuj alestis specialan festmanĝon por celebri la datrevenon de la Esperanto-Federacio. Sekvis distra vespero. Programestro: Arthur Cocking. Bedaŭrinde, pro malsano, Marjorie Duncan ne povis ĉeesti. Tamen, la programo organizata de ŝi, kun Margaret Liston kaj May Baxter, grande sukcesis. —P. Ford Lewis ("Fenikso").

Perth: 22/9: la Ligo kunvenis ĉe Suda Perto. Anoj kiuj deziras plibonigi sian lingvokapablon aparte rondiĝis por sin ekzerci. Pri gramatiko ili uzis: "Teach Yourself Esperanto". Orel-ekzerce la grupo aŭskultis la voĉon de S-ro Maddern per sunbendo. S-ro Dean lumbilde prelegis pri la antarkta regiono, klarigante en E-o.

13/10: Liganoj bonvenigis grupon da studentoj (Instruista Kolegio) kiuj elektis lerni E-on. Sub gvido de D-ro Caldera tiu grupo nun atingas gradon de kapablo por partopreni societajn aferojn. Meritas mension juna studento de ne-Stata kolegio, memlernanto kiu facile parolas E-on. Ludo aranĝita de S-ino Palmer komencis la programon. D-ro Caldera legis amuzan poemon de Baghy. La studentoj prezentis teatraĵon: Ŝi (de R. Mackey). Amuzajn rakontojn elparolis la prez-o, S-ino Blockley, F-inoj Lindsay, Gray kaj Hunt. S-ino Einihovici parolis pri vojplano al Kvinlando, kiun ŝi kaj D-ro Einihovici intencas efektiviĝi dum la sekvontaj semajnoj. Finis la vigan vesperon klarigo pri la mirinda laboro de S-ro Maddern pri enkonduko de E-o en lernejojn.—G. Pollard.

Sunshine Coast (Q'ld) S-ino Doris Sinclair daŭrigas sian bonan laboron en ĉi tiu regiono. En ŝia hejmo en Caloundra okazas kursoj ĉiun mardon vespere kaj ĉiun ĵaŭdon posttagmeze. Ĵaŭdvespere ŝi veturas al Buderim por instrui tiean grupon, kaj ĉiun duan lundon S-ino Sinclair veturas 20 mejlojn de Caloundra al Nambour por instrui klason tie. Gratulojn al ŝi pro la sukceso instigi la lokan konsilantaron eldoni esperantlingvan aldonon al anglalingva turista broŝuro.

Fondkunveno de Esperanto-Federacio de Kvinlando

La 3-a de Oktobro estis grava tago por ĉiuj kvinlandaj Esperantistoj. Okazis la fondkunveno de la Esperanto-Federacio en ĉi tiu ŝtato. 36 personoj ĉeestis kiam Skabeno C. Kroll, urbestro de Redcliff, malfermis la kunvenon ĉe "Sutton House". Inter tiuj kiuj veturis longajn distancojn troviĝis S-ro C. Goldsmith, AEA Sekretario el Manly, S-ro Collier el Bowen kaj Ges-roj Petley el Too-woomba. Elektiĝis la jena Estraro: Prez. S-ino Doris Sinclair (Caloundra); Vic-Prez: S-ro R. Memmott (Redcliffe), S-ro W. Ray (Caloundra); Sekretario: S-ino D. Styles (Redcliffe); 2-a Sek: S-ro R. Ritchie; Kasisto: S-ino A. Pritchard (Redcliffe); Publikaj Rilatoj: S-ino L. Memmott (Redcliffe). Kotizoj estas 50c por individuaj membroj kaj \$1.00 por kluboj. —El raportoj de S-inoj D. Sinclair kaj V. Robinson.

RAPORTO DE LA N.Z.E.A.

La ĉiujara Semajnfina Renkontiĝo en la Aŭklanda regiono okazis en Aŭklando 11-12/9. Ceeŝtis ankaŭ E-istoj el Gisborne, Napier, Palmerston North, Wanganui, Whangerei, Te Awamutu kaj Wellington, kiuj per tio pasigis agrablajn tempon en E-ujo. Inter ili estis la prez-o kaj ĝen. sek-io de NZEA: S-ro J. T. Allan kaj Majoro H. W. R. Petersen respektive (Wellington); ankaŭ S-ino Jean Wilson, sek-io de la Novzelanda E-Instruista Asocio (Wanganui). Ili ĉiuj piriĉigis la programon.

Ceeŝtis la Renkontiĝon ĉ. 60 gesam-oj. En la programo: bonvenigo, lingvaj kaj literaturaj sesioj, prelegoj, skeĉoj, muzikaj eroj, kantado kaj 2-hora aŭta ekskurso tra kelkaj suburboj kaj laŭ la fama pejzaĝa veturejo tra mejloj da indiĝena arbaro sur la supro de montĉeno proksima al la urbego mem. La aŭtoj haltis por ebligi rigardon al la panoramoj de Aŭklando, la du havenoj (Manukau kaj Waitemata) kaj la oceanoj (Tasman kaj Pacifiko).

Notinde, ke forestis aferkunsidoj. Dum la sesioj Aŭklantaj E-klubanoj kaj membroj de la Internacia Lingva Societo regalis la partoprenantojn per lunĉoj kaj te-kafrinkajo. Ne bezoniĝis alkoholajoj por garantiĝi sukceson!

La tri ĉefaj celoj de la Renkontiĝo estis atingitaj: geamikoj denove kunvenis; E-o estis praktike uzata; la Internacia Lingvo antaŭeniĝis.—W. H. K. 19 sept.

LIBRO-SERVO

NIA SANGO, teatraĵeto (Boulton) 30c.
VOLE-NOVELE (Schwartz) \$6.25.
CARTO de Unuĝintaj Nacioj 70c.
SENGENAJ DIALOGOJ,, popular-scienca, (A. Fernandez) \$3.50.

U.E.A. KOTIZOJ

Pro devalorigo de la aŭstralia dolaro prezoj iomete altiĝis: UEA (kotizoj): J-MJ \$2; MA \$8; D.V. \$160; J-MA \$6; MS \$12; MJ \$4.

Gazetoj: British E-ist \$3; Heroldo de E. \$4.80; Norda Prismo \$3.20; Esperanto Gazeto, \$2.15; Germana E-isto, \$3.60; Espero Katolika \$3; Dia Regno \$3; Monda Lingvo-Problemo \$6.65.

TO WHOM TO PAY

Examination Fees and A.E.A. subscriptions: To C. Goldsmith.

U.E.A. and B.E.A. subs., gazettes: K. Linton.

"Oomoto" (only): F. R. Banham.

BIRDS

Ken, Hadler, The Crofts, Hastings England, asks for bird-lovers among Australian E-ists to contact him.

PRI CIGAREDA REKLAMO

Cigared-firmao reklamas per televido. Ĝi supozas, ke en ĉiuj homoj estas latentaj snobeco. En ĝia cigareda regno oni paŝas en luksa paradizo de sociaj elituloj—multekostaj mebloj, dikaj tapiŝoj, mur-tapetoj, kandelabroj, servemaj kelneroj k.c.

Bildeto: la ĉefa aktoro, S-ro Skubastono, ridetas grandsinjore al sinklinanta kelnero, dirante: "Mi estas certa, ke la hotelestro Jakvo bone memoras pri mia preferata mendo". Tiam, sin turnante al sia kunulo: "Je nia renkontiĝo ĉe la Brazilia ambasadorejo ni rimarkis, ke ni havas komunan intereson pri la mond-merkato de baŭksito". Certe estas, ke la du ŝajnaspektaj riĉuloj ne sciis: kiuj estas baŭksito, eĉ se ili rompus la piedon kontraŭ bloko da ĝi. Ili sigelas sian honoran kontrakton en nubo da fumo, laŭdante ĝian aromon, kaj pompe paŝas eksteren al siaj aŭtoj de plej bona marko.

Alia: Lordo Sencenda diskutas kun Skubastono pri multmiliono ter-negoco. Post interŝanĝo de paroloj grand-financaj, kaj bonamike konsentinte inter si pri grava negoco, ili finas la farson en nikotina nebulo.

Konfesinde, tiuj reklamoj bone profitigas la firmaon. Ĉiu cendo, kiun ĝi elspezas, luante tiarojn, vizon-peltajn jakojn, kandelabrojn kaj dudekdolarajn milionulojn, riĉe portas rekompencan, per kreskanta vendo de la allogaj ĉer-najloj.

Bedaŭrinde estas, ke ĝiaj reklamoj ne havas pli admirandan celon, anstataŭ stimulan al maladmirinda flanko de la homa karaktero—nome, la snobeco.

Eino Looorits, Hobarto.

"Mercury Northside" (Hobarto) 23/9 informas, ke li, homo de multaj interesoj, ankoraŭ laboras por E-o Scipovante kelkajn lingvojn, li foje interpretas oficiale, sed E-o estas lia ĉefa "amataĵo". Ĉiujare li sendas alilanden milionon da poŝtmarkoj, kun konsilo pri la I. L. Ĉu kredeble! Kiom estas la ĵara sumo de lia afrank-elspezo? Por daŭrigi sian laboron, li petas (prunte) donon de E-gazetoj de 1928 ĝis 1945. Kompreneble li pagus poŝtokoston.

LINGVA DEMANDO

Pri frazo sur p. 156, kol 1: ". . . kian valoron havas varbi novajn kursanojn . . ." H. K. volis diri: "varbi novajn kursanojn havas nenian valoron". Tie, "varbi" = la varbado de . . . Tiu uzo de infinitivo kun transitiva verbo estas nekutima. Infinitivo povas stari kiel subjekto de frazo, sed ĝenerale nur kun

la verbo "esti", Ekz. "Resti kun leono estas dangere"; "Trofumi estas malsaĝe". Ordinare oni uzas substantivan formon, se sekvas rekta objekto. Tial, prefere ol diri: "Trofumi detruas la sanon", diru: "Trofumado detruas . . ." Pli klara kaj bonstila do: "Kian valoron havas varbado de novaj kursanoj, se . . ."

"VORTOJN SPARU . . ."

Licea profesoro pri franca lingvo pasintjare komencis instrui ankaŭ la indonezian. Sed li trafis en malfacilon, ne havante legolibrojn en tiu lingvo per la lerneja biblioteko.

Plurfoje mi parolis al li pri Esperanto. Pro ĝentileco li subpremis oscedon. Li aludis malsate pri "tiu afero", ne volante nomi ĝin "lingvo". Kiam mi menciis la problemoj pri legajoj en la indonezia lingvo, mi pruntis al li "Women in Indonesia" — bela dulingva (indonezia kaj angla) libro, kiun la aŭtorino, S-ino Datoe Toemengoeng, donacis al nia membro Jack Hawks, kiel memorajon de lia vizito al ŝia lando. La profesoro estis ravita, "De kie vi ricevis tion?" li mire demandis. Li tuj fotokopiigis la tutan libron.

Sed ankoraŭ mankis legajoj. Mi montris al li la Jarlibron de UEA kaj parolis pri la delegita reto. Li "tute ne sciis, ke tio ekzistas", sed restis skeptika. Ho ve! Por Indonezio estis nur unu sola adreso. S-ino Toemengoeng jam mortis. Ĉu tiu samideano en Semarang kunlaboros? Mi skribis urĝan peton kaj preĝe, sopire atendis.

Post nelonge respondis en bonega Esperanto la delegito en Samarang, Javo. Mi sendis tradukon al la profesoro. Dum la lernejaj ferioj alvenis du libroj en la indonezia. Denove la profesoro estis ravita. Skribis tiu delegito: "Estas interese, ke via amiko lernas la indonezian; dume mi lernas la anglan . . . Estas mia espero, ke tiuj libroj plaĉos al via amiko, kaj se li deziras aliajn legolibrojn mi sendos ilin interŝanĝe kontraŭ anglalingvaj aŭ Esperantaj haveblaj en via lando". Dankon, Liem Tjon Hiel Per via tuja kaj afabla kunlaboro vi trafte montris al skeptikulo la validecon kaj valoron de la Internacia Lingvo. Neniu vortoj miaj povus same efiki.

"Vortojn ŝparum agojn faru". Mia freŝdata sperto montris ĝin saĝa konsilo. —Ruth McGrath. (El la "Nigra Cigno").

ARTIKOLO ĈE PROPRAJ NOMOJ

Kiam la propraj nomoj estas akompanataj de epiteto, oni uzas la artikolon: Ludoviko la dekkvara; Frederiko la granda; la bona Dio; la tuta Italujo; la

larĝa Danubo; la venonta mardo.

Kiam la propraj nomoj estas nome-sprimoj kun anoncivorto, oni uzas la artikolon antaŭ ĉi lasta: la reĝo Salomono la princo Ramzes; la pastro Ezra; la rivero Gango; kaj cetere. —"La Plena Gramatiko", p. 199, Kalocsay kaj War-inghien.

Artikolo devas stari antaŭ la propraj nomoj, se ili havas **adjektivan epiteton**: La bona Dio, la kuraĝa Petro; Rikardo la Leonkora; la du fratoj van Buck; la brila Parizo; la potenca Britujo. Sed se la epiteto estas **substantiva**, la artikolo mankas: Reĝo Filipino, reĝino Kleopatra; saĝulo Natan k.s. Nur la river- kaj **montonomoj** (kiuj havas artikolon ankaŭ solaj) havas ĝin ankaŭ kun substantiva epiteto: La rivero Danubo, la lago Bajkal, la monto Gerardo. — Kalocsay en "Lingvo, Stilo, Formo", p. 73.

Tiu ĉi dua konsilo ŝajnas nenecese komplikata; prefere oni sekvu tiun de "P.G.", tial ĉar ĝi estas facile memorigata.

BONVOLU RIDETI

Diris virino: Post kiam niaj gefiloj geedziĝis, kaj ni estis solaj en la hejmo, mia edzo kaj mi kutimis ĉiunokte viziti la urbon por nin amuzi. Sed fine tio fariĝis teda, do ni restis hejme — li sidis en sia seĝo, mi en mia, ĉiuflanke antaŭ televido. Unu vesperon, post semajnoj da jam rutina televida rigardado, la edzo surprizis min, dirinte: "Ho, ni faru ion vere ekscitan hodiaŭvespere, ĉu ne?" Tre plaĉe mi aŭdis tion, mense bildante gajan tempon ĉe ia plezurloko en la urbo. "Kion do ni faru, vi kaj mi?" mi gaje respondis. Li diris, jes li diris: "Ni interŝanĝu niajn sidlokojn".

Plumbisto, aŭ tubisto, jam riparas la gut-gutadan klapeton en la hejmo kaj tiam informis la dommastrinon, ke la kosto estas tridek ŝilingoj. "Tridek ŝilingoj por nur dekminuta laboreto?" ŝi ekkriis, indigne. "Jes, sinjorino, ni devas pagi por horlonga laboro — la minimumo fiksita por plenumi vokon al servo. Tio estas principo de la kompanio".

Respondis ŝi: "Se estas tiel, vi sidigu kaj komencu paroladon — vi havas ankoraŭ kvindek minutojn".

Komencisto estis klariganta al sia filo la principojn de la komerca etiko; li donis la sekvantajn ekzemplojn:

En unu el niaj butikoj viro aĉetis kelkajn aĵojn ĝis iom pli ol dolaro. Limise suposis transdoni monpaperon dudolaran, murmurante: "Jen du dolaroj".

Iom neatente, mi enkasigis la bankbileton kaj donis al li la monrestaĵon. Kiam li estis for kelkan tempon, mi rimarkis, ke la bankbileto lia estas ne dudolara, sed dekdolara, Nun, filo, leviĝis la etika demando: Ĉu aŭ ne mi sciigu mian kunfirmanon pri tiu eraro? Kiel vi sentas pri tio, filo mia?

Du bovbredistoj parolis telefone pri vendo de kvar bovoj. La aĉetulo proponis prezon de tri mil dolaroj; la vendulo postulis tri kaj kvindek. La sekvantan tagon la aĉetulo ree telefonis la vendulon, demandante, ĉu li jam ŝanĝis la penson kaj nun akceptus nur tri mil. Tiu respondis: "Ne. Tamen mi akceptus tri kaj dudek kvin dolarojn". Diris la aĉetulo: "Ĵetu moneron sur tablon. Se ĝi falos kapo supren, vi gajnos kaj mi pagos vian prezon; se ĝi falos male, mi gajnos, kaj pagos nur tri mil". La vendulo konsentis. Tra la telefona fadeno iris la sono de monero falinta sur tablon. "Ĝi falis male", raportis la vendulo, "venu kaj prenu viajn kvar bovojn".

RECENZOJ

"**Bona Ŝanco**": Werner Bormann. Dek du prelegoj pri la Internacia Lingvo kaj la Sociaj Sciencoj. Eld. Stafeto. 247 paĝoj. \$3.60.

Vera "faklibro de la E-a Politiko", kun detala pritrakto de ĉiu sektoro en kiu E-o havas rilaton. La prelegojn li faris antaŭ gravaj E-kunvenoj: Eŭropo kaj la lingva problemoj; Unesko, edukado, trafiko, scienco, filologio . . .

Li esprimas opinion, ke la sperto jam instruis, ke la oficiala enkonduko de E-o ne estas atingebla "de sube", nome per sufiĉe impona amas-uzado de la popoloj mem, sed per potenca premo kaj penetro en rondojn gravajn, kiuj influus sur la registarojn, nome "de supre".

Menciinte, ke Kalocsay en sia traduko de "Reĝo Lear" ne plu uzis malvortojn, li vidas en tio ĝeneralan interlingvistikan tendencon sin movi for de "skemeco" al "naturalismo". Ekzemplo estas la iompostioma enkonduko de vortoj por uzo paralela kun la indiĝenaj, kunmetitaj; kurta, mallonga; dura, malmola; aperta, malferma; lontana, malproksima. Tio estas observebla jam de la frua tempo ĝis nun. Zamenhof mem montris la direkton, mem tiel farante. La genie kompromisa strukturo de E-o donas al ĝi ĝian vivkapablon, ĝian pli ol 80-jaran stabilecon.

Pri la lingva diskriminacio kaj ĝia ideala forigo, la aŭtoro konfesas, ke ĝi prezentas gravajn malfacilojn, malgraŭ principa bonvolo. En la strukturo de la

internacia lingvo mem, oni povas vidi "diskriminacion", necesan pro la nepra bezono ĝin krei precipe al limigita aro da lingvoj—nome el la kulturaj lingvoj de Eŭropo.

Pri tio, kion oni foje nomas ia "stagnado" en la movado, li atentigas, ke por E-o, kiel por ĉiu ideala afero, zigzage oscilas favoraj kaj nefavoraj tempoj. Hodiaŭ la homoj iluzie fidis al la tekniko-mistiko, kies mankoj nur poste evidentigos. Ambaŭ tempospecojn E-o jam sukcesis tralukti, progrese aŭ male. Dume ni tenu nian pozicion, nin perfektigante por "naĝi kun la fluo" en estonta favora por ni tendenco. Tempo nefavora, eĉ malfavora, ne estu tempo neaktiva. Talibre stelbrilas la baza optimismo de D-ro Bormann, docento de E-o, Hamburga Univ., kaj prez-o de la Germana E-Asocio.

"**Estiĝo de la Tero kaj de la Homo**": Leander Tell. 124 paĝoj. 2.00 dol. Eldonis Stafeto, Tenerife.

La aŭtoro, la plej fama Sveda speleologo (grotesploristo) per plaĉe konversaca stilo "plume parolas" pri la estiĝo de la materio, de la terglobo, kaj pri la origino kaj aĝo historia de la homo kaj ties korpa kaj kultura evoluo tra jar-miliono.

El sia praktika fak-sperto Tell klarigas pri la mirinda grotmondo funde sub la terkrusto. Unu groto estas longa 104 km. Alia esplorita estas funda 1180 metrojn.

Li tuŝas la problemon de praa skribado, la formiĝon de komunikado inter homoj, buŝe kaj litere, kaj lumige kontrastas la samtempan edukadon de homideto kun ĉimpanzido sub simila zorgo-flego.

La libreto estas genie simpla sintezo per kiu la aŭtoro sukcese skizas la jamajn sciojn pri sciencaj temoj vastege komplikaj. Ĉiu inteligentulo, per tauga legatento, elirus profiton de ĝiaj paĝoj.

Unu lingva rimarko: p. 31: troviĝis vasta meseto (t.e. altebenajo)". Hispane "mesa" signifas table en la Angla. En suda Usono "mesa" estas altebenajo: montplatajo: Angle — plateau. "Meso" estas en E-o religia vorto. Uzti la formon "meso" por altebenajo estas certe nebona. Krome; kial "meseto", por nomi "vastan" altebenajon?

Rekomendinda estas tiu plaĉe verkita faktaro, kompilita tiel tre pacience.

Secondary School Esperanto, Book 2: R. H. M. Markarian and J. H. Sullivan. University Tutorial Press Ltd., London. 181 pages, £1.

Book 1 was reviewed in "The A.E.", Jan.-Feb., 1969, and the favorable impression there expressed is valid also for

Book 2. Both are designed for teachers with pupils aged 11 and over. The present edition adds about 500 new words and nine affixes. In Book 1 are 800 words and 17 affixes. Thus, on reaching the final pages and having mastered the principles of word-building, one should have a vocabulary of from three to four thousand words—twice that possessed by many sixth-formers after seven years' work in a national language.

The contents are: 20 lessons, passages for translation, verses, songs and playlets. In an appendix: project work with foreign schools, word lists, two-way vocabularies, audio-visual material. The amusing illustrations of Kenneth Wootton are supplemented with three fine photos.

Not all teachers will see the value of introducing jumbled words to be un-(anonco), naslaam (malsana), serlikpuba, molij . . . regarding this as unnecessary brianwork that could be profitably spent on positive learning. Some pupils, however, may be amused by reason of the play element in the "game".

Among suggestions: write simple verses, make up crosswords, fashion Christmas and Easter cards with Esperanto text etc.

The authors are highly competent in both Esperanto and education. Dr. Mario Pei again provides the foreword.

The two books are excellent course-guides and should go far to aid those teachers who are relatively recent students of Esperanto, especially those in non-professional circles—home, clubroom or similar classes. Careful preparation by such thorough detailed study of each exercise and mastery of fluent enunciation, should ensure firm self-confidence in the teacher and so, a clear presentation to the pupils.

"El Popola Ĉinio" por 1972

Jam komenciĝis kampanjo por akcepti abonantojn de "El Popola Ĉinio" por 1972. Ĝi estas monata gazeto kun multampleksa enhavo, riĉe ilustrita kaj kun kolaraj bildpaĝoj. La kampanjo daŭras ĝis 31/3/1972. Ĉiu abonanto senpage ricevos belan esperantan kalendaron. Abonprezo: por 1 jaro: \$0.50, por 2 jaroj: \$0.75, por 3 jaroj: \$1.00 Abonilon kaj prov-numeron oni povas peti senpage rekte de Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

"Biblia Revuo", jan.-marto, n-ro I. Havebla ĉe D-ro D. Broadribb, Univ. de Melbourne, 3052. \$6 Usonaj aŭ ekvivavalento.

Pri la Problemo de Biblia inspiro — homaj kaj Diaj aspektoj. Studo pri Islamo, la tria en serio. La dilemo Kristana pri anima libereco, kun akcento sur la konceptojn pri Dio. Pri la lando Golan (Readmono 4/43), arkeologie, historie; sceno de batalo en 1967, "ses-taga milito".

La kajero valoras ankaŭ pro la multaj recenzoj, resumoj k.t.p. de pribibliaj libroj kaj gazetoj. El "Novajoj": La Internacia Biblia Societo starigis en kvin landoj fajr-imunajn ĉambrojn en kiuj konserviĝas Bibli(part)oj en 1280 lingvoj.

En 1970 aperis en Usono la Nova Amerika Biblio (Katolika) — la tria nova Anglalingva Biblio dum la pasintaj kelkaj jaroj. Antaŭis ĝin la Jerusalema Biblio kaj la Protestanta Nova Biblio.

Pro altiganta kosto la Revuo jam aperas kvaronjare anstataŭ dumonate. Pli oftan aperon ebligus pli multe da abonoj.

"Klerco por hodiaŭ kaj morgaŭ": La eduka sistemo en la Germana Demokrata Respubliko. Centra Laborrondo Esperanto de G. D. R., 108 Berlin, Charlottenstr. 60, D. D. R. 68 paĝoj. Prezo ne indikita.

Detala trakto pri la principoj laŭ kiuj edukigaĵas la gejunuloj en G. D. R. Forte substrekata estas instruo matematika; iom malpli, laŭ sekvanta ordo: fiziko, sporto, desegno, muziko, metilaboro. Mankas mencio pri lernfakoj: retoriko, filozofio, poezio, antikve klasika literaturo, ŝajne ne rigardataj kiel popoleduke taŭgaj lernfakoj. Nur la Rusa lingvo — kiel fremda — estas listita en la instru-horaro.

Oni legas (ĉ.4), ke la tuŝ-ŝtono por ĉio interpretebla estas la Marksismo-leninismo, kiu ekzakte difinas la leĝojn laŭ kiuj evoluas la homa socio. Estas komparata la tielnomata "unuflankeco ideologia" en G. D. R. kaj en Usono. En G. D. R. "lernantoj edukigaĵas al ŝtatkonsciaj civitanoj", kaj en Usono "instruistoj devas juri lojalecon". "En ĉiu civilizita lando unuflankeca prezento de instru-materialo estas agnoskata . . ."

Legantoj profite komparas la enhavon de ĉi libro kun tiu de similaj eldonoj.

POLAND

"An estimated 80,000 people in Poland know the language Esperanto".—Pola Radio, cited in "Contact", 8/71.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 102 (182)

MELBURNO

Decembro, 1971

BONVENON AL MELBURNO!

La membroj de la kvar Melburnaj Esperanto-grupoj ĝojatendas vian alvenon por la 18-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, kiu okazos de la 2-a ĝis la 8-a de Januaro 1972 en la bela "Queen's College" de la Melburna Universitato.

Ni preparis por vi varlan kongresprogramon. Prelegoj informriĉaj kaj distraj alternos kun interesaj ekskursoj kaj gajaj amuzvesperoj.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, tuj faru tion. Informu nin ankaŭ kiam vi alvenos, ĉu fervoje, ĉu aere, por ke ni povu renkonti vin kaj transporti vin al la Kolegio. Se vi perdiĝos en Melburno, telefonu la estron de nia transporta servo (S-ron M. Fordham) ĉe 56-6286.

Intertempe, Bonan Vojaĝon deziras al vi la Kongresa Komitato.



Congress Fee for A.E.A. members: \$6 dol. For others 7 dol. Non-attending members: \$2.50. Send your room reservation (5 dol. deposit) and Congress Fee to Esperanto Congress Secretary, Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

10th List of Congress Members:

133. Miss A. Curtis, Nth. Tamborine, Q'ld.
134. Mr. L. Casey, Sth. Caulfield, Vic.
135. Mr. I. A. Ross, Hornsby, N.S.W.
136. Brig. J. Munro, Port Melbourne, Vic.
137. Mr. Barrie Payne, Cronulla, N.S.W.
138. Miss Michele Payne, Cronulla, N.S.W.
139. Miss Cath. Payne, Cronulla, N.S.W.
140. Mrs. Vera Payne, Cronulla, N.S.W.

141. Mr. A. Cocking, Dee Why, N.S.W.
142. Mrs. L. Cassidy, Richmond, Vic.
143. Mrs. Sue Blockley, Mosman Park, W.A.
144. Mrs. R. L. Horsburgh, Tottenham, N.S.W.
145. Miss Olive Hunt, Cottesloe, W.A.
146. Mrs. Nelly Claxton, Sth. Perth, W.A.
147. Miss Lorna Samblebe, Camberwell, Vic.
148. Mr. J. Allen, Norman Park, Q'ld.
149. Mrs. J. Allen, Norman Park, Q'ld.
150. Mrs. A. H. Callaghan, Norman Park Q'ld.
151. Mr. E. Hearne, Blackburn, Vic.
152. Mrs. E. Hearne, Blackburn, Vic.
153. Mr. A. Culey, Wahroonga, N.S.W.
154. Miss Jessie Gray, Subiaco, W.A.
155. Mrs. Th. v. d. Boogaard, Semaphore, S.A.
156. Mrs. F. Rawson, Hawthorn E., Vic.
157. Mrs. Mary Horsfall, Mosman Park, W.A.
158. Mrs. Jessie Clarke, Woody Point, Q'ld.
159. Mr. Vic Clarke, Woody Point, Q'ld. (at present in England)

11th List of Congress Members

160. Mrs. F. H. Walter, Canterbury, Vic.
 161. Mrs. C. Rowbottom, Canterbury, V.
 162. Mr. K. N. White, Arncliffe, N.S.W.
 163. Mrs. F. Mackintosh, Mt. Dandenong
 Vic.
 164. Mr. W. Grafen, Malvern, Vic.
 165. Mrs. V. Africh, Perth, W.A.
 166. Mrs. E. Graham, Mylestom, N.S.W.
 167. Mr. P. Henderson, Lane Cove,
 N.S.W.
 168. Mr. L. McLochlan, Glen Waverley,
 Vic.
 169. Mr. Jim Dimo, Rochester, Vic.
 170. Mrs. Jennifer Dimo, Rochester, Vic.

State Distribution: Vic. 85; N.S.W. 46;
 Q'ld 18; W.A. 14; S.A. 4; A.C.T. 2;
 Tas. 1.

This month's winners of Book Prizes are: No. 140, Mrs. Vera Payne of Cronulla, N.S.W. and No. 150, Mrs. A. H. Callaghan of Norman Park, Q'ld. They will receive their prizes during the Welcome Evening (Sunday, 2nd January, 1972).

If you have not yet done so, you should immediately book your seats for the Bus Tours. Do not send any money, but make your reservation without delay.

A.E.A. OFFICIAL NOTICES**15th November 1971****New Individual Members**

Williamson, Miss H. J., Kogarah, N.S.W.
 Bowden, Mrs. G. M. L., Kilsyth, Vic.
 Petersen, Miss J., Dromana, Vic.

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$975.43
Koppel, Mr. H., Vic.	1.00
Moore, Mr. J., Q'ld.	5.00
	<hr/>
	\$981.43

Sincere thanks to all helpers.

Interstate Competition**Positions on 15th November, 1971**

	Quota	Points	%
Queensland	130	894	687.7
N.S.W. - - A.C.T.	260	1130	434.6
Victoria	300	1289	429.7
W. Australia	80	248	310.0
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	57	142.5

This competition will conclude on 30th November, 1971.

KURAGA ENTREPRENO

The advertisement referred to in recent issues of the "Australian Esperantist" will

appear in the January issue of the "Reader's Digest". We hope that it will help all local societies, and that it will bring us so many enrolments for correspondence courses that we shall be able to continue the experiment. Here is another list of donations which have helped to make this possible, and we believe that we shall very soon have received the total required.

Already acknowledged	677
Hopkins, Mrs. T.	20
Fletcher, Mr. V. E.	25
Brisbane Esp. Soc.	50
Gray, Miss J.	12
Hunt, Miss O.	12
Williams, Miss B.	20
Dennys, Miss A.	5
Blockley, Mrs. S.	20

\$841

And here are a few short extracts from letters typical of many received.

"Malgraŭ la plendo kaj kontraŭstaro en "Libera Forumo" mi tutkore akordigas kun vi pri la valoro kaj rezulto de la reklamo. Laŭ mia opinio tiu entrepreno ne estas "aŭdaca" sed "kuraga".

V. J. Timmins, Waitara, NSW.

"Tre plaĉas al mi por la Brisbana Esperanto-Societo sendi al vi ĉekon \$50 por subteni la reklamon en Reader's Digest. Mi devas skribi ke ĉiuj Brisbanaj Esperantistoj estas ĝojaj, eltrovi ke la nova jaro komenciĝos laŭ tiu pozitiva maniero".

Val Robinson, Sekretario.

"This is a very quick note (for I am very, very busy) to say I will back your publicity campaign to the extent of \$100, in the name of the Morwell Esperanto Club".

I. T. Maddern, Morwell, Vic.

"I have just returned home and found a mass of Esperanto reading matter awaiting me. The best news was your proposal to advertise in the "Reader's Digest".

V. E. Fletcher, Bowral, N.S.W.

"Please forgive my lateness in writing to congratulate you on your publicity idea. I would like to be in it and am enclosing a small share".

Olive Hunt, Cottesloe, W.A.

"Have only just caught up with the October issue of A.E. Would be pleased to promise \$20 towards the Reader's Digest ad. Hope this is not too late".

Barbara Williams, Camberwell, Vic.

"I congratulate you re the advertising project and wish you every success, and enclose donation \$20".

Sue Blockley, Mosman Park, W.A.

"I was delighted to read the October number of the Esperantist and trust that your appeal to make things move in connection with Esperanto will be very successful".

Amy Hopkins, Tatura, Vic.

"I think your new campaign very ambitious but nevertheless worth trying. The idea has strength, and probably it pays to think big and lift the status of Esperanto".

Mary Fordham, Chadstone, Vic.

As I said last month, **kunlaboro venkos**, and it will.

—Tiny Goldsmith, Secretary.

AUSTRALIA KRONIKO

MELBOURNE: Je 25-a Okt. S-ino Fay Koppel legis leteron de nia Vic-Prezidantino, S-ino Valda King, kiu estas nuntempe en hospitalo; aliaj klubanoj kontribuis al la programo, legante ĉerpajojn el transmaraj E-gazetoj.

S-ro F. R. Banham, 1 Nov., prezentis duflankan aron da verkoj. Seriozaj temoj pritraktis la "Historion kaj personecon de diversaj eminentuloj de la E-movado," kaj la demandon "Kiel impresi al interesatoj". La unua malkaŝis surprizajn ciferojn pri kleraj homoj, kiuj faris kontribuojn al E-o, sed poste mem ellaboris internacian lingvon. La dua emfazis, ke la praktika uzado de E-o pli gravas ol emblemoj kaj insignoj. Sekvis pluraj ŝercrakontoj, kiuj gajigis la ĉeestantojn.

La klubanoj diskutis, 8/11, la neceson plialtigi la klubkotizon (al \$5) kaj kiel pligrandigi la kluban enpezon.

SYDNEY: 18/10: Giuseppa La Rocca, kiu estis membro de la Bologna E-Klubo, ricevis de ĝi lumbildojn, kiujn Margaret Chaldecott priskribis per sonbendo. Jen bildoj de antikva baziliko, palacoj kaj preĝejoj de Bologno, ankaŭ gloraj artaĵoj de famaj Italaj pentristoj. Jen diversa afero: Fritz Mueller-Sorau disdonis ruĝan karton kaj bluan karton al ĉiuj ĉeestantoj, aranĝitaj en rondo. La ruĝa havis demandon en E-o, kaj la blua, respondon . . . pli ofte ne la ĝustan! La estro tiam legis de sia ruĝa karto, ekzemple: "Ĉu vi ŝatas min?" La najbaro tiam legis de sia blua karto, eble: "Ne, mi preferas fiŝon." Tiel daŭris la ludo, simpla sed tre ridiga amuzo.

25/10: Wre Chandler elektis gravan temon: La Diablo jam venkis". De post la Edena Gardeno la diablo, aŭ la malbono, penis venki la homan rason. Unue la satano instruis malobeon; poste deziron pri potenco. La homaro ne lernis la lecionon, sed daŭre mortigis unu la alian. Ekonomio, anstataŭ esti bono, estis malbono, ĉar la diablo metis avarecon en la

mon-sistemon por detruji homojn. Rezultis malpurigo, kaj nune estas atoma forĵetajo, oleo, veneno k.t.p. en la maroj. Sciencistoj asertas, ke eble post paso de 25 jaroj la homa raso estos detruita. Ĉu troviĝus kuracilo kontraŭ katastrofo?

1/11: Rene Asselin montris lumbildojn pri vojaĝo de Istanbul al Parizo. La ĉefaj antikvaj ruinoj de Grekujo, la origina Olimpiada lud-dromo; altaj rokmontetoj kun monaĥejoj sidigitaj sur la supro. Italujo: varie diversaj bildoj de Venecio. Poste, Romo: la ĉefaj lokoj, pitoreskaj kaj historiaj; la Papo, okaze de lia vizito al Sidnejo kun la granda Meso en la tiu-urba kurejo. Sekvis bildoj de Innsbruck, Munich, Luksemburgo kaj fine la Turo Eiffel.

Dolore ni informas, ke Anthony Feldmayr, 84-jara, forpasis subite la 6-an de novembro. Fonda membro de nia Societo kaj antaŭ 40 jaroj prezidanto, li estis fidela ĉeestanto.—G. E. Browne.

MANLY: 28/10 S-ro R. G. Robertson prelegis pri "Paroli kaj skribi ne sufiĉas por moderna klerulo".

4/11 "La membraro prezentas". Ĉiuj altgraduloj kontribuis.

5/11 Programo en la grand halo de la Vespera Lernejo: gitar-ludado; teatraĵeto; lumbildoj kun Anglalingva komentario, "Australian Inland Mission — Safari on the Track". Thora Richmond priskribis siajn travivaĵojn kaj poste montris diversajn indiĝenajn artaĵojn. Programestro Arthur Cocking.

Ĉeestis multe da anoj kaj 10 ne-Esperantistoj.

11/11 S-ro P. E. Schwerin: lumbildoj, kun prelego pri "Lucerne, Milan kaj Florence".

Ek de 16/9 okazis Drama Kurso ĉiulunde en la granda halo de la Vespera Lernejo, gvidata de Margaret Liston. "Fenikso".

PERTH: Kun profunda malĝojo mi raportas, ke nia estimata ano, Jack Finch, mortis pro akcidento. Sur motorciklo li koliziis kun aŭto kaj ĝismorte vundiĝis. Kelkaj Liganoj ĉeestis la solenan enterigon. Samdate, oktobro 27, ĉe kunveno ĉe Suda Perto, nia prezidanto parolis kortuŝe pri nia ĵus mortinta ano kaj lia entuziasmo pri Lig-aferejo.

En la kunveno F-ino Longson estris grupon da aspirantoj, kiuj celas al perfekta uzado de la E-a lingvo. La pli spertaj diskutis la subtilajn nuancojn de la E-gramatiko.

Nov. 10: Ĉe la Nedlanda Instruista Kolegio estis diskutata propono de la 'Cultural Development Council', ke ĉiuj kulturaj societoj en Perth havigu komunan lokon por konduki siajn respek-

tivajn celojn. La prokeo ampleksos centron bazitan sur la plano de la centro Griffin en Canberra, kaj nia E-Ligo ricevis inviton por helpi efektivi la entreprenon.

Sekvus lumbildoj, kiujn F-ino Stempel projekciis pri sia misia laboro en la Nov-Hebridoj. Tiel zorge ŝi aranĝis la bildojn kaj klarige komentis pri ili, ke ni vive-image vojaĝis kun ŝi eke de la marbordo de Aŭstralio, survoje vizitante belajn insulojn kaj ĝuante la tropikan pejzaĝon,, kiu ĉirkaŭas ŝian kampon de laboro. — G. Pollard.

CANBERRA: 7/10: Esperanto estis la ĉefa temo por la Tago de Vizitantoj ĉe la Narrabundah altlernejo. La malferma preĝo dankis Dion, kiu donis al ni buŝojn por paroli kaj kapojn por pensi. Lernanto parolis pri la Babelturo kaj la rezulta konfuzo de lingvoj. Phillip Grabham, prez-o de la lerneja E-grupo, skizis la evoluon de la E-a ŝatokupa klaso en sia lernejo. La KEK-prez-o, Noel Gamble, klarigis pri la kontribuo de D-ro Zamenhof al lingvoj, speciale al la fonetika alfabeto, tuŝante la malfacilan literadon de la angla lingvo kaj la avantaĝojn de fonetika alfabeto. La ĝeneralantoj forte indikis aprobon.

"Canberra News" aperigis foton de la afiŝo pri la Fontano de Sipestro Cook (kuk) en Kanbero kun nia E-a traduko, kiun ni sendis al la Kongreso en Rio de Janeiro. Bedaŭrinde la Aŭstralia Turisma Komisiono ne publikigis nian afiŝon en la UEA-a Jarlibro.

Frue en novembro nia prez-o, ekskurse al Kvinlando, portis kopiojn de la afiŝo al S-ino Doris Sinclair por la tri Sunbrilaj Marbordoj, E-kluboj kaj sciigis pri iliaj aktivadoj. Ni sendis kopiojn afiŝajn al la kluboj kiuj respondis al nia antaŭa propono en "A.E." kaj ni esperas porti kopiojn por aliaj kluboj al la A.E.A. Kongreso. Ni aranĝis Zamenhof nokton kiel rostfeston ĉe Telopea Parko 9/12. Detaloj poste. — Apudstaranto.

MAJUSKLO Aŭ MINUSKLO ?

"Zamenhof majuskligis nur la monatomojn, sed ne la nomojn de sezonoj, nek de tagoj. Lia uzado cetere ne estis ĉiam konstanta. Sajnus pli simple kaj logike skribi per minusklo ĉiujn tiujn vortojn, krom, kompreneble, kiam ili estas personigitaj, kiel ekz-e la Vintro en unu Andersen-fabelo". ("Plena Gramatiko")

Uzante minusklon ĉe monatomoj, oni neniel riskas miskomprenon, ĉar ĉiuj tiuj nomoj estas leksikologie unikaj, proprasencaj. Jam jardekojn kelkaj bonaj aŭtoroj uzadis minusklon ĉe monatomoj.

DIRU ĜIN NUN

Provinca kuracisto iam rakontis al mi historion pri paciento sia, paŝtstedzino, kies edzo estis forta, silentema homo, malema esprimi siajn sentojn. La virino, ĉiam delikata, suferis pro rompigitata apendicito, kaj estis rapide transportita al la hospitalo, kie, malgraŭ sukcesa operacio kaj sennombraj sangotransfuzoj, ŝi konstante plimalfortiĝis.

La kuracisto klopodis instigi ŝin al pli granda penado, dirante: "Mi esperis, ke vi strebos esti tiel forta kiel Johano". Al tio ŝi respondis: "Ho, Johano estas tiel forta, ke neniu li bezonas".

Tiun vesperon la kuracisto informis Johanon, ke mankis al lia edzino la volo resaniĝi. "Ŝi devas resaniĝi", insistis Johano. "Ĉu plua sangotransfuzo helpus?" Li havis samspecan sangon, do la kuracisto aranĝis rektan transfuzon.

Kuŝante tie, dum lia sango fluis en la vejnojn de lia edzino, Johano flustris al ŝi: "Mi devas nepre resaniĝi vin". "Kial?", ŝi demandis. "Ĉar mi tiel ege bezonas vin." li respondis.

Post iom da paŭzo ŝia pulso plirapidigis, ŝiaj okuloj malfermiĝis, kaj malrapide ŝi turnis la kapon al la edzo. "Neniam antaŭe vi diris tion al mi, Johano," ŝi diris.

La kuracisto finis sian rakonton. "Ne estis la sangotransfuzo", diris li, "kiu savis al ŝi la vivon, sed nur tiuj kelkaj vortoj de la edzo".

Kiel ofte ni neglektas diri la afablan vorton, kiam ĝi estas bezonata? Eble vi protestos, dirante, ke vi estas nur ordinara persono, kiu faras sian devon, kial do tia admono povas tuŝi vin?

Jes, eble vi protestos, sed la vero estas, ke tia admono tuŝas nin ĉiujn. Iun ajn momenton ni povus konstati, ke jam estas tro malfrue esprimi la prokrastitan vorton. Sankta Aŭgusteno iam diris: "Dio ja promesis pardonon pro via peno, sed Li ne promesis morgaŭon por via prokrasto".

Industriist-verkisto, Sherman Rogers iam rakontis al mi pri la tago, kiam li fariĝis ĉeflaboristo ĉe lignajista vendejo.

Tuj ĉe la komenco li preskaŭ decidis maldungi malgajan laboriston nomitan Tonio, kies tasko estis sabliz deklivon, por ke la gigantaj sledoj ne transkuru homojn aŭ ĉevalojn tie laborantaj. Tamen la posedanto konsilis al li tion ne fari.

"Mi sugestus," li diris, "ke vi ne ĝenu Tonion. Li estas ofte malgaja, malafabla, kaj malpacema, sed dum kvardek jaroj da lignaja laborado mi neniam renkontis plibonan sabliston. Nek homo nek ĉevalo estis iam ajn perdita sur lia deklivo".

January 1972

AFIKSOJ:—

G	Geografia	T	Teatraĵo
I	Infana	V	Vortoj
K	Kantlibro	Z	Muziko
L	Lernolibro (Textbook)	*	Rekomendita al Progresantoj
M	Movado	b	Broŝurita
N	Novelo, Romano	B	Bindita
P	Poezio	p	Pinglita
S	Teknika	**	Teksto Inkluziva

Conditions of Sale

The LIBROSERVO reserves the right to change prices without notice.

Add EXCHANGE of 5c to interstate cheques.

Allow a minimum of 12c POSTAGE. Books exceeding 1 lb. weight cost 65c to send interstate.

DO NOT SEND MONEY! Make postal notes and money orders payable to MAROUBRA post office. Make CHEQUES payable to "LIBROSERVO de AEA". RECEIPTS for account payments are sent only if 7c postage is included.

INDIVIDUAL AEA MEMBERS are entitled to 5% discount from the libro-servo provided they notify of membership with the order and pay within 14 days of receipt.

Send birthday and Xmas cards with your order for direct despatch to your friends.

Song books, brooches, badges, etc. will appear in next issue.

Information, Correspondence Courses,
AEA subscriptions please write to:
AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION
PO Box 415
Manly NSW 2095

Subscriptions to overseas magazines

Mr. K. LINTON
11 Poplar St
Sth Caulfield
Victoria 3162

LERNOLIBROJ

		Prezo
Corso di Esperanto (Itala)	C. Grazzini	L 250b 1-65
Daŭriga Kurso post Cseh Metodo	Saxl	*L 60b 1-75
Ellernu!	F. Szilagyi	*L 100b 1-70
Eng. Stories for Translation	H. Gee	*L 100b 55
Eng. Phrases & Expressions in Esp.	F. Woolf	*L 100b 1-95
Esperanto. A New Approach	W. Auld	L 90b 1-15
Esperanto for Beginners	M. Butler	L 24p 10
Esp. in 20 Lessons (Ned)	D. Bakker	L 130b 1-20
Esperanto-Kurso	V. Setala	L 48b 50
Esperanto laŭ Friis Metodo	Books 1-10 po	*L 30b 70
	Kompleta Aro	6-25
Esperanto por Infanoj	G. Soloman	L 100b 50
Esperanto Teacher	M. Stuttard	L 108b 50
Esperanto Tra la Mondo	6 Records & Book	18-25

Esperanto I	S. Istvan	*L 200B	1-70
Esperanto II	"	*L 200B	1-70
Essential Esperanto	W. Gething	L 130B	1-45
First Lessons to Young Children		L 30p	40
Gaja Leganto	P. Schwerin	* 48b	35
Hints for Speakers	M. Butler	* 10p	20
Intensiva Kurso de Esperanto	T. Nakamura	L 40p	40
Int. Language for Scouts	G. Rust	L 70b	25
Junulkurso Ilustrita	Vidu Diskojn	*L 90b	1-50
Jamborea Lingvo	J. Hammer	* 60b	65
Lingua di Tutti (Itala)	C. Grazzini	* 60p	15
Ni Parolu Esperanton	R. Markarian	* 40b	1-05
Notes on English Grammar	G. Lewis	* 45p	35
Paŝoj al Plena Posedo	W. Auld	* 240b	2-00
Plena Gramatiko I	Kalocsay kaj	* 180b	2-25
Plena Gramatiko II	Waringhien	* 270b	2-95
Por la Praktikantoj	P. Babim	* 80b	1-85
Practical Course in Esp.,	F. Szilagyi	*L 100b	50
Privilegia Vojo	V. Setala	L 100b	85
School Esperanto Course	A. Batt	L 64b	30
Secondary School Esperanto I	Markarian & Sullivan	L 140b	1-50
Secondary School Esperanto II	Markarian & Sullivan	L 270b	2-55
Step by Step in Esperanto	M. Butler	L 280B	1-50
Teach Yourself Esperanto	Cresswell/Hartley	L 200B	1-10

DISKOJ

Antaŭen	M. Numminen	K7"45	2-20
Donu al Mi Vian Manon	R. van Dalsem	K7"45	2-10
Espero, Ĉeriz Tempo, Adiaŭ	M. Santrueil	K7"15	3-00
Espero kaj Tagiĝo	Nagoya Ĥoro	K7"33	50
Esperantujo	P. Zeska	** 7"45	1-05
Feliĉo (kaj aliaj kantoj)	R. van Dalsem	** 7"33	75
Festparolado de la 49a Kongreso	I. Lapenna	M2X7"33	80
Impresoj pri Esp. Vojaĝo	D. Worcester	** 7"33	53
Internacia Elparolado	(4 Naciuloj)	** 7"33	53
Junulkurso (vidu lernolibrojn)		L5X7"33	2-50
Jamborea Lingvo	J. Hammer	L7"33	85
Kultura Valoro de Int. Lingvo	I. Lapenna	** 7"45	2-00
Lecture in English on Esp.	Cavanagh	M7"33	75
Perfekta Prononcado (blua)	E. Lapenna	* 7"45	85
Perfekta Prononcado (verda)	Flego/Peyronnet	* 7"45	85
Perfekta Prononcado has 1½" centre aperture			
Pronunciation Disc	J. C. Wells	**L7"45	75
Salutparoladoj de 49a Kong.		M7"33	80
Tra La Mondo	6 Discs and Book		18-25

DIVERSAĴOJ

Albumo por Esperantaj Poŝtmarkoj			2-50
Basic Facts about the International Language			18
Bildlibro — Life of Zamenhof			10
Car Window Stickers		3" X 10"	6
1: Do you speak ESPERANTO?			
2: Learn the international language ESPERANTO			
Freedom of Speech			15
First Foreign Language for All Mankind			35
Glumarkoj			
(Stelo "ESPERANTO")		Pkt 100	25
Kovertoj (Envelopes)			
"Use ESPERANTO"		Pkt 20	25
Mondmapo		40" X 28"	1-20
Myth and Fact about Esperanto			18
Portreto de Zamenhof		Postcard	10
Pulĉinelo (Similetas al Scrabble)			55
Yes, Esperanto is the Answer			18

Forto de la Vere	E. Adi	N 50b	90
Freŝa Mateno	R. Kritz	N 300B	1-95
Fundamenta Krestomatio	L. Zamenhof	*M 350B	2-75
Fundamentaj Reguloj de la			
Vortteorio en Esperanto	R. de Saussure	M 40b	1-10
Fundamento de Esperanto	L. Zamenhof	*M 350B	3-35
Fundamento de Esperanto	(Malgranda)	M 90b	35
Gaja Leganto per Esperanto	P. Schwerin	*N 48b	35
Gajaj Klubverseroj	G. Riisberg	*N 32b	55
Galileo Galileo	B. Caraca	N 60b	48
Gosta Berling	S. Lagerlof	N 550B	3-20
Granda Aventuro	F. Szilagyi	*N 140B	1-60
Gvidilo tra la Esperanta Movado	G. de Bruin	N 75b	60
Hamlet	Shakespeare/Newell	T 250b	2-45
Hamlet	Shakespeare/ Zamenhof	T 206B	2-90
Hermano kaj Doroteo	Goethe	T 80b	25
Himnaro Esperanta		KR 200b	80
Historio de la Lingvo Esperanto	E. Privat		
	Vol. I	M 70b	60
	Vol. II	M 190b	95
	Kunbinditaj	M B	1-60
Historio de SAT		M 100b	1-35
Historio de Usono	da Silva	N 28p	13
Homoj kaj Riveroj	J. Rosbach	N 130B	1-80
Homo sur Sia Vojo	M. Mandez	N 230B	4-50
Homoj Sur la Tero	S. Engholm	N 120b	2-65
Humoroj	W. Auld	P 100b	2-00
Hundo Kruso	R. Ballantyne	N 150b	42
Idetoj	D. Faux	*I 25b	30
Ifigenio en Taŭrido	Goethe/Zamenhof	T 140b	95
Imitado de Kristo	T. Kempis	R	1-25
Infana Raso	W. Auld	P 120b	1-55
Infanoj Ne Konas Limojn	S. Waagennar	N 120b	80
Inter Sudo kaj Nordo	F. Szilagyi	*N 180b	1-68
Internacia Kuirlibro	J. Shoter-Eyck	S 190b	3-60
Internacia Lingvo	I. Lappena	M 190B	1-55
Islandaj Pravoĉoj	B. Ragnarsson	N 110b	1-90
		N 110B	2-40
Italaj Rakontoj	A. de Amicas	IN 130b	52
Janis Ranis		P 30b	56
Japana Kvodlibeto	T. Nakamura	N 130b	1-25
Japanujo Hieraaŭ kaj Hodiaŭ		G 35p	40
Jaroj sur Tero	L. Sinha	N 130b	2-35
Jolanto (Filino de l'Reĝo)	Hertz	P 90b	25
Jozefo	J. Applebaum	P 100b	1-05
Junaga Verkaro	E. Privat	N 130b	1-20
Junaj Detektivoj	J. Sullivan	*I 60b	50
Junaj Trezorserĉantoj	J. Sullivan	*I 25b	30
Kaj Nun Ni Eklaboru!	(Aladina Ser.)	I 12b	20
Kaj Tamen Dio Estas Amo	Korf	R b	35
Kalevala	Finna Eposo	P 350B	6-25
Kampomuso Ekskursas	(Aladina Ser.)	I 12b	20
Kanako el Kananam	K. Linton	*GN 200B	2-00
Kantoj kaj Rakontoj		*I 25b	30
Kantoj kaj Romancoj	H. Heine	P 380B	6-00
Karlo	E. Privat	*I 45b	42
Karnivalo kaj Somnambulino	K. Immermann	N 100b	35
Kaŭzakaj Rakontoj	M. Lermontov	N 70b	1-35
Kie Boacoj Vagadas	S. Salovaara	N 70b	1-00
Kiel Akvo de l'Rivero	R. Schwartz	N 475B	3-80
Kiel Aŭtodidakto al la Pedagogia Scienco	K. Wieszorek	S 40b	55
Kien la Poezio ?	B. Clarke	SP 155B	1-80
Kion Rakontas la Amikoj de Peĉjo	Muhlen	I 50b	25
Kion Vi Faras ?		*I 30b	30
Kiso de Reĝino	I. Najibin	N 190b	35
Koloroj	J. Baghy	N 105b	82

Kon Tiki	T. Heyerdahl	*GN 200B	3-50
Konciza Historio pri la Kornvala Lingvo		G 20b	60
Kontralte	M. Boulton	P 280b	1-85
Kredo, Floro, Dinamito	Olsson/Henrikkson	N 80B	2-40
Kristo Interne de Vi		R b	85
Kun Niaj Amikoj la Bestoj	(Aladina Ser.)	I 12b	20
Kuraĝa Tamburisto	(Aladina Ser.)	I 12b	20
Kvar Prelegoj pri Esperanta Literaturo	D. Kralj	M 60b	1-05
Kvara Rapsodio	F. Szilagyi	*N 48b	75
Kvasaroj . . . Ĉu Estingitaj Sunsistemoj?	M. Halvelik	S 75b	1-45
50 Jarojn kun Paul Nysten		M 60b	1-38
Leteroj el Mia Muelejo	A. Daudet	N 25p	45
Leteroj de Zamenhof	Waringhien		
	Vol 1	*M 250B	2-00
	Vol. 2	*M 300B	2-50
	Ambaŭ		3-50
	K. Capek	*N 105b	1-10
Libro de Apokifroj		R 36b	35
Leteroj el la Transcendo	P. Peneter	P 260B	4-85
Libro de Amo	T. Nakamura	G 100B	2-65
Libro de Teo	E. Privat	M 150b	1-25
Life of Zamenhof	L. Zamenhof	*M 130b	1-35
Lingvaj Respondoj	K. Kalocsay	M 140B	1-05
Lingvo, Stilo, Formo	G. Waringhien	M 450B	4-20
Lingvo kaj Vivo	J. Sullivan	*I 25b	30
Longa Marŝo, La	N. Rimanto	I 20b	20
Ludilo 2a ABC Libro	R. Tagore	N 130B	3-08
Malsata Ŝtono	Orzesko/Zamenhof	*N 220B	3-75
Marta	J. Hernandez	P 275B	3-90
Martin Fierro	Anderson	I 50B	2-00
Marvirineto (bele ilustr.)	T. Svarč	N 280b	2-85
Maskerado ĉirkau la Morto	S. Szathmari	N 175B	1-55
Maŝinmondo	Skaljer-Race	P 60B	1-80
Maristo Surmaste		M 100B	3-35
Memorlibro de Zamenhof-Jaro	W. Trobisch	N 140b	1-45
Mi Amas Junulinon			
Mi Serĉis Oron kaj Oeon sed Trovis	D. Flood	N 130B	1-45
Mia Poŝhorlogo kaj la Fumo	M. Konopnicka	N 40b	48
Mikspoto	B. Trudić	N 135B	1-35
Mirinda Eliksiro	J. Rosbach	N 100b	1-35
Miru, Pensu, Ridu!	P. Bennemann	N 250B	1-48
Mistero de l'Sango	Battalgia	S 150B	75
Misteroj de l'Vivo	B. Hogsted	N 90b	70
Mistero Minora	F. Szilagyi	*N 120B	1-80
Mondpercepto de la Moderna Natura Scienco		S 170B	2-85
Monoteismo kaj Pozitiva Moralo	E. Gasse	R 60b	1-35
Mondo Rakontas, La	T. Killian	N 46b	1-00
Natura Nutrado	O. Ramby	S 15b	30
Naŭzo, La	J. Sartre	N 220B	3-70
Ne Tiel sed Tiel Ĉi!	F. Faulhaber	*L 50b	1-15
Neĝulino, La	Grimm	I 12p	32
Nekonatino, La	R. Muschler	N 72b	90
Nepalo Malfermas la Pordon	T. Sekelj	NG 200b	3-00
Nevenkebla Geno, La	Thijssen	N 320b	1-10
Ni Aktoras	M. Boulton	*T 34b	55
Ni en Skandinavio	W. Brienholst	NG b	50
Ni Homoj	Z. Heide	N 72b	1-90
Ni Komedietas	Z. Heide	*T 34b	55
Ni Parolu Esperanton	R. Markarian	*L 40b	1-05
Nia Historio	H. de Hoog	M 150B	1-55
Nia Korpo	S. Niŝi	S 100B	2-25
Nia Sango	M. Boulton	*T 30b	30
Nia Teatro		T 60b	30
Nigra Galerio	Raabe	N 60b	25

Niko kaj Nino	J. Berger	*I 70b	75
Nobla Korano (Esperanta, Araba)		R 700B	7-45
Nokto da Timo	B. Potts	N 80b	1-35
Norda Naturo	H. Dresen	P 140b	1-45
Normandaj Rakontoj	Maupassant	N 200B	3-20
Nova Ezopo	S. Ūrban	P 120b	1-15
Nova Testamento	(Poŝlibro)	R 250B	1-20
Novaj Esperantaj Historietoj		M 70b	90
Novoj Vestoj de Imperiestro	(Bele Ilust.)	I 50B	2-10
Nur Tri Koloroj	E. Urbanova	P 140b	1-10
Okuloj	M. Boulton	N 180b	1-95
Ombroj de la 4a Dimensio	E. de Kock	P 160b	1-55
Ora Duopo	Baghy/Kalocsay	*P 170B	2-20
Orharulo kaj Ruĝakresto	(Aladina Ser.)	I 12b	20
Oriento kaj Okcidento	G. Fradier	M 50b	45
Originala Verkaro	L. Zamenhof	*M 600B	3-45
Otelo, La Maŭro de Venecio	Shakespeare/Rossetti	T 200b	1-80
Panjo	J. Seifert	P 80b	1-00
Papalagoj, La	T. de Tiavea	*N 80b	60
Parnasa Gvidlibro	Kalocsay/Waringhien/Bernard	PS b	1-80
Paraoladoj kaj Poemoj	L. Zamenhof	M b	1-25
Pasko	A. Strindberg	N 88b	50
Paŝoj al Plena Posedo	W. Auld	*L 240b	2-00
Patromurdo en Nigra Muelejo	Rath-Vegh	N 20p	28
Pinta Kraĵono	R. Rosetti	P 125b	1-05
Planlingvaj Problemoj	W. Gilbert	M 80b	1-15
Pli kaj Pli Rapide	(Aladina Ser.)	I 12b	20
Pli ol Fantazio	Borg-Hogsted	N 70b	1-00
Por la Praktikantoj	P. Babim	* 80b	1-85
Portugala Literaturo	da Silva	N 30p	14
Pri Arto kaj Morto	M. Miyamoto	P 180B	2-45
Pri la Vortfarado en Esp.	J. Isbrucker	S 24b	40
Princino de Marso	E. Burroughs	N 180b	35
Printempo de la Morto	L. Zilahy	N 120b	1-20
Pro Iŝtar	H. Luyken	*N 300B	2-25
Profeto, La	Gilbran	N 120b	1-10
Proverbaro Esperanta	L. Zamenhof	*N 150b	1-52
Provo Alfronti la Vivon	I. Georgiev	P 112b	1-05
Psalmaro	(Poŝlibro)	KR 224b	35
Rabeno de Baharah	S. Alajhem	N 70b	68
Radiana Lotuso	J. Degreef	N 200b	1-00
Rakontoj de Ooagi		NG 120B	2-75
Rakontoj por Geknaboj	A. Paolet	I 90p	46
Rakontu Samideano		N 60b	95
Ratkaptisto el Hamleno	(Aladina Ser.)	I 12b	20
Reĉoj	Jugoslavia	P 110b	1-05
Reĝo Edipo kaj Antigono	Sofoklo	P 216b	1-80
Reĝo Lear	Shakespeare/Kalocsay	T 150b	3-65
Rimoj por Infanoj		I 25p	35
Retoriko	I. Lapenna	SMN300B	5-50
Romeo, Julieto kaj la Tenebro	Otceansek	N 180b	1-80
Roza Luksemburg	Holst/Wels	N 230b	1-85
Sageoj kaj Rakontoj laŭlonge de la Rejno		N 48b	85
Saltego trans Jarmiloj	J. Forge	*N 190b	75
Sango kaj Sablo	V. Ibanez	N 230b	2-75
Sankta Biblio	(Tolebindita)	R 225B	3-50
	(Ledebindita)		5-70
Sciencaj Studoj	P. Neergaard	S 250b	4.30
Sekretoj de la Marestajoj	P. Guinio	NS 140b	1-35
Sen Elirejo — La Respektama	P. J. Sartre	TP 120b	1-65
Sen Paraŝuto	P. Thorsen	P 110b	1-15
Senĝenaj Dialogoj	A. Fernandez	NS 200B	3-50
Sep Fratoj	Kivi	N 350B	1-95
Sinjoro Longkrurulo	D. Uitterdijk	I 50b	38
Sinjoro Tadeo	A. Mickiewicz	P 330B	1-50
Skurila Libro	A. Sproek	P 90b	1-75
Soifo	L. Tarkony	P 230b	2-45

Somera Simfonio	A. Leerhard	P 25b	1-15
Somermeznokta Sonĝo	Shakespeare/Kalocsay	T 100b	1-45
Songe sub Pomarbo	J. Baghy	*T 220b	1-80
Stranga Butiko	R. Schwartz	N b	85
Specimene	H. Baupierre	N 120b	1-55
Sub la Ĉielo	D. Faux	*IKN 25b	30
Sub la Signo de la Verda Stelo	P. Fra Hamri	M 70b	90
Sub Stelo Rigida	P. Fra Hamri	P 130b	1-15
Sub la Verda Standardo	Laborilo I	L 60b	40
Sur la Vivoĵoj	A. Logvin	P 110b	1-15
Sur Insulo Malproksima	J. Hemert	N 80b	65
Sveda Novelaro	F. Szilagy	N 230B	1-55
Ŝipego "Tenacity", La	Vildrac/Bernard	T (Kun "Topaze")	
Ŝipestro Rakontas	F. Lindqvist	N 70b	1-65
Ŝtupoj sen Nomo	B. Ragnarson	P 120b	1-10
Taglaboristo	H. Kink	N 220B	3-20
Taglibro de Anne Frank	Degenkamp	N 220B	2-50
Taglibro de Kongresano	V. Setala	N 25p	20
Tartarin de Taraskono	A. Daudet	N 200B	1-40
Teatra Korbo	J. Baghy	T 110b	50
Tempesto, La	Shakespeare/Kalocsay	T 140b	2-00
Tempesto super Akonkagvo	T. Sekelj	NG 240b	2-40
Tom kaj Tina	O. Nederland	I 45b	80
Tom kaj Tina en Flugmaŝino	O. Nederland	I 45B	1-65
Topaze	M. Pagnol	N	
(kun:—Ŝipego "Tenacity")		T 290b	2-10
Tra la Lando de la Indianoj	T. Sekelj	NG 186B	5-70
Tra la Mondo	P. Benneman	N 96b	40
Tragedio de l'Hom	I. Madach	P 260B	2-50
Tragedio en la Universo	Junaj Astronomoj	SN 95b	75
Tri Oraj Haroj de l'Diablo	Grimm	N 35p	20
Tri Satiroj	Domanovia	N 40b	30
Tri	F. Szilagy	*N 50b	45
Tri Rapsodio	W. Galdert	N 150b	1-65
Trifoje Akurate je la Dekdua Hor	Red: Rossetti/Szilagy	N 320B	3-90
33 Rakontoj	Voltaire	N 300b	2-35
Tri Verkoj de Volter	Shakespeare	T 95b	35
Trojlo kaj Kresido	N	b	50
Universala Legolibro	M. Halvelik	S 130b	2-35
Universala Skribo	W. Auld	P 120b	1-05
Unufingraj Melodioj	W. Kloeppfer	N b	95
Vagabondo kaj Sinjorino	J. Robillard	G b	68
Vagado sub Palmoj	J. Baghy	N 75b	1-00
Verda Koro	J. Forge	*N 150B	2-10
Verda Raketo	H. Adamson	P 120b	1-65
Vesperkanto	(Aladina Ser.)	I 12b	20
Vespero en la Cirko	M. Boulton	T 200B	2-00
Virino ĉe la Landlimo	J. Francis	N 135b	1-25
Vitr	E. Privat	N 160b	2-00
Vivo de Gandhi	P. Neergaard	S 127b	2-05
Vivo de la Plantoj	C. Dickens	R 120b	98
Vivo de Nia Sinjoro Jesuo	E. Privat	*M 130B	1-30
Vivo de Zamenhof	da Silva	N 106b	50
Vivo de Zola	S. Engholm	N 180b	1-55
Vivo Vokas	J. Robillard	*N 140b	1-55
Vivo kaj Opinioj de M. Saun	BEA	M 50b	45
Vivu la Stel'	S. Szathman	G 315b	2-45
Vojago al Kazohiono	R. Schwartz	N 192B	4-65
Vol: — Novele	D. Faux	*I 25b	30
Vortludoj	I. Fekete	N 85B	1-70
Vuk	M. Boulton	M 265b	3-00
Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto		M 265B	3-95
Zamenhof, Creator of Esperanto	M. Boulton	M 235B	1-65
Zamenhofa Esperanto		M 328b	3-00
(Simpozio pri "ita-ata")			
Zinoo Szootoo Ki	K. Nohara	N 200b	80

Aladina serio estas bele ilustritaj infanlibroj.

Tiumatene en akre malvarma vetero Rogers observis Tonion, kiu staris apud malgranda fajro, sed anstataŭ varmigi sin mem, li hejtis la sablon, antaŭ ol ĵeti ĝin sur la glacian deklivon.

Rogers alproksimiĝis kaj salutis lin. "Bonan matenon, Tonio, li diris. "Mi estas la nova ĉeflaboristo. La estro informis min, kia bonega laboristo vi estas". Tiam Rogers rakontis al li, kion diris la estro.

"Kial li ne diris tion al mi antaŭe?" Tonio kriis kun larmoj en la okuloj. "Dankon, dankon". Kaj li pumpumis la brakon de Rogers tre forte. Tiam li ekprenis la ŝovelilon kaj laboregis.

Tiunokte la populara temo estis Tonio. "Hodiaŭ li ĵetis sufiĉan sablon por kovri dek deklivojn", diris unu. "Kio okazis al li? diris dua. "Li ridis kaj ĉirpis la tutan tagon", diris tria.

Nur Rogers sciis la veron, kaj, dek jarojn poste, kiam li trovis Tonion en la posteno de intendanto por fervoja konstruo ĉe granda lingnaja firmao, Tonio diris al li: "Tiun momenton, kiam vi parolis al mi, vi ŝanĝis mian tutan vivon" — El la angla tradukis Ken G. Linton.

FAKTOJ PRI LA VIVO

Henriko Garnet estis bonstata borsisto. Li havis filon, Niko, kiu estis studento ĉe universitato kaj tre bona tenis-ludanto. Lia patro esperis vidi lin iam estonte ludanto por la Pokalo Davis.

Ĉe restoracia manĝo iu amiko konsilis al Henriko, ke li permesu la dekokjaran filon iri al Montekarlo por tie konkursi tenise en grava konkurso, sed Henriko tute ne volis. Malplaĉis al li la ideo pro kelkaj kaŭzoj — interrompo de studado meze de trimestro kaj duboj pri malŝagajtoj timinde fareblaj de juna viro en fremda urbo k.t.p. Tamen li fine konsentis post diskuton kun la edzino, kiu favoris vojaĝon, kaj fine ĉio estis aranĝita. Antaŭ la foriro al Montekarlo, Henriko admonis sian filon: — "Ne plaĉas al mi, ke vi iras al loko kia Montekarlo. Espereble vi estos sagaca kaj tento-rezista kontraŭ iuj danĝeroj tie facile renkonteblaj. Unue: Ne vetludu; ne prutedonu monon: ne havu aferon kun virinoj — evitu ilin!"

Kaj Niko diris: "Mi ne forgesos vian admonon. Tion mi promesas".

"Bone, mia filo", fide respondis la patro.

En Montekarlo Niko malmulte fumis, ne drinkis kaj frue enlitiĝis, ĝis tiam,

kiam la tenisludantoj havis festan manĝon, post kiu Niko iom hezite akompanis ilin al kazino. Okulfikse li rigardis la ruletan ludtablon. Konato alproksimiĝis al li, dirante: "Ĉu vi jam gajne ludis?"

"Ho ne, mi ne ludis. Jen la unua okazo en kiu mi vizitis kazonon".

"Saĝa homo vi estas; venu kaj havu drinkaĵon".

Dum ili trinkis, la konato tamen pensis bone, ke Niko havu almenaŭ iom da ludado ĉe la ruleta tablo: "Estus idiote ne kapti specialan okazon por provi la ŝanco". Niko malforte konsentis kaj, venante sur numero 18, sia aĝ-jaro, li fine gajnis, post serio da ludoj, sep mil frankojn.

En tiu momento li rememoris la patran admonon.

Tiam venis al li junulino. Si rimarkis: "Vi estas bonŝanca. Ĉu vi prunedonus al mi mil frankojn? Mi perdis tutan mian nun haveblan monon. Mi repagus al vi post duonhoro".

"Bone", li diris. Si malaperis inter la amason ĉe la ludtablo.

Lia konato flustris: "Vi ne revidos vian monon"

Ankoraŭfoje Niko pripensis la patran admonon.

Li refoje provis sian bonŝancon, fine gajninte ĝis dudek mil frankojn. Li estis ŝovanta ilin en poŝon, kiam reaperis la junulino: "Dankon pro la prunto. Jen repago". Li ridis. "Kial vi ridas?" ŝi demandis. Niko respondis "Por diri la veron, mi ne esper-atendis ricevi la monon de vi". Si ridete respondis amike: "Ho, mi ne estas malmorala koketulo, sentaŭgulo". Si paŭtis. "Mia edzo estas en Maroko, kaj mi en Montekarlo dum kelke da semajnoj por profiti la pli dolĉan klimaton".

Niko informis ŝin, ke morgaŭ li devos flugi al Londono; sekve li devos frue ellitiĝi, ĉirkaŭ la sesa horo.

Aferoj disvolviĝis. Niko iris kun ŝi al dancbalo, manĝis bonstile en restoracio kaj iom multe drinkis ĉampanon. Post tio ili iris taksie al ŝia loĝejo. Ili jam kelkajn fojojn interkisis. Ĉe la sojlo li pagis la taksiston kaj al ŝi diris: "Mi nun marŝos al mia hotelo. Aero freŝa portos al mi bonon". Si tiam diris: — "Antaŭe, tamen mi volas vidiĝi al vi foton de mia fileto, la karuleto. Ĝi staras sur meblo en mia ĉambro". Niko sekvis; li ne multe deziris vidi la foton, sed ne volis ofendi la junulinon. Jam en la ĉambro ŝi forte lin karesis, febre kisante.

Ankoraŭ fojon, Niko rememoris la admonon de sia patro, sed tuj poste tute forgesis pri ĝi

Niko estis malprofunda dormanto; eĉ brueto lin vekadis. Du-tri horojn post enlitiĝo li vekigis pro sono. Iu sin movas en la ĉambro. Estis ŝi, kiu nun serĉis en poŝoj de liaj vestoj. Malrapide ŝi eligis la dudek milfrankajn biletojn, tiam zorge rearanĝis la vestojn. Niko timis paroli, aŭ iel brufari, ĉar tio povus rezultigi por li embarason ĉe la hotelistoj. Do li ankoraŭ pretekstis spiradi kiel dormanto.

La junulino iris al cineraria florpoto kaj levis la planton, enmetinte sub ĝi la monon. Tiam senbrue, kvazaŭ fantome, ŝi enlitis en la liton. Ŝi prove murmuris "Karulo", sed Niko ankoraŭ spiradis iom ronke. Tial la ino iris en profundan dormon, kvazaŭ nenio okazis por interrompi la unuan dormon, se efektive ŝi jam antaŭe dormis.

Niko kuŝis, pensante indigne: "La friponino! La edzo. La fileto dolĉa! Aĉa ŝtelistino ŝi estas . . . mi reĝustigos la aferon!"

Li atendis ĝis ŝi eligis la konatajn sonojn de dormanto. "Karulo!" li flustris. Nenia respondo. Silente, kiel kobro, li elglitis el la lito kaj per facilaj paŝetoj piedpinte iris al la cineraria florpoto, eliris la monbiletojn kaj remetis la planton, zorge ebenigante la teraĵon. Tiam li sin revestis — felice per simplaj vestoj — prenis la ŝuojn en mano kaj atingis la ĉambropordon. Tiun li devis malŝlosi. La ŝlosilo grincis. "Kiu estas tie?" venis voĉo el la lito. "Estas mi. Jam la sesa, kaj mi devas iri for. Pardonu, ke mi vin vekis".

"Ho ja, mi forgesis pri via foriro. Estu senbrua dum vi foriras. La hotelanoj ne amas frumatenan bruaĵon. Vi estas bela knabo kaj amanto neforgesebla. Bonan vojaĝon!"

Niko iris al sia hotelo, pagis la kalkulon el la aparta mono, kiun jam antaŭe li ricevis de la patro kiel vojaĝelspezon. Nun li kalkulis la monon antaŭe prenititan el la florpoto. Anstataŭ dudek, li ekvidis dudek ses milfrankajn biletojn! Ĉu vere li gajnis ĉe la ludtablon pli ol la kredatan dudek-milan? Miregante, li denove ilin kalkulis. Subite li konsciis pri la vero. Ĉe la florpoto tiunokte li ekteneĝis ĉiom de la mono, kiom liaj fingroj povis palpi. La florpoto estis ŝia kasuo, monujo, kaj li prenis tiam ne nur sian, sed ankaŭ ŝian. Li ekridegis. Jen komika okazo! Li imagis ŝin vane serĉanta al la propraj ses mil frankoj, ne plu por ŝi troveblaj. Ne nur lia, sed ankaŭ ŝia mono jam kuŝis en lia posedo. Nenio farebla jam; li konis nek ŝian nomon, nek tiun de la hotelo al kiu ŝi lin kondukis en tiu nokto, kiam li estis iom pens-nebula pro ĉampano. "Ŝi meritas la perdon", li memkontente konkludis.

Tio estas la rakonto, kiun la patro Hendriko poste diris al siaj amikoj ĉe sia elita klubejo. "Kio min kolerigas, tio estas: ke li estas tiel fiera pris sia farado. Sciu, ke li diris al mi. 'Patro, mi pensas, ke via konsilo ne tute taŭgas. Vi diris: ne vetludu. Vetludinte, mi gajnis multe da mono. Vi diris: ne pruntedonu. Pruntedoninte, mi bone ricevis la monon. Vi diris: ne havu aferon kun virino. Tiel farante, mi gajnis pluan ses-milon da frankoj!'"

Henriko ĝemis: "Ridu laŭ via plaĉo, amikoj! Tamen estas al mi embarase. Mia filo rigardas min malsaĝulo. Ne valoras al mi, rimarkigi, ke lia sperto estas nur tre escepta, tre malofta. Li male rigardas sin kiel saĝe lertan homon. Tio finfine povas ruiniĝi al li la vivon. Vi devas konfesi, ke mia konsilo estis kaj restas bona principo de la vivo. Tamen, fine, diru al mi: Kiel mi frontu la situacion?"

Neniu el la amikoj povis lin konsili pri lia mistrafinta konsilo.

Kiam ili adiaŭe levigis por disigi, diris juristo: "Mi kredas, ke via filo naskiĝis kiel bonŝanculo. Kaj tio estas dumvive pli bona ol esti naskita kiel riĉa au inteligenta".

—El la Angla tradukis Robo.

BONVOLU RIDETI !

Kiam Lordo Halifax estis juna viro, li trajne veturis unu tagon de Londono al Bath. Li sidis inter du nejunaj fraulinaj, kiuj havis severe malagrablajn mienojn. Dun la longa veturado neniu el la tri personoj parolis vorton.

Guste antaŭ ol atingi la urbon Bath, la trajno eniris tunelon. La juna Halifax, en la densa mallumo, metis sian manon dorso al la lipoj kaj faris kiso-sonon tre laŭte. Kiam la trajno eliris en la lumon, fine de la tunelo, li rigardis al unu kaj al alia ŝokita sinjorino kaj diris kun gaja rideto: "Al kiu el vi du ĉarmaj sinjorinoj mi ŝuldas tiun tre plezurigan geston?" Li elvagoniĝis, dum la du nejunulinoj suspekteme rigardis akre unu al la alia.

Virinĉasemulo, "homlupo", molestulo al knabinoj, serĉis amaferon en hotel-vestiblo. Fine li ekvidis beletan knabon preterpasantan. Kiam liaj kutimaj komencvortoj ricevis nur glacie-malvarman rifuz-rigardon, li sarkasme murmuris "Pardonu al mi. Mi pensis, ke vi estas mia patrino".

"Tio ne povas esti", ŝi tranĉe diris, "mi estas edzino".

"Kiamaniere, Sara, vi sukcesis fari tian belan ornamajon sur la prun-torto?" demandis dommastrino al sia kuiristino, "ĉiuj gastoj trege admiris ĝin!"

"Simple", respondis Sara, "por tio mi uzis mian falsdentaron".

Aŭstralia soldato seninterese, sencele paŝis tien-reen sur la planko de Londona ripozdomo por armeanoj. Pzis la tempo, kiu rampis limakpaŝe pro la enuo. Mankis al li amiko, konato. Tiam subite li ekvidis neĵunan viron, starantan iom fore. Hezite la Aŭstraliano lin aliris kaj diris: "Ĉu eble plaĉus al vi drinkaĵo kun mi?" Venis respondo: "Ne, dankon. Jam mi glutis drinkaĵon, sed ĝin mi tute ne ĝuis." Iom rebatite, la Aŭstraliano silentiĝis. Poste, prenante denove al si kuragon, li sugestis: "Ĉu cigaredo, do?" "Ne, dankon. Ĝam mi fumis cigaredon, sed ne ĝin ĝuis".

Post kelkaj minutoj la Aŭstraliano ankoraŭ fojon volis amikiĝi kun la nekonato, sugestante, ke eble ludo de bilardo . . . ? Simila rifuzo vaniĝis ankaŭ tiun provon . . . ankaŭ tion la nekonato jam antaue havis, sed tute ne ĝuis.

Li eksidiĝis kaj restis senvortaj ĝis eniris la ĉambron juna uniformita viro. Diris la nelogebla viro: "Jen mia filo. Eble al li plaĉus ludo iaspeca". La Aŭstraliano mire levis rigardon al la juŝveninto: "Via filo, ĉu vere? Mi supozas, ke li estas via unusola infano".

LIBERA FORUMO

Sajnas al mi, ke la elspezo de \$1290 por reklami Esperanton per la fama Reader's Digest estas iom tro granda rilate al la modesta financo de la Aŭstralia Asocio, precipe se oni konsideras, ke la eldonajo estas aŭstralia kaj dissendata sole nur en nia kontinento; en la aliaj mondpartoj ĝi aperas laŭ apartaj eldonajoj, en kiuj nia reklamo tute ne legiĝas.

Per tia konsiderinda sumo sendube oni povus fari multan pli fruktodonan propagandon! — C. J. Caldera.

Mi subtenas la vidpunkton de H. Koppel laŭ letero lia (okt. A.E.) kaj malaprobas elspezon de \$1300 por unu reklamo en Reader's Digest. — Percy Holmes.

STELKURZO

La lasta listo aperis en la UEA-jarlibro 1968 unua parto. Libro-aĉetantoj saĝe studus ĝin. Ekz-e: I stelo = \$0.07 Aust. = 0.55 Dana krono. Eldonistoj utile farus, indikante prezojn per steloj.

RECENZOJ

Ni Ludas Teatraĵoj: E. V. Tvarozek. 30 paĝoj. 4 Danaĵ kr. Eld. Dansk E-Forlag, Aabyhoj.

"Koluma Maŝo", unuakta, akiris laŭdon ĉe la Belartaj Konkursoj 1970. Edzo, veninte hejmen malfrue, vortskermas kun la edzino por ŝia jaluzeto. Ĝi postulas bonan aktorecon por fari la enhavon sufiĉe impresa.

Pli frape klarsenca kaj aŭde komprenebla estas "Nokta Vizito", kvarpersona teatraĵo. Profesoro, minacata de ŝtatagentoj cedi al ili sian inventon, ruze oferas ĝin al sia kamena flamo, prefere ol lasi ĝin en la manojn de danageraj politikistoj. La teatraĵo akiris 3-an premion ĉe la Belartaj Konkursoj 1969.

Facile ludebla estas "Samsortanoj" (baze sur rakonto de O. Henry): ŝtelisto kaj lia intencita pri-ŝteloto trovas kamaradan komunecon en tio, ke ili ambaŭ sam-malsane suferas. Drole! "Ĉe Stratangulo": vojŝtelisto kaj lia viktimo dialogas pri sia respektiva edzino kaj ties drasta sinteno al la edzo kiu revenas hejmen sen mono. Amuza fino.

La Ĉeĥa aŭtoro estas konata kiel konkursanto literatura.

"La Recto", teatraĵo de Bukar. 32 paĝoj. Sama prezo kaj eldonejo.

Bonkvalita teatraĵo de speco detektiveca. Kun streĉa atento oni legas ĝin ĝis "Kurteno". La lingvaĵo de ambaŭ libretoj estas klara, korekta, konciza. La sceno: Franca vilaĝeto ekonomie kadukiĝanta, en kiu unubraka junulino forvegetas, izola, senespera. Pasintempa murdo ombras en la fono. Viro venas en ŝian vivon, eltrovas la kriminton kaj vane klopodas savi ŝin el ŝia animmortiga vivmedio.

"Bukar" estas pseŭdonimo de konata Pariza sam-o.

Notu: jori (skid); karoserio (car body) spoto (spotlight).

A.E.A. LIBROSERVO

Via libroservanto pardonpetas pro sia eraro pri la prezo de VOLE-NOVELE (R. Schwartz). La ĝusta prezo: \$4.65. Internacia Kuirlibro; J. Shoter-Syck 3.60 Tra Lando de Indianoj; T. Sekelj 5.70 (bind.)

Besto-Farmo; G. Orwell 2.20

Sageoj kaj Rakontoj Laŭlonge de la Rejno; J. Pagenstecher 85

Kiel Aŭtodidakto al Pedagogia Scienco; K. Wiczorek 55

Pasko; J. Strindberg, 50

Burĝonoj (bildaro kaj poemoj pri infanoj); V. Setala. Bind. 1.20

WHAT WAS "BIG BERTHA"?

In "Reader's Digest" 3/68 is an article on the great gun that bombarded Paris in 1918 from a distance of 70 miles. Its barrel was long enough to reach the top of a ten-story building. The author of the article called it "Big Bertha". Germans, however, never named it so. The real Big Bertha, so named after Bertha Krupp, was largely used in the Verdun battle, 1916. It was a 420-millimetre, 17-inch calibre weapon and fired a shell weighing over a ton. The cannon that hit Paris fired shells of 265 lbs.

Big Bertha, dismantled into 172 parts for transport and took 20 hours to re-assemble for firing. Its range was several miles, but much less than that of the monster that bombarded the French capital in 1918.

KIO ESTIS "GRANDA BERTA"?

En "Reader's Digest" 3/68 estas artikolo pri la grandega kanono, kiu, for 70 mejlojn, bombardis Parizon en 1918. Ĝia tubo estis sufiĉe longa por atingi supron de dek-etaĝa konstruaĵo. La aŭtoro de la artikolo nomis ĝin Granda Berta. Tamen Germanoj neniam tiel nomis ĝin. La efektiva Granda Berta, tiel nomata post iu virino, Berta Krupp, estis grande uzita en la batalo ĉe Verdun en 1916. Ĝi estis kanono 420-milimetra, kalibro 17-cola, kaj elfafis obuson pli ol tun-pezan. La kanonego, kiu trafis Parizon, pafis obusojn 265-funtajn.

Granda Berta malmuntigis en 172 partojn por transporto, kaj por ilin remeti ĝis uzpreto necesis 20 horoj. Ĝia paf-distanco estis nur kelkmejlaj—multe malpli longa ol tiu de la kanonego, kiu en 1918 bombardis la Francan ĉefurbon.

JARLIBRO DE U.E.A., dua parto 1971. 336 paĝoj.

Sur 142 paĝoj estas ĝenerala katalogo de la nuntempaj aĉeteblaj literaturo kun resumaj priskriboj de ĉiuj pli gravaj libroj. Tio estas senprecedenta en la historio de E-o kaj valorega konsultilo. Simile utila estas listo de 37 diskoj gramofonaj. Tri paĝoj da Nov-Zelandaĵ reklamoj (7 eroj).

Zamenhof-str. en Literaturo.

Zamenhof-str. en Varsovio estas unu el 278 stratoj, placoj k.t.p. en 22 landoj (A. Holzhaus, 1965). Ĝi estis tiel nomita en 1931. En sia: "Mila-18" (Corgi Books), rakonto pri la heroo Getta Batalo en 1943, Leon Ŭris menciis ĝin interalie kiel scenon de la terura lukto.

Mi deziras informi

ke je la 13-a de Novembro, 1971, ĉe sia hejmo, Ges-roj H. Koppel gastigis kelkajn geamikojn; la okazaĵo estis la dudeka datreveno de la geedziĝo. La vespero estis tre ĝuplena. Sinjoro Koppel, mi gratulas vin, la trinkaĵo estis tre bongusta kaj Sinjorino Koppel, kredu al mi, la manĝaĵoj estis nesupereblaj. Mi dankas vin ke mi povis ĉeesti la feston. May FROGLEY.

REGO HENRIKO AL HOTSPUR**Shakespeare. Henry 5, akto 5.**

Kuraĝa Perso, iru bone!
Kiele velkis ambici' malĝusta!
Kiam animon havis via korpo,
Regneco estis por ĝi tro malvasta;
Sed nun, du jardoj da plej kruda tero
Sufiĉas ĝin — ĉi-teron, en kiu vi
kadavras,

Ne paŝas kavalir' egala vin.
Se vi konscius mian admir-diron,
Ne tiel amfervore mi parolus:
Vizaĝon sangan kovru mia skarpo,
Kaj, ja por vi, mi pensas ĝin tre bona,
Ke ĉi molpensan riton mi plenumis.
Al Di', meriton vian prenu vi ĉielen,
Kaj via honto dormu en la tombo,
Ne menciita sur la epitafo.

DANKEMECO DE MALJUNA SERVISTO**"Kiel plaĉas al Vi", akto 2, sc. 3.**

... Mi havas kvincent kronojn en posedo.
Servante vian patron, mi ĝin ŝparis
El la salajro, por min nutre flegi,
Kiam ne servos plu la febla korpo,
Kiam mi, maljuna, restos ignorata.
Ĝin prenu: Dio nutras al la korvoj
Kaj providence zorgas pri l'paseroj ...
Al mia aĝ' Li ankaŭ helpon donu. Jen la
mon —

La tuton mi donacas. Servu mi:
Aspektas mi maljuna, tamen fortas,
Ĉar dum juneco mi neniam trinkis
Likvorojn san-detruajn en la sangon,
Nek kun memfido kuris laŭ la vojoj
Kondukaj al trofrua kadukiĝo.
Similas aĝo mia viglan vintron,
Frostan sed bonvolan; iru mi kun vi;
La servon de pli juna vir' mi faros
Por vi en kiu ajn afero kaj bezono.
Trad. Farbo.

A.B.C. RADIO — On Dec. 2 Wilfred Thomas spoke with B.E.A. Secretary Herbert Platt at the London Esperanto Congress. Hope you heard it! If so, write him c/o BBC London.